



**STANISŁAW LEM**

**SURLOKA  
ESPLORO**

**STANISŁAW LEM**

# **SURLOKA ESPLORO**

**Tradukis Jurij Finkel**



# I. En Svisio

Alteriĝinte sur kabo Canaveral, mi fordonis la ŝipon por riparado kaj ekpensis pri ripozejo. Post tiom longa vojaĝo mi nepre devis ripozi. La Tero ŝajnas punkto nur el la kosmo, post alteriĝo tamen evidentiĝas, ke ĝi estas sufiĉe vasta. Kaj por bona ripozo ne sufiĉas belaj vidaĵoj – necesas krome konvena singardemo. Tial mi veturis al kuzo de profesoro Tarantoga, kiu havas saĝan kutimon legi ĵurnalojn ne tuj, sed post kelkaj semajnoj, kiam ili maturiĝos. Mi preferis elekti ripozlokon ĉe konato, ol en iu publika biblioteko. Trairi magnetajn kampojn de la Galaksio – tio ne estas bagatelo. La ostoj jam rimarkeble doloras. Krome, rememorigas pri si la genuo, kiun mi elartikigis en Himalaĵoj, en alpista tendaro, kiam alumina tabureto rompiĝis sub mi. La plej bona rimedo kontraŭ reŭmatismo estas: pli da seko kaj pli da varmo, certe, en klimata, ne en milita senco. La Proksima Oriento, kiel ĉiam, ne estis kalkulebla. La araboj, kiel antaŭe, prezentas per si plurtavolan kukon, en kiu iliaj ŝtatoj kuniĝas, disiĝas, unuiĝas kaj batalas inter si pro mil diversaj kaŭzoj, kiujn mi eĉ ne provas kompreni. La sudaj, sunaj deklivoj de Alpoj tute konvenus, sed tie jam ne paŝos mia piedo post la okazo, kiam oni ŝtelis min en Turino kiel filinon de duko di Cavalli, aŭ eble, di Piedimonte. Tio eĉ ĝis la fino mem ne klariĝis. Mi venis al astronaŭtika kongreso, la sesio finiĝis post noktomezo, morgaŭ mi devis flugi al Santiago, mi perdis vojon en la urbo, ne povis trovi la hotelon kaj enveturis iun subteran parkejon, por dormeti almenaŭ en la aŭto. La sola vaka loko estis, vere, ĉirkaŭbarita per diverskoloraj rubandetoj, ŝajne, signante, ke la filino de la duko fianĉiniĝis, sed mi nenion sciis pri tio, kaj cetere, ĉu gravis tio je la unua horo nokte? Unue oni ŝovis ŝtopilon en mian buŝon kaj ligis min, poste pakis en kofron, la aŭton kondukis sur straton, ŝarĝis sur grandan kromĉaron, per kiu oni transportas novajn aŭtojn, kaj veturigis en sian azilon. Mi, vere, estas viro, sed nun ne eblas tuj diveni sekson, barbon mi ne havas, kaj estas neordinare bela, – unuvorte, ili eltrenis min el la pakaĵujo apud belega montara panoramo kaj kondukis en solecan dometon. Gardadis min

du altulaĉoj alterne; trans la fenestro videblis alpaj neĝoj, sed, certe, mi ne havis okazon sunbruniĝi. Kun la brunhaŭta lipharulo mi damludis – por ŝakludo li estis malinteligenta, kaj la dua, sen lipharoj, tamen kun barbo, havis neelteneblan kutimon nomi min bifstekoj. Tio estis aludo al mia sorto en okazo, se la duko kun la edzino ne pagos elaĉeton. Ili jam sciis, ke mi havas nenion komunan kun la familio di Cavalli – aŭ di Piedimonte, – sed tio ilin tute ne konfuzis, ja surogata homŝtelo iĝis ordinara afero. Antaŭ tio jam estis kelkaj okazoj de ŝtelo de ne tiuj infanoj, kiuj estis intencitaj, kaj gepatroj de la ŝtelutaj infanoj helpis al malriĉuloj. Poste tio etendiĝis ankaŭ al plenaĝuloj. Germanoj nomas tion Erzzatzenführung, kaj ili bone scias tiajn aferojn. Malfeliĉe, kiam venis mia vico, surogataj ŝteloj iĝis tro multaj, la koroj de riĉuloj malmildiĝis, kaj neniu pagis por mi eĉ rompitan groŝon. Ili provis ellogi ion de Vatikano, la eklezio, kiel sciante, karitatas profesie, sed daŭris tio terure longe. Dum tuta monato mi devis damludi kaj aŭskultadi gastronomiajn minacojn de la ulo, kiu krome neelteneble ŝvitis kaj nur ridegaĉis, kiam mi petis lin duŝi sin: ja en la domo estas banĉambro, kaj mi mem sapumos lian dorson. Finfine ankaŭ la eklezio ne konfirmis la esperojn. Mi ĉeestis ilian kverelon, ili preskaŭ interbatiĝis, unuj kriis «buĉu lin», aliaj – prenu la dukan filinon je la kolumo, kaj pelu for.

«La duka filino» persiste nomadis min tiu, la brunhaŭtulo. Sur lia verto estis lipomo, kaj mi ĉiam devis ĝin okulumi. Manĝadis mi, kompreneble, samon, kion manĝis ili, nur kun tiu diferenco, ke ili lekis siajn fingrojn post makaronioj kun oliva oleo, sed min tio naŭzis. La kolo plu doloris ekde tiam, kiam ili penis igi min konfesi, ke mi estas almenaŭ iu parenco de la duko, se mi enveturis la dukan parkejon, kaj senteble frapis min pro siaj trompitaĵoj atendoj. Ekde tiam Italio ĉesis ekzisti por mi.

Aŭstrio estas sufiĉe ĉarma, sed mi konas ĝin, kiel miajn kvin fingrojn, kaj mi ja deziris ion novan. Restis Svisio. Mi decidis demandi la kuzon de Tarantoga, kian opinion li havas pri ĝi, sed evidentiĝis, ke mi faris stultaĵon, komencinte konversacion kun li; li, vere, estas fervora vojaĝanto, sed samtempe – amatora

antropologo, kolektanta tiel nomatajn surmurajn grafikaĵojn en ĉiuj necesejoj de la mondo. Tutan sian hejmon li faris ilia konservejo. Kiam li ekparolas pri tio, kion homoj desegnas sur muroj de siaj necesejoj, en liaj okuloj ekflagras flamo de inspiro. Li asertas, ke nur tie la homaro estas absolute sincera kaj sur tiuj kahelaj muroj videblas nia «mene, tekel, uparsin», kaj ankaŭ *entia non sunt multiplicanda praeter necessitatem* <sup>[1]</sup>. Li fotas tiujn skribaĵojn, pligrandigas ilin, kovras per pleksiglaso kaj pendigas sur murojn de sia hejmo; de malproksime tio similas mozaikon, kaj proksime simple haltigas spiron. Sub ekzotaj skribaĵoj, kiel ĉinaj aŭ malajaj, li metas tradukojn. Mi sciis, ke li plikompletigadis sian kolekton en Svisio, sed al mi tio nenion donis – li rimarkis tie neniajn montojn. Li plendis, ke necesejojn oni lavadas tie ekde mateno ĝis vespero, neniigante solidajn skribaĵojn; li eĉ sendis memorandon al la *Kulturdezernat* <sup>[2]</sup> en Zuriko, ke oni lavu unufoje dum tri tagoj, sed oni kun li simple ne parolis, kaj pri permeso al li eniri sinjorinajn necesejojn eĉ ne eblis pensi, kvankam li havis paperon el UNESKO – mi ne scias, kiel li ĝin akiris, – konfirmantan sciencan karakteron de liaj okupoj. La kuzo de Tarantoga kredas nek al Freŭdo, nek al freŭdistoj, ĉar de Freŭdo oni povas ekscii, kion pensas tiu, kiu sonĝas aŭ vizias turon, bastonon, telefonan foston, ŝtipon, antaŭaĵon de ĉaro kun timono, palison kaj tiel plu; sed tuta tiu sagaco iĝas senutila, se iu vidas sonĝojn rekte, sen ajnaj aludoj. La kuzo de Tarantoga persone antipatias psiĥanalizistojn, opinias ilin idiotoj kaj ekdeziris nepre klarigi al mi, kial. Li montris la perlojn de sia kolekto, versojn en okdek, ŝajne, lingvoj (li estas preparanta riĉe ilustritan libron, veran kompendion, kun koloraj aldonaĵoj); certe, li faris ankaŭ statistikajn kalkulojn, kiom da kio aperas je kvadrata kilometro aŭ, eble, je mil loĝantoj, mi jam ne memoras. Li estas poligloto, kvankam en sufiĉe malvasta tereno; sed ankaŭ tio iom valoras, se oni atentos, kia leksika riĉo estas akumulita ĉi tie. Li tamen asertas, ke la laborkondiĉojn li abomenas; necesas ĥirurgaj gantoj, senodorigilo kun aspergilo – kiel do sen ĝi? – sed sciencisto devas sufoki en si nevolan abomenon, aliokaze entomologoj esploradus nur solajn papiliojn kaj kokcinelojn, kaj pri blatoj kaj pedikoj neniu sciis ion ajn. Timante, ke mi forfuĝos, li tenis min je la maniko kaj eĉ puŝetis je la dorso, al la plej pitoreskaj pecoj de la

muro; mi ne plendas, diris li, sed mi elektis por mi malfacilan vivon. Homo, kiu venas en publikajn pisejojn, ĉirkaŭpendigita per fotiloj kaj ŝanĝeblaj objektivoj, trenas post si stativon kaj rigardas en ĉiujn ĉelojn vice, kvazaŭ ne povas decidi, – tia homo vokas suspekton de necesejaj servistinoj, speciale se li rifuzas lasi sian ŝarĝon ĉe ili, sed portas ĝin kun si en ĉelon; kaj eĉ solida trinkmono ne ĉiam gardas lin kontraŭ malagrablaĵoj. Speciale forte – kiel ruĝa tuko al virbovo – efikas al tiuj gardantinoj de la neceseja moralo (li esprimis pri ili sufiĉe akre) la lumo de la fotila brililo malantaŭ fermita pordo. Kaj kun malfermita pordo li ne povas labori, ĉar tio incitas ilin eĉ pli. Kaj jen stranga afero: klientoj, kiuj eniras tien, same rigardas al li malaprobe, kaj ofte la afero ne limiĝis per rigardoj, kvankam inter ili sendube estas aŭtoroj, kiuj devus esti almenaŭ iomete dankaj al li pro la atento. En aŭtomatizitaj necesejoj tiuj problemoj ne estas, tamen li devas viziti ĉiujn, alie kolektita materialo ne estos statistike reprezentiva. Bedaŭrinde, li devas kontentiĝi per specimeno, la monda aro de necesejoj superas homajn fortojn, – mi ne memoras jam, kiom da necesejoj ekzistas en la mondo, sed li ankaŭ tion kalkulis. Estas sciate, per kio kaj kiel oni tie skribas, kiam ĉemane estas nenio, kaj kiamaniere kelkaj speciale inventemaj aŭtoroj metas aforismojn, kaj eĉ desegnaĵojn sub la plafono mem, kvankam laŭ porcelano eĉ ĉimpanzo ne povos rampi tiel alte. Dezirante pro afableco daŭrigi la konversacion, mi eldiris supozon, ke ili portas kun si kunmetebajn eskalojn; tia malklereco indignigis lin. Finfine mi tamen liberiĝis de li kaj eskapis persekuton (li kriis ion al mi postsekve eĉ sur la ŝtuparo); treege kolerigita pro la malsukceso – ja pri Svisio mi nenion eksciis, – mi revenis en la hotelon, kaj evidentiĝis, ke kelkaj speciale drastaj ekzemploj, kiujn li deklamis al mi, firme kroĉiĝis en mia menso; ju pli mi penis ilin forgesi, des pli persiste ili reaperadis en mia kapo. Tamen, siamaniere la kuzo estis, eble, prava, fingromontrante por mi al granda skribaĵo super sia labortablo: *Homo sum et nihil humani a me alienum puto* [3].

Finfine mi elektis Svision. Mi jam delonge vartis en la animo ĝian imagon. Vi vekiĝas frue, en pantofloj aliras fenestron, kaj tie estas alpaj gresejoj, lilakaj bovinoj kun grandaj literoj «MILKA» sur la flankoj; dum tintado de iliaj bukolikaj sonoriletoj vi iras

en manĝejon, kie en maldika porcelano fumas svisa ĉokolado, kaj svisa fromaĝo serveme brilas per rosgutoj, ĉar la vera ementala ĉiam iomete ŝvitas, speciale en la truetoj; vi sidas, toastoj kraketas, mielo odoras je alpaj herboj, kaj la beatan silenton emfazas solena tiktakado de surmura svisa horloĝo. Vi malfaldas freŝan «Neue Zürcher Zeitung» kaj kvankam vidas sur la unua paĝo militojn, bombojn, kvantojn de murditoj, sed ĉio ĉi estas tiel fora, kvazaŭ vidata tra malgrandiga vitro, ĉar ĉirkaŭe estas silento kaj trankvilo. Eble, ie ekzistas malfeliĉoj, sed ne ĉi tie, en la regiono de minimuma terorisma tensio; jen, bonvolu, sur ĉiuj paĝoj la kantonoj konversacias inter si per mallaŭta banka dialekto, kaj vi demetas la nelegitan gazeton – ja se ĉio funkcias, kiel svisa horloĝo, por kio vi legu? Vi nehaste ekstaras, vestas vin, murmurante malnovan kanteton, kaj iras promeni en montaro. Kia beateco!

Proksimume tiel mi imagis ĉion ĉi. En Zuriko mi ekloĝis en hotelo apud la flughaveno kaj komencis serĉi pacan anguleton en Alpoj por tuta somero. Mi foliumadis reklamajn libretojn kun kreskanta senpacienco; min fortimigadis jen promesoj de grandnombraj diskotekoj, jen kablotramoj, kiuj porcie trenas amasojn da turistoj al glacirivero, ja mi ne ŝatas homamason; kion diri, la tasko estis nefacila, ja nek montoj sen komforto, nek komforto sen montoj konvenis al mi. El la unua etaĝo al la lasta min pelis la elektrizita hotela orkestro, kaj ankaŭ la kuireja ventolado, kreanta impreson (falsan, sed nevenkeblan), ke grason sur la patoj oni ne ŝanĝis dum pluraj jaroj. Supre estis ne pli bone. Post ĉiuj kelkaj minutoj sur min faladis bruego de jetoj, startantaj nemalproksime. Tamen, en Eŭropo oni diras ne «jetoj», sed «avioj», sed «jeto» pli bone transdonas impreson de frapoj kontraŭ la kapo. Ŝtopiloj en la oreloj ne helpis, ĉar la vibrado de motoroj penetras rekte en la ostojn, kiel borilo. Tial en la tria tago mi transloĝiĝis en novan «Sheraton», en la centro de la urbo, ne kompreninte, ke tio estas plene komputilizita hotelo. Mi ricevis apartamenton, nomatan uson-maniere «suite», reklaman fontoplumon kaj platan ĵetonon anstataŭ ŝlosiloj. Per ĝi eblis malfermi ankaŭ bufedon-malvarmujon, konektitan al la centra komputilo. La televidilo laŭ unua postulo montradis momentan sumon de la konto. Estis sufiĉe amuze observi nelacigeblan saltadon

de ciferoj, kvazaŭ dum translacio de sportaj konkuroj, nur kun tiu diferenco, ke saltis ne onoj de sekundoj, sed svisaj frankoj. «Sheraton» estis fama pro renasko de malnovaj tradicioj; ekzemple, sur ĉiu tablo briletis arĝento de manĝilaro; antaŭe sur tranĉiloj kaj forkoj oni gravuradis «Ŝtelita en "Bristol"», sed en «Sheraton» oni evitis similajn akraĵojn: simple en la arĝento estas io tia, pro kio la pordoj alarmas dum provo eliri kun forko en la poŝo. Ve, mi mem konvinkiĝis pri tio, kaj devis poste longe senkulpigi min. La fontoplumon mi forgesis apud la glaso, kaj tekulereton ŝovis en la brustan poŝon; sed tiu klarigo ne trankviligis parfumitan lakeon, ĉar la kulereto brilis, kiel lavita, kvankam mi manĝis molan ovon. Nu, mi ĝin ĉirkaŭlekis, tian mi havas kutimon, sed mi ne deziris konfesi miajn intimajn emojn al la sviso, konvinkita, ke li parolas angle. Mi opiniis la incidenton elĉerpita, sed kiam mi – por amuzo – petis de la televidilo la konton, ĝi montris ĝin kun prezo de unu arĝenta kulereto; eraro ne estis ebla. Se mi jam ĝin pripagis, ĝi estis mia, kaj dum la tagmanĝo mi ŝovis en la poŝon precize saman kulereton, kio kaŭzis novan skandalon. «Sheraton», klarigis oni al mi, ne estas mempriserva vendejo. La kulereto, eĉ inkludita en la konton, restas propraĵo de la hotelo. Tio estas ne puno, sed afablaĵo rilate de gasto, ĉar juĝaj elspezoj kostus por mi multe pli. Mia ĉikanemo estis tuŝita, mi eĉ pensis pri proceso kontraŭ «Sheraton», sed decidis ne malbonigi al mi la humoron, ĉar malgraŭ ĉio mi esperis vidi la Svision de mia revo.

Apud la pordo de la banĉambro troviĝis kvar ŝaltiloj, kies destino neniam iĝis klara por mi, kaj vespere mi enlitiĝis en mallumo. Al la kuseno estis alpinglita karto kun koraj gratuloj de la direkcio, kaj kun malgranda briketo da «Milka», sed mi pri tio ne sciis. Komence mi enpikis la pinglon en la fingron, kaj poste mi devis serĉi la ĉokoladon sub la litkovrilo, kien ĝi falis. Kiam mi ĝin formanĝis, mi ekkomprenis, ke necesas denove purigi la dentojn, kaj post mallonga interna lukto mi faris tion. Poste, penante palptrovi lumŝaltilon apud la lito, mi premis ion tian, ke la matraco komencis skuiĝi. Al la lampa kloŝo batiĝis nokta papilio. Mi malŝatas noktajn papiliojn, speciale kiam ili sidiĝas sur la vizaĝon, tial mi decidis ĝin dispremi; tamen atingebla estis nur ampleksa volumo de hotela

Biblio en malmola bindaĵo, kaj ĵeti Biblion estas iel ĝene. Mi persekutis tiun papilion sufiĉe longe kaj finfine glitfalas sur la alpaj reklamaj libretoj, kiujn mi antaŭ tio ĵetis sur la tapiŝon. Ŝajnas, ĉi ĉi estas bagateloj. Stultaĵoj, pri kiuj estas hontinde skribi. Sed rigardante pli profunde, tio ne estas tiom simpla. Ju pli da komforto, des pli da suferoj kaj eĉ animaj humiliĝoj, ĉar homo sentas, ke li ne meritas tian riĉon de ebloj, kvazaŭ li staras kun tekulereto antaŭ oceano; tamen, sufiĉe pri kuleretoj.

Sekvan matenon mi telefonis al agento pri vendado de nemoveblaĵo kaj petis lin trovi informojn pri negranda komforta vilao en montaro; eble, mi akirus ion tiaspecan kiel someran rezidejon. De tempo al tempo mi faras agojn, kiuj mirigas min mem; ja mi, fakte, ne intencis aĉeti ĉi tie iun ajn vilaon. Tamen, mi mem ne scias. La urbo estis ne nur balaita, sed polurita ĝis spegula brilo, parkoj estis ornamitaj, kiel donacoj; kaj tiu reganta ĉie festa pureco ŝajnis antaŭsento de beata vivo, kiun mi ial neniel povis atingi. Vane malŝparinte tagon, ankoraŭ ne decidinte, kie mi pasigu la someron, mi decidis kiel eble plej urĝe transloĝiĝi el «Sheraton», kaj nur pensinte pri tio, eksentis nemalgrandan faciliĝon. Konvenan meblitan loĝejeton sur nebrua strateto mi trovis en sekva tago, kaj eĉ kun vizitanta servistino, heredita de la antaŭa loĝanto. Tiu ĉi tago devis iĝi la lasta tago de mia hotela loĝado. Kiam mi finis matenmanĝi, al mia tablo venis granda, grizhara, solida viro, nominta sin advokato Trürli. Metinte apud si grandan paperujon, li petis de mi minuton da atento. Li informis min, ke fama svisa milionulo, doktoro Wilhelm Küssmich, estante delonga entuziasto de mia astronaŭtika agado, kiel signon de respekto kaj danko deziras donaci al mi kastelon je mia plena posedo. Jes, jes, kastelon, de la dua duono de la XVI-a jarcento, super lago, ne en Zuriko, sed en Ĝenevo, bruligitan dum la religiaj militoj, rekonstruitan kaj novigitan fare de sinjoro Küssmich, – la advokato deklamis la historion de la kastelo flue. Verŝajne, li ĝin parkeris. Mi aŭskultis lin, pli kaj pli agrable mirante pri tio, ke mia unua imago pri Svisio, jam preskaŭ tute paliĝinta, iĝis tamen ĝusta. La advokato metis antaŭ mi sur la tablon gigantan libregon en leda bindaĵo, pli ĝuste, albumon, montrantan la kastelon de ĉiuj flankoj, kaj ankaŭ de supre. Tuj post tio li ŝovis al mi duan volumon, malpli

dikan, – liston de objektoj, aŭ moveblaĵoj, troviĝantaj en la kastelo, ĉar sinjoro Küssmich ne volis ofendi min per aspekto de nudaj muroj, kaj mi estis ricevonta la antikvan konstruaĵon kun tuta ĝia enhavo; nur la unua etaĝo estis sen mebloj, tamen sur ĉiuj ceteraj estis nuraj antikvaĵoj, valoregaj artaĵoj, armila ĉambro – nepre! – kaj eĉ veturilejo; tamen, li ne donis al mi tempon ĝui ĉion ĉi kaj per oficiala, preskaŭ severa tono demandis min, ĉu pretas mi akcepti la donacon. Mi estis preta. Advokato Trürli por momento rigidiĝis – ĉu li preĝis antaŭ komenco de tiom solena ago? Li apartenis al tiu speco de viroj, al kiuj mi ĉiam iomete enviis. Iliaj ĉemizoj brilas per anĝela blanko eĉ je la tria horo nokte, iliaj pantalonoj neniam ĉifiĝas, kaj de ili neniam falas pantalonbutonoj. Per tiu sia senriproĉeco li min iom frostigis, aŭ, pli ĝuste, katenis; sed ĉu eblis postuli, ke nekonata bonfaranto sendu al mi homon, pli konvenan al miaj gustoj? Krome, ne endus forgesi, ke ni estas en Svisio. Post dignoplena silento advokato Trürli diris, ke finajn formalizaĵojn ni aranĝos poste, dume sufiĉos nur subskribi la donacan akton. Li elprenis el la paperujo ankoraŭ unu, diafanan paperujon, en kiu, kvazaŭ inter vitroj, ripozis tiu zorgeme tajpita dokumento, kaj malkovris ĝin antaŭ mi sur la tablotuko, samtempe etendinte al mi sian fontoplumon – certe, svisan kaj oran, samkiel liaj okulvitroj. Poste per facila movo li deŝoviĝis de la tablo, kvazaŭ abolante sian ĉeeston ĉi tie, ĝis kiam mi konatiĝos kun la enhavo de la tiom grava dokumento. Mi legis ĉiujn paragrafojn de la donakakto. Interalie, mi estis devigata dum ses monatoj ne tuŝi dudek ok kofrojn, starantajn en la kavalira halo; mi levis la okulojn al la advokato, sed ne sukcesis malfermi la buŝon, kiam li, kvazaŭ legante miajn pensojn, certigis min, ke en la kofroj – certe, ne ŝlositaj, – troviĝas unikaj objektoj, speciale, pentraĵoj de malnovaj majstroj; transdono de ili en proprecon de alilandano, eĉ tiom fama, kiel mi, postulas tempon. Krome, dum du jaroj mi ne rajtis vendi la kastelon, nek tute, nek parte, nek transdoni ĝin al triaj personoj iel alimaniere. Nenion suspektindan mi rimarkis en tiuj paragrafoj. Tamen, ĉu mia suspektemo ne estis demonstro de senhelpeco antaŭ nekomprenebla grandanimeco, kiu laŭ ĉeno de pezaj german-svisaj frazoj, kiel laŭ penda ponto, kondukis min rekte en kastelajn ĉambrojn? Mi eĉ iomete ŝvitis, farante mian subskribon, kaj tiam

advokato Trürli per facila, sed ordona movo levis la manon, kaj du hotelaj lakeoj, kiujn mi antaŭe ne rimarkis – ili nerimarkeble atendis malantaŭ palmoj, – alvenis, por certigi mian subskribon. Verŝajne, li anticipe metis ilin tie, en la angulo. Senriproĉe, li penis meti tiun scenon en konvenan kadron. Kiam la lakeoj foriris, Trürli petis min subskribi ankoraŭ unu klaŭzon sur la dorso de la donakakto. Laŭ tiu klaŭzo, mi permesis al personoj, kiujn difinos la donacanto, periode kontroli mian plenumon de la paragrafoj 8, 9 kaj 11 – tio estas, ĉu mi ne fosas en la kofroj kun la altvalora enhavo. La penso pri tio, ke iaj fremdaj homoj vagos tra la kastelo kaj ŝovos siajn nazojn, kien ili deziros, malkomfortigis min. La advokato klarigis pure formalan karakteron de tiu paragrafo. La dokumento, aldonis li, ricevis juran validon, kaj mi ajnmomente povas ekposedi la tutan objekton kune kun la apuda parko. Li jam ekstaris, kaj tiam al mi, feliĉe, venis ideo demandi lin, kiam mi persone povus esprimi mian dankemon al mia bonfaranto. Tamen sinjoro Küssmich estis tre okupita: li estris konzernon, kiu produktas nutrajn koncentraĵojn, interalie la faman «Milmil» – la preparaĵon, fortigantan sanon de infanoj sur ĉiuj kontinentoj; pri la tempo de nia renkonto, diris la advokato, ni interkonsentos poste. Li premis mian manon, la antikva horloĝo malantaŭ mia dorso komencis sonori la dek unuan horon; kun tiuj solenaj sonoj mi, jam kiel posedanto de svisa kastelo, rigardis, kiel Trürli paŝas sur tapiŝoj, kiel serveme malfermiĝas antaŭ li la vitraj pordoj, kondukantaj eksteren, kaj ŝoforo kun kasketo subaksele malfermas pordeton de nigra «Mercedes», – kaj iom post iom mi venis al la konkludo, ke ion similan mi, fakte, jam delonge meritis.

Ve, la kastelo evidentiĝis neloĝebla. Vintre tie krevis hejtotuboj. Sed al ĉevalo donacita... Rezigninte ideon veturi al Alpoj, mi komencis riparadon. Fakulo pri dominternaĵo penis konvinki min transformi la malsuprajn halojn en kastelan romantikan fabelon, kaj, renkontinte mian reziston, cedis, sed tre malice: li simple metis sur min ĉiujn decidojn, inklude tegaĵon de banĉambro ([kreviĝintan](#)) kaj stilon de pordoansoj ([iu malŝtraŭbis ilin](#)). Mi sukcesis jam malŝpari nemalgrandan monsumon, kiam subite sur unuaj paĝoj de gazetoj aperis sensaciaj novaĵoj pri «Milmil». Evidentiĝis, el kio vere estas

preparata tiu produkto. La internacia komitato de suferintaj patrinoj ekproceŝis kontraŭ Küssmich. La postulo konsistigis naŭdek ok milionojn da svisaj frankoj. Frakasita sano de infanoj, fizikaj kaj moralaj suferoj de gepatroj, kompenso de doloro – pri ĉio ĉi la gazetoj detale informis, – kaj mi, venante por kontroli, kiel statas la riparado, devis tratiĝi tra protestantoj kun plakatoj, brulstampantaj la kanajlon, kiu ne nur akiris palacon, venenante infanojn, sed aldone arogas beligi tiun palacon ĝuste nun, kiam super li pendas Damokla glavo de juĝafero. Dufoje mi sukcesis klarigi, ke mi ne estas Küssmich, kaj nenion komunan havas kun suĉinfanoj, sed en la tria fojo iu maljuna sinjorino el la Savarmeo (*ŝi, verŝajne, simple min ne aŭdis, kantante kaj frapante tamburinojn*), prenis de alia sinjorino plakaton kun postulo de justeco kaj bataĉis min al la kapo. Tiam mi ekkonsciis, en kian idiotan kaĉon min metis Küssmich per sia kastelo. Mi telefonis al la advokato, dezirante aŭdi lian opinion, kaj tiu konsilis al mi eviti ĵurnalistojn. Plej bone, diris li, estas forveturi por ia tempo en Alpoj. Mi obeis – finfine, ĝuste por tio ja mi venis en Svison. En profundo de la animo – mi konfesis tion sincere, ĉar mi kutimiĝis diri nur veron, – mi esperis, ke ĉio trankviliĝos, kaj Küssmich-on oni finfine enprizonigos. Mi, azeno, ankoraŭ pensis, ke lin turmentis rimorsoj kaj en la donaco li vidis agon de kompenso. Se mi ĝustatempe fuĝus el «Sheraton», mi pasigus trankvilan someron en kvietanta montara angulo, kvankam, aliflanke, tiam mi ne konatiĝus kun profesoro Gnuss, nek kun la Instituto de Historiaj Maŝinoj, do, ne vojaĝus al Entio kun ties mirinda etikosfero. Tielas la vivo: el stultaĵoj kreskas grandaj aferoj, kvankam pli ofte okazas male. Tiusomere mi ne malplian tempon pasigis en Ĝenevo, ol en Alpoj, – la riparadon ja necesis kontroli, kaj Trürli pridiskutadis kun mi jen tion, jen alion. En la urbo mi loĝis en meblitaj ĉambroj, la kastelon ne vizitadis, en la proceso de Küssmich mi same preferis ne aperi, kaj dume la patrinoj, la prokuroroj kaj la raportistoj zorgis pri tio, ke la gazetaro de tempo al tempo eksplodu per sensacioj pri malicaĵoj de la konzerno. Tamen, la lukto de oro kontraŭ juro estis donanta neatenditajn rezultojn. La ekspertoj de la akuzanto pruvadis, kiom malutila estis influo de «Milmil» al la infana organismo, kaj la ekspertoj, dungitaj de la konzerno, kun ne malplia scienca precizo demonstradis savecon

de tiu pulvoro. La publika opinio, tamen, estis ĉe la flanko de la suĉinfanoj kaj la patrinoj. Vican fojon reveninte el Ĝenevo en mian alpan kastelon, mi apenaŭ sukcesis matenmanĝi, kiam Trürli per lakona telegramo vokis min reen.

En Ĝenevon mi revenis per trajno. La svisoj truigis sian landon per tuneloj, kaj eblas traveturi ĝin tutan, ne vidinte montojn eĉ unufoje. En la kupeo mi renkontis maljunan viron kun orumita eksmoda nazumo sur nigra ŝnureto, kiu estis leganta miajn «Stelajn taglibrojn». Min mirigis, ke li regule malfermadas ian dikegan volumon, kuŝantan sur liaj genuoj, kaj, rigardinte tien, ion zorgeme enskribas sur marĝenoj de mia libro. Kiam li foriris en la restoraci-vagonon, lasinte la «Taglibrojn» sur la sidloko, mi atente pririgardis ilin. La marĝenoj de supre ĝis malsupre estis kovritaj per numeroj de iuj paragrafoj. Mi estis intrigita; kiam li revenis, mi prezentis min kaj demandis pri la senco de tiuj notoj. Mia kunvojaĝanto evidentiĝis homo tre afabla kaj kore gratulis min pri elstaraj malkovroj kaj agoj. Li estis profesoro de kosma juro, speciale de ties politika parto. Roger Gnuss – tiel li nomiĝis – ne nur estris universitatan katedron, sed ankaŭ kuratoris, laŭ komisiono de sekretarioj de UNO, la Instituton de Historiaj Maŝinoj, la filion de MEA. Ne de Ministrejo de Eksterlandaj, sed de Eksterplanedaj Aferoj. Mi eĉ ne sciis, ke ĝi ekzistas. Bonkore ridetante per siaj bluaj, kiel alpaj glaciriveroj, okuloj, kiuj malantaŭ la vitroj de la nazumo ŝajnis eĉ malpli grandaj, la profesoro klarigis al mi, ke la nova MEA dume ekzistas nur parte, kiel organizaĵo en stadio de formiĝo. Laŭ iniciato de influhavaj ŝtatoj estas kreita administra praĉelo, kiu evoluos en normalan ministrejon post ioma tempo, kiam kontaktoj kun aliplanedaj civilizoj ĉesos havi hazardan karakteron kaj la afero atingos aranĝon de diplomaciaj rilatoj, inklude akreditadon de plenrajtaj ambasadoroj. Ĝis nun pri kontaktoj kun loĝataj planedoj okupiĝadis UNO, sed la kosmaj skaloj postulas de diplomatio tute novajn metodojn kaj solvojn. Ĉio ĉi estis por mi tute nova. Pleje min mirigis silentado de la svisa gazetaro pri tiom grava afero. Ne tro mirinde, klarigis la profesoro; ja dume ni okupiĝas precipe pri fantoma-trejna diplomatio, krome nin financas UNO (la kantonaj estroj, donante permeson pri lokigo de la nova MEA en Ĝenevo, klaŭzis, ke la financa flanko de la afero ilin

ne koncernas), kaj la gazetaron ne interesas aferoj, ne influantaj la svisian ekonomion. Tamen, aldonis li, nia agado ne estas publika. Ĝi ne estas sekreto, kiel tion komprenas la internacia, kaj ankaŭ la svisa (civila kaj kriminala) juro: temas ne pri ŝtata sekureco, sed pri sobra prudento. La valuta merkato febras eĉ sen mesaĝoj pri aliplanedanoj; la svisa franko ankoraŭ ne falas, sed jam lamas, kaj necesas gardi ĝin kontraŭ ŝokoj. Ordinara periodo de planado en la banka metio estas kelkaj jaroj, ne pli, ja ĉefa mezurunuo ĉi tie estas buĝeta jaro; sed ni, tio estas IHM kun MEA, laboras kun minimuma anticipo ĉirkaŭ cent jaroj! Ĝuste per tiuj unuoj (nomataj sekularoj) manipulas tuta ministreja planed-historia meĥanismo. Mi nenion komprenis, sed kuraĝis konfesi mian senhelpecon. De vi, sinjoro Tiŝi (tiel li prononcis mian nomon), mi ne havas sekretojn, kredigis la profesoro. Unue li klarigis al mi la signifon de la notoj en la «Taglibroj». Ordinara profesia kutimo: ĉiujn faritajn de mi, pro nescio, rompojn de la interplaneda kosma leĝaro, kaj de la reguloj de trafiko en la Laktaj Vojoj, li indikis per respektivaj paragrafoj. Vidinte mian ĉagrenitan vizaĝon, la profesoro aldonis, ke tiaj *faux-pas* <sup>[4]</sup> estas ordinara sorto de pioniroj. Ĉu Kolumbo ne opiniis Amerikon Hindio? Kaj la rilato de la hispanoj al la aztekoj? Sed la stelaj ŝtatoj, kun kiuj ni havas aferojn, tute ne estas celo de kolonia ekspansio; ili, ĝenerale dirante, estas multe pli evoluintaj, ol ni. Ĝis Ĝenevo mem la profesoro eksponadis al mi fundamentojn de sia fako, kaj mi atentis lin, kiel lerneĵano. Juraj leĝoj, instruis Gnuss, en la Kosmo pli gravas, ol la fizikaj. Certe, en la lasta instanco la fenomenoj de la universo estas determinataj de fiziko, sed en la praktiko ĉio estas alia. Ni prenu, ekzemple, la misteron de «kosma silento», Silentium Universi. Kial tiom da jardekoj malŝpariĝis vane por serĉado de eksterteraj civilizoj? Ja tial, ke, ne sciante pro kia rajto, unuaj pri ĝi okupiĝis natursciencistoj – astronomoj, fizikistoj, matematikistoj, biologoj – kaj kalkulis kiel duoble du, ke tiuj, aliaj, ne povas ne ekzisti, energiajn rimedojn ili havas, teĥnikajn same; sed se nenio videblas kaj aŭdeblas, *ergo* <sup>[5]</sup>, Nenie Estas Iu Ajn. Sed kiel do ne estas, se estas pruvite, ke ne povas ne esti? Anstataŭ ol konsulti fakulojn pri politika, ekonomia kaj ceteraj juroj, ili decidis: ju pli alte evoluos civilizo, des pli probabla estas ĝia pereco. La larva periodo, la stadio de krizalido, daŭras longe, sed tiam mankas rimedoj por

signalado, kaj kiam ili jam ekzistas, la civilizo aŭ malaperis, aŭ estas tuj malaperonta. Per tiu nevenkebla logiko ili timigis ne nur sin mem, sed ankaŭ la publikon. Rezultis, ke en la kosmo ni estas tute solecaj. Eĉ pli: ankaŭ ni baldaŭ malaperos. Certe, estis *Ijon Tichy* <sup>[6]</sup> kaj vojaĝis, sed «*nec Hercules contra plures* <sup>[7]</sup>», solulo ne povas kontraŭstari plurajn. Li ne ricevis oficialan agnoskon. Kial? Sed ĉu malmultas maniuloj kaj friponoj, plektantaj fabelojn pri NIFO-j kaj pri Treege Bonkoraj Praastronaŭtoj, venintaj sur la Teron por konstrui piramidojn por egiptanoj sub preteksto de entombigo de faraonoj? La scienco devis ellabori en si malakceptemon de tiaspecaj deliroj – kaj iĝis tro malakceptema. «Ĉu vi scias, sinjoro Tiŝi, – la profesoro per trankviliga gesto metis sur mian genuon la manplaton, svisan, lavitan ĝis rozkolora haŭto, – kie, alivorte en kiu sekcio, estas konservataj viaj verkoj, nu, almenaŭ en la urba biblioteko de Ĝenevo? En la sekcio de scienca fikcio, jen tiel, kara kolego! Je Dio, ne ĉagreniĝu pro tio. Ĉu vi ne sciis?»

Mi respondis, ke mi ne legas miajn proprajn librojn kaj tial ne serĉas ilin en bibliotekoj.

– Esti neagnoscita – tio estas simple devo de ajna eminenta noviganto kaj pioniro, – aforismis Gnuss. – Tamen, estis tre seriozaj rezonoj, pro kiuj ni – tio estas MEA – ne reagis al tiaspecaj miskomprenoj. Ni per tio iamaniere gardis ankaŭ vin...

– Kiel mi tion komprenu? – demandis mi, mirigita de liaj lastaj vortoj.

– Vi komprenos, sed siatempe. Se la sorto renkontigis min kun vi, estu, kio devas esti, – kaj li donis al mi vizitan karton, antaŭ tio skribinte sur ĝia dorsoflanko nepublikigeblan hejman telefonnumeron. – La Silentium Universi estas klarigebla per financaj limitoj, – diris li, mallaŭtiginte la voĉon. – Nia riĉa ŝtato donas al malriĉaj landoj 0.3 de procento de sia enspezo. Kial ekster la Tero devas esti alie? Opinii, ke la Kosmo estis nenies spaco, ne sciinta jurajn normojn, sferojn de influo, projektojn de buĝetoj, doganojn, propagandon kaj diplomation, ĝis kiam tie aperis la homaro, – tio

signifas esti simila al bebo, al kiu ŝajnas, ke, antaŭ ol li faris la unuan kakamaseton, neniu tion scipovis. La dilemo malaperis nur tiam, kiam de la natursciencistoj ĝi transiris al ni. Ja ili, sinjoro Tiŝi, vere estas kiel etaj infanoj. Al ili ŝajnas, ke tiu, kiu havas sur sia kuranta konto dudekon da sunoj, stabilan energian bilancon, kaj en astrofinanca rezervo – ĉirkaŭ 1049 da ergoj, disĵetas tiun havaĵon dekstren kaj maldekstren, ne kalkulante: informas kaj sciigas, sendas en vakuon industriajn licencojn, tute senpage – eĉ pli, kun pura malprofito, – disdonas teĥnologiajn, sociologiajn kaj Dio scias kiajn ankoraŭ informojn, simple pro bonkoreco – aŭ pro boneco de tiu organo, kiun li havas anstataŭ la koro. Ĉio ĉi estas fabeloj, kara sinjoro Tiŝi. Kiel ofte, permesu demandi, oni vin superŝutadis per riĉaĵoj sur malkovritaj de vi planedoj?

Mi pensis dum minuto – tia aliro estis por mi tute nova.

– Eĉ ne unu fojon, – respondis mi finfine, – sed mi ja pri nenio petis, profesoro...

– Jen, vidu! Por ricevi, necesas unue peti, kaj eĉ tio ne garantias. Ja la interstelaj rilatoj estas determinataj de la politikaj, sed ne de la fizikaj konstantoj. Fiziko validas ĉie, sed ĉu vi vidis iam politikiston, kiu plendis pri la gravita konstanto de la Tero? Kiaj fizikaj leĝoj malpermesas al riĉuloj dividi sian riĉon kun mizeruloj? Estas simple mireginde, kiel sinjoroj astrofizikistoj povis ne atenti en siaj rezonoj tiom evidentajn aferojn! Sed ni jam estas alveturantaj. Mi invitas vin viziti la Instituton de Historiaj Maŝinoj. La numeron mi al vi donis – telefonu, kaj ni interkonsentos.

Vere, la trajno jam estis frapanta sur vojforkoj, aperis la stacidomo. La profesoro kaŝis la «Stelajn taglibrojn» en la tekon, prenis la mantelon kaj diris, ridetante:

– Politikaj rilatoj evoluadas en la Kosmo dum jam miliardoj da jaroj, sed observi ilin estas neeble eĉ per la plej granda teleskopo. Meditu pri tio en libera tempo, kaj dume – ĝis revido, kara sinjoro Tiŝi! La konatiĝo kun vi estis honoro por mi...

Mi, ankoraŭ forte impresita de la renkonto, trovis apud la stacidomo nigran «Mercedes»-on, en kiu atendis min Trürli. Sidiĝante en la aŭton, mi etendis al li la manon. Li rigardis al mi, kvazaŭ ne povis kompreni, kio tia elŝoviĝas el mia maniko, kaj poste tuŝis mian manplaton per la fingropintoj. Kvankam la ŝoforo ne povis nin aŭdi, – li sidis malantaŭ diafana vando, – la advokato diris tre mallaŭte:

– Sinjoro Küssmich faris konfesojn...

– Ĉu konfesis? Tio estas bone, – aŭtomate respondis mi kaj tuj komprenis, ke mi diris misaĵon; ja mi estis parolanta kun lia advokato.

– Por vi – ne, – ĵetis li malvarme.

– Pardonu, kio?

– Li konfesis, ke la donacakto estis artifiko...

– Kiel – artifiko?.. Mi ne komprenas.

– Estos pli bone, se ni parolos pri tio ĉe mi.

Ni eksilentis. Lia glacia aspekto mirigadis min pli kaj pli; sed kiam ni trafis en lian kabineton, la sekreto malkovriĝis.

– Sinjoro Tichy, – diris Trürli, eksidinte ĉe la skribotablo, – la konfesoj de doktoro Küssmich tute ŝanĝis la situacion.

– Ĉu vi opinias? Ĉar ili estas falsaj? Li kalumniis min, ĉu?

La advokato sulkiĝis, kvazaŭ aŭdis ion maldecan.

– Vi troviĝas ĉe advokato, sed ne en juĝejo. Kalumnio, – ne, nur imagu! Ĉu vi volas diri, sinjoro Tichy, ke doktoro Küssmich pro nenio, nur pro viaj belaj okuloj donacis al vi objekton, kiu kostas okdek tri milionojn da svisaj frankoj?

– Pri la kosto ne temis... – balbutis mi, – kaj... kaj kun tio ĉi ĝuste vi venis al mi...

– Mi faris tion, kion komisiis al mi mia kliento, – diris Trürli. Liaj okuloj estis bluaj, kiel de la profesoro, sed tute ne tiom simpatiaj.

– Kiel do... Vi volas diri, ke vi enmanigis al mi tiun donacakton kun kroma intenco?

– Miaj intencoj ne rilatas al la afero; tio estas tereno de mia psiĥo, kiu ne interesas la justicon. Do, ĉu vi penas aserti, ke vi akceptis donace de tute nekonata de vi homo okdek tri milionojn tute sen ajnaj kaŝitaj intencoj?

– Sed kion tian vi ĉi tie diras, – komencis mi kun ekflagranta kolero, sed li direktis al mi sian fingron, kiel revolveron.

– Pardonu, sed nun mi parolas. Se juĝistojn oni prenis de sur lerneja benko, eble, ili akceptus viajn depoziciojn, kiel veron; sed je tio ne eblas kalkuli. Nur pripensu! Homo, pri kiu vi eĉ ne aŭdis, donacas al vi okdek tri milionojn, nur ĉar – imagu! – iam kun plezuro legis libraĉon, kiun vi verkis? Kaj ĉu tribunalo devas kredi je tio?

La advokato prenis el luksa skatolo cigaron kaj ekfumis ĝin per ora flamigilo, starinta apud la inkujo.

– Eble, vi klarigos al mi, en kio estas la afero? – diris mi, penante konservi almenaŭ eksteran trankvilon. – Kion deziras sinjoro Küssmich? Ke mi dividu kun li prizonan ĉelon?

– Doktoro Küssmich estos purigita de ĉiuj falsaj akuzoj kontraŭ li, – prononcis advokato Trürli, elspirante fumon en mian flankon, kvazaŭ volis forpeli tedan insekton. – Mi timas, ke en la ĉelo estos vi sola.

– Atendu. – Mi plu nenion komprenis. – Li donacis al mi la kastelon... por kio? Ĉu li deziras repreni ĝin?

La advokato solide kapjesis.

– Do, pro kia diablo li ĝin donacis? Ja mi ne petis, mi ne sciis – ha-a-a... li timis, ke la kastelo estos arestita, konfiskita, ĉu?

La vizaĝo de la advokato ne tremeris, sed de miaj okuloj kvazaŭ defalis ŝirmilo.

– Bone, – diris mi bataleme, – tamen la kastelo ankoraŭ estas mia, mia laŭ la leĝo...

– Mi ne pensas, ke tio ion donos al vi, – respondis li indifere. – La donakto estas tiom nekredebla, ke agnoskigi ĝin malvalida estas bagatela afero.

– Mi komprenas, tial li faris la falsan konfeson... sed se juĝistoj kredos je tio, li mem ne ĝojos...

– Mi ne komprenas, kion vi celas per la vortoj «ne ĝojos», – diris Trürli. – La akuzantoj delonge strebis al la proceso. Pri tio scias ĉiu, kiu legas gazetojn. Doktoro Küssmich estis en malfacila stato, ĉar la unua konkludo de ekspertoj estis malfavora al «Milmil». Vi uzis lian minutan malfortecon, animan krizon, kaŭzitan de maltrankvilo pri bonfarto de la familio. Li agis kontraŭ mia konsilo, – mi estis konvinkanta lin, ke la vero venkos kaj ni gajnos la proceson. Ĝuste tiel estos. Tial la afero ne atingos sekvestracion. La tribunalo devos klarigi nur unu aferon: kiel vi, alilandano, penis profiti el malfeliĉo de aliulo.

– Do, ĉu al li nenio minacas? Kvankam li mem konfesas, ke volis per la donakto eviti areston de posedaĵo? Ke li volis...

– Neniu povas esti punita pro tio, ke li ion volis.

– Do, ankaŭ mi!

– Vi ne nur volis, sed ankaŭ subskribis la konatan al vi dokumenton.

– Sed sen kromintenco! Mia reputacio estas senriproĉa! Mi povas pruvi tion, – tiam mi stumblis, ĉar la vizaĝo de la advokato ŝanĝiĝis, kvazaŭ pintoj de Alpoj dum sunsubiro.

– Kaj la arĝentaj kuleretoj?!! – ektondris li, rigardante al mi kun nekaŝata malestimo.

Sur tio mi finu la raporton pri nia konversacio. La advokato, rekomendita al mi de profesoro Gnuss, nomiĝis Sputnik Finkelstein. Li estis malalta, nigrahara kaj gaja. Li aŭskultis mian historion ĝis la arĝentaj kuleretoj inklude, frotis la nazon kaj diris:

– Ne miru, ke mi ĉiam movas la fingron sur la nazo: se oni dum dudek jaroj portis okulvitrojn, estas malfacile rezigni tiun kutimon tuj post transiro al kontaktaj lensoj. Vi rakontis al mi la enhavon de la spektaklo, kaj mi diros al vi, kiuj estas la aŭtoroj de la libreto. Küssmich gajnos la proceson, ĉar li interkonsentis kun «Nestlé». Temis pri ora kafo. Ĉu vi aŭdis? Pulvora kafo – se ĝin dissolvi, ĝi aspektas precize, kiel oro en taso.

– Kaj la gusto?

– Ne tre. Sed tio estas ankoraŭ neokupita merkata niĉo – neniuj ankoraŭ tielaĵon elpensis! Novaĵo! Trinki puran oron! Ĉu vi komprenas? Li interkaptis la patenton el sub ilia nazo, kaj tial ili aranĝis por li malagrablaĵon.

– Kaj «Milmil»? Ĉu ĝi estas malutila aŭ ne?

– Ĉio estas malutila, – per kategoria tono respondis mia advokato. – Tie estas endorfinoj, nu, ĉu vi scias, la substancoj, kiujn organismo mem produktas en la cerbo, sendolorigiloj, morfino apartenas al la sama klaso. Da tiuj endorfinoj «Milmil» enhavas nur ete. Ĝuste tiom, ke estu eble skribi pri tio en reklamoj. Unuj kuracistoj diras, ke tio estas malutila, aliaj, ke utila. Aŭ, ĉiukaze, nemalutila. Tamen, ĉu tio gravas? En civitanaj juĝaferoj ĉion decidas banka konto – se ne eblas gajni, eblas procesumi la kontraŭulon ĝismorte. Ĝuste nun mi okupiĝas pri tia juĝafero – pri patento de tempomaŝino. Por veturi

estontecen. Ĝi nomiĝas kronork. En ambaŭ direktoj same, ĉu vi rimarkis? Du doktoroj el tre deca universitato, – ni nomu ilin, por eviti publikigon, doktoro Trefe kaj doktoro Koŝer, – inventis ĝin kune. Sed oni ne donas al ili patenton, ĉar ĝi agas ne tiel, kiel eksplikas ilia priskribo.

– Kronork? – demandis mi kun sciemo, jam forgesinte pri «Milmil» kaj kuleretoj. – Ĉu vi ne povus rakonti pri tio pli detale?

– Kial ne? Ĉio aperis el la teorio de Ejnŝtejno, tamen, same kiel ĉiuj ceteraj malfeliĉoj. Sur rapide moviĝantaj korpoj la tempo fluas malpli rapide. Ĉu vi tion scias? Nu, certe, scias... Do, en iliajn kapojn venis ideo, ke ne necesas ien flugi, sufiĉas, ke la korpo tre rapide turniĝu surloke. Jen en unu direkto, jen en alia. Kun sufiĉe granda rapido de tiu turbo la tempo komencas iri malpli rapide. Tia estas la principo. Bedaŭrinde, nenio eltenas tiun skuadon, ĉio disflugas. Je atomoj. Eblas, certe, sendi en estontecon tiujn atomojn, sed nenion pli. Se vi sendos ovon – venos fosforo, karbono, kaj el kio ankoraŭ konsistas ovo. Kaj homon eblas sendi estontecen nur pulvoro. Tial la patenta buroo rifuzas al ili pri patento, kaj ili timas, ke iu ŝtelos la ideon, antaŭ ol ili elpensos rimedon kontraŭ tiu skuado. Jen tia afero. Malfacila, sed ĝuste tiajn mi ŝatas. Tamen ni revenu al niaj ŝafoj. «Nestlé» interkonsentis kun Küssmich kaj ili dividos la oran kafon. La panjojn kaj infanojn oni ĉesos subvencii. La ekspertoj pridubos siajn konkludojn. Küssmich donacis al vi la kastelon por, ni supozu, demonstri sian forton. Ke oni nenion povas fari kontraŭ li. Donaci al la familio, ŝanĝi nominalan posedanton de la propraĵo – ĉio ĉi estus tro travidebla. Necesis alilandano, merita, sed – ni diru tiel – kun kromgusto de dubsenceco. Ĉu vi ne ofendiĝos? Por ke estu eble en necesa okazo diri: jen, li meritis la donacon, sed se la afero iros alie, ŝanĝi la parolon: min erarigis la ekstera aspekto, estis la arĝentaj kuleretoj kaj ankoraŭ io. Tiel ili turnis la ludon kontraŭ vi. Vi interesiĝis pri aĉeto de domo! Vi konvenis al ili kiel eble plej bone, ja vi ne estas iu sentaŭgulo; sed permesu demandi, kial vi konsentis akcepti la kastelon kun ĉiuj tiuj kofroj? La kofroj frakasis vin definitive...

– Kiel do mi povus rezigni? Mi ne vidis kaŭzojn. Kaj eĉ tio estas iel malafable – akcepti donacon, sed nur parte... ja tio estas ofendo por donacanto...

– Mi ĝuste tiel pensis. Sed la kofrojn neniu tribunalo glutos. Ĉu vi scias, kio estas en ili?

– Oni diris al mi, ke artaĵoj...

– Nu, eble nur supre. Tio ja estas ridindega. Jen mi havas la donakaton, kseroksaĵon. Pri la enhavo de la kofroj ne estas eĉ vorto.

– Advokato Trürli diris, ke tie estas iaj pentraĵoj kaj ke transdono de ili en mian posedon postulas specialajn formalizaĵojn...

– Nu certe, ja tie estas ĉefaj partoj de la aparataro por produktado de la ora kafo. Al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras, sed tiu ĉevalo estis Troja! Vi devis konservi tion, pri kio okazis la vera disputo, malantaŭ la kuliso!

– Sed kion vi diras! Mi eĉ ne rigardis en tiujn kofrojn...

– Nu jes, vi estas honesta homo. Vi subskribis, vi promesis, tio tre bone karakterizas vin, eble ie aliloke oni kredus al vi, sed ne ĉi tie. Ilia versio estas tia: vi penis uzi la seneliran staton de Küssmich, por akiri kapitalon.

– Trürli diris ion similan.

– Jen, vidu!

– Sed klarigu al mi, kial Küssmich, donacinta al mi tion, kion li tute ne deziris donaci, elkaĉiĝos sendifekta, sed mi ne?

– Vidu, jen en kio estas la afero. Ni supozu, iu venas al vi kun granda kofro kaj diras, ke li murdis la onklinon, en la kofro estas ŝia korpo kun brilantoj, kaj se vi kaŝos ilin ĉe vi, li dividos kun vi la predon, – nur helpu enterigi la onklinon. Poste evidentiĝas, ke li

trompis vin. En la kofro estas solaj brikoj. Li ne havos respondecon – ja pro kio? Ĉu pro tio, ke li vin trompis? Sed li nenion ricevis de vi per tiu mensogo. Li diros, ke li ŝercis, – kaj vi estos en la kaĉo. Vi konsentis iĝi komplikulo de krimo postfakte, promesinte kaŝi la rabitaĵon, kaj helpi pri enterigo de la kadavro. Tio estas punenda. Provo de komplaceco *post homicidium* [8], kaj helpo pri vendo de rabitaĵo.

– Ĉu vi vidas ĉi tie ian analogion kun mia situacio?

– Jes. Ili tion tre ruze elpensis! Kaj vi ankoraŭ konsentis, ke nesciate kiom da komisiitoj de Küssmich observu, kiel vi plenumadas la kondiĉojn de la donacakto! Ĉu mi diru al vi, sinjoro Tichy, kion vi vidos en la kastelo, se vi venos tien? Homamason, sinjoro Tichy! Se vi havos ian fiziologian neceson, ili rajtas akompani vin ĝis la necesejo mem, kaj eĉ esti *praesentes apud actum urationis aŭ defecationes* [9], ĉar la dokumento, kiun vi subskribis kaj permesis certigi per subskriboj de du atestantoj, ne rezervas iajn ajn esceptojn. Nenio direblas, bonege farite!

– Prefere vi moderigu vian admiron.

– Hi-hi, vi, je Dio, estas amuza kliento, sinjoro Tichy! Do: ili, vidu, deziras, ke vi propravole rezignu la donacon. Se vi ne konsentos, komenciĝos proceso. La kastelo – nu, tie mi iel vin defendus, sed kio koncernas la kofrojn – apenaŭ. *In dubio pro reo* [10], sed neniu sviso dubos, ke unue vi rigardus en la kofrojn.

– Kaj eĉ se mi rigardus, kion tio ŝanĝus?

– Ĉu vi nepre deziras scii? Bone, mi diros al vi. Tie estas ankoraŭ biloj, akcioj de Küssmich, patentoj, tehnikaj dokumentaro, kaj se vi estus homo malpli honesta, sed pli antaŭvidema, vi tion trovus kaj informus Küssmich-on, ke li prenu sian havaĵon. Sed vi silentis. Ne, silentu – mi al vi kredas! Tamen kolego Trürli intencas kuir el tio tre pitoreskan historion. Neagado kiel *dolus* [11], aŭ eĉ kiel *corpus delicti* [12]. Sur via loko mi nepre okupiĝus pri tiuj kofroj.

– Vi diras strangajn aferojn.

– Ĉar mi scias, kio estas Küssmich, kaj vi nur komencas ekscii. Tio estas ankoraŭ ne ĉio. Ili silentos, sed se vi decidis forveturi, vi estos arestita sur la limo aŭ en la flughaveno. Intenco fuĝi en landon, ne subskribintan kun Svisio la konvencion pri transdono de krimuloj.

– Kion do vi konsilos?

– Estas bastono ankaŭ kontraŭ Küssmich, sed ĝi havas du pintojn. Se vi rezignus la donacon nun, Küssmich ne ĝojus. Ĉi tie estas jura nuanco. Dum la tribunalo ne faris favoran por li verdikton, la proceso pendos super li, kiel Damokla glavo. Ni scias, ke tiun glavon oni forigos, metos en glavingon kaj enterigos, sed se jam antaŭ la verdikto la gazetaro distrumpetos pri via rezigno de la malavara donaco, unu tiros post si alion kaj rezultos tre granda odoraĉo. La gazetaro ŝategas tiajn skandalojn! Tamen post la verdikto neniun interesos la kastelo, nek vi, nek la kofroj, kaj neniuj rimarkos, ke li donacis, kaj vi redonis al li la donacon, ĉar tiel vi deziris, kaj punkto. Ĉu vi komprenas?

– Mi komprenas. Kaj mi deziras rezigni tuj. Por ke estu pli da odoraĉo!

Advokato Finkelstein ekridis kaj minacis al mi per la fingro.

– Venĝo? Vi soifas sangon, ĉu? «Ho, malnobla Jago...» kaj tiel plu, «jen venis temp' de rekompenco, ho fiulo!» kaj tiel plu. Mi petas vin ne fari tion, sinjoro Tichy! La bastono havas ankaŭ alian pinton. La gazetaro ĵetiĝos al vi ambaŭ. Li estas fripono, kaj vi estas lia helpanto. Certe, ne malutilos minaci, ke ni tuj ĉion redonos, sed la minacoj estos ne tre konvinkaj, ĉar kvankam ni povas tiri ilin kun ni, ni dronos kune, kaj vi subakviĝos pli profunde, ol li. Trürli forĝos el viaj kuleretoj la glavon de arkanĝelo Gabrielo.

– Do kion vi al mi konsilas?

– Konservu paciencon. La tribunalo prokrastis la sesion je tri monatoj. Ni marĉandos. Ni bremsos, konsentos je kvarono, iom cedos, paŝos al la elirejo, fermos post ni la pordon, denove iom remalfermos, revenos, – kaj fine rezultos nula interkonsento.

– Kion vi volas diri?

– Küssmich reprenos la kastelon kaj la kofrojn, sed kompensas viajn malŝparojn kaj rezignos la proceson. Nu, ankoraŭ, eble, kompensas la moralan damaĝon. Ĉu la tuta bildo iĝis al vi klara? Se ne, mi povas klarigi ankoraŭfoje. Mi estas tre pacienca kun klientoj. Alie ne eblas. Svisoj, ĝenerale, pensas malrapide. Mi naturaliĝis ĉi tie, sed mi naskiĝis en Ĉortkovo, se vin interesas. Ĉu vi scias, kie ĝi estas?

– Ne.

– Ne gravas. Galicio kaj Lodomerio. Ĉarmaj lokoj. La patro – eternan memoron al li, kune kun lia ideo nomi la unuenaskitan filon Sputnik, – havis tie antikvaĵan vendejon. Li estis meritoplena homo. Mi ne ŝanĝis la nomon. Nu, do kiel, sinjoro Tichy? Ĉu ni rezistu aŭ paciĝu?

– Mi volus, ke sinjoro Küssmich memoru min longe, – respondis mi post ioma medito.

La advokato rigardis al mi kun malaprobo.

– Ĉu vi pensas unue pri li, kaj poste pri vi? Noble, sed nepraktike. Prefere lasu al mi rezervan ŝnuron. Advokato Finkelstein rezistos kaj prokrastos tiom, kiom eblas. Kaj vi dume ripozu. Tutegale necesas atendi tri monatojn.

– Ĉu vi scias, – diris mi, kaptita de nova ideo, – tiu kronorko – ĉu ĝi jam pretas? Ĉu funkcias? Ja tiam eblus sendi grandan dozon de diversaj atomoj tien, kie Küssmich estos preparanta sian oran kafon. Ekzemple, fulgon, silicion, sulfuron...

La advokato laŭte ekridis.

– Ho, la profesoro pravis, kiam diris, ke vi estas sprita. Vere, tiu armilo povas iĝi tre danĝera. Sed, vidu, venĝo, samkiel ajna komerco, devas havi ian limon de malŝparoj. Por sendi manplenon da atomoj je duonjaro estontecen, necesus elektro je miliono da frankoj...

– Tioukaze mi komisias al vi la zorgojn pri mia kastelo kaj mia honoro, sinjoro advokato, – diris mi, ekstarante. Li ankoraŭ ridis, kiam mi fermis la pordon malantaŭ mi.

## II. La Instituto de Historiaj Maŝinoj

Advokato Finkelstein konvinkis min. La venĝo estis neebila. Kvankam tio estas, certe, unu el la plej superaj ĝuoj de la vivo, kaj, kiel asertas ekspertoj, malvarma venĝo plej bongustas. Kiu el ni ne havas personajn malamikojn, pro kiuj ni retenas nin for de malutilaj pasioj, por ke en bonega sano ĝisatendi la necesan horon? Pri tio mi povus rakonti nemalmulte, ja kosmonaŭtiko, kompreneble, lasas amason da tempo por meditado. Unu homo, mi ne diros lian nomon, por ne eternigi ĝin, dediĉis sin tutan al primakulado de miaj verkoj. Revenante el Kasiopeo, mi sciis, ke mi renkontos lin en la oficiala bankedo, kaj pripensadis diversajn variantojn de tiu renkonto. Certe, li venos al mi kaj donos sian manon, kaj mi, ekzemple, petu lin klarigi al mi, ĉu li estas kanajlo aŭ kreteno, ĉar al kretenoj mi premas la manon, sed al kanajloj – neniam. Sed tio estis iel tro mizere, operete. Mi malaprobadis unu varianton post alia, kaj alteriĝinte, kun teruro aŭdis, ke ĉio estis vana. Li ŝanĝis sian opinion kaj nun laŭdegadis min.

Al Küssmich mi same nenion povis fari. Tial mi decidis, ke ekde nun li ne ekzistas por mi. Kaj li vere malaperis, sed nur el mia realo. En sonĝaj koŝmaroj li donacadis al mi jaĥtojn, palacojn, cisternoŝipojn, plenajn je «Milmil», kaj amasojn da brilantoj. Mi devis surgenue forrampadi de hordo de advokatoj, kaj tiuj, atinginte min en malluma strateto, plenigadis miajn poŝojn per arĝentaj kuleretoj. Kondamnita al tri monatoj de malfacilaj zorgoj en Svisio, mi timis, ke mi simple perdos la sanon. Nokte Küssmich, kaj tage donacaspektaj parkoj, ore brilantaj ŝildetoj kun nomoj de bankoj, borsaj bultenoj kaj kurzoj de akcioj en «Neue Zürcher Zeitung». Dum promenoj mi evitadis unu straton: oni diris al mi, ke sub asfalto, inter tuboj tie estas konservataj gardoŝrankoj kun oro; por ili, onidire, mankis loko en la subteraĵo, kaj la banko enfosiĝis sub la pavimon. Feliĉe, mi rememoris pri la invito de profesoro Gnuss. Tio min savis.

La instituto troviĝis eksterurbe. En ĝiaj vitraj muroj speguliĝis ĉielo kaj nuboj. Ĝi altis meze de vasta parko, rimarkebla de malproksime. Malantaŭ la barilo en formo de lancoj kun orizitaj pintoj varmiĝis sub la suno tonditaj vicoj de arbustoj. El la akceptejo mi telefonis en la ĉefan konstruaĵon; poste mi traveturis pluen kaj parkis la aŭton sub grandaj kaŝtanoj apud baseno, en kiu naĝis dormemaj cignoj. Mi malŝategas tiujn stultajn estaĵojn kaj ne komprenas, kial tiom da talentaj homoj (*speciale artistoj*) kaptiĝis je hoko de iliaj fleksitaj koloj.

La halo de la instituto estis senlima. Per io ĝi similis katedralon – eble, pro silento kaj marmoraj platoj; linteloj, spegulitaj en ili, pensigis pri preĝejoj kaj volboj. De malproksime mi ekvidis la profesoron – li estis eliranta el lifto, ridetante responde al mia saluto. Tiel komenciĝis uverturo al unu el miaj plej gravaj vojaĝoj; sed mi, sekvante mian kondukanton laŭ koridoroj de iu alta etaĝo, preter teĥnikistoj en blankaj ĥalatoj, rajdantaj en seloj de senbrue ruliĝantaj elektroĉaroj, ne povis pri tio scii. Malgraŭ taga tempo, brilis lumineskaj lampoj jen per varma, jen per malvarma lumo, kvazaŭ aludante, ke la ĉi-tiea tempo ne obeas la teran. En la grandega kabineto la profesoro prezentis al mi ĉirkaŭ dekon da siaj kunlaborantoj – sekciestroj de IHM. Por ne ĝeni mian modestecon, ili salutis min respekte, sed sen servileco. Tio estis rondeto de brilaj, unuarangaj mensoj. Bedaŭrinde, ne ĉiujn mi memoras. Mi scias, ke la Sekcion de Financa Kosmologio ne estris doktoro de Volaille, la sekciestro havis ian alian nomon, sed kian – mi forgesis. Ĉiuokaze, ian similan. Tamen, financoj ne estas mia fako. Alia afero estas fiziko. Tiun sekcion estris franclingva sviso, docento Bourr de Calance; preskaŭ 49 procentoj de liaj subuloj estis frenezuloj. La envianoj – ĉar la ideo montriĝis genia – asertis, ke ankaŭ de Calance mem estas mensmalsana. Kvazaŭ sur tiaj intelektaj altaĵoj tio povus havi ian ajn sencon. Prenu por ekzemplo kelkajn lastajn ideojn de liaj kunlaborantoj. Se ne eblas movi sin en la tempo, oni movu la tempon. Se energio ne deziras flui inter izotermaj punktoj, oni ĝin fluigu, farante truojn. El tio devenis entronoj, inversoroj kaj reversoroj, kaj ankaŭ fosistiko, aŭ profundo de kavetoj en la strukturo de la spaco-tempo, ĝis kiam ĝi ie krevos, –

kaj tiu, ekster ajna dubo, freneza ideo metis komencon de la nova erao en fiziko. Tamen, dume neniu sciis, kiel tion fari, sed praktika apliko zorgigis en la Instituto nemultajn, ĉar ĝi tuta estis strebanta en malproksiman estontecon. De Calance, ĉiuokaze, estis plenigita de entuziasmo. Certe, ajna renkontita alienulo ne povus kalkuli je posteno en lia sekcio. Necesis freneziĝi ne pro banalaj personaj problemoj, sed pro la plej malmolaj nuksoj de fiziko. Tamen, tiu penso apartenis jam al Niels Bohr: tiu iam rimarkis, ke en la moderna fiziko ordinaraj ideoj jam ne sufiĉas – necesas la frenezaj. La dekstra mano de de Calance estis doktoro Doberman, la maldekstra – malalta Sen-Beernares. Aŭ inverse. Ĝuste li (sed mi ree ne memoras – kiu el ili) matematike pruvis la eblon de transformiĝo de kvarkoj al akvarkoj, kaj de tiuj, siavice – al akvarioj. En nia Universo tio ne eblas, sed en aliaj, sendube, eblas; per tio la teorio eliris ekster limojn de nia Universo. Tamen mi estas preskaŭ certa, ke ĝuste la nederlandano Doberman diris al mi subite, ke la eklezio uzas malkonvenajn simbolojn, uzante pastoralajn, alivorte, paŝtistajn imagojn de ŝafidoj kaj ŝafoj, ĉar loko de ŝafidoj estas sur rostostango, kaj ŝafoj taŭgas por ŝaŝliĝo. De Calance, certe, havis iomajn malfacilaĵojn kun sia kolektivo. Aldone li revis akiri almenaŭ paron da freneziĝintaj Nobel-premiitoj; malfeliĉe, ĉiuj vivantaj estis dume normalaj. Liaj sciencistoj kondukis treege logike por sia stato, eble, eĉ tro logike, kaj tute ignoris ordinarajn morojn, kiam temis pri la esenco mem. Sur mia tibio ĝis nun videblas spuro de la dentoj de doktoro Druss; li mordis min tute ne en paroksismo de frenezo, sed por tio, ke mi pli bone enmemorigu lian teorion de spinoj (alivorte, turniĝoj) – ne maldekstraj kaj ne dekstraj, sed triaj. Kaj vere, li atingis la celon: mi memoras ĉion precize.

Necesas, tamen, meti almenaŭ ian ordon en tiujn senbridajn rememorojn. La koro de la Instituto estis grandegaj historiaj maŝinoj, nomataj ankaŭ elektrokronografoj; la ceteraj sekcioj havis kun ili konstantan komunikadon. La sekcion de Ontologiaj Eraroj kaj Distordoj estris Jondler Knack, alta usonano, filo de islandanino kaj eskimo; antaŭ kreo de tiu ĉi sekcio neniu havis eĉ etan imagon pri la vera rolo de eraraj ideoj, kiuj, esence, determinas konduton de raciĥavaj estaĵoj. Rigardinte unuafoje en la laboratorion

de Industria Seksistiko, mi decidis, ke mi trafis en muzeon de malnovaj vapormaŝinoj aŭ pumpiloj de James Watt, ĉar tie ĉio kun siblego moviĝis tien-reen; sed tio estis nur metiejo de putinaj maŝinoj, primitivaj kopulatricoj; ilin oni veturigis el diversaj landoj kun celo de normigo kaj komparaj konverĝaj esploroj. La japanaj framoj estis lakitaj kaj ornamitaj per pentritaj floroj de blanka ĉerizo. La germanaj estis absolute funkciaj, sen ajnaj ornamaĵoj, iliaj pistoj sensone moviĝis en cilindroj, brilantaj pro lubriko, kaj la fakuloj de Knack eksterpolis jam sekvan generacion de kopulatricoj. Sur la muroj pendis koloraj grafikaĵoj de erekto kaj malerekto, kaj ankaŭ kurboj de orgasma kaj ekstaza saturaĵo. Ĉio ĉi estis tre interesa, sed la etoso tie regis sufiĉe malgaja, ĉar tie oni jam sciis, ke la hipotezon pri universala karaktero de la tera erotiko kontestis informoj de interstelaj ekspedicioj. Doktoro Fabelhaft, la kreinto de la teorio de konstante kreskanta intervalo inter agoj de amoro kaj nasko ([tiel nomata teorio de kopulacia-prokreacia diverĝo](#)), laŭ vortoj de la kolegoj, drinkis ĝis perdo de konscio, ĉar li jam kalkulis parametrojn de tiu diverĝo por ĉiuj biologiaj populacioj de la Galaksio kune kun la Magelana Nubo, kiam la direktoro ordonis transdoni la tutan dokumentaron en la sekcion de Eraroj kaj Distordoj. Tial mi ne sukcesis konatiĝi kun li – li evitadis homojn.

Tamen la sekcio de Eksterteraj Teologioj prosperis. Malgraŭ mikrominiaturigo ([en blokoj de hidrarga memoro kun kapacito je 107 sanktoroj por kuba milimetro estis konservataj nur la plej bazaj scioj pri teodiceoj](#)), oni parolis pri transigo de la sekcio en apartan domon, ja la elektronika enciklopedio de konfesioj pezis jam preskaŭ 150 tunojn. Tio estis sufiĉe neordinare – stari antaŭ giganta bloko de memoro, katenita en ŝtalo, kie, kvazaŭ en brilanta sarkofago, ripozis miloj da religioj de la Kosmo.

Estimata asistanto de la profesoro, magistro Denkdoch, komence trairigis min tra ĉiuj sekcioj ([sed mi ne povos indiki eĉ malgrandan parton de ili](#)), por ke mi komprenu, kiaj riveroj de informo nutras la centrajn elektrokronografojn. Ilia destinon mi ankoraŭ ne komprenis, sed laŭ konsilo de Denkdoch mi dume nenion demandis.

La tagmanĝo, ricevita de mi en la kantino, por tia instituto estis tro modesta. Denkdoklarigis, ke antaŭnelonge la subvenciojn oni denove reduktis. Tamen pri mia klerigo oni ekokupiĝis serioze. La vizito rapide perdis konatigan-ekskursan karakteron, kvankam mi ankoraŭ ne konjektis, kion planis la profesoro, donante al mi sian telefonnumeron. Post la tagmanĝo Denkdoklarigis proponis partion de ŝakludo. Mi alportis mian minikomputilon, kiun mi lasis en la aŭto, kaj sidigis ĝin ĉe la ŝaktabulo kontraŭ unu el la institutaj komputiloj – la malpli granda; dum ni mem, ne perdante tempon, iris en la direktoran kabineton, kie komenciĝis mia inico en sekretojn de IHM.

Nun ĉio ĉi estas nur paliĝintaj rememoroj, sed tiam mia kapo preskaŭ krevis. Unue oni min konatigis kun la ordo de MEA, al kiu ili estis subordigitaj. Ion el tio mi eble iam havis okazon aŭdi, tamen mi laŭeble penadis flanke ĉirkaŭiri tiun sferon de la kosma burokratio, ĝis ĝi mem ne trafis min. Kio okazas nun en la najbaraj stelaroj, neniu scias; en la plej bona okazo oni scias, kio okazis en ili antaŭ ikso da jaroj, kiam tie estis niaj senditoj. Esploristoj, kiel personoj politike nekompetentaj, ne povas, kompreneble, vojaĝi solaj; tial kun ili flugas senditoj de respektivaj departementoj. Post reveno el la afervojaĝoj la oficistoj faras raportojn, kaj el tiuj raportoj estas preparata ekstrakto por programado de elektrokronografoj, tio estas komputiloj, modelantaj historion de la koncerna planedo. Kiamaniere, tamen, oni povas konstrui politikon surbaze de konkludoj el antaŭnelonge pasintaj eventoj? Nura radiokomunikado ne sufiĉas por tio; tamen, radiogramo eĉ de la plej proksima stelo iras dum pluraj jaroj. La elektrokronografo, simple dirante, devas diveni daŭrigon de la aliplaneda historio, al kiu ĝi estas celigita. Mi ne rakontos detale pri kvereloj kun esplorantoj-atestantoj, kvankam, interalie, ankoraŭ neniam okazis, ke ili sukcesus akordigi siajn raportojn pri ekspedicio. Sufiĉas rememori, ke la usonanoj malŝparis miliardojn, penante klarigi, ĉu ekzistas vivo sur Marso; ili sendis tien orbitajn kaj surplanedajn aparatojn, dum pluraj monatoj esploradis ricevitan materialon, post kio evidentiĝis, ke ĉio, vere, estas sciata, sed kio ĝuste – pri tio la sciencistoj ne povas interkonsenti. Sed ĉio, kion necesis ekscii, estis nur: ĉu estas tie en la sablo iaj bakterioj aŭ ne. Ja mikroorganismoj, kiuj aŭ estas

aŭ ne estas, kiuj malhavas langon, kaj tial ne povas rakonti fabelojn, – tio estas simple donaco kompare kun racihavaj estaĵoj, kiuj ne nur havas tian kapablon, sed ankaŭ kun nemalgranda lerto uzas ĝin. Krome, kosmopioniro venas sur la Teron kun senespere malnoviĝinta materialo, ja kiam MEA ricevas lian raporton, pasas jarcento, kaj kun tiu diplomatia flanko de la relativecteorio ne eblas ion ajn fari. Tial diplomatio, kaj kun ĝi ankaŭ politiko en la Kosmo povas esti nur relativismaj. En elektrokronografon oni enmetas donitaĵojn de planedologio, fiziko, ĥemio, kaj historiojn de loĝataj planedoj; ĝi glutas centojn da informaj fluoj, kaj poste vica kontrolo ekspedicio konstatas plenan fiaskon de ĉiuj tiuj penoj. Dume elektrokronografoj eĉ unu fojon ne trafis ĝuste. Plej ofte ili tute mistrafas, kaj kial miri? Ĉu vi memoras, kiom sukcesaj iĝis elpenaĵoj de futurologoj? Sed ili ja okupiĝis pri tio, kio estis sub iliaj nazoj kaj trans la fenestro. Aliflanke, oni ne ĉesu labori: politiko ekzistas ne tial, ke tio al iu plaĉas, sed tial, ke ĝi necesas. La politika informiteco de MEA tute dependas de la laboro de elektrokronografoj, tial la Instituto muntadas ilin unu post alia. Tamen ili funkcias kun devioj, alivorte, kreas kontraŭdirajn versiojn de aliplaneda historio. La perspektivoj estas ne tre ĝojigaj. En ĉiu galaksio estas ĝis naŭcent civilizoj, kun kiuj necesas teni diplomatiajn rilatojn, tia estas la hodiaŭa aprezo; kiom da galaksioj estas en la mondo, neniuj scias precize, sed ne malpli ol cent miliardoj. Tio donas ian imagon pri objektivaj malfacilaĵoj, kun kiuj kunpuŝiĝas la Ministrejo de Eksterplanedaj Aferoj; konsoli sin per tio, ke ordinara interŝanĝo per diplomatiaj notoj kun foraj civilizoj okupas ĉirkaŭ du miliardojn da jaroj, ne eblas: ja ekzistas ankaŭ pli proksimaj, kaj ne malutilus scii, kion ni atendu de ili. Magistro Wüterlich el la Grupo de Memprognozo de IHM ([ĝi modelas estontan evoluon de MEA](#)) malkovris, ke se la kosmopolitiko evoluos laŭ la prognozoj, do ne pli malfrue, ol post cent kvindek jaroj ĉiu terano iĝos minimume honora konsulo, se ne plenrajta ambasadoro, kaj ĉiuj tipografioj de nia planedo presados nur solajn akreditaĵojn. Tio, certe, radike likvidus la minacon de troloĝateco, sed kreus vicon de novaj problemoj. La urboj malpleniĝus, kaj MEA mem ricevus malfacilaĵojn kun kompletigo de la etato.

Dum la unua monato mi ĉiutage venadis en la institutan Centron de Kronografia Observado kaj aŭskultadis lekciojn, kiel studento. Mi eksciis, ke ne ni elpensis ĉi tiun pulvon, longe antaŭ ni troviĝis tiaj mensoj en la ĉielo. Politiko ja estas rimarkinda pro tio, ke ĝi inkludas en sian orbiton ĉion, kio komence, eble, ne estis ĝi. Tie, sub fremdaj sunoj, estas propraj MEA-oj kun propraj elektrokronografoj, kaj la kosma konkuro en tereno de optimumigo de antaŭdiroj jam delonge ruliĝas. Ju pli precize vi divenis daŭrigon de aliplaneda historio, des pli profita estas via stato. Tial la kronomodelado estas ne nur metodo de ekkono, sed ankaŭ politika armilo; ja kelkajn versiojn de sia historio tiuj, Aliaj, produktas nur por eksporto; en intereso de la kosmopolitiko tiel, plej verŝajne, devos fari ankaŭ ni. Kiel rimarkis en mia ĉeesto ironia profesoro Maverix el la Sekcio de Tera Historio, por tio necesos nek specialaj malŝparoj, nek penoj – sufiĉos translacii enhavon de lernejoj lernolibroj de historio, eldonataj en landoj, tiom grandnombraj sub nia suno. Tamen, ĉar tiuj fantazioj estas, ĝenerale, modestaj, oni nomas ilin ne mensogo, sed loka patriotismo.

Mi diligente aŭskultadis lin, glutadis pulvorojn kontraŭ kapdoloro kaj konvinkiĝadis, ke ĉio estas perdita. Neniam mi konos la Kosmon tiel, kiel en la antaŭaj jaroj. Tiam mi estis vera infano; sed al infana simplanima naiveco pli aŭ malpli frue venas fino.

La elementojn de kronomodelado eksplikadis al mi docento Zwingli. Tio ankaŭ nomiĝas projekcia imitado de futuro; tamen, en la interesanta nin planedo ĝi jam estas ne futuro, sed nuno, sed ni ne scias ĝin kaj ne povas tuj ekscii, ĉar ne eblas momente trapasi la dividantan nin distancon. En la maŝinojn oni enmetas ĉiaspecajn informojn pri loĝata astro. Komence – versiojn de pioniroj, falsaj minimume je 100 procentoj ([ĉe tiuj vortoj mia koro haltis](#)). Minimume, ĉar eĉ sur la Tero pioniro ordinare ne havas eĉ imagon pri tio, kion malkovris. Prenu almenaŭ Kolumbon kun lia Ameriko. Li ricevis eĉ ne nulan, sed negativan informon. Nula ĝi estus, se li sincere konfesus, ke tute ne komprenas, kien li trafis.

Sekvajn versiojn liveras aborigenoj, plie pro propra profito, ol pro strebo al vero. Tiuj versioj estas plej facile kompreneblaj: destinitaj por eksporto, ili estas simplaj, klaraj kaj konsekvencaj. Se ili proksimiĝas al la vera stato de la aferoj, tiam eblas kompreni aŭ malmulte, aŭ ĉion inverse. Kaj tio ne estas kaŭzo por indigno: ni rememoru, ke kristana amo al proksimulo servis kiel pravigo por malamo al alikredantoj, por disŝirado per ĉevaloj de Di-timemaj interpretantoj de Evangelio, por prirabado de najbaroj, por sklavigo de aborigenoj, – koncize, ne estas krimo tiom abomena, kiu ne estus farita pro timo antaŭ Dio. Kaj vorte tiuj Diaj ordonoj estis sankte plenumataj, el kio sekvas, ke ĉio povas sekvi el ĉio, kaj la racio en praktiko servas por akordigo de la bela kun la hontinda. Optimistoj povas konsoli sin per tio, ke temas pri universala atribuaĵo de racio, sed ne pri la loka.

En la labora slango de la Instituto enradikiĝis artileria terminologio, ĉar la fina rezulto de la esploro devas esti eventa trajektorio, trafanta precize en la celon. En la ideala okazo tera observanto venas sur la planedon – la objekton de modelado – kun lasta numero de loka gazeto en la manoj ([tiel nomata fantoma eldono](#)) kaj, komparinte ĝin kun analogia loka eldono, konstatas ilian plenan similecon. La idealo, kiel tio ordinare okazas, ne estas atingebla, sed necesas al ĝi strebi. Aparta kronohaŭbizo donas devion, nomatan absoluta; tio signifas, ke estas neniaj koincidoj. Tial kronohaŭbizojn oni unuigas en bateriojn, kio kaŭzas egan diverĝon de kronogramoj. La provoj mezumi la rezultojn donis plenan ĥaoson, kaj nun ekstremaj rezultoj estas forfiltrataj. Laŭ tiu principo funkcias tri kronobaterioj: Baterio de Aprobantaj Moduloj ([BAM](#)), Baterio de Oponentaj Moduloj ([BOM](#)) kaj de Utiligantaj Moduloj ([BUM](#)). Akordigi iliajn verdiktojn provas MENS ([Mezumiga Nedeterminita Sistema](#)), kiu, tamen, de tempo al tempo falas jen en epilepsian resonancon, jen en katatonion. Oni faras esplorojn pri kreo de unuiĝintaj divizioj ([BAM](#), [BOM](#), [BUM](#)) por eliro sur pli altajn nivelojn de modelado, sed la lanĉo de la unua korpuso de grandkalibraj kronohaŭbizoj ne konfirmis la atendojn; montriĝis, ke la historiografia trafeco de korpusaj agregaĵoj povas kontentigi nur en tiu okazo, kiam ilia komuna maso egalos al tiu de la Galaksio.

Do dume oni devis limiĝi per sistemo el tri memstaraj baterioj, kaj MENS nur komentas ĝiajn diagnozojn.

Ĉio ĉi ŝajnis al mi tute nekredebla. Ĉu eblas, demandis mi, antaŭvidi ion ajn el okazintaĵoj sur planedo, malproksima de ni je miloj da lumjaroj, se mi ĵuros per la kapo, ke ĉiuj viaj kronohaŭbizoj ne divenos, kion mi morgaŭ tagmanĝos?

– Ha! – respondis Zwingli. – Ne pensu, ke vi jam mortpafis nin. La principo de fidindaj prognozoj estas simpla. Vere, ne estas sciate, kion vi morgaŭ manĝos, sed estas sciate, ke post kvar miliardoj da jaroj ĉi tie neniu ion ajn manĝos, ĉar la Suno, iĝinte «ruĝa giganto», cindrigos la internajn planedojn, kaj kun ili ankaŭ la Teron. Ĉu prave?

Mi konsentis.

– Tial malfidindajn eventojn necesas kupli kun la fidindaj. Tia estas ĝenerala principo, kaj cetero estas jam kalkuloj. Ilin ne povus fari la tuta homaro, sidigita ĉe abakoj, sed cent gramoj da psin-maso ([psiĥosinteza maso](#)) facile venkas la homaron. En la Naturo ekzistas iuj konstantoj. Ekzemple, la konstanto de dilato de varmigataj korpoj aŭ de disvastiĝo de planedaj civilizoj. Ne gravas, kion ili tie pensas, gravas, kion ili faras. Stilo de arĝenta kulereto kiel juvela artaĵo tute ne gravas, se meti ĝin en fornon. Gravas nur la temperaturo de degelo de arĝento. Sekve, krom konstantoj, ekzistas krizaj punktoj – ankaŭ en historio. Forgesu la tutan arkaikan historiografion! Reĝojn, dinastiojn, ŝtatajn interesojn, konkerojn kaj ceteron. Ne eblas kalkuli gutojn en Niagaro, sed ties potencon kaj akvofluon eblas kalkuli. Juna civilizo, kiel oni ĉe ni kutime diras, ne tute adheras al la Naturo. Kiam estas neatingeblaj ne nur steloj, sed ankaŭ fundoj de maroj de la propra planedo, ĝiaj internaĵoj kaj polusoj, kiam hordoj de nomadoj nutras sin per tio, kion sendis al ili Dio – ili povas pensi pri steloj, maroj, klimato, tero ĉion, kio venos en iliajn kapojn, ja tiuj fantazioj ne estas ligitaj kun praktika agado. Pluvon ili povas voki per sorĉado, adresi al oceano preĝojn, peti sunon pri helpo – la kondiĉojn de ilia vivo tio neniel tuŝas. Sed ju pli aĝa estas la civilizo, des pli vasta estas sfero de ĝia kontakto kun

la Naturo. Vi ne povas limigi sin per informoj pri tridento de Neptuno, se vi deziras preni nafton el mara fundo! El tio kio sekvas? Tio, ke juna civilizo kondutas ne kiel brasiko sur bedo somere, sed, pli simile, kiel kalto sur marĉo printempe. Ĝi jam ekburĝonis, sed jen subita frosto, kaj la burĝonoj iras al diabloj. Frosto desegnas arabeskojn sur fenestroj. Kiajn arabeskojn ĝi desegnos, ne estas sciata; estas sciata, tamen, ke baldaŭ ili malaperos, ĉar venas varmiĝo. Frua evoluo singultas. Alivorte, oscilas. Lokaj sociaj sciencistoj nomas tion historiaj cikloj, kulturaj epokoj kaj tiel plu. Kompreneble, neniam prognozojn eblas fari el tio. Konvena modelo estos kuvo kun akvo, en kiun oni aldonas sapon. Dum da sapo estas malmulte, vezikoj krevas. Se vi aldonos akvon – ili tute ne estos. Sed, aldonante sapon, vi densigas la ŝaŭmon. Substitu sapon per kompareble evoluintaj teĥnologioj, kaj la vezikoj ĉesos krevi. Jen al vi la modelo de civiliza ekspansio en la Kosmo! Ĉiu veziko estas civilizo. Unue ni kalkulas konstantojn de veziko. Kia estas la surfactensio? Alivorte stabileco de la sistemo. Kia estas nia veziko interne – ĉu tute malplena aŭ dividita per membranoj, do, sekve, konsistas el kelkaj malpli grandaj vezikoj? Alivorte ŝtatoj. Kiom da sapo aldoniĝas dum jarcento? Alivorte kia estas rapido de teĥnoevoluo? Kaj tiel plu.

– Sed ĉio ĉi estas ja tro abstrakta, – ne kapitulacis mi. – la statistika mezumo el tio, eble rezultos, sed ke la enhavo de aliplaneda gazeto de jena tago de jena jaro – pardonu! Mi neniam kredos!

– Sed ni pri historio ne parolas, sinjoro Tichy, ni ĝin modelas, kaj kiel pruvon de efektiveco de la modelado ni ricevas kronogramojn, – replikis flegme la docento. – Hodiaŭ kun via ĉeesto ni ŝargos porcion da erco, kaj ĝuste laŭ priskriboj de la planedo, kiun vi vizitis kaj detale priskribis en viaj «Taglibroj».

– Kio estas tio – erco?

– Kunpremita informo pri planedo, tio estas pri ĝia civilizo. Viaj notoj same estas inkluditaj tien, certe, – sed inter dek mil aliaj. Por

praktike demonstri al vi la eblojn de la kronohaŭbizo, ni celigos ĝin al via taglibro kaj rigardos, kio rezultos!

– Mi ne komprenas. Kion kaj kiel vi celigos?

– Simple dirante, via raporto pri vojaĝo al Enteropio estos alfrontita kun tuta aro de faktoj, kiujn kolektis, esplorante la planedon, tuta kronodivizio, senĉese provizata de informo de nia MEA-a satelito, kaj tiu ricevas ĝin el la observatorio «Mount Wilson» – tie ili havas la plej freŝajn donitaĵojn de kosma radiinterkapto. Kaj neniu el ni, sinjoro Tichy, scias, kio estas en la erco, – tio estas specifeco de nia laboro. Por lego de nur unu porcio de erco vi perdus tri mil jarojn, ne malpli. Dum la kronodivizio perceptas ĝin dum tridek ses horoj, kun antcipio je kvin sekularoj. Eble, tio donos al vi ioman ideon pri la diferenco inter historiaj imagpovoj de la maŝino kaj de la homo. El ĉiuj obstakloj, kiujn ni renkontas, mi rakontos al vi nur pri unu, por ke al vi iĝu klare, kion ĝuste ni montros al vi kiel rezulton de la modelado. Kronohaŭbizo funkcias tiel, kvazaŭ ĝi ludus milojn da ŝakaj partioj samtempe, kaj rezulto de unu estas komenco de la sekva. Por fari ĝustan movon, ĝi konstruas kriteriojn de aprezo, teoriojn, hipotezojn kaj tiel plu. Do: ni tute ne deziras ilin scii. Tio al ni ne necesas – ja ankaŭ artileriisto tute ne bezonas scii, kiel okazas brulado de ĉiu pulva grajno. La obuso devas trafi la celon, jen ĉio. Tial kronohaŭbizo respondas konkretajn demandojn konkrete, sen balasto de interaj supozoj kaj elpensaĵoj. La programo de la hodiaŭa eksperimento entenas analizon de via dekkvara vojaĝo el vidpunkto de ĝiaj foraj konsekvencoj. Kaj ne tre gravas, ĉu vi diris, kiel en juĝejo, veron kaj nur la veron. Ni ja staras sur grundo de politiko, sed ne fiziko. Gravus ne vero, sed realpolitiko. Alivorte, tio, kian influon via pionira agado sur Enteropio faros al la rilatoj inter la civilizoj – la nia kaj la tiea.

– Do, kion ni atendas? – demandis mi. – Ŝargu rapide vian ercon, kien necesas...

La ŝargado komenciĝis vendrede vespere, do, veninte en la Instituton lunde, mi sukcesis ĝustatempe, por vidi la lastan etapon

de la operacio. En la Centro de Kronoobservado ŝtopiĝis multe da scivolantoj el diversaj sekcioj; la rezulto devis aperi sur ronda kaj dika, kiel lukso, ekrano, super kiu febre ekbriladis blankaj kaj verdaj kontrolaj lampetoj, ĝuste kiel en ordinara fantastika filmo; la horloĝo montris la dekunuon horon, tempo pasis, sed la malklara profundo trans la dika vitro restis malhela. Poste ĝuste en ĝia centro ekbrilis ruĝa punkto, kaj tiu lumo disvastiĝis al la tuta surfaco de la tuta cirkonferenco de la ekrano, svarmanta de nigraj, etaj, fleksiĝantaj raŭpoj. Aspektis tio treege malapetite – kiel insektoj sur arda pato. La ĉefo de lingvistoj doktoro Hayerstein triumfe ekkriis:

– La rodofila skribo, dialektoj de la supra kaj la malsupra Tetrapeptio, la lingvo de oficialaj dokumentoj!

Li proksimigis la vizaĝon al la ekrano; la nigraj raŭpoj – ĉu hieroglifoj aŭ literoj? – viciĝis je du egalaj rektanguloj, unu super alia.

– Tio estas al vi, sinjoro Tichy, – aldonis jam pli trankvile Hayerstein.

– Kio estas tio?

– Mi ne scias precize. Mi studis ambaŭ tiujn lingvojn, sed lingvoj ŝanĝiĝas kun tempo, kaj antaŭ ni estas projekcio kun anticipo je du sekularoj... se ne pli. Kolego Dŭngli, komutu, mi petas, al la ĉefa tradukilo...

Dŭngli jam staris ĉe la regpanelo, kun senemocia vizaĝo premante klavojn. Sur la ruĝa ekrano aperis akra pikilo de lumo kaj komencis kuri tien kaj reen laŭ vicoj de rigidiĝintaj signoj. Kaj tuj per ofta tamburado respondis maŝino, simila al granda teletajpilo. Ĉiuj turniĝis al ĝi, lasinte lokon ankaŭ por mi. Dum la teletajpilo muelis literojn, el sub larĝa ŝafto per etaj, spasmaj puŝoj elŝoviĝis paperfolio. Ekvidinte konatajn latinajn signojn, mi retenis la spiron kaj komencis legi.

**Kechjurr:** La Terra Ambasadorejo

**Vechjurr:** de la Superpotencforta

**Kerdellenpadrang:** Politmobilo de Kurdllando

## **BARGMARGSKVAROŜ!**

Al S-ro Ijon Tichy  
en Terro de 115 Llimner, Abrilo

Via Altebona Moŝto!

Ni: Neordinara kaj Plen-Rajta Ministro, Terre Akreditita, de la Superpotencforta Politmobilo Kurdllanda, turniĝas al V. A. Moŝto kun la malsupresekvanta.

Sciigis ni pri Skribaĵo, presita de V. A. Moŝto, kies Titolo "Stelaj taglibroj", speciale atentante "La Dekkvaran Vojaĝon", kaj en tiu Skribaĵo V. A. Moŝto rakontskribas pri flugado sur nian Globon.

V. A. Moŝto ŝovas al la Terra Populo informaĵojn pri Nia Politmobilo, tre de la vero disiĝintajn.

Singlure, alie Primo: V. A. Moŝto rakontskribas en la nomita skribaĵo pri KURDEL kontraŭ fakteco, pro kio montrantas la Politmobilon en mokoŝan Priridadon kaj Pristultadon al tre granda por Ambaŭ Ĉielaj Flankoj difekteco.

Gvindiklast, alie Secondo: V. A. Moŝto en la menciita Libraĵo tute ne stumblis stultecigi ĈASADON AL KURDEL, kiu Fenomeno en Viaaltebona Presaĵo estas estanta paskviloza Malicaĵo, kaj egale abomeniganta Ridaĉado pri la Politmobilo Kurdllanda generale, speciale pri Lia Luma Supereco Prezidanto.

Kressime, alie Tertio: V. A. Moŝto en sia Karnivoreco ne privilegiis eĉ per unu Diro pridiri pri la vera Monstrego, Plago Imperia, LUZANIO, kiu kuraĝas malicinside kontraŭamiki kun

la Kurdllanda Politmobilujo. Samkrome surverŝis V. A. Moŝto senkiale kontraŭ fakteco pri SEPULKOJ.

En aspekto de la menciita Politmobilo Ni, Neordinara kaj Plen-Rajta Ministro, Terre Akreditita, levas Superprotestadon pri Misfamigo kaj paŝas kontraŭ V. A. Malico al Spirito, Esenco, Karno, Kanto kaj Potenco de la suprenomita. Samkrome, estiel Reprezenta kaj Rezidenta Ambasadorulo, kun molkoreca firmpanseco nia ekscitas ni V. A. Moŝton turniĝi al veremuleco kaj refuzi putrecan MENSOGAĴON. Pro kio Ni, de Interplanedara Paco Amantoj kaj Amikantoj, turniĝas al V. A. Moŝto kun amikama Propozo delegacii V. A. Moŝton Ijon Tichy je duonkonto de la Ambasadorejo (BAM), de Terro (BOM), je propra konto (BUM), malklara afero (MENS) al la inkriminita Planedaro kaj samtie pervide kapti la Faktotelecon.

Ĝis 117 de Llimner (Abrila-Maia junto) ni atendas de V. A. Moŝta aperado; se tamen V. A. Moŝto malice obstinos, havos lokon dislarĝiĝi Interplanedara Konflikto.

En atendantanta senpacienceco QRDL,  
la Plen-Rajta Ministro de SPK

---

SUNN SENSELENN BRAMGORR: La Tera Ambasadaro

KIRMREGCUDAS: de Nereduktitaj Ŝtatoj de Luzanio

## **BRIBARNOTROPS!**

Ideatoro: Brannaksolaks Tun Tan 115 Vehna

Programatoro: AS/01-94ba

Operatoro: Linkomputor IX Tipo Sol-U-3

Operono: Ijon Tichy, Homo.

Altestimata Moŝto!

La Ambasado de NŜL sendas al vi varmetan amikan frazon, adekvatan inter astroj de malsamaj sistemoj.

Tamen, la menciita Ambasado eksciis, ke vi bonvolis komponi libron libraĉon libraĵeton sub/tit. "Stelaj taglibroj" k. c., en kiu Via atento fokusiĝis sur rilatoj de nia alta astro.

## EKSPLIKO

La Ambasado de NŜL kun facila bedaŭro konstatas, ke Vi, A. M., permesis al Vi ĉiuflankajn aberaciojn, kiel:

1. Kun erara perfekteco Via libraĉo prisilentas nian ŝtaton, t. e. NŜL;
2. KURDLOJ estas priskribitaj de Vi kiel rezerveja bestaro, dum en la realo tio estas kungluaj kuniĝoj, malamike agorditaj al NŜL de kurdlestroj de la najbara Kurdlando;
3. Vi permesis al Vi multajn frivolajn aludojn rilate de SEPULKOJ, kreinte per tio aspekton de ilia Pornosfereco.

## KONKLUDO

Vi, A. M., estis tute ne sur nia astro, speciale ne sur la teritorio de NŜL, sed sur la surfaco de Sintelito Skan Sen, kiu prezentas per si fragmenton de NŜL, orbite pendigitan cele de konatiga-saniga turismo. Tieajn artefaritaĵojn, sintaliojn, erotomlastikonojn, telegardistojn kaj vakuojn ([vakuorojn](#)) Vi erarege opiniis reprezento de nia civilizo, kaj amuzigajn akcesoraĵojn – vivaj estaĵoj k. c. Per tio Vi, A. M., primokis la faktan staton de la aferoj, damaĝinte la larĝiĝantajn, longiĝantajn kaj profundiĝantajn rilatojn inter Entio kaj Tero.

Rilate de la menciita rilateco, ni malsevere petas Vin, atestimata kvietulo, per diligente pesita vorto kontesti la falsajon.

Opinianta la kaŭzo de la misaĵo ne Vian malicon, sed Vian mensan malfortecon, la Ambasadoro de NŜL pretas donaci al Vi veturon laŭ itinero Tero-Entio-Tero, garantiinte sagaconan imunecon kun lertona provizo, manĝmonon kaj poŝmonon en limoj de NŜL.

Anstataŭ la Ambasadoro de NŜL Ataŝeo pri/dem. de Kulturo Terlingva Diplomato Sol-U-3, apostolanta en subsistemoj, akredititaj In Partibus Barbarorum. Subskribo nedeĉifrebla.

Kodo: A-Pc6sek-Ca-Pek-Pi(7)Cek-Pra(5)cek-Pur-9-Cik-Cikcik-Mee.

*Post Scripturam Terminantam:* La supreindikitan kodon ni petas indiki en la responda repliko. Okaze de incidento de neapero de tiu, ni komencos ordinaran gastroklastikan proceduron B-93.

Responsas: Sekretkanala Diplutoro de II rango

Cip Cipcikip Titikvak

La teletajpilo eksilentis; ekregis plena silento. Mi ĉirkaŭrigardis la ĉeestantojn – ili staris ĉirkaŭ mi duoncirkle – kaj vidinte samajn Zwingli, Dŭngli, Nŭzli kaj ceterajn sinjorojn kun similaj nomoj, ekkonsciis, ke mi troviĝas inter svisoj.

– Kion tio signifas? – severe demandis mi. – Kiu el vi, sinjoroj, permesis al si tiun, se eblas tiel nomi, ŝercon? Ĉu ne vi, sinjoro Zwingli? Bonvolu ne pensi, ke mi ne rimarkis viajn hieraŭajn aludojn pri arĝentaj kuleretoj, kvankam pro natura takto mi preterlasis tion. Sed ĉio havas limojn, estimata sinjoro! Tio jam estas ne iaj kuleretoj...

Mi stumblis, rimarkinte ĉies konfuzon, sed ankaŭ ĝojan subridon de doktoro de Calance, kiu ŝajne en miaj vortoj vidis simptomojn de mensa malsano kaj jam kalkulis je plikompletigo de sia kolektivo per tia elstara alienulo.

– Trankviliĝu, sinjoro Tichy! Ne estas tiel, vi eraras, mi donas al vi honestan vorton. Mi ĵuras per miaj infanoj!

– Se ili estas same realaj, kiel tiuj ĉi kalumniaj elpensaĵoj, – mi elŝiris la paperfolion el la teletajpilo kaj svingis ĝin super la kapo, – do via ĵuro nemulte kostas! Klarigu, mi aŭskultas...

– Tio ne estas falsaĵo! – ekkriis Zwingli. – Nek mi, nek miaj kolegoj povis anticipe scii la enhavon de kronogramoj...

– Kaj ĉu mi devos kredi je tio?! – ektonrdis mi, fine kolerigita. – Mi pretas agnoski, ke mi faris kelkajn... e-e... misojn en la stilo de Kolumbo. Tion ne eblas eviti. Sed ĉiu probable havas siajn limojn. Ĉu vi vere serioze volas min konvinki, ke la maŝino ne nur trovis miajn erarojn, ne nur antaŭvidis malkovron de ĉiuj ĉi ambasadoj sur la Tero post ducent aŭ kiom ajn jaroj, ne nur eksciis, kiajn notojn ili al mi sendos, kiam neniu el ni estos viva, kaj ankaŭ sukcesis kompili ilin en la lingvo, en kiu oni tiam parolos, kaj aldone divenis, ke ilin subskribos diplomatoj, kiuj ne ekzistas en tuta Kosmo, ĉar ili ankoraŭ eĉ ne sukcesis naskiĝi?!!

Mi metis la kronogramon sur la regpanelon, severe rigardis al ili kaj diris:

– Por praviĝo mi donas al vi dek minutojn.

Ili ekparolis samtempe; finfine Zwingli – ili lin elpuŝis antaŭen, – kun ruĝa vizaĝo kaj gutoj de ŝvito sur la frunto, petege kunmetinte la manojn, komencis per konfeso, ke li, eble, nesufiĉe preparis min al tiu ĉi speciala eksperimento, tio estas al la telesemantika fokusigo de elektrokronografoj; ja tiuj estis celigitaj al alfronto de miaj «Taglibroj» kun plena porcio de erco tute ne por moki min, sed kiel signo de speciala respekto al mi. La programo malpermesas uzi

ĝeneralajn frazojn kaj lasi en la prognozo malplenajn lokojn, kaj eblajn malplenaĵojn la maŝinoj plenigas per supozoj, tio estas – ili konstruas hipotezojn pri specialaĵoj de apartaj frazoj, ilia fonetiko kaj eĉ ortografio; alie ne eblus difini precizecon de la prognozo en procentoj. La maŝino en ajna momento povas indiki prokovirton (probablecan koeficienton de virtualeco) de ajna vorto de la kronogramo kun precizo de kvara signo post la komo. La prokovirto povas esti nealta, sed neniam estas negativa. Tie, kie ĝi tre proksimas al nulo, la elektrokronografo donas kontraŭdirajn versiojn de la Baterio de Aprobantaj Moduloj (BAM) kaj tiu de Oponentaj Moduloj (BOM), kion, eble, mi bonvolis rimarki en la unua sendaĵo, tie, kie temis pri preteco subvencii mian afervojaĝon al Entio per ĝiaj teraj ambasadoj. Ĉar financajn aferojn, pro ilia speciala subtileco, ne eblas antaŭdiri tiel, kiel ceterajn eventojn. Ni klarigu unue, diris Zwingli, pli kaj pli absorbiĝante kaj svingante la manojn tute ne en svisa maniero, kion entenis la erco? Ĝi entenis tutan aron de donitaĵoj pri Entio, akiritaj de ni surloke kaj ricevitaĵoj per radia kaj lasera komunikado, kaj tiu dokumentaro inkludas eĉ entiajn lerneajn kantarojn, ne dirante eĉ pri lernolibroj de loka historio. La diferenco inter nomoj de la planedo en la versio de la kronohaŭbizo kaj en la mia estas proksimume sama, kiel inter la nomoj «Hindio» kaj «Ameriko». Ja la aborigenojn de la Nova Mondo, ĉiujn ĉi apaĉojn, komanĉojn, aztekojn kaj ceterajn ni nur tial nun nomas indianojn, ke Kolumbo opiniis ilin loĝantoj de Hindio. Estante malpli alte civilizitaj, ol ilia malkovrinto, tiuj aborigenoj ne povis malhelpi al li erare bapti sin. Entio estas alia afero. Tiu nomo estas latina ekvivalento de ilia memnomo («ento» aŭ «racie ekzistanta»), kaj de tio venis the Entians, die Entianer, les Entiens kaj tiel plu. Neniu tion intence elpensis – tiel iros estonte la eventoj, al kiuj ni celigis la historiajn maŝinojn. Iliaj apartaj blokoj eksterpolis diversajn aspektojn de la evoluo de Entio, speciale, kiuj el tieaj ŝtatoj, estante superregnoj, unuaj malfermos terajn ambasadojn; kiel oni produktas ofican dokumentaron en iliaj kancelarioj (kio speguliĝos ankaŭ en formoj de diplomatia leterinterŝanĝado); la diplomatiaj notoj, kiuj estos senditaj al mi aŭ al miaj heredontoj, fizikaj aŭ juraj, ne koincidos, certe, kun niaj kronogamoj en ĉiu komo, sed iliaj enhavo kaj stilo estos analogiaj; eĉ la komputila kodo, indikita en la

luzania sendaĵo, estas antaŭdirita surbaze de la ĝenerala teorio de evoluo de komputiloj de N-a generacio kun donitaj teĥnikaj antaŭsupozoj; certe, tio ne estos precize SAMA kodo, sed sama TIPO de kodo, nome – la uzata en la diplomatio. Ne eblas modeli unikaĵojn – oni modelas klasojn, al kiuj ili apartenas, tio estas TIPOJN. Kaj la luzania noto estos subskribita ne per precize TIU SAMA nomo, kiu estas indikita en la fantogramo, sed per nomo de TIU tipo, simila al la fantomata tiel, kiel Zwingli al Dŭngli, kaj Ivanov al Smirnov. Ĉar la genealogia bloko de kronohaŭbizo eltrovis tipajn trajtojn de entia diplomatia junularo ne per analizo de ĝiaj biologiaj karakterizaĵoj, sed de la karakterizaĵoj, kiujn oni postulas tie ĉe akcepto en diplomatiajn altlernejojn. Ja la kronografoj malkovras ne ian «objektivan lastinstancan veron», sed lastajn direktivojn de la altaj instancoj. Sinjoroj natursciencistoj fantaziis kaj sugestis al ĉiuj aliaj, ke interstelaj kontaktoj komenciĝos per interŝanĝo de opinioj pri la eŭklida geometrio kaj la strukturo de atomo, – kvazaŭ sur la Tero, dum renkontiĝo kun antaŭe nekonataj loĝantoj de Amazonio aŭ de Fajrolando la senditoj de la civilizita mondo unue hastus informi ilin pri hipotenuzoj kaj atomoj, sed ne pri tio, kiujn negocojn oni povus kun ili fari. Ĉu iu iam aŭdis pri geometrio aŭ ia alia matematiko en politikaj rilatoj? Sed ja kosmaj kontaktoj ne povas havi nepolitikan karakteron! Unue difiniĝas oficaĵ, aŭ kancelariaĵ konstantoj, ĉar tie, kie ekzistas politiko, ekzistas ankaŭ kancelarioj; tiu leĝo havas absolutan karakteron kaj ne submetiĝas al relativismo de la relativecteorio. Unuajn konversaciojn oni faras ne pri rapido de lumo, sed pri rapido de ofica promocio, ne pri amplekso de atomaj kernoj, sed pri amplekso de oficaĵ rajtoj. Kaj el kio konsistas la Neteranoj, ĉu el siliciatoj, jodidoj, kloridoj, aŭ aminacidoj, kaj per kio ili spiras, ĉu per oksigeno, aŭ eble per fluoro, kaj kiel ili moviĝas, ĉu antaŭen aŭ malantaŭen, – ĉio ĉi tute ne influas parametrojn de ilia burokratio; la interkompreno tamen dependas eksklude nur de diplomatia interŝanĝo, sed ne de la ĥemia! Fine, tio, kio speciale min tuŝis, nome: la falsa bildo de vivo sur Entio, kiun mi opiniis vero, estas, kiel oni al mi plurfoje klarigis sur ĉiuj etaĝoj de la Instituto, tute ordinara SUPF, t. e. Sumo de Pioniraj Fuŝoj, kiu kalkuleblas laŭ la Teorio de Eraroj kaj Distordoj kaj en tiu ĉi okazo egalas al triapotenca diferenco de distancoj inter Hispanio kaj Ameriko unuflanke kaj inter

la Tero kaj Taŭro aliflanke. Kion, notu, malkovris magistro de ĝenerala modelado Prüngli. Kolumbo misopiniis Amerikon Hindio, kaj Tichy – artefaritan sateliton planedo. En tio estas nenio hontinda, kaj ne necesas ofendiĝi.

Mi estis aŭskultanta jam pli trankvile, kaj la klera sviso, kun hirtita barbo kaj vaporkovritaj okulvitroj, skuadis la fantogramojn de la notoj, kriante:

– Mi ĵuras, ĉi tie estas Nenio Hazarda! Mi petas atenti la diferencon en la lingvaĵoj de ambaŭ sendaĵoj. Ili montras al diferenco de salajroj, kaj per tio ankaŭ de nacienspezoj de Kurdlando kaj Luzanio... Pri tiuj diferencoj okupiĝis la financa-planedologia bloko de nia maŝinaro. La kurdlanda noto atestas modestajn monrimedojn, donatajn al diplomatio, ĉar ilia ambasado dungos malbone pagatan, do malbonan tradukiston... plej probable, homon, tio kostos malpli multe, ol veturigi tra multaj lumjaroj propran poligloton kun diplomaciaj valizoj.

– Kion vi ĉi tie pruvadas al mi, – interrompis mi, – ja la originaloj de la sendaĵoj estas tie, – mi montris al ankoraŭ plu lumanta ruĝa cirklo de la ekrano, kovrita per kurbiĝintaj hieroglifoj, – kaj la tradukon faris via aparataro ĉi tie kaj ĉi tiam, sed ne iu homo, tradukisto, oficisto, kies gepatroj, kaj eble eĉ geavoj ne sukcesis ankoraŭ interkonatiĝi...

– Tute ne! Vi eraras! Tio estus nepardonebla eraro por nia metio. Ja hipoteza konflikto, interplanedaj malbonaj rilatoj plej facile povas komenciĝi pro miskomprenoj dum interŝanĝo de notoj, do necesas antaŭvidi eĉ gramatikajn kaj ortografiajn fontojn de tiaj miskomprenoj! La traduko estas plenumita de la devena bloko, kun partopreno de la bloko de eksporta propagando, kaj kontrolis ilian laboron la limit-financa bloko; alivorte, parolante bildece, la maŝino kreis fantomon de ambasado, kaj en ĝi – fantomon de ofica nivelaro, kaj jam en ĝi tie, kie necesas, metis fantomon de eta oficisto, kiu tradukos la respektivan dokumenton, nenion komprenante en ĝi, ĉar oni al li ne pagos por kompreno de io ajn. Mi opinias, – aldonis

li malpli laŭte, kvazaŭ pense, – ke tio estas ia *Gastarbeiter* <sup>[13]</sup>, scianta bone neniun lingvon, krom la turka... kaj pli riĉa Luzanio uzas en diplomatio aŭtomatojn, ja ju pli evoluinta estas lando, des malpli multe kostas en ĝi aŭtomatoj kaj des pli multe kostas laborforto.

Mi ne asertos, ke li plene konvinkis min, sed jam estis malfrua tempo, tial ni prokrastis analizon de ambaŭ notoj kaj de iliaj eblaj konsekvencoj por morgaŭ, kaj mi revenis hejmen. Mi sentis min tiom konfuzita – en danĝero estis mia honoro de stela pioniro, – ke prenis telefonan parolilon kaj vokis novjorkan numeron de profesoro Tarantoga; mi devis paroli kun parenca animo. La profesoro pacience aŭskultis, poste, ne reteninte sin, kolerike ronketis en la parolilon:

– Kaj kial vi, Ijon, emociiĝas? Ĉu la svisoj elpensis komputilojn? Baterioj, divizioj, korpusoj, kronohaŭbizoj, sed ja sufiĉas nur iomete pripensi, por veni al samaj konkludoj. La kontaktoj estas faritaj, ĉu ne? Iam necesas interŝanĝi ambasadojn, ĉu tiel aŭ ne? Ajna kultura ataŝeo devas ion fari, ĉu? Do, li kolektos materialojn por sinoptikaĵo de gazetaro kaj por raportoj, kiujn li sendas al la estraro, montrante, ke pri io ja li estas okupita. Pli aŭ malpli frue li aŭdos pri viaj «Taglibroj», kaj kio restos al ili, krom sendi al vi kontestojn?..

– Certe, tiel... – jesis mi mirigite kaj samtempe konfuzite, – sed tie, profesoro, estis tiaj detaloj... eĉ sekreta diplomatia kodo de luzanoj... propono subvencii mian ekspedicion...

– En simila okazo similan proponon faros ajna ambasado, kaj la cetero estas vato. Ĉu vi iam vidis, kiel el kulero da sukero rezultas peco da sukera vato granda kiel kuseno? Jen! Bone, tamen, ke vi kontaktis kun mi, ja mi ĉiam forgesas al vi diri, ke tuta tiu «Kosma enciklopedio», kiun mi tiam al vi pruntedonis, – ĉu vi memoras, tie estis skribite pri Enteropio kaj sepulkoj? – do, tio estis falsaĵo. Friponaĵo. Fraŭdo. Iu kanajlo decidis profiti...

– Kaj ĉu vi ne povis diri al mi tion iomete pli frue? – indignis mi; ŝajnis, ke la tuta mondo konspiris kontraŭ mi.

– Mi volis, sed vi ja konas min – mi forgesis. Mi skribis tion sur la vizita karto, la karton metis en la veŝton, la kostumon fordonis al purigejo, la kvitancon perdis, poste mi devis flugi al Proksimo, kaj tiel ĉio restis...

– Nermalbonan servon vi faris por mi, – rimarkis mi kaj hastis fini la konversacion, ĉar timis diri al la profesoro nesciate kion – ja mi estas kolerikulo...

Tio estis tago de malagrablaj surprizoj kaj paroksismoj de furiozo. Pro afableco, por ne vekti Tarantoga-n, mi parolis kun li post la noktomezo, kiam en Ameriko jam estas tago. En la Instituto mi manĝis preskaŭ nenion; nun mi estis malsata kaj malfermis la malvarmujon por preni malvarman fritiĝon el bovidaĵo. La vizitanta servistino, al kiu mi donis rajton matenmanĝi ĉe mi, uzis ĝin sen ĝeno. Io tamen tie kuŝis – kiel montriĝis, preskaŭ tute nuda osto, por deco ĉirkaŭvolvita per haŭto. Malsata kaj kolera, mi manĝis pecon da pano kun butero – kaj iris en la liton.

En la Instituto tiutempe oni kompilis komputilan eksplikan vortaron de ambaŭ sendaĵoj. Disiĝi – malproksimiĝi, en aspekto – en la nomo, refuzi – rezigni, kontesti kaj tiel plu. Sed mi eĉ ne prenis ĝin en la manojn. Mi postulis aliron al la fontaĵoj. Tio iom konfuzis ilin. El la sekciestroj neniu havis respektivajn rajtojn, tial ni iris al la direkcio. Tie evidentiĝis, ke ekzistas tia administra nuanco: la Instituto povas disponigi al mi la ercon, sed ne la fontaĵojn, t. e. originalojn de raportoj, dokumentoj k. t. p., el kiuj, per eltiraĵoj kaj resumoj, estas preparata la erco, ĉar ĉiuj ili estas konservataj en la sekreta arkivo de MEA, kaj la laborantoj de la Instituto ne havas tie alirrajton. Kaj tio jam ne estas subjekto de diskutoj kaj disputoj; nek diskuti, nek eĉ kompreni tion necesas – simple ĝuste tiel iras la linio de limo inter kompetenteco de la Instituto kaj de la respektivaj departementoj de MEA. Tiukaze, diris mi, donu al mi la ercon, kaj tiutempe petu kiun necesas en la ministrejo, por ke oni urĝe donu alirrajton al la originaloj, kion mi, kiel pioniro kaj malkovrinto, probable, meritas. Koncerne la unuan ne estos obstakloj, respondis oni al mi, kaj koncerne la duan – ili penos. Dŭngli – eble, tamen, tio estis Wrengli

– kondukis min en malgrandan kabineton, kie troviĝis unu el komputilaj terminaloj, fotelo, skribotablo, ekrano, skanilo, varmobotelo kun kafo, biskvitoj kaj floksoj en kristala kaliko, kaj lasis min sola kun la aparataro; estante instruita, mi tuj komencis rulumi tra senbrila ekrano la fifaman ercon.

La favora leganto el tio, kion mi precize transskribas ĉi tie, ne atendu kompreni pli, ol mi tiam sukcesis. Mi rememorigu nur, ke BAM estas la Baterio de Aprobantaj Moduloj, aŭ opinio de la bateria malplimulto; MENS estas la Mezumiga Nedeterminita Sistemo, kiu ordinare nenion povis mezumigi, kaj finfine BUM estas la Baterio de Utiligantaj Moduloj, kiu enŝovadis vorton en okazo de plena implikiteco.

«ENTIO, luz. KIRMREGCUDAS, kurd. KERDELLENPADRANG, 7-a planedo de Gamo de Taŭro. 4 kontinentoj (Didlantio, Taraktio, Cetlando, Maŭmazio), 2 koteanoj, formiĝ. el disociiĝintaj mikrometeoritaj sedimentoj (BAM), rezulte de industria poluo de la medio (BOM), nesciate kiel (MENS). Ĉ. 1000 kotaj gejseroj (kojseroj), erare (BAM), prave (BOM) opiniitaj de la malkovrintoj reliktaj subkotuloj (klaso Immersiones, ordo Marmaeladinae, familio Maccaronicaea /bulpastaj/). Unu orgasto – organika stagnaĵo (BAM), organoida sterko (BOM), orgasma stalagmito (BUM), jam antaŭlonge sekiĝis (MENS). Unu sintelito (sinteza satelito) – KOKAIN, aŭ Kosma Kamuflo Industria, LSD, aŭ Latenta Skansen Deĵoranta, kiu prezentas per si surorbitan parton de la teritorio de Luzanio (vd.), de varianta diametro, ĉar fakte tio estas pufigeblaĵo (BAM), fatamorgano (BOM), la diablo mem ne komprenos (MENS). Klimato estas modera, forte malbonigita per industriigo (BAM), per sekrete funkcia armilo (BOM), ĉiam estis tia (BUM).

En la planedo loĝas raciĥava raso (BAM), du raciĥavaj rasoj (BOM), dependas de vidpunkto (MENS). Entianoj estas homsimila specio (BAM), ilia homsimileco estas larva stadio de metamorfozo, ĉar la aborigenoj estas transformiĝuloj kaj

transiras stadiojn de DUONULO tra UNUULO kaj DUULO, ĝis GIGANTA KUNGLUULO (BOM), ili nur malsame vestiĝas (BUM), ĉio ĉi estas legendoj kaj mitoj, vd.: "Politografio de rasoj de Taŭro", eld. nur por interna uzo, MEA 345/2ab/99 (BIM). La donitaĵoj de BAM estas ricevitaĵoj de luzanoj, kaj de BUM, BOM kaj BIM – de kurdlandanoj, kaj tial estas neakordigeblaj (MENS).

La sekso estas klare difinita (BAM). Mankas seksoj (BUM). Ili estas, sed inversaj al la teraj (BOM).

Ŝtatoj de E.: I. Unikan en nia Galaksio formon de ŝtata ordo montras Kurdlanda Politmobilo (ankaŭ: Naciomobila Kurdlujo) – rustika memreganta unuiĝo de loĝataj kurdloj – URBOSAŬROJ. La supera potenco apartenas al la Prezidanto de Kurdlestroj. Administra unuo estas grego de kurdloj, aŭ TRETpartamento. Antaŭe la kurdlestrojn oni nomis kurdlobredantoj. La naciomobilo konstruiĝis dum jarcentoj en procezo de lukto kontraŭ Pirosaŭroj, precipe estingiĝantaj kaj apenaŭ flagretantaj ĉasataj animaloj (ekz. disĵetanta fajron Poliservo, aŭ Grandsklavo, kaj Kukurdlo – malvarmsangaj kotakvaj estaĵoj kun pezo ĝis tuno kaj duono). Estingiĝintan kurdlon oni nomis Esturdlo (Draco Pyrophoricus Curd. L. Msimeneti – laŭ la nomo de la malkovrinto, ano de IX ekspedicio de la Saŭrolog. In-to), kaj malsekiĝintan – Humurdlo. Vd. ankaŭ: Kerdl, Kjordl, kaj QRDL. Bredado de k. anstataŭigas domkonstruadon, neeban sur transkotejoj kaj subkotejoj, t. e. teritorioj, periode kovrataj de koteano (al teraj Glaciaj Periodoj sur E. respektivas Kotaj Periodoj) (BAM).

Neniaj fajrospirantaj reptilioj sur E. iam ajn ekzistis. BAM fidas al kurdlanda mitologio kaj propagando. Kurdloj estas grandlaborantoj (sed ne grandskloj), aperintaĵoj pro evoluo en lukto por elvivado en la koteano (BOM). Uzataj kiel laborforto, ili konsistigas t. n. Kolekorporojn.

En la luzana versio kurdloj estas kadavroj (korporoj), sentripigitaj fare de lokaj vilaĝanoj pro loĝeja malsato kaj

movataj per sklava laboro de galeranoj; alivorte, tio estas t. n. Cadaveria Rusticana. En la kurdlanda versio kurdloj estas opiniataj produktoj de genetika bioinĝenierio, inventita de la Prezidanto de Kurdlestroj. Neakordigebla (MENS). Lukto de nomadoj kontraŭ kotakvaj bestoj finiĝis per simbiozo de lokaj Primatoj kun kurdloj, danke al pleniĝo de la lastaj per aero kaj adaptiĝo de la unuaj al gurgitado kaj regurgitado (kaj ankaŭ al Laksado – BIM). Ĉar urbosaŭroj estas simbiozaj kooperaj loĝejoj (BAM). Nenio simila (BOM). Tio estas ne pli ol pseŭdobestoj, pseudozoa, alivorte, sintofaŭno, kiu estas produktata en bredejoj de Genĝenera Trusto (BEM), laŭ modelo de prakurdlo, tamen ne identas kun ĝi, sed nur similas.

La ŝtata strukturo de Kurdlando estas malbone esplorita. La Prezidanto ne regas persone, sed nur pensas pri regado, kaj la pensojn interpretas, aplikante al lokaj kondiĉoj, KURDLESTROJ. Iliaj historiaj nomoj: Patriarko de Grego de Kurdloj, aŭ PAGREKO, Ĉefkurdlo, Kurdla Administranto k. a. (BUM, BAM, BOM).

La urbosaŭroj suferas pro internaj malakordoj, kaŭz. de alergia (BAM), malsameco de politikaj opinioj (BUM), plimultiĝo de parazitoj – nelaboj, priraboj kaj tromboj (BIM). La listigitaj formoj estas ne parazitoj, sed anoj de kooperado (BOM).

Kurdlandanoj estas treege sentemaj, kiam temas pri ilia originala ŝtata doktrino. Uzo de moknomoj de kurdlo, kiel: Tombego, Paskurdlo, Merdosaŭro, Kurdlaĵo, Manĝmuto, kaj ankaŭ Dikodonto, Tretulo kaj Kadavromobilo, estas punata per malaltiga transloĝigo (ekzilo en la voston parton, t. n. Postaĵkoloniigo). En la antikveco k. servis kiel tombejoj de famaj viroj, simile al teraj piramidoj (BAM). Ĉio ĉi estas legendoj kaj mitoj (BEM). Io tia tie estis (MENS). Vd.: "La entia mitografio", ĉap. "Arkeomobilistiko, Peripatetika Poliarkio, La Mito de Prezidanto". Kp. ankaŭ: "La Kotulo", eld. por ofica uzo. Doc. Ju. Bledder: "Kiom da piedoj havas kurdlo?" (MEA6/4). De la

sama aŭtoro: "Historio de lukto kontraŭ kotakvuloj". Sama aŭt.: "La voma politiko". Sama aŭt.: "Kurdloj – viktimoj de raba ekonomio". Sama aŭt.: "Loĝeja juro kaj interna loĝareo". V. Tutas: "Ĉu estis iam kurdloj uzataj kiel kontraŭmeteorŝtonaj aziloj?" Vd.: "Raporto de la II neokazinta entia ekspedicio", IHM, kronogramoj de serioj B/9 kaj T/9. Ankaŭ: "Postkurdla vivo en la hereza instruo de Tretistoj" ("Analoj de la Instituto de Postmorta Fromaĝproduktado", T. Kvargl, PIP 20111). I. Dragonder: "La ĥemia konsisto de kurdla salviando" ("Acta curdeliana", v. XI, p. 354 kaj sekv.). "Struktura analizo de kurdlanda poezio", kolektiva monografio de IHM, 239/c. D-ro Revolvender: "Internaj tuptazoj kaj piroforazoj kiel rimedo de fajrospirado" (Boston McGrow Hill. Doktora disert., prognoza kun 40-jara antcipio de Rüngli kaj Kinderstein. Presita kiel manuskripto)».

Forlasante ankoraŭ tricent nomojn da citita literaturo, mi transiras al la dua parto de la erco, dediĉita al Luzanio.

«Luzanio. Ankaŭ: Nereduktitaj Ŝtatoj de Supera Luzanio (BAM), Libera Federacio de Eksteretataj Ŝtatoficistoj (BUM), Kunigitaj Ŝtatoj de Taraktio (BOM). La gvidanta lando de Entio, alte (BAM), tro alte (BUM) evoluinta, havas streĉitajn rilatojn kun la najbara Kurdlando. Kreskantaj internaj problemoj kondukis al falo de la intelekta nivelo ĉe la anoj de ambaŭ ĉefaj polit. partioj, el kiuj estas elektata Prezidento (BAM), Landopremanto (BUM); ĉe nevenkeblaj malfacilaĵoj ne troviĝis sufiĉe inteligentaj kandidatoj, bonvole pretendantaj al la supera posteno. T. n. kretenizado de ŝanĝiĝantaj unu la alian administracioj kondukis al la krizo, finiĝinta per enkonduko de Politerio (politika loterio) por plenigo de vakaj lokoj en la ŝtata aparato. Ĉar plejmulto de la loĝantaro evitis partopreni ĝin, en la XXIII-a jc. estis deklarita eksterordinara stato kaj plenumita Granda Ĉasado al Indiferentaj Kandidatoj al administraj organoj (GraĈIKo). Venki la krizon helpis evoluo de komputila teĥniko. Aŭtomatizado de administrado, tamen, fiaskis en fino de la sama jarcento, kiam aŭtomatoj-Civitatoroj rezignis siajn mandatojn sekve de t. n. logistrona sindromo. Tiuj tro inteligentaj

aparatoj aŭ falis en sensencismon, aŭ ilin trafis progresanta genializo ([paroksismo de genieco](#)). Eliri el la nova krizo NŜL sukcesis danke al sinturo ([sintezita kulturo](#)), t. e. ekosofizado ([saĝigo de la loĝata medio](#)) kaj gedopraksio ([distribuado de feliĉo](#)). Helpe de tiuj ŝtataj institucioj oni sukcesis protezi sociajn ligojn, disfalantajn sub premo de bonstato ([BAM](#)). La menciitaj institucioj estas rezulto de kunfandiĝo de ŝtataj interesoj kun la dominanta religio ([BUM](#)). Dubinde ([MENS](#)). Etikigado de la medio, kaj ankaŭ devige ĝuigaj, malbon-absorbaj kaj disrealigaj teĥnologioj sume konsistigas la sinturon. Konforme kun la principo de saĝigo de la loĝata medio, vojojn, aŭtojn, domojn k. c. oni produktas el lertonaj – logikaj mikroelementoj, nobligitaj dum anticipa prilaboro. En metropoloj lertonizo atingas 60 unuojn da intelekto por gramo kaj sekundo. En urba teritorio ĝis profundo je 40 metroj senraciaj substancoj tute ne renkonteblas ([BAM](#)). Tio estas oficiala versio ([BOM](#)). La cetera teritorio estas lertonizita je 87% ([BAM](#)). Dubinde ([BOM](#)). La sinturo saĝigas la medion, por ke ĝi nelacigeble zorgu pri bono de civitanoj kaj pri sia propra bono, korektante difektojn, faratajn de la opozicio, klerigante, helpante, konsilante kaj absorbante krimajn penojn, kaj ankaŭ instigante konsuman bakanalion enkadre de la leĝo ([BAM](#)). La lasta formulo estas sekvo de traktado de la sinturo per teraj konceptoj ([BOM](#)).

Lertonizitaj objektoj plenumas nur mendojn, ne rompantajn ies ajn interesojn. Lertonaj de unuaj generacioj ([sagaconoj](#)) estis submeteblaj al putriganta influo de la kriminala mondo, sed iliaj nunaj specimenoj, provizitaj per amoroj ([amplifiloj de moralo](#)), estas nepenetreblaj por malbono je 99,998% ([BAM](#)). Tiel asertas la registaro ([BOM](#)).

Industria produktado dividiĝas je la ĝuiga kaj la preventa.

1. La ĝuiga produktado subdividiĝas je: disrealigo ([diserigo de la realo](#)), feliĉizo ([amasa, kaj ankaŭ laŭ individuaj mendoj](#)), komfortizo, karesizo, dolĉizo kaj sintezita preparado de karieroj ([sinierismo](#)), kompletigata per cela elekto. Ĉio ĉi estas

industriaĵoj branĉoj de gedoliza, aŭ bonproviza, informadiko. Konforme al la slogano de Luzanio «*Fac quod vis* <sup>[14]</sup>», ĉiu civitano faras, kion volas lia animo, kaj la ŝtato zorgas pri maksimumigo de ĉies feliĉo. Por tio oni uzas gedometrion – mezuradon de kvanto da bonaj sentoj, kiuj povas esti traigitaj tra nerva sistemo de civitano dum lia vivo. Ĉar, tamen, la oferto 108-oble superas individuan traigivon, inklude dormotempon, necesas elekti inter la ĝuoj. Tiun laboron prenas al si elektokibero (nomata ankaŭ Proponatoro); ĝi ĝuigas konsiderante individuajn inklinojn, temperamenton kaj fortikecon.

Pro tio en la Galaksio ne povas esti iu ajn pli feliĉa ol luzanoj (laŭ la registara deklaro CCC/7/Zub) (BAM). Al tio kontraŭdiras kurdlandaj fontaĵoj, referencante al kresko de indico de memmortigoj (BOM). Unu el la plej komplikaj estis la problemo de perdo de proksimuloj pro akcidentoj aŭ natura morto. Neefikeco de animtrankviliga kuraco instigis MIA-on (Ministrejon de Intimaj Aferoj) komenci produktadon de neekzistantoj (aŭ pseŭdoindividoj), kiel: Amoroidoj, Patrinoidoj, Patroidoj, Infano-morganoj kc. Neekzistantoj estas produktataj laŭ mendo de interesiĝantaj personoj, kaj ankaŭ de direktoj de urbaj tombejoj – por entombigaj solenaĵoj kun partopreno de idealaj kopioj de la Karaj Forpasintoj. Civitanoj, al kiuj la sorto donis proksimulojn kun komplika karaktero, por evito de malagrableco povas protezi proksimajn parencojn eĉ dum la vivo; al la lastaj, enkadre de leĝa kompenso, oni ankaŭ liveras postulatajn duulojn (kio en ĉiutaga lingvaĵo estas nomata familia manekenigo) (BAM, laŭ luzaniaj fontaĵoj). Manekenaj pseŭdofamilioj estas areno de koŝmaraj historioj, pro kiuj eĉ haroj de kurdlo stariĝas (BOM, laŭ kurdlandaj donitaĵoj). Vd. ankaŭ: "Notlibro de kurdla agitanto", 391/P, kaj krome, la parolon de la Prezidanto de la Konsilio de Kurdlestroj en la X-a kungrego de urbosaŭroj, speciale ĉap. sub/tit. "Luzanaj pseŭdoparencoj kiel trejniloj de perversa murdado" (BEM).

La disrealigo permesas travivi tion, kion principe ne eblas travivi samtempe – per konekto de bonoduktoj al diversaj duonsferoj de la cerbo tra dissplitigilo de la konscio. La registaro planis kreskon de ĉies feliĉo je 4% dum jarkvino, sed komenciĝis stagno (BAM), fenomenoj, pri kiuj legu sube (BUM, BOM).

2. Informoj pri la preventa industrio ne submetiĝas al verokapta selekto de la kronohaŭbizoj pro grandega disĵetiteco de la fontaj donitaĵoj. Laŭ la luzanaj fontaĵoj, tia industrio tute ne ekzistas; tial la sube sekvanta parto de la erco baziĝas sur la kurdlandaj donitaĵoj kun konsidero de luzanaj kontestoj, kaj anstataŭ modulaj markoj (BAM, BOM, BUM) estas donitaj indikoj de fontaĵoj (KUR, LUZ).

Kontraŭlertona opozicio pledas por renaturigo de la loĝata medio sub slogano "bonfara detruo". Luzaniaj potenculoj ĝin ne persekutas (LUZ), persekutas ĝis apliko de sekretaj torturoj, kaj poŝtupa anstataŭigo de nelojalaj loĝantoj per lojalaj neloĝantoj, aŭ lojanoj (sekreta projekto de totala protezado de la socio, t. n. lojanigo) (KUR). Tio estas malicaj elpensaĵoj, tute malhavantaj bazon (LUZ). La veran rilaton de la popolaj amasoj al la ĝuiga diktaturo atestas esprimoj el ĉiutaga lingvaĵo: "karesi ĝis ŝaŭmo en la buŝo", "feliĉigo ĝis perdo de vivdeziro", "feliĉe morti", kaj pro lojanigito oni diras "fordonis la animon al la feliĉo" (KUR). La menciitaj citaĵoj estas ĉerpitaj el fantastika beletro (LUZ).

Konsumismo estis stultiganta la socion, sed la defio, kiun ĵetas al ĝi neordinara saĝeco de la loĝata medio, favoris al evoluo de intelekto kaj disvastiĝo de klereco en amasoj (LUZ). Precipe, tamen, en sfero de sekretaj murdoj kaj plej taŭgaj rimedoj por tio (KUR). Imagata terorismo, kaj ankaŭ mania sinturomaĥio estas nur parto de la nova sistemo de socia klerigo. La etikigita medio ne nur absorbas kontraŭsociajn agojn, sed ankaŭ funkcias kun profilaktika anticipo, danke al sendorma zorgo pri civitanoj en la realo, kaj ankaŭ danke al totala

sonĝoskopio (spektroskopio de sonĝoj por forigo de koŝmaroj kaj deliroj) (LUZ). Temas pri nelacigebla kaŝobservado pri civitanoj kaj kastro de la animo dum dormo (KUR). Anstataŭ kuraci sadistojn, la luzania MIA (la Ministrejo de Intimaj Aferoj) plivastigas reton de batejoj kaj familimultobligaj metiejoj (KUR). Motivoj de murdoj radike ŝanĝiĝis. Personeco de la viktimo ne gravas, la plej grava por murdanto estas superi reziston de amoroj (lertonaj amplifiloj de moralo). Vd.: "Amatora murdatora sporto en Luzanio". Ŝtata Scienca Eld. "Kukurdlo", 56/b/9; krom tio: "La etikosfero kiel kreskigo de degeneruloj", Verkaro de Prez. de Kurdl., vol. V, p. 77 kaj sekv. Ankaŭ: interna kluba luzana broŝuro "Kion eblas fari kun DOTuTo?" (DOTuTo – Dankema Objekto por Turmentoj kaj Torturoj). En kriminala luzana ĵargono abundas sinonimoj de DOTuTo: batato, kraĉatulo, ploraĵo, kriaĵo, distordulo, mortaĉulo k. a. ("Vortaro de idiomaĵoj de sinturo", Akad. de Sc. de Kurdl., Pcim 67/b) (KUR). Luzana kontesto de la supre dirita: "Kampanjo de kalumnio kaj misfamigo" ("Acta Synturales Lusaniae", v. II 67/43f).

Peno fortiri la atenton de urbanoj for de kriminalaj intencoj per miraĝoj de neaŭditaj ĝuoj estas organizado de brutakloj (spektakloj por brutiĝintaj spektantoj) (KUR). Temas pri malstreĉigo de emocioj de fervoraj spektantoj de telekineza futbalo (LUZ). La ĉefaj socialaj malsanoj de NŜL estas elsaĝiĝismo, elsaltismo kaj sinmanĝa komplekso.

I. Elsaĝiĝismo estas panika fuĝo el metropoloj por serĉi nelertonizitajn teritoriojn (KUR). Tio estas serĉado de fungoj (LUZ). Fuĝanta homamaso detruas ĉion sur sia vojo, kaj ĉar lertonizitan nemoveblaĵon ne eblas detrui per nudaj manoj, tre ofte okazas frakturoj de la nuka ostoj, ĉar konstrumaterialoj, eĉ etikigitaj, konservas la inercion de maso.

II. Individua reago al la nobligo de la medio estas elsaltismo. Sub preteksto de kontemplo de belaj vidaĵoj elsaltistoj penas

superruzi altajn balkonojn, fenestroniĉojn k. t. p. (KUR). En Kurdlando estas sepoble pli multe da memmortigoj (LUZ).

III. Aliaj simptomoj de la sama reago karakterizas kaptistojn, kroĉistojn, kaj oĥlofilojn (amasoŝatantojn), kaj ankaŭ dorsmordistojn. Ili provas kaŝiĝi de la sinturo malantaŭ korpoj de aliaj homoj. Oĥlofiloj serĉas densan amaspremaddon, kaj kaptistoj kaj kroĉistoj kaptas kaj alkroĉiĝas iun ajn (tiel nomata impulsa kroĉismo). Oĥlofiloj diferencas de dorsmordistoj per tio, ke la unuaj agas en stato de afekcio kaj katatonio, tial oni rilatas al ili kiel al psiĥaj malsanuloj, dum la duaj konsistigas religian sekton kaj opinias kroĉismon rita ago de la vera, nealtrudita amo al proksimulo.

IV. Familia kelismo konsistas en fosado, plej ofte fare de la patro, de kavo sufiĉe profunda, por atingi nelertonizitan kulturan tavolon, post kio la tuta familio ekloĝas en ĝi por ĉiam.

V. Sian ekstreman manifestiĝon kontraŭsinturaj konvinkoj trovas en kaŝita porcia memmortigo. Ordinare ĝi komenciĝas de unuarigarde senkulpa ronĝado de ungoj.

Krome, sur la teritorio de NŜL agas indistoj (indiferentistoj); por tiuj estas tutegale, kion fari, nur kontraŭ la sinturo. Ili ĉasas planitajn viktimojn, ekz., patrinojn de superaj ŝtataj oficistoj, malkonvinkas lernantan junularon pri uzo de bonodukto, diligente poluas la loĝatan medion, difektas personajn elektokiberojn de kripluloj kaj maljunuloj kaj ĝenerale nigrigas, diskreditas kaj provokas. MIA, estante ne kapabla venki ilin, komisiis al la Ministrejo de Malpeza Industrio enkudri en subvestojn de suspektatoj specialajn aparatojn kun elektropikiloj; sentinte kriminanlajn intencojn de portanto de subvesto, ili induktas seriozajn atakojn de iskiatika neŭralgio (t. n. dolorprofilaktiko).

Ĝia neefikeco kaŭzis monstran kreskon de luzania leĝokreado (KUR). Tiu, kiu sukcesas, trompinte elektropikilojn, telegardistojn, amorojn, animmildigilojn k. t. p., duafoje fari

krimon, laŭ leĝo devas esti sencerbigita kaj transformita al dumviva-postmorta torturato per poreterna neŭropreparado. Starigita al malhonora elektrofosto torturato, aŭ pli ĝuste, ties neŭropreparaĵo, eligas koŝmarajn kriegojn; tiuj kriegoj estas translaciataj per megafonoj, al kiuj estas konektitaj nervaj finaĵoj de lia eks-laringo. Luzana scienco faras nemalmultajn penojn, por maksimume uzi traigivon de doloraj nervaj fibroj (**KUR**). La menciitaj krioj venas el junularaj diskotekoj; ĉio cetera estas abomenaj elpenaĵoj de la malamika kurdlanda propagando, kiun ĝenas neniam rimedoj (**LUZ**).»

Estis jam multe pli malfrue, ol noktomezo, kiam mi ekstaris de la tablo, ĉesinte legi, – mia kapo vertiĝis. Kurdlandaj prognozoj pri senhoma civitana milito de lertonoj kun kontraŭlertonoj, aŭ de sinturo kun kontraŭsinturo, miksiĝis en ĝi kun mornaj luzanaj senmaskigoj de urbosaŭroj kiel vojaĝantaj prizonoj (**VOPRIZoj**). Proampoj (**protezoj de amo al proksimulo**), etikigado de la medio kaj ĝia kontraŭsagacona abomenizado, seksorifuĝejoj, malerotikigiloj, kontraŭteroraj preparaĵoj, patrinoidoj, malfratoj, bopatrinkaptiloj, murdatoroj, turmentatoroj – miloj da misteraj vortoj turniĝis en mia malfeliĉa cerbo kiel senfunda Malstromo. Mi staris apud la fenestro kaj el la deksesta etaĝo rigardis al kviete dormanta Ĝenevo, dum min premis malcerteco: ĉu mi povos atingi veron pri la planedo, kiun mi tiel facilanime kaj tiel erare priskribis iam en miaj «Taglibroj»? Kiam ia BAM, MENS aŭ FRAP nomis amuretojn amoraj biletoj, tuj KUR aŭ BOM deklaris, ke tio estas speco de taburetoj. Mi ne eksciis eĉ, kiom da seksoj havas entianoj – ĉu unu, du aŭ pli; ankaŭ pri tio estis pluraj neakordigeblaj vidpunktoj. Krome min sentrankviligis la penso pri tio, kia idioto mi min montris, opiniinte orbitan amuzejon planedo, kaj gajajn amuzojn kaj distraĵojn – dramecaj okazaĵoj, ligitaj kun la Meteorŝtona Grajlo. Almenaŭ nun mi komprenis, kial nur mi tiel nervoziĝis pro la MEGRo, kiu neniom maltrankviligis la aborigenojn; mi kondukis kiel sovaĝulo en teatra loĝio, kiu kriis al Otelo, ke tiu gardu sin kontraŭ Jago kaj, pro Dio, ne sufoku Desdemonan. Kun tiu penso sango impetis al mia vizaĝo. Tia honto devas esti forlavita per ajna prezo. Mi ĵuris, ke mi ne trankviliĝos, ĝis atingos la verajn fontaĵojn, ne malklarigitajn per senpena kaj kvazaŭ

senpartia laboro de komputiloj. Mi jam sciis, ke tio estos malfacila, ĉar aliron al la arkivoj de Taŭro povis doni al mi nur iu doktoro Strümpfli, sekreta konsiliano de MEA, laŭ onidiroj, homo nealirebla, fanatikulo de instrukcioj kaj senanima formalemulo, unuvorte, vera sviso. Profesoro Gnuss faris por mi ĉion, kion povis. Li aranĝis mian renkonton kun Strümpfli por morgaŭ; ĉio cetera, tio estas venko de burokrataj barieroj, estis jam mia afero. Malfacile suspirinte, mi provis elskui el la varmobotelo lastajn gutojn da kafo, sed trovis nur iomete da densaĵo sur la fundo mem. Mi ne scias, kial, sed tio ŝajnis al mi antaŭsigno de malvenko, atendanta min en la kabineto de la konsiliano. Morne mi ĉirkaŭrigardis la ĉambron, glutis mentolan tablojdon – mi sentis naŭzon, ĉu pro manĝita dum la tagmanĝo *cordon bleu* <sup>[15]</sup>, ĉu pro la erco, – kaj iris dormi.

\* \* \*

Strümpfli akceptis min malvarme. Diplomato de tia rango – sekreta konsiliano, – certe perfekte posedas arton liberiĝi de vizitantoj, kaj mi nenion atingus, se ne okazus feliĉa koincido. Por liberiĝi de mi, li devis al mi rigardi, kaj mi rigardis al li – kaj ni rekonis unu la alian, ne momente, ja ni eĉ unu fojon ne intervidiĝis, sed poiome, ĉiam pli kaj pli atente rigardante unu la alian; mi rekonis lin unue laŭ la kravato, pli ĝuste, laŭ la maniero nodi la kravaton, kaj li min – mi ne scias ĝuste, kiel; ni preskaŭ samtempe tusetis, poste ridetis kun ioma ĝeno – ne eblis dubi plu. «Ja tio estas li!» – pensis mi, kaj ĝuste samo, verŝajne, flugis en lia kapo. Li prokrastis iomete, etendis al mi la manon trans la tablo, sed en tia situacio tio estis ne sufiĉa; dum ia ono de sekundo li aŭskultis siajn sentojn – ĵetiĝi en mian brakumon li ne povis, tio estus troe, tial, gvidata de intuicio de diplomato, li leviĝis de la tablo, amike prenis mian brakon kaj kondukis en la angulon de la kabineto, al grandaj ledaj foteloj. Tagmanĝi ni iris kune, poste la konsiliano invitis min al si, kaj adiaŭis ni iam ĉirkaŭ la noktomezo. Kial ĉio ĉi? Ja tial, ke ni havas komunan vizitantan servistinon. Ne iun aŭtomatan kuiristinon, sed veran, vivan, klopodeman, kiu litere ne fermas la buŝon, tial mi sen troigo povas diri, ke mi kaj la konsiliano konas unu la alian tiel, kvazaŭ ni vivis kune dum jaroj. Opiniante sin taktoplana persono, ŝi neniam

menciis lian nomon, ŝi ĉiam diris simple «la konsiliano», kaj kiel ŝi diris al li pri mi – mi ne scias, demandi pri tio estus ĝena; kaj tamen nia konatiĝo, almenaŭ komence, postulis reciprokan taktecon, kaj speciala respondeco estis mia, ja ni renkontiĝis plejparte en lia loĝejo, kaj mi devis regi min; eĉ eta rigardo al komodeto, al tapiŝeto ĉe kuŝfotelo, rigardo, tute senkulpa por fremdulo, ricevis specialan signifon, iĝis aludo; ja mi sciis, kio estas konservata en tiu komodeto, kio estas elskuata ĉiumatene el tiu tapiŝeto... Tial nia proksimeco estis ĉiam en danĝero, kaj mi komence ne sciis, kien direkti la okulojn, mi eĉ pensis, ĉu mi vizitadu lin en nigraj okulvitroj, sed tio estus *faux-pas* <sup>[16]</sup>, tial mi invitis lin trinki tason da kafo ĉe mi, sed li iel ne tre hastis fari respondan viziton al mi. Pripensinte, mi konkludis, ke la afero estis ne en la materialoj, kiujn li havis (kvankam pri la alirrajtoj al la sekretoj de la arkivo ne li sola respondecis, ĉiujn postajn formalizaĵojn li promesis aranĝi mem), – ne, pli probable, li kvazaŭ estis elprovanta min, ja ĉe mi jam li devus ĉiam regi sin. Nia komuna servistino nevideble ĉeestis dum tiuj renkontiĝoj, mi bonege sciis, kiel ŝi komentos morgaŭ staton de la bufedeto, de la cindrujoj, ni ambaŭ vivis kiel maljunaj fraŭloj, kaj al tiaj neniuj servistino pardonos ion ajn, kaj rakontante pri tio, ne kompatos; kaj mi sciis, ke li scias, ke mi scias, kion ŝi diros; ĝuste tial eĉ sur minkampo mi ne kondukus tiel singarde, kiel en la loĝejo de la konsiliano; ĉiu guto, verŝita sur la tablotukon, reeĥis en miaj oreloj per ŝia komento, kaj ŝi ne kutimis bridi siajn esprimojn, sed tutegale necesis cedi al ŝi – ja kie preni alian? Ŝi plurfoje kritike eksponis al mi la konduton de la konsiliano en la banĉambro, precipe la demandon pri sapuoj, nu, kaj pri ŝtopiĝinta lavkuvo kaj pri tiuj malgrandaj viŝtukoj, kaj, se oni ŝin aŭskultis nesufiĉe atente, ŝi povis simple foriri kaj ne reveni; ne permesu Dio forgesi pri ŝia nomfesto, ĉe mi ŝi estis por tio nelonge, sed ja ĉe la konsiliano ŝi servis jam pluran jaron, estas kolosaj malfacilaĵoj kun donacoj, ja ŝi ne fumas, ne drinkas, neniajn dolĉaĵojn, sinjoro, ŝajne komenciĝas jam diabeto, jen en la saketo – tuta stako de urinaj analizoj, necesis legi aŭ almenaŭ ŝajnigi legon, kaj ne eblis limiĝi per ĝeneralaj frazoj; spuroj de albumino – tio ne estas bagatelo, – kaj poste denove pri la konsiliano; la kosmetikujon – aŭ eble necesujon – mi ne memoras precize – ŝi kunportis, plej probable, por kaprici antaŭ mi: tiaj koloroj,

en ŝia aĝo, ĉu ne pensas mi, ke ŝi entute farbas sin? Mi sentis min, kiel sur scenejo. Antaŭ ĉiu el ni ŝi ludis spektaklon pri la alia, veran teatron de imago; kaj kiel ŝi hastis fini purigadon ĉe mi, por sukcesi trovi lin hejme! Ŝi ne eltenis malplenajn ĉambrojn, ŝi bezonis aŭskultanton; ni havis malfacilan taskon, sed ni ambaŭ penis, ĉiu en sia loĝejo, ja kion ni povis fari? Serivstinojn en nia tempo oni pretas dungi tuj, eĉ disŝiri je pecoj; kaj tiu ĉi simple kvazaŭ devenis el scenejo, verŝajne, ŝi naskiĝis aktorino, sed malbonŝancis: neniu rimarkis tiun talenton en ŝi, kaj ŝi mem, dankon al Dio, ne konjektis. «Homo sum, et nihil humani a me alienum puto». Bonkoreco estas bona afero, sed mi ĵuras per mia kapo: la konsiliano tiel kompatis min kaj tiel volonte helpis trafi en la bibliotekon de la ministrejo, ĉar li jam tiam kalkulis, ke kiam mi forveturos (li legis tiun decidon sur mia vizaĝo pli frue, ol ĝi fine maturiĝis en mia kapo), li posedos ŝin sola – komprenebla, kvankam memtrompa deziro... Li deziris ekskludecon, transformiĝon de la nekaptebla vizitanta servistino en loksidan hejman servistinon kaj sciis, ke se oni min enprizonigus (mi fratece konfesis al li pri Küssmich, la kastelo, la pulvoro por suĉinfanoj kaj eĉ pri la kuleretoj), li definitive perdus trankvilon, ĉar ŝi, ĉesinte purigi mian loĝejon, komencus min idealigi, prezenti min al li kiel ekzemplon, por ke li sentu sian senvalorecon. Ne amikiĝi ni ne povis, alia eliro ne eblis – pli bone estas, se viajn intimajn aferojn scias iu proksima, ol iu fremda aŭ eĉ malŝatanta, vere, ni ne havis sekretojn inter ni, neniu psiĥanalizisto penetras en tiajn profundaĵojn de la animo, kiel servistino (kiaj ĉifitaj littukoj estas hodiaŭ, kion vi tian songis?); unuvorte, ni ludis per malfermitaj kartoj, kvankam ni ĉiel montradis, ke tute ne. Kelkajn fojojn la konsiliano invitis, krom mi, la estron de la departemento de Taŭro, du ekspertojn kaj arkiviston, do en lia loĝejo, kun kafo kaj biskvitoj, preskaŭ la tuta kolegio konsiliĝis, kiel aranĝi por mi aliron al ĉio absolute, sen esceptoj; ilia interparolo foje estis eĉ pli mistera, ol la erco.

Plej malfacile por ili estis decidi, estiel kiu mi, fakte, povas penetri la arkivon. La malkovrinto de la planedo, pacience klarigadis al mi magistro Schwigerli el la personara fako, tio sonas treege solide, sed nur en lernolibroj, kaj por la ministrejo tio valoras nulon. Ja mi

ne estas eksperto, al kiu la Departamento de observado de Taŭro komisiis laboron per kontrakto, nek membro de la konsilio de la ministro, nek eĉ eksteretata fakulo. Mi estas privata persono, kaj estiel tia mi ne rajtas fari ion ajn en MEA, kun sama sukceso noktogardisto povus postuli aliron al sekreta dokumentaro. Sekreteco estas ne nur sigelo sur dokumento, tio estas ankaŭ signo de tio, kien iros – aŭ ne iros – la afero, ĉar nemalofte moviĝo de la afero tra instancoj signifas ĝian entombigon; tial ili streĉadis cerbojn ĉe tasoj da nigra kafo, por trovi se ne paragrafon, do almenaŭ pretekston, kiu malfermus antaŭ mi la pordojn de Sezamo. Baldaŭ mi komprenis, ke ĉiuj oficistoj de MEA, kiel superaj, tiel ankaŭ malsuperaj, havis nek pri Entio, nek pri astronautiko eĉ etan imagon, ĉar tio ne estis ilia ofica devo, kaj mi aŭdis kelkfoje, kiel ili diris «bovaĵo» anstataŭ «Taŭro». Finfine Strümpfli rezignis pluajn konsultojn, ordonis al mi sidi hejme kaj atendi telefonvokon, kaj post tri tagoj li solene proklamis, ke la venko estas nia. La nepran postulon – veni en la ĉefan konstruaĵon nokte kaj foriri antaŭ mateniĝo – mi, kompreneble, akceptis sen protestoj, ja mi jam tiom komprenis tutan tiklecon de tiu afero, ke al mi restis nur danki. Do, farinte nokton tago, mi povis finfine dum nelabora tempo penetri la sekretojn de la fremda mondo.

Mi aĉetis la plej grandan, kian mi nur sukcesis trovi, varmobotelon por kafo, sakon kun kelkaj sekcioj, ŝovis tien biskvitojn, bokaleton kun marmelado, bulketojn, platan botelon da «Martello», per kiu oni trinkigas vunditojn sur kampo de gloro, dikan kajeron kaj en la lasta momento – preskaŭ forgesitan de mi, vere simbolan kaj tamen, sen ajnaj ŝercoj, vere necesan al mi – kulereton.

# La fontaĵoj

Do, Strümpfli, ricevinte neoficialan konsenton de la estro de la Departamento de Taŭro, nokte, kiam la domo malpleniĝis, enkondukis min en la entian arkivon kaj en la unua biblioteka halo persone klarigis al mi ordon de uzado de la kolektita tie materialo.

Donitaĵojn pri neloĝataj planedoj, diris al mi la konsiliano, oni akceptas por konservado sufiĉe simple, distribuante ilin al tri branĉoj. Unue estas raportoj de malkovrintoj, kompreneble, eraraj, poste estas rezultoj de esploraj ekspedicioj – ĉi tie jam arbo de eraroj komencas disbranĉiĝi, ĉar ne okazis ankoraŭ, ke fakuloj konsentas inter si, kaj aperas apartaj opinioj, kontraŭdiroj kaj kontestoj, kaj fine – konkludoj de teraj ekspertoj, tio estas homoj, kies piedo ne paŝis eĉ en kosmoŝipon, ne parolante eĉ pri foraj planedoj, tial kosmonaŭtoj-esploristoj, grizhariĝintaj en bataloj, sendas pri iliaj verdiktoj kasaciajn plendojn, apelaciojn kaj reklamaciojn, kio kaŭzas ellaboron de planoj de novaj ekspedicioj, kiuj en mezo aŭ en fino de la vojo estas torpedataj de la kontista departemento, ĉar, laŭ ĝia opinio, multe malpli kostas interpacigaj komisionoj kaj arbitracio surloke; sur tio la disputoj ordinare finiĝas, escepte de okazoj, kiam iu tre influhava kaj glorama persono deziras eternigi sin, liginte sian nomon kun nova astro, kaj obtenas ekstran subvencion; tamen, tio jam ne zorgigas MEA-on, tutegele ja neniajn rilatojn eblas establi, ĉar mankas tiuj, kun kiuj oni rilatu, kaj la dokumentojn oni sendas en la arkivon kun noto de estro de respektiva departemento: «*No lo contendere* <sup>[17]</sup>».

Malpli bone estas pri loĝataj planedoj. Astronaŭtikaj aferoj tre rapide miksiĝas ĉi tie kun politikaj, ĉar ajna civilizo kreas minimume tiom da versioj de sia historio, kiom da ŝtatoj estas en ĝi; tiuj versioj estas kontraŭdiraj kaj eĉ diametre kontraŭaj, sed MEA ne povas malfermite negi iun el ili, ja de tio estas nemalproksime al konflikto *ante rem* <sup>[18]</sup>; tie oni *prima vista* <sup>[19]</sup> akceptas ĉiujn versiojn, kaj nur poste komencas pensi, kion fari kun ĉio ĉi. En la ofica praktiko steloj

estas klasigataj je tiuj, kiuj malproksimiĝas de nia Suno, kaj je tiuj, kiuj al ni proksimiĝas; pri la unuaj ne estas ajnaj klopodoj – ja pri kia diplomatia proksimiĝo povas temi en kondiĉoj de konstante kreskantaj astronomiaj distancoj? La atento de MEA-anoj estas koncentrita sur la duaj, kaj ĝuste al tiu kategorio apartenas la planedaj sistemoj de Taŭro. En MEA oni klasigas materialojn je oficialaj kaj veraj, aŭ je publikaj kaj sekretaj, ja politikan kurson necesas elekti konforme kun tio, kiel tie estas EN LA REALO, kaj konkretajn diplomatiajn paŝojn – konforme kun tio, kion ILI diras pri tio.

Se sur planedo estas dek ok ŝtatoj (kaj en la kosma skalo tio estas bagatelo), nur tre naiva homo atendus trovi tie dek ok versiojn de ĝia historio; krom laboroj de oficialaj historiistoj ekzistas ja verkoj de historiistoj nur tolerataj, kaj foje – mortpunataj kaj rehonorigataj nur postmorte, kaj ankaŭ verkoj de kritikantoj kaj senmaskigantoj, kiuj, bedaŭrinde, submetebblas al spirita aŭ fizika sugesto kaj ŝanĝas siajn opiniojn en sekvaj eldonoj, ĉar havas, ekzemple, edzinon kaj infanojn (se tion permesas tiea biologio; tamen, la instinkto de memkonservado estas imanenta al ajna viva estaĵo, do ne necesas tro atenti tiajn nuancojn de galaksia historiografio). Sur tiun amasegon da variantoj kuŝiĝas centneroj da kronikoj, priskribantaj sortojn de la interesanta nin ŝtato per okuloj de najbaroj kaj ties historiistoj; kiel estas sciata, la unuan mondmiliton ĉinoj nomis intercivitana milito de eŭropanoj, kaj tio estas tute komprenebla, sed pro tiu kaŭzo la agado de MEA iĝas vagado tra labirinto, kie sur ĉiu paŝo atendas embuskoj kaj kaŝiĝas sekretoj; kaj, kvazaŭ ĉio ĉi ne sufiĉas, de tempo al tempo venas vicaj raportoj de vicaj ekspedicioj, kaj kiam tien kune kun diplomatiaj misioj iras la komercaj, kiujn pli interesas varcirkulado, ol la historia vero, denove aperas neceso pri taktaj akordigoj kaj precizigoj. Kiam ĉion ĉi, finfine, oni iel sukcesas aranĝi, sur la loko subite okazas historia rompo, kaj oni denove rekomencu ĉion, ĉar monumentoj de antaŭe diigataj regantoj falas de la piedestaloj, krimaj demonoj kaj monstroj iĝas naciaj herooj kaj gvidantoj, ditiramboj kaj verkoj, eternigintaj meritojn de monarkoj kaj poliarkoj, momente arkaikiĝas; kaj imagu, kiel bonege aspektus tera

diplomato, kiu dum enmanigo de akreditaĵoj miksus la etapojn de la historio.

Konsternita per tiuj klarigoj, mi ne povis deteni min de la demando, ĉu vere la Tero jam establis rilatojn kun tia amaso da planedoj, ke MEA fleksiĝas sub pezo de falintaj sur ĝin taskoj, – ja en la Instituto oni diris al mi, ke ilia agado havas dume trejnan karakteron. Strümpfli rigardis al mi, kvazaŭ ne kredante al siaj okuloj, kvazaŭ al li ŝajnis, ke li misaŭdis, kaj nehaste, klare, por ke mi pli bone komprenu la esencon de la demando, eksplikis al mi malkonvenecon de mia demando. La Ministrejo de Eksterplanedaj Aferoj laboras surbaze de havataj dokumentoj, kaj ne pli. Nur tiu, kiu havas nenian imagon pri dokumentoproduktado, povas vidi en tio ion neordinaran, netaŭgan aŭ eĉ neseriozan. Ja tuta politika historio de la Tero estas vico de eraroj kaj ties konsekvencoj; ekde praaj tempoj ŝtatoj metadis ĉion sur malĝustan karton, faradis tion, kio NE konformis al iliaj intereso; tial politiko konsistas antaŭ ĉio en erara pritakso de kontraŭulo, kaj eĉ pli ofte – en farado de malamikoj el potencialaj aliancanoj pro miskompreno kaj mispensado. Kiel venkoj, tiel ankaŭ malvenkoj sekvadis el falsaj prognozoj, ĉar venkitoj ĝenerale statis pli bone, ol venkintoj – se ne tuj, do iomete poste. Ĉar politiko okupiĝas pri estontaj eventoj, kiujn ne eblas precize antaŭvidi, kaj sperta politikisto estas tiu, kiu bonege scias pri tio, sed insistas pri patriotismo, devo kaj konscio de historia neceso. Tial la Ministrejo de Eksterplanedaj Aferoj ne iras laŭ iu tute nova vojo, sed agas precize same, kiel ordinara MEA-oj, nur kun tiu diferenco, ke limoj de eraroj, neeviteblaj en diplomatia agado, ŝvelis ĝis astronomiaj skaloj. Ĉu mi vere nenion scias pri tio, ke historiaj decidoj, determinintaj rezultojn de la mondaj militoj, estis farataj kun plena ignoro de raportoj kaj aliaj tute fidindaj donitaĵoj, el kiuj sekvis, ke ne endas deklari militon? Tial ĉu tiom gravas, ĉu kun vera dokumentoj ni laboras aŭ nur kun fantomoj? Kiamaniere, propre, tiu diferenco influus al la fluo de ministrejaj aferoj?

Doninte en bonkora, sed kategoria tono tiun edifon, Strümpfli konsilis al mi ne tuŝi la ĉefan katalogon, entenantan kvardek mil

titolojn, inter kiuj estas facile vojerari.

Li enmanigis al mi folieton kun listo de la plej gravaj verkoj, kiun kompleze kompilis magistro Brabander, frapis min je la ŝultro kaj iris dormi, kaj mi restis sola kun la biblioteka labirinto.

Ricevinte kiel Ariadnan fadenon tiun liston, mi dum ioma tempo hezitis, ne sciante, kion elekti – ĉu la varmobotelon aŭ la boteleton kun konjako, finfine mi glutis konjakon, por vigliĝi, kaj eklaboris, kuspinte la manikojn, ĉar la plej malnovajn raportojn kovris dika tavolo de polvo, kaj mi ne deziris tro malpurigi la ĉemizon; eĉ ĉi tie super mi, ŝajne, ŝvebis la grumblema spirito de la servistino. La listo konsilis al mi komenci per «Universala historio» de Msims Pittilikvastr, luzania prahistoriisto, sed mi pro pura kuriozemo prenis la plej malnovan kaj flaviĝintan paperujon. La paperujo estis maldika. Sur malpureta folieto mi ekvidis oblikve algluitajn rubandojn de telegramoj, aŭ eble, teleksaĵoj; malalte klininte la kapon antaŭ tiu ĉi estiminda dokumento, mi ne sen peno legis paliĝintan tekston:

TAŬRO GAMMA DIABLA AMASO DA PLANEDOJ SED  
DANKE AL DIO SENHOMAJ EN PERIHELIO MARĈAJ  
EN AFELIO GLACIAJ ĈIO ĈI ESTAS AĈA ENTROPIO KAJ  
NENIO PLI PUNKTO LA ŜIPANARO LACIĜIS NI RAPIDE  
ĈIRKAŬFLUGOS ANKORAŬ UNU PARSEKON KAJ AL LA  
PANJO ANSTATAŬ LA ĈEFO JANKI PAS KAJ FILERGUS  
PUNKTO POST LA REVENO NI KVITIĜOS KUN  
LA ŜIPKONSTRUEJO SALUTON PUNKTO FINO

La teksto estis kruce trastrekita per ruĝa krajono. Malsupre videblis permane farita skribaĵo: «La sesa estas loĝata, mi proponas senpremiigi tiujn fuŝulojn», kaj nedistingebla subskribo.

Mi refoje ĵetis rigardon al la arkaika astroteleksaĵo, kaj kvazaŭ ŝirmilo defalis de miaj okuloj: mi komprenis, ke la nomo ENTEROPIO aperis simple el «aĉa entropio», misskribita de iu oficisto. Tie estis ankoraŭ unu folio, aŭ, pli ĝuste, formularo de raporto pri oficovojaĝo: al ĝi estis alkroĉita hotela konto, sur kiu bluis sigelo «RIFUZI PRIPAGON». Sur la dorso de la formularo

iu neglekte skribis: «Per imuna kuriero. La satelito de la sesa estas planeda kamuflo, plej probable, Amuzilo-Interkaptilo de Fremduloj, malplena interne, blovata okaze de neceso. Rekomendatas singardeco, ĉar parto de la aborigenoj opinias ĝin provoko pro modeloj de KURDLOJ. Detalojn vd. en mia memorando, ĉifro TZG/56 Eps. Mi faras, kion povas. Ne protokoli. Ne publikigi. Ne mendi. Forbruligi. La cindron disblovi en ĉeesto de komisiono». Poste, sendube, sekvis subskribo, supergluita per oranĝkolora gluaĵo kun supertajpaĵo: «KONSERVI SEKRETE».

Mi adiaŭis tiun antikvan dokumenton kun ioma malgajo, sed ankaŭ kun suspiro de faciliĝo: evidente, mi ne estis azeno, opiniinte ordinaran flugantan amuzejon planedo, se tio estis speciala amuzilo-interkaptilo, kaj en mian kapon venis penso, ke ĉi tie mi finfine ekscios la sekreton de sepulkoj, kiu turmentis min dum pluraj jaroj; tamen, ĉirkaŭrigardinte vicojn de ŝlositaj libroŝrankoj (la konsiliano, tamen, lasis al mi grandan faskon da ŝlosiloj), mi komprenis, ke tio estos ne facila afero. Sekvan paperujon same kovris dika tavolo de polvo. Mi tuj remetis ĝin sur la breton – tie estis iaj historioj de malsanoj el psiĥiatria malsanulejo. Strange, kiel ĝi trafis ĉi tien? Trafita de subita konjekto, mi eltiris el la paperujo kajeron da flaviĝintaj paperoj kaj starante komencis ĝin foliumi. Mi trovis medicinan konkludon, atestantan ĉe la ŝipanaro de «Ramfornicus» kolektivian halucinogenan psiĥozon, sindromon de progresanta demenco kaj altigitan agresemon, kiu montriĝis en aktiva kontraŭagado al terapiistoj kaj malsupera medicina personaro. Tiu malsano estis agnoskita profesia kaj la pacientojn estis proponite pensiigi pro invalideco. «Ramfornicus» per du descendaj moduloj devis esplori sisman altebenaĵon de la norda hemisfero de Entio, kaj ankaŭ vastajn marĉajn teritoriojn de la zono de modera klimato. La deliraj vizioj de ambaŭ esploraj grupoj estis egale obsedaj, sed tute malsamaj laŭ la enhavo. La anoj de la marĉa ekspedicio asertis, ke loĝantoj de la planedo tutajn tagojn pasigas en koto ĝis la kolo, kaj vespere elrampas sur relative sekajn lokojn kaj, nelaŭte kantetante, grimpas unuj sur aliajn, kiel cirkaj akrobatoj: ili kreas vivajn kolonojn, sur kiujn grimpas novaj aborigenoj; tiel aperas kelkaj dikaj kruroj, kaj tiu grimpado daŭras, ĝis kiam ili kunfluos,

interplektante la manojn kaj piedojn, ion similan al elefanto aŭ mamuto kun pendanta ventro. Kuniĝinte tiamaniere, ili kun kanto en la buŝoj foriras en nesciata direkto. La provoj pridemandi aborigenojn, postrestintajn survoje, fiaskis, malgraŭ uzo de la plej potencaj aŭtomataj tradukiloj, ĉar la demanditoj tuj plonĝis en koton kaj el iliaj fragmentaj ekkrioj eblis kompreni nur, ke la giganta estaĵo, kiun ili kreis per totala reciproka kroĉiĝo, nomiĝas Kurdlego aŭ Kurdlejo, aŭ eble Kurdlaja. Ne eblas ekskludi, tamen, ke ili sin mem nomas kurdlanoj aŭ kurdluloj. La psiĥopatologiaj simptomoj de la anoj de la norda grupo estis multe pli diversaj. Unuj esploristoj kvazaŭ trafis en egan komplekson de konstruaĵoj sen fenestroj kaj pordoj kaj trovis, ke necesas kure ĵetiĝi al muro, por ke tiu tralasu ilin internen. Ne sukcesinte disiri por serĉi aborigenojn, ili estis atakitaj de vato – aŭ io simila – kaj ankaŭ de iuj neglekte kudritaj ekzempleroj de vesto, similaj al vatpaltoj, kiuj, havante kvantan superecon, elpuŝis ilin sur tegmenton, de kie ili saviĝis per taktika retiriĝo sur la descenda modulo. Aliaj asertis, ke al ili pli fortunis. En granda parko, plena je pigre promenantaj arboj, ili renkontis grupon de malgrandaj aborigenoj, kaj ankaŭ du aŭ tri aborigenojn pli grandajn, kiuj, ekvidinte ilin, forkuris. Tamen la etuloj, kiujn la esploristoj opiniis loka infanaro, ne montrante eĉ etan timon aŭ miron, penis ekkonversacii kun la fremduloj, sed el tio nenio rezultis, ĉar la tradukiloj anstataŭ konscia parolo elmetis ion similan al blekado. Tamen tiuj pseŭdaj infanoj volonte konsentis fotiĝi kun la homoj kaj adiaŭante donacis al ili nemalgrandan kvanton da misteraj objektoj. La esploristoj, tamen, devis reveni, kiam ili aŭdis alarmsignalon, senditajn de la marĉa esplorgrupo. La fotoj fuŝiĝis: kiel evidentiĝis jam en «Ramfornicus», la fotiloj havis spurojn de difektoj, tipaj por influo de altaj temperaturoj. La optikaĵoj de la objektivoj krevis, kaj la fotomembrano degelis. Demandite, kio okazis al la donacoj, kiujn ili kvazaŭ ricevis, la esploristoj asertis, ke en la skatoloj, kie lokiĝis la donacoj, troviĝis nenio, krom manpleno da griza polvo. Neniu el la esploritaj pacientoj sentis sin psiĥa malsanulo. La diagnozo estis farita ne facilanime. Estis eksperimente pruvite, ke la fotiloj estis forte varmigitaj, probable, en la forno de la ŝipa kuirejo, kvankam la pacientoj ne deziris konfesi tion. La spektrografia kaj kromatografia analizo de la polvo, en kiun

kvazaŭe transformiĝis la donacoj, montris ĉeeston de elementoj, renkonteblaj en ĉiaspeca rubo. Kvankam tiom skrupulaj analizoj pruvis mensogecon de iliaj asertoj, la pacientoj obstine insistis pri tio, ke ili renkontis loĝantojn de la planedo, kiuj, aspektante de malproksime homsimilaj, de proksime pli similas hibridon de struto aŭ emuo kun pingveno, saniĝinta de obezeco. Tiuj estaĵoj povas iri, kiel homoj, sed povas ankaŭ moviĝi per saltoj, tenante la piedojn kune, kiel paseroj aŭ infanoj dum faksalta ludo. Ili ne kapablas sidiĝi en la homa maniero, ĉar iliaj genuoj fleksiĝas malantaŭen, kiel ĉe birdoj, kaj ripozas ili, sidiĝinte sur la genuojn. Vestiĝas ili tre bunte, kaj sur iliaj vizaĝoj estas, verŝajne, maskoj, ĉar ili estas demetebaj kaj tiam oni povas vidi sufiĉe malagrablan vizaĝon kun larĝa frunto, malproksime disigitajn, tute rondajn okulojn, kaj tie, kie ni havas buŝon kaj nazon, ili havas konveksaĵon kun truoj, similaj al nazotruoj. Post izolo en la malsanulejo agresemo de la malfeliĉaj pacientoj multe kreskis. Poste sekvis inventaro de malsanuleja meblaro, rompita dum paroksismo de furiozo.

Komisiono, kreita por esploro de tiu demando, pristudis kvardek ok diversajn hipotezojn kaj venis al konkludo, ke la subita amasa psiĥozo povis esti intence induktita de fremda civilizo, kiu per tio defendis sin kontraŭ nedezirata interveno. Tial oni malpermesis viziti la planedon, kaj kolektitaj poste materialoj estis ricevitaj nur danke al radiokomunikado, kun ordinara tempa prokrasto. Atinginte tiun ĉi lokon de la raporto, mi eĉ ekĝojis, ke ĉiuj postaj informoj pri Entio kaj la entianoj venas rekte de ili, do ne estas misformitaj per homaj antaŭjuĝoj. Tamen, antaŭ mi estis longa kaj malfacila laboro: la entianoj, montrinte nemalgrandan kosman altruismon, donacis al ni centojn da siaj verkoj, traktaĵoj, lernolibroj, gazetoj kaj eĉ flugfolioj.

Mi opiniis plej bone komenci per lernolibroj pri historio, kaj per la plej malnovaj, por iri kvazaŭ laŭ natura vojo de la socia, kaj ankaŭ de la intelekta evoluo de la nekonataj estaĵoj. La loko de miaj luktoj kontraŭ tiuj foliantoj estis la tablo, hele lumigita per malalte pendanta lampo. Havante maldekstre de mi la varmobotelon, kaj dekstre la biskvitojn, mi prenis unuan traktaĵon, por ajna okazo metinte en la

elŝovitan tablokeston la boteleton kun malŝraŭbita ĉapo tiel, ke estu eble preni ĝin palpe, ne deŝirante la okulojn de paĝoj kun densa teksto. En la grandega halo estis silento, kiel en kaverno. Krom susuro de foliumataj paĝoj, de tempo al tempo aŭdiĝis miaj mallaŭtaj ĝemoj, ĉar mi okupiĝis pri malfacila afero. Laŭ mia kutimo mi trarigardis komence bibliografion, metitan en la fino de la studata verko, kaj jam tio estis pripensinda, ĉar la nomoj de sciencistoj, cititaj de la entia historiisto, sonis: Trirrcarrakaks, Trrlitriplirrlipitt, Kjukjuksis, Kvorrstjerrkjerr, Kvidtderduduk kaj tiel plu. Mi ne faru antaŭtempajn konkludojn, diris mi kaj ĵetis rigardon al la titolpaĝo.

Tio estis «Historio de Entio» el la plumo de la fama, laŭ asertoj, kurdlanda historiisto Kvakerli. La konsiliano rekomendis ĝin al mi kiel nemalbonan enkondukon en la fakon, sed kiam mi vidis la nomon de la aŭtoro, klare rememoriganta svisajn nomojn, en mia kapo fulmis freneza penso, ke Strümpfli ĝuste tial rekomendis ĝin al mi. Evidenta sensencaĵo, karakterizanta nur mian animstaton. Mi sekvis la konsilon, ĉar ĝi ŝajnis al mi racia. Kvankam estis malfacile decidi, kiu parto de la erco estas pli nekomprenebla, ĉu la kurdlanda aŭ la luzania, io sufloris al mi, ke kun tuta sia nekutimeco, eĉ unikeco, la kulturo de urbosaŭroj – loĝataj vivaj estaĵoj – estas pli proksima al la Naturo, ne tiom artefarita, kiom la civilizo, doninta racion eĉ al ŝtonoj kaj grundo. La Naturo, kiel universala kosma konstanto, devis iĝi ligilo kaj enkondukilo en la fremdan historion. Ne pensu, tamen, ke mi avide kroĉiĝis al tiu ĉi dikega volumo, glutante paĝon post paĝo, – ne, mi staris kiel nedecidema plonĝonto super glacia aperturo, ĝis, finfine, mi enspiris en la pulmojn pli da aero, kaj enprofundiĝis en legadon.

La ĝermadon de la vivo sur Entio Kvakerli priskribis sciencmaniere, sed, ĝenerale, tute kompreneble. La vivo, laŭ liaj vortoj, ĉie ĝermas same. Unue oceano treege malrapide fermentas ĉe bordoj, transformiĝante en ĝelan ŝmacaĵon, kaj malfortaj ondoj kirladas ĝin dum jarcentoj, eĉ dum jarmiloj, ĝis kiam el tiu kaĉo apartiĝos ŝmacanta ĵeleo kaj post sennombraj aventuroj alŝmacrampos tien, kie ĝia molaĵo malmoliĝos, iĝinte kalka skeleto. Kvakerli asertis, ke sur diversaj planedoj, depende de lokaj kondiĉoj,

aperas malsamaj superaj organismoj, kies ĉefaj specoj estas: sangosuĉuloj, laktosuĉuloj kaj bekonazuloj. Ankaŭ reproduktiĝas ili malsame – per frotado, per polenado, per proliferado, kaj iam, kvankam treege rare, per tiel nomata ŝtopado, kion sur Entio, planedo tute normala, la afero, dankon al dio, ne atingis. Devenante de grandaj neflugantaj birdoj, entianoj nomas sin ĉlakoj: tiun vorton kelkaj entropologoj derivas de la ŝmaca sono, ordinara dum moviĝo en marĉoj, ĉar marĉoj, senlimaj marĉegoj kaj gigantaj marĉmaroj estis ĉi tie la lulilo de la vivo. Kaŭzis tion la loka geografio. Entio revoluas ĉirkaŭ sia suno laŭ tre longigita orbito, kaj en la afelio sur ĝi regas terura frosto. Sed la oceano per siaj neordinare vastaj malprofundaĵoj proksimiĝas al la rando de la kontinento, marĉa apud bordoj, sed en profundo riĉa je vulkanoj de la sistemo aktiva altebenaĵo, kaj de ili venas sava varmo, kiu periode sekigas la marĉojn. Tamen bolantaj gejseroj, senĉesaj vulkanaj kaj sulfuraj erupcioj devigis ĉion vivan teni sin malproksime de tiu infero. Tial la vivo hejmiĝis ĝuste meze inter la oceanaj glacioj kaj la vulkanoj de Taraktio, en la regiono de la Granda Koteano. Ĝuste tie el prarampuloj aperis rampuloj, kaj el tiuj – transrampuloj kaj cisrampuloj. La lastaj, kiel indikas ilia nomo mem, ne sukcesis transrampi al pli varmaj pecoj de sekaĵo kaj dronis, tamen la transrampuloj metis komencon al ŝmakoj. La ŝmakoj evoluis en ŝmardeojn, kies kruroj estis ankoraŭ tro mallongaj; pro tiu kaŭzo ili rapide engluiĝadis en marĉo kaj pereadis pro malsato. La ŝmardeoj iĝis ŝmekoj, ŝmokoj kaj ŝmukoj. Estis ankaŭ ŝmusoj, sed tio estis, se eblas tiel diri, sakstrato de la evoluo: ili havis malbonan vidkapablon kaj baldaŭ formortis. Poste la evoluo haltis por miliono da jaroj, ĉar reproduktiĝo en glita malvarma marĉo donas malmultan ĝojon, kaj maskloj pli ofte nur ŝajnigadis, ke ili okupiĝas pri sia afero, ol vere okupiĝadis pri ĝi, alpremiĝante al femaloj precipe por varmiĝo. Tiea koto estas treege glueca, tial paroj tute ĉesis disiĝi. Estas facile kompreneble, ke pro tio el paro rezultis kvaropo, el kvaropo – okopo kaj tiel plu, ĝis kiam vicaj generacioj, kreskante, transformiĝis en humidulojn, humonstrojn kaj, finfine, humurdlojn. Ĝuste de la humurdloj poste devenis la kurdlo. Kvankam humurdloj havis tute bonajn krurojn – longajn je ses ĝis naŭ metrojn, tamen tio ne sufiĉis por teni la korpon super la surfaco de la marĉo,

tial pro baraktado en koto iliaj vostoj kaj ventroj ĉiam estas humidaj; por saviĝi de tiu ĉi plago – ja en la marĉo estas diable malvarme, – la humurdloj komencis altigi la temperaturon de la korpo, certe, ne intence (tiuj kreitaĵoj estas neordinare stultaj), sed pro la natura selekto de la plej varmaj individuoj. Sed plirapidigi la metabolon senfine ili ne povis, ĉar finfine ili simple kuiriĝus, kiel en bolaĵo, kaj vica mutaciulo komencis eligi el la faŭko gason, kiu de dentogrincado (aŭ de dentoklakado pro malvarmo) flamiĝadis, kiel niaj marĉaj gasoj en humidaj torfejoj. Ekde tiu momento la humurdlo, por ne malvarmumi, eligadis fajron, kiu ĝin multe sekigadis, kaj eĉ pli oportune estis sekiĝi por du humurdloj, starantaj unu kontraŭ alia; tiaj estis la unuaj ĝermoj de altruismo. La unuaj flamspirantaj humurdloj (aŭ flamurdloj) ne atingis eĉ duonan amplekson de ilia malproksima posteulo – kurdlo. Estingiĝinta flamurdlo nomiĝas esturdlo. Ĝuste ili anstataŭis por la praentianoj Olimpon, el kiu Prometeo ŝtelis fajron. En iliaj legendoj gravan rolon ludas netimigebla heroo, nomata Grandeo aŭ Granteuso, kiu laŭ la legendoj faris la samon, kion faris Prometeo. Trafintaj en kaptilon flamurdloj estis uzataj por hejtado de rezidejoj de tribestroj.

Sed ĉio ĉi okazis post milionoj da jaroj, en la tempoj de la mita reĝo Grrakvinio. Sed dume en grego de flamurdloj paŝtiĝadis kutime unu giganto-avanulo kaj kelkaj malpli grandaj maskloj, agnoskantaj ĝian superecon; tamen se ĝi tro ĝenis ilin, ili kungluiĝadis, imitante kopuladon, danke al kio tri aŭ kvar flamurdletoj, kunkroĉiĝinte, per unuigitaj fortoj rebatadis la giganton. La dialektiko de la evoluo de la humurdloj estis tia: kiam ili tro multobliĝadis, tiam ili ĝisseke piedpremadis ampleksajn areojn de la marĉo, kaj poste, paŝante sur firma grundo, piedpremadis ĝin jam tiel, ke tie nenio kreskis, kaj pro manko de nutraĵo mortadis pro malsato. Tiam marĉoj denove revenkadis, ŝtoneca grundo iĝadis koto, diskreskadis marĉaj sfagnoj kaj la tuta ciklo ripetiĝadis dekomence. Se la nutraĵo iĝadis tute elĉerpita, humurdloj pro malsato komencadis vori unu alian, atakante la viktimon per fajro, eligata el la faŭko; tiel ili kutimiĝis al rostaĵo. Ĝuste la humurdla kanibalismo kaŭzis aperon de la kurdloj, ĉar la prakurdlo estis simple humurdlo, maldece tromanĝinta. Sed la prakurdlo, pro sia giganteco, malmulte konvenis por batalo por

la ekzistado. Speciale grandajn malfacilaĵojn ĝi spertis, penante kompreni, kie finiĝas ĝi mem kaj komenciĝas io alia, taŭga por manĝado, tial memmanĝado, komencante de la vosto, estis ordinara fenomeno, kion atestas paleontologiaj elfosaĵoj; laŭ konserviĝintaj skeletoj videblas, ke la prakurdlo pereadis, se tromanĝis sin mem.

Poste malpli grandaj humurdletoj, timante grandan humurdlon jam ekkurdliĝantan, komencis intence subŝovi al ĝi individuojn, kiuj pro longa baraktado en marĉaj sfagnoj, tiaj kiel vomiko hastiga, neforgesumo naŭza aŭ ruktalo drasta, efikis al la stomako kiel vomigilo. Tio estis tiel nomataj humurdistoj, kaj subŝovado al malamiko de vomigaj humurdletoj iĝis konata sub la nomo «humurdo». Danĝero embuskis la kurdlojn de du flankoj. Tro granda masklo-solulo nesentible sin mem ronĝis ĉe la fora periferio, kaj kurdlo tro malgranda pro sia hipermetropeco povis entute sin mem ne rimarki; opiniante, ke ĝi ne ekzistas, ĝi ĉesadis manĝi kaj mortadis. Ĝuste en tiu ĉi punkto la evoluo de la kurdloj decide kruciĝis kun la socia evoluo de la entianoj, kio donis mirindajn konsekvencojn, kiuj ne havas precedencon en la tuta Galaksio.

En sia eolita, tio estas ŝtona, epoko, la praentianoj adoris kurdlojn kiel diajn estaĵojn, kvankam abomenajn. Tial kurdla simbolaro firme enradikiĝis en ilia mitologia arsenalo, en arkaikaj legendoj kaj sagaoj; de tio venis ankaŭ la pli posta nomo de ilia ŝtato – kurdlujo. Jam tiam okazis, ke kurdlo glutadis praentianojn, kaj, por eviti tian morton, la loĝantoj de la marĉoj ŝmiradis sin per pasto, preparita el vegetaĵoj, kiujn ili ŝtelis de etuloj-humurdistoj, subrigardinte, en kiaj herboj baraktas tiuj kreitaĵoj antaŭ ol proponi sin al kurdlo, por delogi ĝin al kanibalismo. Entianon, glutitan de la monstro kaj elfaŭkigitan eksteren sen ajna damaĝo ([tiel nomatan Glutulon](#)), ĉirkaŭis ĉies adoro; tial oferotojn al kurdloj oni komencis ŝmiri per la pasto, tiel ke kurdlo, kvankam akceptadis la oferon, baldaŭ malplezure redonadis ĝin. Sed ĉu ĉiam la afero statis ĝuste tiel, ne estas tute klare. Kelkaj aŭtoroj asertas, ke oferatoj mem ŝmiradis sin per dekoktaĵo el vomigaj herboj, nelegale akiritaj de tribaj ŝamanoj, kaj tio kvazaŭ kaŭzis totalan koruptecon, ĉar en kelkaj triboj la redono de ofero fare de kurdlo estis opiniata malbona antaŭsigno. Sed

en aliaj lokoj Glutulo mem estis ŝamano, aŭ eĉ tribestro, kaj de tio venis rito postuli de kandidato al tribestro doni sin al kurdlo por manĝi. Trairadon de kurdlo oni opiniis ago de rita inico. Tiu, kiu pro malkuraĝo timis proponi sin al kurdlo, ne povis kalkuli pri iom grava posteno en la komunumo. Praentianoj, loĝintaj en transkotejoj, jam tiam nomis sin ĉlakoĵ. Iliaj kredoj estis sufiĉe strangaj el nia vidpunkto. Plejan respekton oni faris al kurdlo, kiu sin mem voris, – opiniante, ke memmanĝado estas potencigo ([se kurdlo, estaĵo dieca, plenigas sin per si mem, ĝi iĝas diaĵo kvadratigita](#)). La Olimpo de la ĉlaka antikveco estis loĝata tre dense, pro diverseco de specoj de kurdlo kaj ties sortoj. Tiel, ekzemple, malsatanta kurdlo iĝas, laŭ kredoj, ĉiam malpli granda kaj pli kolera; tia malica kurdlo nomiĝas «nanurdlo». El nanurdloj aperas kurdliputoj, kaj ĝuste ili, sed ne najbaroj, fekas nokte en postkorto. Kaj kakurdlo estas kurdlo, kiu formanĝis kurdliputon kaj ekkoleris, sed ne malpligrandiĝis. Ĝi embuskas vagantojn kaj donas al ili enigmojn, kiujn ne eblas solvi, ĉar parolas ĝi tiel malklare, ke ne eblas ĝin kompreni. En la frua mezepoko la vorton «kurdlo» ĉlakoĵ opiniis sankta, kaj prononci ĝin estis malpermesite; la monstroj ricevis anstataŭajn nomojn, ekzemple, Derdlo, Brrrdlo, Merdlo k. t. p. Heroaj mitoj rakontas pri kuraĝuloj, kiuj sukcesis enkurdliĝi kaj elkurdliĝi helpe de magio; el tio eĉ aperis herezo, anstataŭiginta ĉiujn signojn de la antaŭa kredo al la malaj kaj deklarinta kurdlon personigo de ĉia malbono kaj abomenaĵo, unuvorte, monstro el la infera abismo ([kies enirejo estis, laŭkrede, krateroj de vulkanoj](#)). La mezepoko daŭris sur Entio okoble pli longe, ol sur la Tero, kio havis seriozajn konsekvencojn por evoluo de la ĉlaka kulturo. Ĝia mondumiĝo komenciĝis en tempoj de la granda malsato – kaj komenciĝis ĝi per ĉasadoj al kurdloj. Kelkaj batalantoj kun frameoj kaj lancoj ([kunmetebraj, por ke ili ne ŝtopiĝu en la gorĝo de kurdlo](#)), kaŝinte ĉebruste sakoĵn kun vomiga preparaĵo, permesadis al kurdlo gluti sin, kaj poste, ŝmirinte sin per tiu preparaĵo, pikadis la internajn organojn de la besto, ĝis kiam, finfine, ĝi sentis kolikojn pro naŭzo. Iam kurdlo eligadis ĉasantojn antaŭtempe, iam mortadis kune kun ili, kaj iam ili sukcesadis elrampi eksteren el la mortinta kurdlo. La specio, kies ekzisto estis serioze endanĝerigita, montris mirindajn kapablojn al mimetismo; ekzemple, estis kurdloj, kiuj kovriĝis per herbo kaj

eĉ per arbustoj, precize similante al tumultoj, tio estas tombomontoj de ĉlakaj prauloj, kaj per tio sekurigis sin. Sed la scienco ĝis nun ne trovis, ĉu estas en tiuj legendoj almenaŭ grajno da vero.

Mi, certe, ne devis interrompi la legadon de la «Historio de Entio» en la versio de la kurdlanda historiografo, sed li tiel ofte furiozis kontraŭ luzaniaj historiistoj, nomante ilin malestimindaj mensoguloj, falsistoj, demonoj kaj monstroj, ke mi terure ekdeziris ekscii, kio kaŭzis tiajn eksplodojn de indigno; tial, trovinte kelkajn luzaniajn verkojn, mi demetis la folianton flanken, anticipe markinte ĝin en tiu loko, kiun mi atingis, per la kulereto – nenion alian mi havis ĉe la mano. Komence mi malfermis «Mistifikitan historion» – simple tial, ke tiu libro estis la plej maldika. Verkis ĝin luzania kurdlogo Arg Kvarg Tralaksarg. De li mi eksciis, ke neniam humurdloj, flamurdloj kaj flamurdletoj iam estis sur Entio. Ĉio ĉi estas antikvaj fabeloj, senkritike akceptitaj de granda parto de la kurdlandaj sciencistoj pro kaŭzoj, kiuj havas nenion komunan kun la scienco. Ne ekzistis ankaŭ iaj ajn fajrospirantaj animaloj. Sed estis nure vagantaj flamoj de spontanee flamiĝanta metano kaj aparte de ili – kotaj amfibioj, kaj krome subkotaj vulkanoj, ofte nomataj glukanoj, kiuj, kompreneble, de tempo al tempo komencadis erupcii kaj glugli, kaj tiuj fenomenoj en la malkleraj mensoj de la aborigenoj transformiĝis en terurajn batalojn de pirosaŭroj, kaj poste tiun fenomenon penis interpreti racie (tio estas konforme al la teorio de evoluo de Cipcirvin) la sciencistoj de la paletina skolo, subvenciataj de la kurdlanda Ministrejo de Propagando, ĉar la Prezidanto estas interesita pri subteno de reputacio de la naciomobilismo ankaŭ ekster la limoj de la politmobilo.

Sed tiu aŭtoro polemikis kun alia, Kviksaks, tial mi turnis min al lia paleontologia verko kaj trovis tie plenan ciklon de transformado de nutra maso en la stomako de kurdlo (pli ĝuste, en la stomakoj, ĉar entute da ili estas, ŝajne, ses) – tiel nomatan ciklon de Greps, kaj ankaŭ tabelon kun spektroj, ricevita dum laboratoriaj eksperimentoj pri kurdla memflamiĝo, el kiuj sekvis, ke kurdlo kun malalta acideco produktis gasojn, fajrantajn per hela oranĝkolora flamo, kurdlo kun alta acideco, suferanta pro pirozo, eligas blu-violan flamon, kaj

se ĝin abunde manĝigi per lignecaj plantoj – ĝi fumas. Samloke estis fotoj de tiuj, kiuj per propraj okuloj vidis en kurdlanda rezervejo Fiffari vivan prakurdlon: ĝi dormis, ĝis la oreloj merginte en koto, tiel ke ekstere estis nur ĝiaj korniĝintaj nazotruoj, kaj de tempo al tempo malfacile suspiradis, kaj poste komencis hiki, elŝovis la kapon super la akvo kaj ekgrincis per dentoj tiel, ke ekŝutiĝis fajreroj, kaj tuj el la faŭko ekiris fajro kaj aŭdiĝis tondrosimila frapado de dutakta dizelo. Tio kvazaŭe atestis tion, ke ĝi vekiĝis ne tute, kaj eligis flamon dum dormo. Mi, tamen, preferus vidi foton de la fajrospiranta kurdlo anstataŭ la foto de la atestintoj, kiuj tiel proksime observis ĝin, sed precizeco de la priskribo estis, sen ajna dubo, mirinda. Sed kion eblis fari, se Iks Kvasseriks Getelent, probable la plej granda aŭtoritatulo de la planedo pri genetika kaj morfologia kurdlistiko, listigas konvinkegajn eksperimentojn, faritajn en lia Instituto kaj kontestantajn la tezon pri ekzisto de pirosaŭroj. Kvankam dentojn de kurdloj oni intence fajladis per fajlilo, kvankam oni manĝigadis ilin per bruligita korko, kaj el vegeta nutraĵo donadis nur fabacojn, kaj eĉ penis trinkigi ilin per brulemaj kaj volatilaj substancoj, de etero ĝis benzino, neniuj el ili hikis eĉ per plej eta flamlangeto, kaj la Instituto forbrulis nure pro malatento – en incendio, fajrigita de kolerigitaj partizanoj de la pirosaŭra hipotezo. Getelent tamen ne klarigas – plej verŝajne, pro lojaleco al la kolegoj, – kion ili strebis atingi per tiu brulatenco: ĉu neniigi la negativajn rezultojn de la eksperimento aŭ rekte deklari brulfarinto la eksperimentan kurdlon. Eĉ pli, Getelent pridubas la ekziston mem de URBOSAŬROJ, asertante, ke en la stomako de kurdlo eblas droni aŭ tuj morti pro odoraĉo, kaj en ĝiaj balgoj por aeroblovado neniuj eltenus eĉ kvin minutojn; kaj tio, kion vizitas luzaniaj turistoj dum ekskursoj, aranĝataj de kurdlandaj turismaj agentejoj, estas nur intence preparita modelo, praktike senodorigita, dum ĉiu, kiu staris je dek paŝoj apud almenaŭ facile muĝetanta kurdlo, scias, ke en tia distanco ĝia spiro faligas kaj kaŭzas astman anhelon. Do, laŭ la opinio de Getelent, sur la planedo ne nur neniam ekzistis fajrospirantaj flamurdloj, sed krome ne ekzistas kaj neniam ekzistis ajnaj urbosaŭroj. Sur tio, deklaras li, finiĝas lia misio, kiel de paleontologo, fidela al la scienco, kaj rilate de ĉio cetera, tio estas pri tio, kial la kurdlandanoj tiel insistas pri ekzistado de neniam ekzistintaj estaĵoj, devas paroli

ekstersciencaj instancoj kaj organoj. Ŝajne, la elpaŝo de Getelent kaŭzis politikan tempeston kiel en Luzanio, tiel ankaŭ en Kurdlando, – en urbosaŭroj la afero atingis neparlamentajn interpelaciojn kaj stomakajn protestajn mitingojn, en la luzania parlamento ekflamis debatoj, kaj poste okazis interŝanĝo de diplomatiaj notoj, solvita per deklaro de la luzania gazetar-ataŝeo, ke lia registaro ne pridubas la fakton de loĝateco de kurdloj en ĉiutaga maniero, kaj sciencistoj, kiuj faras eldirojn pri tiu temo, elpaŝas ekskluzive kiel privataj personoj, ne rajtigita fari deklarojn de programa karaktero kaj formuli kriteriojn de objektiva vero, kiujn necesas obei en ellaborado de eksterpolitika kurso.

Sufiĉe konsternita de la tiom principa diskuto, mi denove prenis la «Historion de Entio» de Kvakerli, timante perdi la vojqvidan fadenon kaj droni en la marĉo de reciproke ekskludantaj vidpunktoj. La duan parton de sia monumenta monografio Kvakerli dediĉas al la raciĥavaj loĝantoj de Entio. Li eksplikas la esencon de la afero sufiĉe klare, nome: sur la planedo ekzistis ne unu specio de Raciĥavantoj, sed du – duuloj kaj ĉlakoĵ, aŭ duonuloj. De la duuloj devenis la luzanoj, de la ĉlakoĵ – la kurdlandanoj. Ambaŭ devenis de grandaj neflugantaj birdoj kaj tial tre similis anatomie, tamen tute malsamis spirite. La duuloj estis famaj per sia voluptemo, per kriminalaj inklinoj kaj ĝenerala mensa subevoluinteco. Tamen la ĉlakoĵ evoluis laŭ ĝusta mezuro. Tial, danke al tio, ke ili ekposedis astronomion, antaŭvidante, ke post centoj da jaroj la natura satelito de Entio disfalos, enirinte en la zonon de malstabileco de Rosh, kaj la planedo troviĝos interne de meteorŝtona svarmo, la praĉlakoĵ decidis konstrui por si rifuĝejojn. Tamen en transkotejoj ([en kiuj tiam la ĉlakoĵ loĝis kune kun la hebetaj duuloj, nutrante ilin de tempo al tempo pro denaska bonkoreco](#)) konstrui ion ajn estis neeble; transloĝiĝi norden, al la vulkana altebenaĵo, la ĉlakoĵ, vivtenintaj sin per ĉsado, same ne povis, ĉar iliaj ĉsataj bestoj, tio estas kurdloj, povis vivi nur en marĉoj, nutrante sin per marĉaj algoj, kaj sur nova loko rapide formortus. Tial la ĉlakoĵ konstruis siaspecajn Noajn arkeojn – moviĝantajn fortresojn el grandegaj ostoj de mortigitaj dum ĉsado kurdloj, per kies viando ili nutradis sin, kaj tio estis por ili la sola eblo resti vivaj. La afero estas en tio, ke antaŭ milionoj

da jaroj en la zono de Rosh disfalis alia satelito, malpli granda, kaj falis sur Ention per ŝtonaj pluvoj jam antaŭ kiam aperis la raciĥavaj estaĵoj; ĝuste tio kaŭzis la mutacion de la prakurdloj, sur kies dorsoj elkreskis potencaj karapacoj el ŝtoniĝinta silico. Ĝin sekrecias tiel nomataj kontraŭmeteorŝtonaj glandoj, kiujn priskribis alia kurdlanda sciencisto, Kukarikku, arkeologo, baziĝante sur muraj bildoj en kavernoj de la vulkana altebenaĵo.

La lastaj kirasitaj kurdloj estis formortantaj, kiam taĉmentoj de ĉlakoĵ entreprenis kuraĝajn ekspediciojn al la altebenaĵo. Kiel asertas Kukarikku kaj ankoraŭ unu arkeologo, Kvakerlak, ĉlakoĵ ellernis melki tiujn kurdlojn; la melkita likvaĵo densiĝis, kaj se oni verŝadis ĝin en formojn, rezultadis bonegaj brikoj. (Tamen, la luzaniaj fakuloj unuanime nomas tion pura fantazio, substrekante, ke la menciitaj brikoj datiĝas de la oka jarmilo de la antikva erao, kaj estas ricevitaj per bakado, sed ne melkado).

Do, kiam komenciĝis megroj, tio estas meteorŝtonaj grajloj, konsistintaj el rompaĵoj de la dua satelito de Entio, la ĉlakoĵ jam havis moviĝantajn fortresojn; tiuj fortresoj, cetere, tute ne estis vivaj kurdloj, tio estas kalumnia elpenaĵo de la napokapaj luzanoj (aŭ duuloj). Bonkoraj de naturo, la praduonuloj (ĉlakoĵ) permesadis al la luzanoj kaŝiĝi sub siaj moviĝantaj urboj, kaj vere, sub la ventra fundo de ĉiu el ili nomadis bando de senhejmaj duuloj. Ĉi tie mi devas klarigi, ke tiu duobla terminologio (duonuloj – duuloj, ĉlakoĵ – luzanoj) estas sekvo de ekzisto en Kurdlando mem de du konkurantaj arkeologiaj skoloj, ĉiu el kiuj posedas dekojn da nerefuteblaj argumentoj por nur unu paro de terminoj; bedaŭrinde, ili ne povas veni al komuna opinio. Tiuj ĉi vagabondoj nutradis sin per manĝorestaĵoj, kiujn ĵetadis al ili el fortikigita kurdlo noblaj ĉlakoĵ. Vivtenante sin per almozo kaj, male al ĉlakaj garnizonoj, senorde vagante sub sava ombro de kurdlo en marĉaj herbejoj, abundaj je luzerno, tiuj duuloj ricevis nomon de luzernanoj, aŭ luzanoj. Sed ankaŭ la kurdlandanoj ne havis dolĉan vivon: ili laboradis de matenruĝo ĝis vesperruĝo, kiel en galeroj, kaj centoj da manoj kun plena forto tiradis kolosajn ostojn, por movi la krurojn de sia fortreso. Al tiu galera laboro metis finon nur la Prezidanto, kiu

persone elpensis bioinĝenierion. Li montris al siaj malgrandaj fratoj, kiel sintezi, sub lia sagaca gvido, etajn kurdlidojn, kaj kiel ilin nutri per hormonoj de kresko, kio estis plenumita kun ega sukceso. Tiel aperis sintekurdloj, kaj el ili – modernaj urbosaŭroj, bonege ekipitaj, kanalizitaj, oportunaj kaj puraj, – unuvorte, paŝantaj urboj, kiuj mem zorgas pri siaj loĝantoj. Ĉiu povas eliri por promeno aŭ pro alia neceso el la gepatra kurdlo, kaj poste revenas, kiel en sian hejmon. La megroj, vere, antaŭlonge ĉesis, sed kio povas esti pli bona, ol luksa turomobilo, en kiu vintre estas varme, somere ne estas varmege, en kiu estas tiel bone vojaĝi, en la medio, konata ekde infanaĝo, ekkonante la patrujon de rando ĝis rando? Kaj kio koncernas paspermesilojn kaj pasportojn, sen kiuj ne eblas eliri el kurdlo, do ili necesas pro pure administraj kaŭzoj, por eviti tumulton ĉe enirejoj kaj elirejoj. La pasportizo montriĝis necesa ankaŭ tial, ke la fiaj luzanoj, anstataŭ eterne danki kurdlandanojn pro savo el la megro, alivestiĝadis kiel ĉlako kaj en aspekto de revenantaj post promeno legalaj loĝantoj de urbosaŭro penetradis internen, por semi malpacon kaj demoralizi, speciale en vicoj de la politike nematura junularo, al kiu ili sufloradis, ke ekster kurdlo vivkondiĉoj estas pli bonaj. Post kelkaj jarcentoj, ĝissate ŝtelinte kaj rabinte, la luzanoj forlasis la transkotejojn kaj ekloĝis sur la norda altebenaĝo, kie ili kreis post la ĉeso de la sisma aktiveco propran ŝtaton, kiu ĉiurilate estis malpli bona, ol la Kurdlujo. Tiutempe la koteano retiriĝis; sur la humidaj spacoj firmiĝis Kurdlistano, kaj sur limanta ĝin altebenaĝo – Luzania Imperio, poste iĝinta respubliko. La difino de limoj okazis ĉirkaŭ la 900-a jaro antaŭ la nova erao. Estas interese, ke militoj en tera maniero, kun klare distingeblaj frontoj kaj moviĝoj de grandaj militaj trupoj, daŭris sur Entio nur tricent jarojn. Oni rezignis ilin por senĉesa, sed ne tiom evidenta lukto. Oni molestadis unu alian per rabatakoj, provokoj, diversioj kaj sabotado, kaj la unua ĉiam estis Luzanio ([mi rememorigas, ke mi citas kurdlandajn historiistojn](#)). En luzaniaj staboj oni ellaboris novajn metodojn de lukto kontraŭ urbosaŭroj, ekzemple, per imputo al ili de kvina kruro, kiu ludis rolon de kvina kolumno. Malico de tiuj fiuloj atingis eĉ tion, ke ili ŝajnis, ke ili nenion scias pri la loĝantoj de kurdloj. Tial, kiam luzanaj diversiantoj semadis ĥaoson en la kurdaj korpoj, alfarante al ili la kvinan kruron aŭ ŝmirante voston

de kurdlo per io bongusta, por ke ĝi mordu sin; kiam ili vomsapeadis, subĵetante al paŝtiĝantaj kurdloj venenon en balonoj, kaŭzantan tian vomon, ke kurdlo povis elkurdliĝi, tio estas reversiĝi, – ĉio ĉi estis prezentata, kiel agoj direktitaj nur kontraŭ animaloj. Ĉar Luzanio ne konsideradis la artefaritan, sintezan devenon de kurdloj, kaj senhonte asertadis, ke la Prezidanto elpensis nenian bioinĝenierion.

La situacio ŝanĝiĝis radike nur en la XXII-a jarcento, kiu proksimume konformas al nia deknaŭa. Mi eksciis pri tio el trivoluma verko de profesoro, doktoro, ano de la Kurdluja Akademio Mcicimrrks. Luzanio ekiris tiam laŭ vojo de industriiĝo, kiun malfeliĉon Kurdlando evitis, danke al la instruo de la Prezidanto. La unua puŝo estis invento de flamurdla maŝino, kiun movis fajro, kiun elfaŭkigas flamurdlo, malsekigita kaj pro tio koleriĝinta. Pli riĉaj luzanoj komencis vendi siajn bienojn kaj investi kapitalon en fajrorezistajn kurdlojn, kontribuante per tio evoluon de kurdlobredado. Baldaŭ estis breditaj rasoj maksimume fajrospirantaj kaj samtempe fajromelkaj. Ili estis vaste uzataj en metalurgio, kaj ankaŭ por hejtado. Transformiĝo de kurdloj en kapitalon kaŭzis abruptan kreskon de postulo pri alttemperaturaj kaj longe vivantaj kurdloj, sed senfumajn kurdlojn oni ne sukcesis bredi. Kvanto de flamurdloj kreskis lavange, kaj post kelkaj dekoj da jaroj poluado de la natura medio ricevis minacantan amplekson. Tiam aperis ideo pri pligrandigo de flamurdloj (aŭ, kiel oni nemalofte ilin nomadis, fumurdloj), ĉar kelkaj potencaj ekzempleroj fumas malpli, ol tuta grego da etuloj; kaj tio jam estis proksima al la slogano pri naciigo de la tuta kurdlaro (tio nomiĝis «optimumigo per koncentriĝo»); sed parto de sciencistoj, provinte kalkuli, kia kurdlo estus plej ŝpara, venis al konkludo, ke ajna natura kurdlo tute ne taŭgas. Ankoraŭ estis pridiskutata ideo de Pururdlo, flamanta kaj samtempe purema, kiu funkcius laŭ principo de fermita ciklo, nutrante sin per propraj ekskrecioj, riĉigitaj per kelkaj vitaminoj. Sed eksperimentaj kurdloj mortadis aŭ freneziĝadis kaj, rompinte baran muron, forkuradis en Kurdlandon, aliaj perdis kapablon de fajrospirado, kaj kelkaj rezulte de sciencaj eksperimentoj komencis eĉ malvarmiĝi ĝis negativaj temperaturoj; tion oni penis uzi en konstruado de malvarmujoj, sed sensukcese, ĉar la kurdloj

frostmortis. Estis maturiĝanta ekonomia krizo, akcioj de kurdaj akciaj societoj fulmorapide falis, ĉiuj, kiuj povis, sekrete kaŝadis lastajn flamurdletojn, oni penis bredi kurdlojn-gazonistojn, kiuj ellaborus gason el fermentigata de ili herbo, sed ĉio estis vana. Disfalon Luzanio evitis nur pro malkovro de la atoma energio, tamen, farita tute stulte, kiel ĉio, kio estis farata en tiu ŝtato. Jen kion diras la kurdlanda akademiano. Kaj eble, li diras ankoraŭ ion, sed mi jam ne havis fortojn legi lin plu. Ĉar li pleje mallaŭdadis sian luzanan kolegon nomatan Pirivitt Piritt, ne eksplikante liajn opiniojn, sed nur verŝante sur lin malpuraĵon, mi pro sciemo trovis malgrandan libreton de tiu luzano. Ĝi nomiĝis «Mendosfero aŭ etikosfero». Perpleksite mi rigardis en grandan vortaron de fremdaj vortoj kaj eksciis, ke la unua vorto de la titolo devenas de latina mendax – mensogulo. En la antaŭparolo la aŭtoro frakasis la kurdlandan version de la industriiĝo de Luzanio. Li nomis ĝin amasigo de fetoj deliraĵoj: en la imperio oni neniam bredadis ajnajn pirosaŭrojn ([en tiu epoko Luzanio ankoraŭ estis imperio](#)), kaj kurdloj ne povis esti kapitalo, kaj tio estas komprenebla – ja ĉu povas esti kapitalo tio, kio ne ekzistas? Ne estis ankaŭ iaj ajn provoj anstataŭigi konstruadon de loĝejoj per bredado de kurdloj, parte – kiel asertis la kurdlanda flanko – laŭ licencoj de bioinĝenieroj de la Prezidanto ([kurdloj-ĉielskrapantoj](#)), kaj parte danke al ŝtelado de kurdlandaj patentoj. Ĉio ĉi, de la komenco ĝis la fino, estas propagando por interna uzo, stultiganta malfeliĉajn kurdlandanojn-galeranojn, kiuj eĉ nazon ne povas elŝovi ekster la ventron de sia grandsklavo, aŭ grandsklaviganto, ĉar ĝuste tiel endas nomi la urbomobilojn. En la historio de Luzanio, vere, same estis nemalmulte da malfacilaĵoj kaj krizaj fenomenoj, sed ili estis nekompreneblaj por subevoluintaj mensoj, premiataj per sciencaj titoloj laŭ rango, sed ne laŭ talento. Pirivitt Piritt menciis, ke la kurdlanda akademiano ne estis eĉ vera doktoro, sed portis nur nominalan titolon *doctor honoris causa* <sup>[20]</sup>, kaj liaj propraj disĉiploj nomis lin «doktoro kurdlo». Ĉi tie almenaŭ ĉio estis klara. Tamen en la sekvaj ĉapitroj Pirivitt Piritt polemikis kontraŭ luzanaj etikigistoj kaj gedomatikistoj, kaj tie mi jam apenaŭ povis ion kompreni. Li asertis, ke ne ekzistas alia vojo, krom plena etikigo de la loĝata medio, kaj la adeptoj de parta etikigo, kiuj proponas etikigi nur publikajn domojn kaj konstruaĵojn, ne konscias, kiajn

koŝmarajn konsekvencojn kaŭzos tia decido. Tio, ke en la Galaksio estas neniu totale lertonizita civilizo, tute ne estas argumento *contra rem* [21], ĉar almenaŭ iu socio devas esti la unua, alivorte la plej progresinta en sia evoluo, kaj tiu honora, kvankam malfacila sorto trafis ĝuste al la luzanoj, kiuj per tio pavimas vojon por galaksiaj raci havaj fratoj. Poste sekvis tabeloj, formuloj, skemoj kaj grafikaĵoj, kompreneblaj por mi ne pli, ol hieroglifoj.

Kun malagrabla sento, ke post lego de la libro kun tia belsona titolo mi scias malpli, ol antaŭ kiam mi malfermis ĝin, mi komencis serĉi sinoptikaĵojn kaj gvidlibrojn pli popularigajn kaj verkitajn sur la Tero, ja ilin verkas homoj por homoj, samgentanoj; ĝuste tiam mi vere enkaĉiĝis, trovinte lernolibron por doktoriĝantaj historiistoj de luzanistiko. Tio estis kolektiva verko de ĉirkaŭ dudek aŭtoroj-fakuloj, vera volapukaĵo, almenaŭ por homo kiel mi, kiu legis kaj ne povis kompreni, kion mi legas; ja kiel eblis tie ion kompreni, se sur ĉiu paĝo buntis ĉenoj de formuloj kaj terminoj kiel «feliĉatoroj», «entropiloj», «antibitoj», ENKODRA ([entropio de komput-diskutaj raci havaj aŭtomatoj](#)), kaj sub multepromesanta titolo «ekspedicioj en profundon de la luzana scienco» troviĝis tute malklara por mi teksto pri organizado de inspertizo en duonvivaj grupoj kun eksterkosma provizado. Poste evidentiĝis, ke ĉio ĉi havis tute realan sencon, sed antaŭ ol mi atingis ĝin, mi elturmentiĝis kaj ekkoleris, – en tiu nokto mi staris antaŭ amaso da ĵetitaj flanken libroj kaj rigardis al longaj vicoj de ankoraŭ ne tuŝitaj volumoj kun tia senespera kolero, kiel homo, kiu nepre devas ensalti en trajnon dum ĝi rapide veturas, sed kiu samtempe bone komprenas, ke povas rompi sian kolon. Mian manon tiris malsupren peza volumo de «Luzana-kurdlanda vortaro», kaj mi sentis tenton frapĵetegi ĝin sur la plankon – tio donus al mi nemalgrandan faciliĝon, ja mi laŭ la naturo estas kolerikulo; sed mi retenis min kaj anstataŭ la libro prenis starintan en la angulo malnovan kroĉilaron por ĉapo, kaj poste, kiel per ramo, batis per ĝi grandan ŝrankon kun dokumentoj, sciante, ke ĝiaj pordoj estas kverkaj, kaj, sekve, fortikaj. La kroĉilaro, tamen, fendiĝis, sed mi starigis ĝin tiel, ke la rompita kroĉilo estis almetita al la muro, kaj la difekto ne estis rimarkebla. Iu diros, ke pri tiuj miaj noktaj frenezaĵoj mi povus silenti, ja ili ne bone karakterizas

kaj miajn nervojn, kaj mian komprenemon, sed mi opinias, ke tiaj riproĉoj estus tute malpravaj, ĉar vojoj, kondukantaj nin al ekkono, ne estas tute egalaj por la rezulto de la ekkono.

La detruo de la kroĉilaro influis min bonege. Pacigita mi denove komencis serĉi librojn por lego, paŝante inter bretoj kaj elektante tion, kio trafis al miaj okuloj, kvankam ankaŭ tiu metodo ne estis tre racia; mi tro malfrue komprenis, ke mi elektas librojn pli belajn, en luksaj bindaĵoj, sed oni nur akceptas laŭ vizaĝo. Tio estis, bedaŭrinde, precipe libroj por spertaj luzanistoj, kaj ili povis malesperigi, ja mi ricevis tion, kion mi volis – mi trinkis rekte el la fonto, la trezorejo de scioj pri Entio estis en mia plena dispono, kaj mi ne sciis, kion fari kun tiu riĉo. Mi eĉ pensis, ĉu mi veku telefone la konsilianon kaj petu de li konsilon, sed hontis pri tiu penso; viŝinte ŝviton de la frunto kaj polvon de la malpuriĝintaj manoj, mi impetis al nova ofensivo. Tamen mi iĝis pli modera kaj elektis «Enkondukon en epistemologian drenadon», ĉar eksentis, ke tie ne estos eĉ unu vorto pri grundo kaj mineralaj sterkoj. Ĝuste tiel estis. Mi eksciis, ke en la XX-a jarcento Luzanion skuis terura krizo, kaŭzita de memobskuriĝo de la scienco. Sciencistoj ĉiam pli ofte konvinkiĝadis, ke la esplorata fenomeno certe estas jam de iu detale esplorita, ne estas nur sciate, kiel trovi tiun esploron. Kvanto de sciencaj fakoj kreskis en geometria progresio, kaj la ĉefa difekto de komputiloj – kaj nun jam estis konstruataj megatunaj komputiloj – iĝis persista informa konstipo. Estis kalkulite, ke post nur kvindek jaroj en universitatoj restos nur komputiloj-serĉistoj, kiuj fosados en mikroprocesoroj kaj pensistoroj de la tuta planedo, por ekscii, KIE, en kiu angulo de kiu maŝina memoro konserviĝas informoj, havantaj decidan valoron por farataj esploroj. Plenigante jarcentajn blankaĵojn, kun freneza rapido evoluis ignorantiko, tio estas scienco pri tio, kion la scienco ĉi-momente ne scias, la fako, kiun ĝis la lasta tempo oni neglektis kaj eĉ tute ĝin ignoris ([pri ignorado de nescio okupiĝis kvankam parenca, sed tute memstara fako, nome ignorantistiko](#)). Ja tiu, kiu precize scias, kion li ne scias, jam tre multe scias pri la estonta scio, kaj per tiu flanko la ignorantiko limis futurologion. La vojistoj estis mezurantaj longon de vojo, kiun devas trairi serĉa impulso, por trafi al la serĉata informo, kaj tiu vojo jam

estis tia, ke valoran trovaĵon averaĝe necesis atendi dum duonjaro, kvankam la impulso moviĝis kun la lumrapido. Se vojo de vagado tra la labirinto de akumulitaj sciencaj riĉaĵoj kreskus kun sama rapido, do la sekva generacio de fakuloj devus atendi de dek kvin ĝis dek ses jarojn, antaŭ ol lumrapida aro de signaloj-spurhundoj sukcesos kompili plenan bibliografion por intencita esploro. Sed, kiel diris nia Ejnŝtejno, oni gratas nur tie, kie jukas; tial unue aperis ekspertoj pri serĉmatematiko, kaj poste – tiel nomataj inspertoj, ĉar necesis krei teorion de kovritaj malkovroj, tio estas malkovroj, ŝirmitaj de aliaj malkovroj. Tial aperis Ĝenerala Ariadnologio ([General Ariadnology](#)) kaj komenciĝis la Epoko de Ekspedicioj en Internon de la Scienco. Ĝuste tiuj, kiuj planis tiujn ekspediciojn, nomiĝis inspertoj. Tio iomete helpis, sed ne por longe: ja ankaŭ inspertoj estas sciencistoj, kaj ili tuj komencis elabori teorion de inspertizo, inklude tiajn ĝiajn fakojn, kiel labirintiko, labirintistiko ([kaj inter ili estas sama diferenco, kiel inter statiko kaj statistiko](#)), ĉirkaŭa kaj rekta labirintografio, kaj ankaŭ labirinto-labirintiko. La lasta estas nenio alia, ol eksterkosma ariadnistiko, fako laŭdire neordinare interesa, ĉar ĝi traktas la ekzistantan Universon kiel ion similan al eta breto en grandega biblioteko; kaj tio, ke tia biblioteko ne povas ekzisti reale, tute ne gravas, ja teoriistojn ne interesas banalaj fizikaj limoj, kiujn la mondo aplikas al la Pensa Insperimento, tio estas la Unua Memmanĝanta Profundiĝo de Ekkono. «La Unua», ĉar tiu terura ariadnistiko antaŭvidis tutan vicon de tiaj profundiĝoj ([serĉoj de datumoj, serĉoj de datumoj pri serĉoj de datumoj kaj tiel plu ĝis aroj kun senfina povumo](#)).

Interese, ĉu ne? Feliĉe, mi havis du paketojn kun pulvoro kontraŭ kapdoloro. Ariadnistiko postulis infinit-dimensian nemetrikon inform-entropian spacon, kaj ĉiuj jubilis, kiam oni sukcesis pruvi, ke tiu spaco estas plene kongrua al Dio, kiu almenaŭ tiamaniere estis komprenita en nocioj de logiko kune kun sia Ĉiopova Ĉioscio. Kaj ankoraŭ iĝis klare, ke la kreita mondo disiĝas de tiu kvazaŭdia spaco simile al eta veziko, kaj iĝas neniea rilate al ĝi, kaj alie eĉ ne povas esti. Tute neatenditajn konsekvencojn havis tiu fina matematikigo de la Dia esenco kiel de la sistemo de Ĉioscio, – certe, de sistemo tute abstrakta, ja tio ne estis bildo de Dio kiel persono, sed

topografie perfekta konverĝo de Liaj atributoj. Montriĝis krome, ke tiu infinit-dimensia spaco havas limojn, tamen en ĝi lokiĝas nenio reala, speciale ne la Universo. Estas nemalfacile konjekti, ke neniu ortodoksa religio akceptis tiun pruvon. Kvankam la transfinita spaco iĝis neordinare interesa objekto de sciencaj esploroj, tiuj per nenio riĉigis epistemologion, ĉar ĉi tie temis pri ĉioscia sistemo, tio estas sistemo, en kiu ne necesas serĉi ian ajn informon, kaj eĉ ne eblas. (Dirante naive simple, la ĉioscio estas samtempe kaj premiso kaj atributo de tiu mirinda kreaĵo de la abstrakta penso, kaj kun la reala Universo ĝi ne havas iujn ajn kontaktpunktojn.) Kvazaŭ vi, perdinte en via hejmo tekulereton, lanĉus ĝian serĉadon en tia skalo, ke kreus idealan sistemon de senerara trovado, kiu, certe, estas nenio alia, ol la sistemo de Trovado de Ĉio en la Mondo, kaj tial vi nenion povas respondi al la demando pri la kulereto pro ĝia evidenta trivialeco. Kaj trovistiko rilatas al serĉistiko proksimume same, kiel pura matematiko al la aplika. La divido de la ĝenerala ariadnologio al la praktika kaj la abstrakta malplibonigis la staton, ĉar ju pli potenca menson havis ariadnologo, des pli lin interesis ecoj de la Ĉiotrova Sistemo kaj des malpli – banala fosado en internaĵoj de la artefarita tutplaneda memoro, tiu ĥaosigita tenejo de scioj. Tial la krizo de la scienco ŝajnis nekuracebla, kaj tamen luzanoj liberiĝis de ĝi, ĝuste liberiĝis, sed ne superis sur la elektita de ili vojo; ili simple elverŝis el la kuvo akvon kun la infano, alivorte, ili sukcesis tute liberiĝi de la scienco mem – ĉiuokaze de la scienco en la formo, konata de ni.

Sur Entio dum jam pli ol cent jaroj estas neniam sciencistoj, estas nur civitanoj, kiuj lernas de instruistoj, kaj la instruistoj estas eĉ ne modernigitaj ciferaĵoj maŝinoj, sed lertonaj. Ekposedo de lertonologio kostis al mi ses sendormajn noktojn; mi spronadis mian kompatindan cerbon per tutaj litroj da kafo. Lertonaj estas logikaj elementoj, nevideblaj per nearmita okulo, ĉar ilia grandeco kompareblas kun grandaj molekuloj. Ilin produktas aliaj lertonaj – per metodo, simila al produktado de molekuloj de albumino en viva organismo; tamen, mi ne profundigu en teĥnikajn detalojn. Tiu revolucio estis treege dolora por luzaniaj sciencistoj, kaj tutaj sciencaj konsilioj mortigadis sin, kompreninte, ke verkado de magistraro kaj eĉ doktoraj disertacioj

jam ne plu havas eĉ etan sencon kaj ke eĉ la plej saĝa doktoriĝanto trafas en staton de homo, kiu penas per ŝtona hakilo produkti ŝtonan tranĉilon, kvankam maŝinoj jam produktas miloble pli bonajn tranĉilojn el hardita ŝtalo. Samtempe okazis tiel nomata abolo de empirio, kaj per tio likvido de ajnaj eksperimentoj, kaj laboratoriaj, kaj kampaj. Ne plu necesis fari eksperimentojn reale, ĉar speciala lertona sistemo povas plenumi ajnan eksperimenton *in abstracto* [22], kaj eĉ kun lumrapido, do ne necesas atendi, kiam kreskos iu kverkaro ĉe iu rivereto, por esplori ĝian influon al mikroklimato: tio, kio antaŭe okupus cent jarojn, lertonoj faros dum palpebruma momento. Tamen, palpebra momento por ili estas diable longa tempo, ja tio estas preskaŭ dekono de sekundo, kaj al ili sufiĉas milionono. Sed ankaŭ tiajn lertonizitajn eksperimentojn oni faradis nur komence, kvazaŭ inercie, laŭ kutimo, laŭ tradicio. Ja mikroklimaton oni ĉiam esploras kun ia celo, tial sufiĉas nur difini tiun celon, ne zorgante pri interŝtupaj etapoj; kaj okupiĝas pri tio la celistoj, kiuj antaŭe nomiĝis teleonomoj. Necesas rimarkigi, ke celo nun povas esti tute idiota: ekzemple, ke hodiaŭ estu verda pluvo, morgaŭ – citronkolora, kaj krome ilin ambaŭ akompanu ĉielarko, aŭ ke piĝamo per karesaj tuŝoj dormigu vin, kaj matene veku en difinita horo per delikata masaĝo, – kaj tuta industria ciklo, necesa por produkto de tiaj piĝamoj aŭ pluvoj, estos tuj aŭtomate ellaborita kaj realigita. Kaj tiu, kiu interesiĝas, kiel tio estas farata, aniĝu al poliversitato (*certe, lertonizita*), kie unue didaktoroj klarigos al li, kiaj demandoj havas sencon, ĉar al stultaj demandoj ne ekzistas saĝaj respondoj, kaj post fino de la kurso de demandologio li povos ekscii pri ĉio, kio lin interesas; sed tio tute ne estas profesio – pli ĝuste ŝatokupo. Demandoj kreas tiel nomatan piramidan hierarkion, aŭ, eble, hierarkian piramidon, mi ne memoras precize, kaj en tiu hierarkio ekzistas tiel nomata sojlo de Tjutikvokitok, nomata ankaŭ la supra limo, ĉar super tiu limo neniu jam kapablas kompreni demandon, nek respondon, – antaŭ ĉio tial, ke necesus la tutan vivon dediĉi al unusola demando kaj unu respondo, kaj eĉ tio ne sufiĉus, ĉar mensaj fortoj estingiĝas kun aĝo, kaj ĉi tie ili devus seninterrompe kreski dum minimume cent, aŭ eĉ mil jaroj. Tial la intereso mortas pli frue, ol bone demandos, kaj bone ekscios tion, kion li volis. Tamen el respondoj al demandoj, farataj sub

la bariero de Tjutikvocitok, eblas eltiri praktikan utilon, kaj tie estas nenio mirinda kaj nova, ĉar, kiel klarigas didaktoro TITIPIK 84931109 en la gvidlibro por elementaj lernejoj, por manĝi sekalan flanon, ne nepre necesas scii historion de apero de sekalo, nek metodojn de ĝia kreskigo, nek teorion kaj praktikon de panbakado, sed necesas nur enpiki dentojn en la flanon, kaj fino.

Do, la scienco ekfunebriĝis pri si mem, kio, tamen, malmulte tuŝis la luzanian publikon; tiu, kvankam ŝuldis al la scienco pro la disfloro de la civilizo, ĉiam pli mallaŭdadis la sciencistojn pro tiu disfloro, kaj, sekve, ĝisgorĝe satiĝis ankaŭ per la scienco; kaj nun, dankon al Dio, ŝajnis vero tio, ke neniu jam povos leviĝi super la kuncivitanoj kiel doktoriĝinta docento, kaj tio tre plaĉis al la simpla homo kun liaj demokratiaj moroj. La racion oni ne formetis en arkivon, sed fieri pri ĝi oni povis nur private, kiel pri pura kaj senlentuga haŭto, kiu, kiel sciate, donas neniam sociajn privilegiojn. Dezirantoj, certe, povis okupiĝi pri scienco malnovmaniere, tio estis senmalutila hobia kiel konstruado de palacoj el alumetskatoloj aŭ lanĉado de kajtoj. Ŝajne ankaŭ hodiaŭ en Luzanio estas sufiĉe da stranguloj, kiuj kun entuziasmo fordonas sin al tiu infaneca, laŭesence, okupo kun malkaŝa espero malkovri ion tian, kio metos finon al ĉiu ĉi lertoniko, sed tio estas neplenumebaj revoj de malfeliĉuloj, kiuj pro malbona sorto naskiĝis ne en antikva tempo, kiam ili, probable, iĝus lokaj Neŭtonoj aŭ Darvinoj.

Ĝuste de la abolo de la tradicia scienco komenciĝis en Luzaniaj Nereduktitaj Ŝtatoj kreado de la sintezita kulturo, aŭ sinturo. Tamen, ĉi tie opinioj de historiistoj disiras. ([La historiistoj plu restas homoj, tio estas, mi volas diri, entianoj; ĉar la sciencojn pri kulturo kaj socio oni ne sukcesis aŭtomatizi, kaj ne tial, ke ili estas nekredeble komplikaj, male: ili estas tiom kontraŭdiraj kaj nelogikaj, en ili estas tiom da arbitraj elpenaĵoj, pri kiuj fieras sciencaj skoloj, ke ne eblas komisi ilin al logikaj sistemoj, – ili reagis al tio per informa konstipo aŭ per alerga ekzantemo.](#)) Unuj, ekzemple, Kiutc, asertas, ke la sinturo estis kreita por protezado de la natura kulturo, kiun ĝismorte frakasis ĉies bonfarto; saman opinion havas tuta vico da sinturologoj. Sed aliaj, speciale Kviksikoks, opinias, ke la afero okazis same, kiel

kun la aero kaj la vakuo: lertonoj penetris ĉien, kien povis penetri, tio estas en ĉiujn malplenajn lokojn. La indikitaj aŭtoroj nomas tion natura gradiento de evoluo de la natura loĝata medio; simple dirante, la kulturo, same kiel la naturo, ne toleras vakuon; kaj kiam detruigis sociaj ligoj, bonaj moroj, centjaraj barieroj de religiaj kaj juraj malpermesoj, kaj ĉiu povis tuj ricevi ĉion, kion li deziris, – nur unusola deziro konservis sencon: fari al proksimulo tion, kio estas por li malagrable kaj eĉ terura, ĉar la proksimulo rezistis, kaj rezisto estas la plej pikanta spico kaj eĉ la ĉefa delikataĵo tie, kie posedo de ĉiuj varoj kaj servoj perdis tutan valoron. Kio facile riceveblas, valoras malmulte. Se vi havas dek ok kostumojn, eble, estas agrable ĉiutage ŝanĝadi ilin, sed se vi havas dek milionojn da ili, tio donas nenion, krom zorgoj. Nur al etaj infanoj ŝajnas, ke estus bonege loĝi sur monto el pura ĉokolado. Satiĝo finiĝas per doloro en la stomako. Tiel sur pinto de ĉies bonfarto renaskiĝis stato de ĉies danĝero: kia estas ĝojo havi ĉion kaj ĝui tion, se en ajna minuto vi povas ricevi bastonbaton al la kapo aŭ trafi en kelon de ulo, kiu trovas ĝuon en kiel eble plej fajna torturado? La lertonoj reagis al tiuj ŝanĝoj ([ĉar la polico estis tre frue lertonizita](#)); ĝuste tiam la sinturo transprenis al si zorgo-defendajn funkciojn, kaj poste – patronadon super ĉiuj vivantoj.

Mi devas agnoski, ke tiu demando – pri la radikoj de la sinturo – ŝajnis al mi la plej neordinara el ĉio, kion mi sukcesis tralegi. Verŝajne ([se juĝi laŭ la historia sperto de luzanoj](#)), kiam en la loĝata medio aperas embrioj de racio, kiam tiun racion oni transplantas el la kapoj en maŝinojn, kaj de la maŝinoj, kiel iam de mamutoj kaj primitivaj reptilioj, ĝin heredas molekuloj, kaj tiuj molekuloj, perfektigante novajn generaciojn de racihavaj molekuloj, superas tiel nomatan sojlon de Skvark, alivorte la denseco de ilia intelekto tiom superas la densecon de la homa cerbo, ke en sablero povas lokiĝi mensa potencialo ne de iu docento, sed de tutaj fakultatoj kun iliaj sciencaj konsilioj, – tiam eĉ la diablo mem ne komprenos, kiu kiun regas: ĉu la homoj la lertonojn aŭ la lertonoj la homojn. Kaj temas ĉi tie tute ne pri la fifama ribelo de maŝinoj, ne pri revolucioj de robotoj, per kiuj tre antaŭlonge, kiam en modo estis futurologio por popolamasoj, timigadis nin malkleraj ĵurnalistoj, sed pri procezo

de tute alia speco kaj valoro. Lertonoj ribelas precize same, kiel tritiko, kreskanta en kampo, aŭ mikroboj sur agaragara membrano. Ili ĝuste plenumas tion, kio estis al ili komisiita, sed faras tion ĉiam pli kaj pli bone, kaj finfine komencas fari tion tiel mirinde, kiel neniu povis eĉ imagi en la komenco mem. Kaj ja delonge estas sciata, ke preciza plano de homo, kaj samtempe de la konstrua entrepreno, kiu plenumos tiun planon, troviĝas en nevidebla por okulo kapeto de spermatozoo, sed neniu opiniis ebla, ke el tio eblas eltiri industrian licencon por molekuligo de la racio, – kvankam ĉiu abituriento ŝajne sciis, ke lia cerbo, antaŭ ol aperi al la mondo, tuta lokiĝis en nekredeble malgranda ero de patra spermo. Kaj tio ja signifis, ke iam tiun teĥnologion eblos uzi en sama amasa skalo, en kiu nukleoj produktas miliardojn kaj miliardojn da ĉeloj, sen ajna inspektado, planado, sen fabrikoj, projektaj burooj, sen laboristoj kaj inĝenieroj, kaj tiel plu. Kaj des pli neniu kredis, ke iaj lertonoj superos homojn – ne per minacoj kaj per fortoj, sed tiel, kiel scienca konsilio, konsistanta el duoblaj profesoroj, superas etulon en mallongaj kalsonetoj. Tiu eĉ ne komprenos ilian kolektivan saĝecon, kiel ajn li penu. Kaj eĉ se li estas princo kaj povas ordoni al la konsilio, kaj la konsilio diligente plenumas liajn kapricojn, tutegale la rezultoj estos malsamaj, ol liaj knabaj atendoj, – ekzemple, se li ekdezirus flugi. Certe, li flugos, sed ne fabelmaniere, kiel li, sendube, imagis, ne sur fluganta tapiŝo, sed sur io simila al aeroplano, balono aŭ raketo, ĉar eĉ la plej alta saĝo en la mondo kapablas realigi nur tion, kio estas ebla en la reala mondo. Kaj kvankam la revoj de tiu nazmukulo plenumiĝos, ilia plenumiĝo ĉiufoje estos por li neatenditaĵo. Eble, finfine la saĝuloj sukcesus ekspliki al li, kial ili iris al la celo laŭ ne tiu vojo, kiun li montris al ili, ja la etulo kreskos kaj povos lerni de ili; sed la loĝata medio, kiu estas pli saĝa, ol ĝiaj loĝantoj, ne povas ekspliki al ili tion, kion ili ne komprenos, ja ili – ni diru finfine rekte – estas tro stultaj por tio. Tiuj foraj konsekvencoj de la evoluo de cifroniko, kies krono iĝis lertoniko, treege dolore ofendas la raci havajn estaĵojn. Kion fari! Kion ili deziris, tion ili ricevis. Sed ne tion, kion ili pro naiveco timis, – malobeon, ribelon de ŝtalaj monstroj, sovaĝiĝintaj kaj potencavidaj komputiranoj, – sed nur molekulan ekstrakton de la racio, transmetitan el la kapo en la medion kaj milobligitan dumvoje, racion, kiu kondutas precize same,

kiel tritika kampo aŭ spermatozooj. Ĝi ne estas individuo, kaj se aperintaj dum la batalo por ekzistado cerealoj, amebaj aŭ katoj zorgas pri memkonservado, tio estas pri si mem, kaj al la homoj servas nur nerekte, tritiko – kiel nutraĵo, katoj – por amuzo, do la lertonizita medio zorgas antaŭ ĉio pri la homoj, kaj pri si – en la plej minimuma grado, ja se ĝi ne zorgus pri si, ĝi baldaŭ ĉesus ekzisti, simple detruigus.

Ĉu eblas regi evoluon de la lertonoj? Eblas, certe eblas, sed ne pure arbitre, ne laŭ ajna kaprico, same kiel eblas kreskigi diversajn specojn de tritiko, vintra aŭ somera, sed ne eblas fari tiel, ke el spikoj falu melonoj. Kaj kun la lertonoj aperas ankoraŭ unu malfacilaĵo: ilia evoluo dependas de miproj ([mikroprogramaj aparatoj](#)), kaj la miproj de kodokodoj ([koherente dozataj kodoj](#)), kaj la kodokodoj – de mi jam ne memoras kio. Unufoje startigita procezo ĝis certa, ne sciata anticipe grado evoluas memstare, kvazaŭ veturiganta homon jungaĵo de ĉevaloj, kiuj obeas gvidrimenojn kaj knuton kaj ne obstinas, sed ili kuras ĉiam pli kaj pli rapide tra ĉiam malpli kaj malpli konataj al ni lokoj, – nur kun tiu diferenco, ke ĉevalojn tamen eblas turni, sed la civilizon – apenaŭ.

Alivorte: principe eblus, certe, – kaj la luzanoj povus – rezigni de la lertonoj, reveni al la natura medio, sed tio iĝus por ili katastrofo, kies amplekson ne eblas antaŭdiri, katastrofo pli terura, ol se sur la Tero oni eksplodigus ĉiujn elektrejojn, forbruligus bibliotekojn, dispelus inĝenierojn, sciencistojn kaj kuracistojn, – ĉu necesas priskribi konsekvencojn de tia reveno al la Naturo?

\* \* \*

Tage mi dormadis, kaj dum noktoj sidadis en la arkivoj de MEA. Mi tie tute nemalbone aranĝis min. En la skribotablo mi tenis kafkuirilon, sukeron, sapon, viŝilon, tason, nur la kulereto ien malaperis, do kafon mi devis kirli per tenilo de dentobroso, – mi ĉiam forgesadis alporti novan kulereton, bombardata per amaso da faktoj, kiujn mi eĉ ne penis ordigi; sed mi rimarkis, ke pri abstraktaĵoj de Entio mi jam eble ion scias, sed pri ordinaraj aferoj mi, kiel antaŭe, scias nenion, ĉar luzaniaj historiistoj kontraŭis al la

kurdlandaj, kaj inverse. Mi sidis en la centro mem de granda urbo, sed sentis min kiel Robinson Crusoe sur neloĝata insulo. Dum du tagoj mi studis anatomion kaj mitografion de kurdlo. Ĝi havas egajn flosajn balgojn ambaŭflanke de la pulmoj, kaj tiu, kiun kurdlo misglutos, povas trafi en ilin. Tie, laŭ asertoj, loko sufiĉas por tridek grandaj uloj ĉe ĉiu flanko. Oni diras, ke iam kurdlojn oni dresis kaj uzis en militoj, kiel elefantojn. Kelkaj ĉlakaj triboj opiniis vulkanojn senkruraj kurdloj; eble ĝuste de tie devenis la legendoj pri pirosaŭroj – ja vulkanoj fumas. Estas interese, ke eĉ en lernolibroj pri anatomio tie kaj tie renkonteblis ditiramboj al la Prezidanto, kaj tuj post ili – diatriboj kontraŭ la luzanoj. La mitografio estas pli interesa. Al nia sankta Gralo estis respektiva la sankta kurdlo, kaj unuaj kosmogonioj de ĉlako baziĝis sur tio, ke la kosmo estas aranĝita laŭ modelo de superkurdlo, aŭ superdlo. La pontifiko, sendanta preĝojn al ĝi, havis rangon de kurdinalo. Tie estis ankaŭ multe da nekomprenebla. Paladinojn, kiuj foriradis por serĉado de la sankta kurdlo, oni nomis stomakuloj. Sed ili ja ne serĉis kurdlon, sidante en ĝia stomako? Tamen, ĉu indas aliri mitologian pensadon kun ordinara mezuriloj? Mi trovis eĉ amason da receptoj de kuirado de fritita flamurdlo, aŭ friturdlo. Aliflanke, preskaŭ certe neniam flamurdloj ekzistis entute. Aŭ ĉi tie ni havas religian metafizikon?

Bindaĵojn de jam trarigarditaj libroj mi markadis per kreto, por ne reveni al ili. Al mi jam sen tio ŝajnis, ke mi dronas en ĉiaspecaj stultaĵoj kaj malgravaĵoj. Longajn kruojn de la marĉaj monstroj duonuloj nomis ne ekstremaĵoj, sed ekscesaĵoj. Iam ekzistis sekto de kaŭditoj, aŭ vostistoj, kiuj mezuradis longon de la kurdla vosto kaj aŭguradis laŭ ĝi, kiom sukcesa estos ĉasado. Io de tiu tradicio konserviĝis, ĉar ĝis nun oni atribuas sciencan rangon de doktoro *honoris caudae* <sup>[23]</sup>. Sed, finfine, tio povis esti simple preseraro. La Prezidanto, kiel asertas liaj apologiantoj, detronigis la kurdlon de la ĉielo sur la teron enkadre de laikigo de la kulturo, per tio farinte ĝin atingebla por siaj sampatrujanoj. Ĉar vulkanojn oni opiniis senkruraj kurdloj, elŝirado de kruoj signifis sanktigon. Komprenu tion, kiu povas. Luzanaj agentoj, transvestitaj kiel ĉlako ([tiel nomataj pseŭdoduonuloj](#)), onidire ŝtelpenetras en loĝatajn kurdlojn. Tiuj maliculoj iam sukcesas provoki perturbojn inter uloj, ekzilitaj en la

malantaŭajn regionojn de urbosaŭro (postaĵloĝantoj); tio estas nefidinda kaj postrestanta elemento, pro sia loĝloko. Speciale malklara estas demando pri frenezo de kurdloj: luzanoj klarigadis ĝin per politikaj tumultoj, kaj kurdlandaj oficialaj fontoj – per sabotado. Mi longe ne povis kompreni tutan tiun kaŝon, ĉar mi ne konis la politikan doktrinon de ĉlako, kaj ne konis mi ĝin tial, ke iu kreteno-bibliotekisto metis la tutan sekcion «Naciomobilismo» kune kun «Aŭtomobilismo» – en la rubrikon «Urba Transporto kaj Komunikado», dum mi serĉadis ĝin en la rubrikoj «Doktrinoj Politikaj», «Politikaj Doktrinoj», «Ideologioj» kaj tiel plu. La necesan breton mi trafis tute hazarde, kiam mi bezonis pezan kaj dikan volumon kiel premilon: la afero estas en tio, ke por plia oportuno mi foje demetadis la pantalonon kaj rimarkis, ke ili estas tre ĉifitaj, kaj veni en la Ministrejon kun gladilo estus iel ĝene.

Tute ne la Prezidanto proponis la ideon de naciomobilismo, aŭ ŝtatmoviĝado, sed socia aganto de la XVIII-a jarcento Ksarbargsar, kiu priskribis idealan ŝtaton kiel Universalan Interplektiĝon de Feliĉuloj, mallonge UIF (tiu pensulo havis netolereblan kutimon mallongigi proponitajn de li terminojn, tiel ke finfine mi devis preni paperpecon por skribi ĉiujn ĉi mallongigojn, alie mia kapo vertiĝis). Pri praktika realigo de sia teorio Ksarbargsar interesiĝis tre malmulte, absorbita de benitaj revoj pri Paradizo sur Entio, kaj nur lia kuzo Gagagaks malkovris ekvivalentecon de la ideala ŝtato kaj la ideala kurdlo. En du vortoj tiu ideo konsistis en sintezo de kontraŭaĵoj – de la Naturo kaj de la Kulturo; la ĉlako estis kreita per fortoj de la Naturo kaj tial nur en la sino de la Naturo ĝi povas farti vere bone; tamen ankaŭ kulturo estas same necesa al li, alie li nemulte diferencas de animaloj. Kaj ĉar la kurdlo, estante mem animalo, ekster ajna dubo estas nedisigebla parto de la Naturo, do necesas nur kulturigi ĝin, tio estas loĝigi, transformi ĝian krudan Animalecon, sed ne ŝanĝante lian esencon. Mi pensas, ke mi ĝuste prezentas la pensojn de tiuj du elstaraj parencoj, de kiuj la Prezidanto prunteprenis sian bazan ideon. Ekstere natura, interne nobla, aŭ nobligita, kurdlo devis iĝi la baza ĉelo de la ŝtato ankoraŭ pro ekzisto de estiminda tradicio, nome ritoj, legendoj kaj mitoj, ligitaj kun megroj kaj ĉlako, kiun ilia Noa arkeo kaj tiel plu. Tamen la patroj

de naciomobilismo metis la aferon sur pli realan grundon, renversinte la kurdlon de la piedoj sur la kapon, pli ĝuste, ne la kurdlon mem, sed la rilatojn inter ĝi kaj la ĉlako. Antaŭe la kurdlo estis supera estaĵo, kaj la ĉlakoĵ adoradis lin kiel dion; tial necesis ĝin maldiigi, por ekde nun ĝi mem servu al la ĉlakoĵ. La rezulto de enradikigo de tiu ĉi ideo en la vivon estis ĝuste la urbomobiloj, kurdlocivitoj, urbopaŝteĵoj ([paŝteĵoj por urbosaŭroĵ](#)) kaj tiel plu. Aperis krome, kiel tio ordinare okazas, kiam alta ideo tuŝas malbelan realon, diversaj malfacilaĵoj, ne antaŭviditaj de la patroj de naciomobilismo, komencante de laksoj kaj ceteraj malsanoj de urbosaŭroĵ, kaj bretoj de tuta biblioteka ĉambro fleksiĝis sub pezo de volumoj, dediĉitaj al analizo de imanentaj kaj akcidentaj malavantaĝoj de ŝtatmoviĝado. Da tiuj verkoj estis tiom multe, ke mia dorso doloris kaj krakadis la spino nur pro sola trenado de ili supren-malsupren laŭ la biblioteka eskalo. Tamen, firme sekvante mian decidon esplori ĉion ĝis la fino mem, mi legadis plu.

Fajneco kaj inĝenieco de rezonadoj estis estimindaj, sed, kvankam mi eĉ unu fojon ne renkontis tiun vorton, mi ĉiam pli kaj pli multe sentis, ke loĝi en kurdlo estis maloportune; sed neniu kurdlanda teoriisto iam ajn dirus ion similan. Ili parolis pri provizoraj malfacilaĵoj, kaŭzitaĵ de nesufiĉa ventolado, pri malkontentiga kvalito de filtroj kaj odorkaptiloj, pri malsanoj de vertebraro, kaŭzitaĵ de neceso vivi kaŭre ([en kurdlo estas malfacile rektiĝi plenalte, speciale sur malaltaj rangoj](#)); sed pri tio, ke oni simple forlasu tiujn loĝatajn internaĵojn, neniu eĉ menciis. Tio, mi devas konfesi, nemalmulte min mirigis, – kia tia absoluta neceso devigis ilin tiel suferi? Respondoj al tiu neevitebla demando torentis kiel pluvo el ĉiuj verkoj, kiujn mi legis; oni diradis pri sintezo de naturo kaj kulturo, pri kunigo de tiuj kontraŭaj elementoj kaj orientiĝoj, kaj se mi intencus prezenti nur la plej gravajn argumentojn de la adeptoj de ŝtatmoviĝado, al mi ne sufiĉus papero. Eble, pensis mi, ili tiom kutimiĝis, ke ne povas alie; aliflanke, kutimo iel ne konformas kun tiom nelacigebla propaganda impeto.

Decidinte finfine, ke tiun aliplanedan enigmon mi ne povas solvi, mi rezignis de plua legado en la ĉambro de klasikuloj. Al la

Prezidanto estis destinita la tuta sekva ĉambro, sed mi nur rigardis tien kaj tuj rezignis. Estis ankoraŭ tria ĉambro, de tiel nomataj Elĵetuloj, aŭ Ĉefherezuloj de kurdismo; la ĉefa el ili estis ekzekutita pro siaj konvinkoj saĝulo, kies nomon la oratoroj ne menciis, sed nomis lin aŭ Fiega Inpatro, aŭ Inega Fipatro. Mi foliumis lian ĉefan verkon en la sekcio de malpermesita literaturo kaj danke al tio eksciis du aferojn. Unue, la nomo de tiu herezulo transskribeblis en neniun teran lingvon, tial en la katalogoj li estis menciata kiel Kinderlos, Sansenfants aŭ Seninfanulo, kio laŭdire transdonis sencon, kiun havis lia kurdlanda kromnomo. Due, en la herezo, kiun li predikis, mi ne sukcesis rimarki ion ajn teruran kaj eĉ speciale originalan. Simple li proponis ke nokte oni dormu en kurdlo, kaj tage eliru eksteren, okupiĝante pri tio, kion ĉiu deziras, kaj ĝuste tio profunde indignigis la ortodoksajn kurdlistojn. Mi tute ne povas kompreni, kial tiu banala penso tiom terurigis ilin.

Moviĝante laŭ bretoj, mi atingis librojn por lerneja legado. En ili estis edifaj historioj pri tio, kiel en praaĵ tempoj pseŭdoduonuloj, tio estas luzanaj agentoj, por trompi praduonulojn en iliaj urbomobiloj, semadis kalumniajn elpensaĵojn kaj faradis sabotajn konversaciojn; ekzemple, ili propagandis inversismon, alivorte proponadis turni kurdlon tiel, ke la vosto iĝu surloke de la kapo, kaj inverse. Ili kalkulis, ke, se ili sukcesos persvadi pri tio la kurdlamantajn loĝantojn, komenciĝos kaoso kaj tumulto, kaj tiam ili vokos siajn malnoblajn samgentanojn, por per komunaj fortoj ataki la senorientigitan urbomobilon. Elpelinte la leĝajn loĝantojn por neevitebla morto sub meteora grajlo (ja ĉio ĉi okazis en la epoko de megroj), luzanoj okupus ilian lokon, komforte ekloĝinte en la rekvizita kurdlo. Sed ĉiam troviĝadis heroo, kiu ĉesigis tiujn fiintencojn jam embrie. Speciale enmemoriĝis al mi la historio pri kuraĝa knabo, kiu sole venkis bandon de fiuloj; li sentime enrampis en la gorĝon de la kurdlo kaj komencis juki ĝian palaton, ĝis ĝi, finfine, faligis sur kaŝiĝintajn fremdulojn gastran diluvon. Porinfanaj libroj vokis la infanaron konservi observemon rilate al vagantaj provokantoj, kiuj penas disigi dormantan aŭ enpensiĝintan kurdlon de la grego aŭ uzas incendiajn eskalojn por serĉi ĝiajn jukeblajn

lokojn, ĉar la giganto, seninterrompe jukata, emas al grandaj internaj renversoj.

Cetere, en verkoj de luzanaj fakuloj pri lerneja edukado mi legis, ke la kaŭzoj de tiel nomataj renversoj estas tute ne politikaj. Malicurdlo ne estas kurdlo, inversigita fare de sabotuloj, sed urbomobilo, kies loĝantoj amase faras brandon, kaj pro sia ebriiĝemo venenas la animalon, ĝis tiu ricevas ebri-deliron kaj komencas ataki ceterajn kurdlojn. Ĉar ebrieco estas vera socia plago de Kurdlando, pri kio, tamen, la libroj por lernejoj silentas. Cetere, en kurdloj mem onidire cirkulas flugfolioj, en kiuj oni asertas, ke urbomobiloj konflikta inter si pro nutraĵo, kaj kurdlestroj kune kun siaj familioj kaj proksimuloj aranĝas kaŝajn orgiojn, freneze dancante interne de malfeliĉaj malfortkruraj maljunaj kurdloj, kaj plurajn ili jam dancmortigis. Tiu oficiale malpermesita danco nomiĝas kurdaŝo. Fonto de tiaspecaj sensacioj estas ordinare postaĵloĝantoj, kaj ĝuste al ili referencas luzanaj kurdlistoj el la Instituto de Teorio de Ŝtato, asertante, ke ĉlako estas nur parazito de kurdloj, kaj pri ia simbiozo de la unuaj kun la duaj tute ne eblas diri. De vagado praduonuloj transiris al peripatetismo, de la peripatetismo al praparazitismo, kaj de ĝi al ordinara formoj de paraziteco. Strange, tiuj ekspertoj malsamopiniis pri la demando pri tio, ĉu kurdlo estas vivaj aŭ malvivaj. Laŭ opinio de kelkaj, ĉi tie okazis historio, simila al tiu, kiu estas priskribita de barono Münchhausen, kiam lupo saltis al ĉevalo, jungita al sledo, enronĝiĝis en ĝin de malantaŭe, tramanĝis ĝin tute, mem trafis la jungilaron kaj ekkuris laŭ la vojo jam mem tirante la sledon. Ĝuste tiel, laŭ ilia opinio, faris ĉlako kun kurdloj. De la gigantoj, poiome formanĝitaj el interne, restis nur malmulto, ne pli ol skeleto kaj grandega felo kun blenditaj vertebraj diskoj, kaj aktivuloj alterne movas tiun putraĵon, aŭ simple dirante – tiun kadavron, pri kio, tamen, estas malpermesite mencii, por ne ĉagreni la Prezidanton. La Prezidanto firme kredas bonegan sanon kaj junulecan viglon de la urbosaŭroj, des pli ke li mem loĝas ne en kurdlo, sed en tute ordinara rezidejo, ĉirkaŭita de belega parko, kaj pri la interna stato en kurdloj ekscias el la registara gazetaro.

Tamen, luzana psiĥosociologo Tjurtirrkarr opinias, ke la ideo de naciomobilismo estas viva, kvankam la kurdloj mortis, ĉar la kredo, kiel estas sciata, povas movi montojn, kaj des pli kadavrojn. Tio estas, certe, trompo, sed la loĝantaro akceptas ĝin hurae, kaj ne mirinde. Ja ili enrampis en tiujn estaĵojn, saviĝante de la megroj, por memkonservado, sed ne pro ideologiaj kaŭzoj, kaj konscio de sia subigita stato sur la planedo ilin subpremis. Simple dirante, ili abomenis tian vivon, speciale se oni atentis, ke neniu sur Entio aprobas parazitecon. Kiu sur la Tero asertus, ke vivmaniero de puloj kaj soliteroj estas la plej alta formo de sociigo? Sed ĝuste la Prezidanto, unuiginte la teorion de ideala kurdlo kun tradiciaj legendoj, kaj kun nerezoneble misformitaj epizodoj de la historio de la civilizo kaj evoluo, kontentigis politikajn ambiciojn de ĉlako, emfazante en siaj verkoj ilian abnegacian kaj tial altan vivmanieron, kondukantan rekte al hela estonteco.

Tia estas la opinio de la ekstrema koncepto, nomata mumiiga, aŭ kadavromobila. Tamen abundas aŭtoroj, kiuj havas multe pli moderajn opiniojn. Ili notas, ke de tempo al tempo urbosaŭroj senforte falas sur la teron, kion la kadavromobila hipotezo ne klarigas. Do, ili tamen estas vivaj, kvankam, eble, apenaŭ spiras, sed foje tamen ankaŭ muĝas – dum tiel nomataj popolaj muĝifestacioj, kiuj okazas dum ŝtataj festoj. Koncerne ilian sociordon, ĝi estas feŭda-kasta en anatomia senco. Staton de civitano determinas loko, kiu estas donita al li en kurdlo. Bedaŭrinde, ekzistas ankaŭ aliaj vidpunktoj, sed mi simple ne havas fortojn por prezenti ilin ĉiujn; kaj tutege ne eblus taksi verecon de ĉiu el ili. Mi jam intencis adiaŭi tiun sekcion de la biblioteko, kiam mi subite trafis amason da broŝuroj kaj gazetoj, faligitaj en angulo inter du ŝrankoj. Ŝajne ili estis destinitaj por forĵeto. Tiam mi estis vere konsternita: ili ĉiuj, kvankam estis luzanaj, kantis ditirambojn al naciomobilismo. Ternante pro polvo, mi tamen ekkaŭris super tiu amaso, rigardante jen raportaĵojn, jen versaĵojn, poemojn kaj dramojn, prikantantajn ĉarmon de vivo en urbosaŭroj, kie ĉiuj konas ĉiujn, kie estas nenia fremdiĝo, disiĝo kaj lertona observado, kie ĉiuj nomas ĉiujn per antaŭnomo kaj ĉies koro batas unisone kun la koro de tiu bonkora, mirinda estaĵo, kiu, eksciinte proksime gustojn de siaj

loĝantoj, elektas sur paŝtejoj herbojn kaj berojn, kapablajn doni al ili specialan ĝuon. En tiu ĉi amaso mi trovis tutajn kolektojn de revuoj «Ĉarmoj de kurdlo» kaj «En kurdla silento», kantaron, el kiu al mi enmemoriĝis kanto «Ho, glutulo, ho glutul'», kaj ankaŭ libreto de opero «Kurdelio». Tamen troveblis ankaŭ broŝuroj de diametre kontraŭa enhavo, en kiuj la ventro de kurdlo estis komparata kun geheno, kaj en unu pamfleto oni eĉ asertis, ke antaŭ miliono da jaroj sur Entio elŝipiĝis iuj praastronaŭtoj kaj loĝigis sur transkotejojn paron de pirosaŭroj, kaj tiu generis tutajn fiodorantajn gregojn, kiu diversio havis celon deflankigi Ention for de la deca evoluvojo. Tio, bedaŭrinde, estis sukcesa, ĉar la aĉaj monstroj glutis ne nur ĉlakojn, sed ankaŭ luzanojn, almenaŭ spirite, ĉar iliaj kapoj estas nun ŝtopitaj per la problemo de kurdlo, aŭ kurdliĝo kiel saviĝo.

El tio eblis konkludi, ke sur Entio nun ne estas aliaj zorgoj, krom unusola: «Ĉu esti aŭ ne esti en kurdlo». Sed mi decidis adiaŭi ĝin, kaj por longe. Min atendis ankoraŭ netuŝitaj vicoj de ŝrankoj kun regulaj kolumnoj de libroj, traktantaj pri pli altaj kaj komplikaj aferoj. Kiam mi transiris sojlon de la unua ĉambrego, la libraro de luzanistiko per sennombraj vicoj de siaj bindaĵoj ĵetis al mi defion, pro kiu miaj kruroj fleksiĝis. Nec Hercules kontraŭ plures – fulmis en mia kapo, sed mi tuj aldonis: *Sursum corda!* <sup>[24]</sup> Kun tiu penso mi impetis sola kontraŭ Entio – kontraŭ amasiĝantaj unu sur alia, kiel geologiaj tavoloj, spiritaj sedimentoj de la fremda mondo.

Neniam relativeco de la belo montriĝas tiom frape, kiel en renkontiĝo de du planedaj rasoj de malsama deveno. Profesoro Shimpanzer en sia «Kompara entropologio» citas sekretan raporton, kiun faris por siaj potenculoj entiaj monstrologoj, esplorinte multegajn terajn televidelsendojn. Speciale konsternis ilin la konkursoj por titolo «fraŭlino Universo». La homoj opinias la teran graviton enkarniĝo de la malbono, kaj lukton kontraŭ ĝi ili komisiis al strikte difinitaj korpopartoj. Pro nekompreneblaj kaŭzoj la virinoj devas demonstri sian partoprenon en tiu lukto konstante, kaj la viroj – nur de tempo al tempo. Probable, konscio de tia misproporcio kaŭzas protestojn de femaloj de homo sapiens, nomatajn movado por virina emancipado. Ĝiaj partoprenantoj demonstre rezignas porti sub

la vesto specialan jungilaron, kiu kontraŭas al gravita falo de la laktonutraj apendicoj, simbolantajn vivan aktivecon. La lukto de bustoj kontraŭ la gravitforto neeviteble finiĝas per ilia malvenko, pri kio la homoj devus scii anticipe, ĉar pro aĝo tensio de haŭtaj histoj malfortiĝas. Tamen la maskloj rifuzas al la venkitaj femaloj eĉ etan parton de tia adoro, per kiu ili ĉirkaŭigis ilin, dum la ŝajno de nedependo de la gravito estis konserviĝanta. Maljusteco de tiu kondutkodo estas des pli mirinda, ke, kiel jam estis dirite, la maskloj nur de tempo al tempo devas demonstri similan sendependecon, kaj nur dum tre mallonga tempo. De kie venis tiu rito, oni ne sukcesis klarigi. Plej probable, ĝi havas religian ([metafizikan](#)) bazon, kvankam ĉi tie ĉiuj teraj religioj silentas kiel mutaj, kio atestas kriptoreligian karakteron de la lukto de la supremenciitaj partoj de organismo kontraŭ la tera gravitforto. Solvi tiun enigmon malhelpas plurfunkcieco de organoj, destintaj por kontraŭgravita lukto, ĉar, pro unika, nevidita en tuta Galaksio kuniĝo de ekskreciaj kaj naskaj organoj de la teraj mamuloj, neniam estas ĝisfine klare, en kiu ĝuste rolo aktiviĝas tiuj organoj, ĉu private aŭ publike. Biologiaj komplikiĝoj, kondukintaj la anatomion de la homo al tia priplorinda stato, sendube trovas sian misformitan speguliĝon en lia kulturo kaj religio. Ĉiuokaze, identigo de malbono kun tero estas ekster ajnaj duboj; esti fine venkita de la gravito – signifas fali en kavon, nomatan tombo, tial mortintojn oni enterigas. En tiu ĉi tereno estas nepraj ritoj de kolektiva memtrompo: kvankam la teranoj, sen ajna dubo, scias pri putrado de kadavroj, al tio kontraŭas ĉiuj komplikaj agoj, farataj dum kaŝado de la mortinto for de rigardoj de aliuloj ([por tio oni uzas ujojn el lignaj materialoj, kaj por ke estu pli malfacile klarigi, kio okazas kun la enterigitaj korpoj, la lokon de enterigo oni kovras per pezaj konstruaĵoj el ŝtono, granito, kaj aliaj magmaĵoj](#)).

Tiaj nin vidas la entianoj, diras profesoro Shimpanzer, kaj ĉi tie ne eblas ion fari, ja ili juĝas pri ni, kiel blindulo pri koloro. Por ili estas nekompreneblaj ĉiuj nocioj, ligitaj kun erotiko, kun ties spirita kaj korpa flankoj, ĉar la naturo aranĝis ilian reproduktiĝon en maniero, tute malsama ol la tera. Ili ne havas eksterajn seksorganojn, ne pariĝas, ne kopulas, kaj eĉ la nocio de familio ne implicas ĉe ili biologian parencecon, ĉar fekundigo de ina ovo okazas per

polimiksio, aŭ, parolante en malpli scienca lingvaĵo, kun partopreno de minimume du viroj. Por kompreni, kiel la afero atingis tian staton, necesas turni sin al la komenco mem de evoluo de la vivo sur Entio, kaj profesoro Horace Gorilles, al kies fundamenta monografio «Vegeta prokreacio» referencas profesoro Shimpanzer ([li konstante citas Gorilles-on, preferante lin al aliaj entiologoj](#)), klare skizis tiun neordinaran por ni manieron de reproduktiĝo.

Antaŭ tri miliardoj da jaroj Entio aspektis en kosmo kiel pal-verda disko. Sed ne verdaj nuboj estis kovrantaj ĝian surfacon, sed trilionoj da insektoj multe malpli grandaj, ol kulo. Tiuj insektoj, ricevintaj nomon «verduletoj» ([Gorilles Viridans Ohrentangi L](#)), estis plenumantaj funkciojn de teraj algoj, ĉar ili havis kapablon de fotosintezo; ŝvebante ĉe la limo de la stratosfero, dum miliardo da jaroj ili saturis la atmosferon per oksigeno. Kaj ĉar, esprimante figure, tieaj paŝtejoj ŝvebis en la ĉielo, la evoluo de la superaĵoj same strebis supren, kaj jam komencante de unuaj reptilioj kaj rampuloj aperis flugantaj specioj, analogo de niaj herbomanĝuloj, kaj ju pli bone ili flugadis, des pli sukcese ili uzadis la nekalkuleblajn rezervojn de nutraĵo en la verdaj vivaj nuboj de Entio. Angiospermoj neniam aperis ĉi tie, kaj marĉaj kreskaĵoj anstataŭ klorofilon enhavas nekonatan sur la Tero spiran pigmenton, kiu disocias sulfidojn kaj sulfatojn, abunde delavatajn de vulkanaj altebenaĵoj al la koteano. Animaloj, adaptiĝintaj al tia sulfida nutraĵo, ne povis disvastiĝi sur la tuta planedo kaj iĝis katenitaj al marĉaj paŝtejoj, inklude la plej grandajn el ili – kurdlojn. Tiuj animaloj havis multege da parazitoj kaj simbiozulojn de «ĉiela» deveno, laŭ esprimo de profesoro Gorilles, ĉar grandnombraj specioj de verduletoj, perdante la verdan pigmenton, kaj kun ĝi nemalofte ankaŭ la flugiletojn, transiris al vianda nutraĵo, akompanante grandajn gregojn de reptilioj kaj ceteraj amfibioj, loĝantaj sur transkotejoj. La perspektivojn de evoluo de la vivo, kiel klarigas doktoro Achilles Paviani ([al kiu referencas Gorilles](#)), ĝenerale determinas la nutra piramido, alivorte tio, kiu kiun manĝas kaj de kiu, siavice, estas manĝata. Sulfidajn kreskaĵojn manĝadis la trarampuloj, la prerampuloj kaj ceteraj marĉaj estaĵoj kune kun la kurdloj; kaj ili mem estis nutraĵo por rabobestoj – rapidaj, viglaj, precipe saltantaj kaj tial dukruraj ([tre similaj al dukruraj teraj](#)

kanguru-similaj amfibioj de ĵurasio), kaj manĝado ordinare havis karakteron de ĉaskurado; tiaj gigantoj, kiel kurdloj, penis fuĝi de rabobestoj, plonĝante en marĉan koton, kaj ĉio cetera forkuradis de la dentegoj kaj ungegoj de la fulmorapidaj elronĝuloj, traronĝuloj kaj superronĝuloj, kiel ilin nomas Abraham Gibbon en sia «*Historia naturalis praedatorum Entianum* <sup>[25]</sup>».

Shimpanzer, Gorilles kaj Gibbon senrezerve akceptas la aserton de la entiaj biologoj, ke, kiel ajn tio estu ĉagrene, la Primatoj ĉiam kaj ĉie ŝuldas sian racion al tiel nomata trapaso de la stadio de rabobesteco. La afero estas en tio, ke por la herbomanĝantoj ekzistas nur la nuno, ĉar la manĝaĵon ili havas rekte antaŭ la nazo, kaj fino, tamen la rabobestoj laŭ sia naturo strebas estontecen, ja ili devas atendi ĉasaĵon, insidi ĝin, gvati, kaŝiri, persekuti, diveni ĉiujn ĝiajn artifikaĵojn, kaj tio des pli akcelas kreskon de inteligenteco, ju pli inteligenta estas la ĉasaĵo. La racio ekzistas nur latente, ĝi kvazaŭ dormas, dum sufiĉas ĉasaĵo; sed se ĝi malabundas, venas krizo, kaj tiu, kies kapo estas malplena, pereas pro malsato.

Kaj la vivkondiĉoj sur Entio estis ekskluzive komplikaj kaj danĝeraj; krom tio, ke dum vulkanaktivaj epokoj la varma altebenaĵo ĉiam iĝadis zono de morto, aldone la planedo, situanta en la konstelacio Taŭro, ofte suferadis pro teruraj radiaj batoj de Novaj steloj, kiuj ekflamadis en ĝi; la rezulto de tio ĉiufoje estis timiga ekstermo de animaloj kaj pereado de plejmulto de la atmosferaj verduletoj, sed samtempe – ankaŭ plirapidigita gena rekonstruado de la travivintaj specioj danke al mutacioj. Tio aspektis tiel, diras profesoro Paviani, kvazaŭ iu draŝis per draŝiloj en grenejo, plena je musoj; estas klare, ke saviĝos la plej inteligentaj kaj la plej rapidaj. Al niaj biologoj ŝajnis, klarigas profesoro Shimpanzer, ke decidu rolon en la antropogenezo ludis trapaso tra la arba stadio, aŭ, kiel mokas kelkaj, simiigo kaj malsimiigo de kelkaj primitivaj specioj, kiuj unue grimpis sur la arbojn, kie akiris lertecon de la manoj, rektan staturon kaj akran vidon, ĉar alie ne eblas transsalti de unu branĉo al alia, kaj poste, kiam pro glaciigo arbaroj forfrostiĝis, ili devis malleviĝi de la arba ĉielo sur la teron kaj okupiĝi pri serĉado de nutraĵo, kiu ne atendas pasive, kiam oni ĝin formanĝos, kiel pomo

aŭ banano. Sed traĥiro de la rabobesta stadio estas pli grava, ol traĥiro de la arba stadio; kiu surgrimpi sur la arbon estante plena idioto, ne plisaĝiĝos, malleviĝinte sur la teron. Sur Entio ne estis arbaroj, ne estis, kien grimpi, tial la primatoj tie devenis de grandaj plumhavuloj. Kaj okazis tiel pro tio, atentigas doktoro Shimpanson (ne miksu kun doktoro Shimpanzer!), ke grandaj entiaj plumhavuloj havis cerbon, ekskluzive grandan por plumhavuloj. Kaj tio, siavice, estis kaŭzita de tio, ke la verduletoj, kiuj spiras ne kiel animaloj, sed kiel vegetaĵoj, povas leviĝi tre alte – en la stratosferon, kie jam mankas oksigeno por pulmuloj; tial birdoj, kiuj manĝadis ilin, laŭvorte sufokiĝadis, leviĝante post fluganta manĝaĵo, kaj ĉar pro oksigena manko unuaj pereas la cerbaj nervaj ĉeloj, la natura selekto agis en la direkto de pligrandigo de kvanto de tiuj ĉeloj: se ili estis tre multaj, birdo povis resti viva eĉ kiam parto de la cerbo formortis. (La cerbaj ĉeloj, kiel estas sciite, ne regeneriĝas).

Tiamaniere, maso de la cerbo de entiaj plumhavuloj kreskis kaj iĝis io simila al superflua materialo, en kiu postaj eventoj bruligis – post milionoj da jaroj – la fajron de racio. Sed okazis tio, kiam plumhavuloj jam ĉesis flugi kaj kiel grandaj marĉaj neflugantaj birdoj okupiĝis pri ĉasado sur marĉaj malaltaĵoj. Ĝuste tial la entiano similas la homon nur kiam li staras senmove; se li komencas moviĝi, videblas, ke la krurojn li movas, kiel struto – ili fleksiĝas malantaŭen ĉe la genuoj, – kaj la kapon li povas turni je 180 gradoj; lia brusto estas barelforma, la ostoj de la brakoj estas grandaj kaj malplenaj interne, kaj sur la skeleto restis spuroj tiuloke, kie estis alkroĉitaj la flugilaj muskoloj. Liaj okuloj estas rondaj, la vizaĝo estas tre malagrabla por ni, ĉar anstataŭ nazo kaj buŝo meze de la vizaĝo li havas angulecan tuberon kun larĝe dismetitaj nazotruoj; tamen, tio tute ne estas nazotruoj, sed eliraj kanaloj de seksorganoj; kaj lia ventro kaj sino estas glataj, kiel de pupo; ne estante vivonaska mamulo, li havas nek umbilikon, nek eksterajn seksorganojn.

Al mi ne sufiĉis sano por ĝisfine tratiĝi tra la lernolibroj de Shimpanzer kaj Gorilles; anstataŭ klare diri, kio, kien, kiel, kial kaj por kio, ili plenigis milojn da paĝoj per populacia genetiko de la neflugantaj birdoj kaj praentianoj; feliĉe, mi trovis koncizan

organologian skizon de magistro Stenly Lemur, kaj mi sekvos ĝin. Verdire, Lemur estas sciencisto kun iom malpli alta rango, ol Orentang, Shimpanzer, Gorilles kaj ceteraj luzanistoj, li scias, eble, iom malpli, sed por mi tio tute sufiĉis. Li diras, ke ĉiuj superaĵoj de Entio reproduktiĝas kiel vegetaĵoj, sed ne tute, ĉar tion ili faras dum kurado. Plenrapida. Kaj tamen tiu reprodukta maniero nomendas vegeta, kuraĝe insistas S. Lemur, kvankam liaj oponantoj blasfemegas lin pro tro simpligita aliro. La entiaj plumhavuloj ne produktas ovojn. Ŝajne, la plej antikvaj arkeopterikoj produktis, sed por neflugantaj birdoj, trakurantaj ĉiutage kelkajn dekojn da mejloj, persekutante nutraĵon, ovonaskeco estus nur tre ĝena obstaklo. La embriojn, similajn pli al spongoj, ol al ovoj, la femalo portas sub la ventro en faltoj de la haŭto, iom simila al la sako de kanguruo. Tio ankoraŭ iel-tiel similas al la teraj kondiĉoj. Tamen la kopulacia ago mem havas nenion komunan kun ni. La femalo fekundiĝas per *orificia oviductales* [26], situantaj super la buŝa truo, kaj la maskloj anstataŭ koloida spermo produktas flugantan polenon, kiun ili elĵetas tra analogaj truoj, atinginte la femalon dum pariĝa kurado. Shimpanzer malkonsentas ĉi tie kun Orentang, kaj tiu siavice kun Gorilles. Ignorante iliajn disputojn, Lemur asertas, ke pri ĉio ĉi kulpis la katastrofa stato, en kiun trafis iam la animaloj sur Entio. Ĝi urĝigis ilin ricevi certajn formojn, kiuj estis hereditaj antaŭ ol aperis eblo de plua diferenciĝo. Alivorte, tiu seksa kaj samtempe nekopulacia maniero de reproduktiĝo estas multe pli primitiva, ol la tera.

Mi tamen devas honeste agnoski, ke mi eksplikas la vidpunkton de esploristoj-homoj, kiuj devenas de la simioj kaj tial opinias, ke ju pli proksima estas parenceco de raciĥavaj estaĵoj kun amfibioj ([kaj la plumhavuloj rekte devenas de tiuj](#)), des malpli da honoro ili havas. La entianoj havas rekte malan vidpunkton. Primitiveco, kaj la plej malbona, asertas ili, montriĝas tie, kie la fekadon disde la reproduktado disigas nuraj milimetroj, aŭ eĉ malpli. Tiu maniero restas neŭtrala el morala vidpunkto ĝis kiam ankoraŭ ne ekzistas moralo, tio estas, dum la konduton de animaloj regas blinda instinkto. Tamen tiu ŝpara maniero kombini en la sama loko tiom kontraŭajn funkciojn, kiel la forigo el la organismo de ekskremento

kaj la amoro, devis iĝi malbeno de la racio, kreanta kulturon. Ĉar ajna viva estaĵo evitas proprajn ekskrementojn, tiun ĝeneralan abomenon necesis iel superi, kaj la evoluo uzis artifikon tiom simplan, kiom cinikan, transforminte la lokojn laŭnature abomenajn en la allogajn – danke al la nestanta en ili ĝuo. Tiuj malfeliĉaj, senlime naivaj homoj, asertis entia homisto Piksikiks, dum tutaj jarcentoj rompadas la kapojn pri tio, kial la kopulacio donas al iliaj femaloj fizikan ĝuon, dum ĉe malpli altaj animaloj nenio simila observeblas. Estas mirinde, aldonas tiu plumhavulida saĝulo, ke racia estaĵo povas sin trompi tiom longe kaj tiom sukcese, kiel la kompatindaj teranoj! Tiun, kiu pariĝas senreflekte, ne necesas logi per promesoj de plezuroj, superantaj abomenon. Heliko, bufo, ĝirafo aŭ bovo tute nenion pensas, kiam venas tempo de pariĝo; sed por subpremi ajnan pensadon de tiuj, kiuj ne nur povas, sed eĉ devas uzi racion, necesas nebuligi ilian cerbon per memnarkotiĝo, kaj ĝuste tiun rolon ludas la orgasmo. La spasma, nebuliganta la konscion, rapide pasas, kaj klareco de pensado revenas. Kompatindaj, senkulpaj viktimoj de la evoluo, trompitaj de ĝi! – ekkrias en tiu ĉi loko de sia «Kompara homologio» doktoro Piksikiks. – Tuta Galaksio devas kompati al viaj vanaj animaj luktoj, de kiuj vi ne liberiĝis ĝis nun kaj liberiĝos neniam, ĉar kun tia kripleco jam nenion eblas fari.

Mi aldonu cetere, ke en la fako de luzania poezio mi trovis kelkajn poemojn, priplorantajn nian seksan kriplecon, kiu speciale forte influis la terajn filozofion kaj religion, deviginte ilin despere elturniĝi. Nemalforte impresis min la «Nemorala traktaĵo» de Hett Titt Ksiurksiruks, komenciĝanta per jenaj linioj:

*Teranoj, ho bastardoj de l' Naturo,  
En am' ilia ludas ĉefan rolon  
Tiu eliga posta aperturo,  
Kie la korpo finas metabolon.*

*Kiam la Kosm' eksciis l' idealon  
De tiuj suferantoj malfeliĉaj,*

*En tuta Universo la skandalon  
Eviti povis jam neniu niĉo.*

Tion tradukis – laŭ mi, tute nemalbone – svisa poeto Rudi Wüez. Fama teoriisto de literaturo strukturalisto Teodoroff opinias tamen la tradukon de la dua strofo malsukcesa kaj proponas sian varianton:

*Aŭdinte, kiun ĝuste korpoparton  
Gent' homa uzas kiel aman ilon  
Ĉiuj ekstremis, kaj la Kosmo granda  
En plor' singulta rompis la palpilojn.*

La sama sciencisto atentigas pri grandnombraj apokrifoj, verkitaj sur la Tero kaj senbaze atribuitaj al entianoj, kio videblas el uzataj en ili lirikaj atributoj kiel abeloj aŭ papilioj, dum sur Entio estas nenio simila.

[Profesoro Teodoroff celis tekston de kanteto devenanta kvazaŭ el Luzanio:

*Turtinon mian polenante,  
Mi gloras papiliojn piajn  
Sed via mor' estas alia,  
Homa naci' malhonoranta!  
Ekstaze inon brakumante,  
Inspiron vidos do poet'  
En la kloaka kanalet'.*

(Rim. de I. Tichy)]

Ni revenu tamen al natursciencaj aferoj. La danĝero por la vivo sur marĉoj estis tiom granda, ke iliaj loĝantoj kuradis seninterrompe – kaj dum ĉasado, kaj dum reproduktado. Dum pariĝa periodo la nefluguloj komencas ritajn dancojn, post kio la femaloj disiĝas de la grego, diskurante en diversaj direktoj, kaj amasoj da maskloj persekutas ilin; atinginte, ili ĉirkaŭigas la fuĝintinon per nuboj de fekundiga poleno, kiun la femalo ensuĉas dum kurado per la nazotruoj. Facile kompreneblas, ke patrecon en tiaj cirkonstancoj

ne eblas eltrovi, eĉ se la fekundigo estus ebla sen polimiksio (nomata ankaŭ plurpolenado). Tamen sen la polimiksio ĝi estas tute neebla, kiel pruvis per komputila modelado Orr, Angutt, Tang, kaj ankaŭ iliaj kunlaborantoj el Masaĉuseca Instituto de Seksa Tehnologio.

Al mi ŝajnis, ke la esprimoj de aliplaneda kompato ofendis niajn sciencistojn, tamen ili ne povis malkaŝe montri siajn sentojn aŭ kategorie rifuzi la signojn de kompato, kiu fontis, sen ajnaj krompensoj, el la plej bonaj intencoj. Tial ili penis revenki *sine ira et studio* [27], substrekante, kvazaŭ interalie, treegan maloportunecon de fekundigo dum rapidega kurado; sed luzaniaj biologoj montriĝis spertaj polemikistoj kaj klarigis, ke la plej bona atesto de bona sano estas, sendube, la kapablo kuri pli rapide kaj pli longe, ol aliaj, tial la entia moro de pariĝa kurado garantiis kaj plu garantias reprodukon de individuoj ĉiurilate plej adaptitaj, kion tute ne eblas diri pri agoj, plenumiĝantaj sur herbo aŭ en lito, ja kuŝiĝi kapablas eĉ la plej senforta lamulo. Rilate de tiu senapelacia aserto ekflamis disputo, ĉar ne ĉiuj luzanistoj samopiniis pri traduko de la lasta esprimo; ekzemple, profesoro Pogorilles (ne miksu kun Gorilles!) opiniis plej ĝusta tradukon «aĉa perversiulo». Aliaj aŭtoroj, tamen, kontestas tion, montrante, ke entianoj ne havas nocion pri perversio, speciale seksa: sur Entio ili simple ne povis aperi. Por fini rakonton pri tiu demando, mi aldonu kelkajn vortojn pri tio, de kie aperis la vizaĝa lokiĝo de la seksorganoj ĉe la entianoj. Ĝi devenas el amfibio, aŭ pli ĝuste kotamfibio periodo de vivo de iliaj antikvaj prauloj antaŭ miliardo da jaroj. Kelkaj specioj de rampuloj penis meti ovojn en la tera maniero, sed tiuj ovoj dronadis, ĉar ili estis pli pezaj, ol la akvo (kaj malpli pezaj ol la akvo ili ne povis esti pro sia ĥemia konsisto; sed se mi devos klarigi ankoraŭ tion, mi neniam atingos la finon), kaj senglore pereadis en marĉa ŝlimo; finfine, post vico de mutacioj, transvivis nur seksvizaĝuloj kaj spermonazuloj, kiuj faris per la nazo vezikojn, enhavantajn respektive ovolojn kun naĝiloj kaj hasteman naĝantan spermon. Poste la aferoj iris malsame, sed mi ne deziras transformi la raporton pri mia ĝeneva legado en lernolibron de entia evoluo. Tiuj, kiujn interesas detaloj, povas

turni sin al la Departamento de Taŭro en MEA kun peto pri alirpermeso al la arkivoj.

La legado okupis jam kvin semajnojn; restis ankoraŭ preskaŭ du monatoj da devigita estado en Svisio, sed al mi tio ŝajnis nenio antaŭ ankoraŭ neesploritaj haloj de la giganta biblioteko. Tamen mi ne senesperigis, kvankam iĝis vera ermito; tage mi dormadis, kaj vekiĝadis, kiam svisoj ĉirkaŭ mi, ne sen plezuro plenuminte sian tagan dozon da aferoj, en pantofloj estis direktantaj sin al la litoj. Sed mi kun teko, plenŝtopita per rezervoj da kafo, sukero kaj sandviĉoj (ĉar jam nur ekvidinte biskvitojn mi sentis naŭzon), paŝadis laŭ malpleniĝintaj stratoj al MEA.

Strümpfli donis neniajn informojn pri si, tial mi tute ne sciis, ke li kaj lia estraro nerimarkeble observas miajn persistajn studojn, havante rilate mian personon tute konkretajn intencojn; estante veraj diplomatoj, ili preferis ne malkovri kartojn tro frue. Mi mem ne scias, kion mi farus, se mi ekscius pri iliaj planoj. Tamen, plej verŝajne, mi farus la samon, ĉar mi deziregis ekscii tutan veron pri niaj foraj fratoj laŭ racio.

La kerna diferenco de la entia kulturo disde la nia devenas el la kernaj diferencoj en la maniero de reproduktiĝo. Sur la Tero ties ĉefa parto estis lukto pri rajto koiti kum femalo, tio estas senpera konkuro, dum sur Entio tiu fenomeno ekde antikvaj tempoj havis kolektivan karakteron. Se la femaloj kurus malpli rapide, ol la maskloj, aŭ almenaŭ kun preskaŭ sama rapido, specoj de grandaj nefluguloj post kelkaj dekoj da generacioj iĝus malpli rapidaj. Tio minacus per pereco, kaj tial en la ekzistolukto venkis specioj, kies femaloj estis longkruraj, do malfacile kuratingeblaj. Estis krome tre grave, ke la maskloj rimarku – kaj tuj, – ke la fekundigo okazis. Ĉirkaŭigita per nuboj de poleno, la femalo faras akran krion, tre malagrablan por niaj oreloj, ĉar ŝi krias dum enspiro. (Estas malfacile kii dum elspiro dum tia malfacila maratona kurado). Iufoje dum tiu stadio okazas tiel nomata momenta aborto – se fekundigita per poleno femalo ternas, sentinte jukon en la nazo. Tiukaze la masklaro daŭrigas

la persekutadon ĝis morto – tute laŭvorte, ĉar malpli fortaj maskloj vere mortfalias.

La kapablo fari kriojn-signalojn iĝis la unua stadio de apero de la parolo. Necesas rememorigi, ke la birda laringo estas multe pli bone adaptita al tio, ol, ekzemple, tiu de simio; kiel oni scias, ĉimpanzon ne eblas instrui pri homa lingvo, dum por sturnoj kaj papagoj tio estas simplega, sed nenio interesa aŭdeblas de ili, ĉar al ili ne sufiĉas cerbo. De la origina plumaro al entianoj restis preskaŭ nenio – nur lanugo, kovranta la korpon, estas iom pli densa sur la ŝultroj, tie, kie iam kreskis svingaj plumoj. Mi permesis al mi tiun ekskurson en la pasintecon, ĉar sen ĝi ne eblas kompreni tutan profundecon de la abismo, dividanta la spiritan vivon de la homoj kaj de la entianoj. Ilia tuj rimarkebla homformeco estas sekvo de evolua konverĝo; sed, malgraŭ kroĉemaj manplatoj, kranio, volumene proksima al la homa, rekta staturo kaj parolkapablo, kompreni ilin por ni estas probable eĉ pli malfacile, – kiel asertas entiaj sciencistoj, – ol simiojn-primatojn, de kiuj ni devenas. Antaŭ ol profundiĝi en ilian filozofion kaj religiajn kredojn, mi listigu ĉion, kio por ni estas kutima, sed por ili estas tute nekomprenebla. Ili ne scias nek povas scii ĉiaspecajn erotikajn nuancojn kaj deviojn, ili ne konas tiajn nociojn, kiel konkero de erotika partnero, fidelo, adulto, monogamio, incesto, seksa humilo kaj protesto, kiun ĝi povas kaŭzi, ili ne konas iajn kulturojn, orientitajn porsekse aŭ kontraŭsekse, ĉar ankaŭ tio ĉe ili ne eblas.

Nemalmultajn kategoriajn eldirojn pri teraj kulturoj ni devis aŭdi de tieaj antropologoj. ([Niaj sciencistoj evitadis tiajn ekstremojn](#)). Teraj nocioj de pura kaj malpura, kaj ritoj de purigo kaj satisfakcio, asketeco kiel rimedo de lukto kontraŭ volupto, kiel protesto kontraŭ seksa impulso, anatemoj al tiu impulso kaj glorado de ĝi – ĉio ĉi, asertas ili, kondukis al dismembrigo fare de homo de lia propra korpo, kaj dum certaj epokoj, ekzemple dum Mezepoko, la kulturo destinis la korpon al veraj suferoj, forkondukante ĝian supran parton en la ĉielon, kaj la malsupran ĵetante en la geĥenon. Neniu teologo dum tutaj dudek jarcentoj eĉ ne balbutis pri tio, kion fakte homoj, al kiuj la kristanismo garantias karnan resurekton, faros kun

la seksorganoj en la paradizo. Kaj la gedonisma civilizo, radikanta en la epoko de Renesanco, laŭ opinio de entianoj, kondukis al tia egalrajtigo de ambaŭ korpoduonoj, pro kiu la kulturo suferis, ĉar finfine la homo animal-seksa superis la homon koran kaj pensantan. Tamen, la malsupra korpo estis vera plago por ĉiuj kulturoj, kiel okcidentaj, kun ilia kontraŭstarigo de peko kaj asketa sankteco, tiel ankaŭ orientaj, kie anstataŭ tiu paro de nocioj aperas poluse kontraŭaj nocioj de plena korpa libero kaj de plena nego de la korpo ([nirvano](#)). Kiom ajn bataladis kontraŭ sia korpo la kompatinda Homo, li tutege ne sukcesis trovi finan manieron paciĝi kun ĝi, sed kontentiĝis nur per surogatoj kaj iluzioj, nemalofte dronante en veraj marĉoj de memtrompo. Kiom forte tio limigis la homojn, asertas la entianoj, ja ili devis malŝpari gigantan parton de sia racio por pravigo, klarigo, kaj eĉ transformo de rilatoj, neeviteble diktataj de la konstruo de la korpo. Kiom ili devis suferi kaj trompi sin mem, por konformigi la dogmon pri la kreo laŭ la aspekto de Dio kun tiu kuneco de la organoj, kiu igis Sanktan Aŭgustenon en malespero ekkrii: «*Inter faeces et urinam nascimur* [\[28\]](#)». Ĉiam oni devis unu flankon idealigi, kaj la alian prisilenti, jenon kovri, jenon alinomi, kaj neniam revolucioj en la spirita vivo permesis tute paciĝi kun la damnita anatomio. En plej ekstrema okazo la signumoj invertiĝis, bigotecon anstataŭis cinikeco aŭ parenca al ĝi indiferenteco; homoj kvazaŭ diris al si: «Se jam ĉi tie ne eblas ion ajn fari, ni uzu senlace la organojn, kiujn ni havas, eĉ tiamaniere, ke fekundigo estu neebla; almenaŭ tiel ni ribelu kontraŭ la Naturo, se alie ne eblas». Dum epokoj de tutmondaj revolucioj la malvaste seksaj problemoj ne estis sur la unua loko, kio estas facile klarigebla: la civilizo, evoluanta sub la standardo de raciismo, simple ne deziris agnoski, ĝis kia grado la biologio dominas super ĝia raciismo. Sed tamen Renesanco estis la epoko, kiam la homo malkaŝe agnoskis la propran korpon, eĉ tiujn ĝiajn partojn, kiuj timigadis la teologojn, kaj en la Fora Oriento pensuloj vidis en la neekzisto la solan vere radikalan rimedon kontraŭ disfendiĝo de la homo je sentoj kaj spirito, je *delectatio morosa* [\[29\]](#) kaj racio. Aŭ ĝuo, superanta abomenon, aŭ abomeno, kiun oni ne rajtas konfesi, ĉar tiu, kiu pridubas la normon, mem iĝas nenormala.

Tia estas, laŭ la entianoj, nia eterna dilemo. Mi serĉis terajn ekspertojn, kiuj levus la ĵetitan ganton ([kaj verdire, ion tute alian](#)), sed, strange, trovis nenion, kio sonus konvinke: ja ĉi tie necesis ne sofistiko, sed logike senriproĉa refuto de la aliplandaj rezonoj. La niaj, vere, repagis, sed ne per kontraŭatakoj en la seksa temo, sed en tute aliaj terenoj, pro kio la disputo simple perdis sencon. Domaĝe. Tiaspecaj juĝoj de aliplanedaj estaĵoj pri la homo ne povas esti ofendaj. Ili estas nur ĉagrenaj por ni, kiel atesto de tio, ke la pretendoj al universaleco de ĉio homa en la skalo de la Universo ruiniĝis ankoraŭfoje.

Estas amare agnoski, diris unu maljuna filozofo, ke ni ankoraŭfoje estas eltronigitaj, metitaj sur la konvenan lokon, kaj des pli ne per abstraktaj rezonadoj, sed per demonstraĵoj pruvoj en aspekto de aliaj raciĥavaj estaĵoj. Tiu nerefutebla fakto montris al ni, kiom vanaj estis penoj de la homa penso levi hazardajn, pure lokajn terajn cirkonstancojn en rangon de racia kaj tial universala neceso. Kiajn montojn da kaprompaj argumentoj ni amasigis, por montri la naturon de la homo kiel kosman konstanton! Kiel facile la homo cedis al la iluzio, ke la mondo indiferentas al li ([se eĉ ne bondezira, kiel diras la konsolaj religioj](#)). Tio, kio okazis kun iuj pramoluskoj, trilobitoj kaj kirasfiŝoj antaŭ miliardo da jaroj, kio estis nur afero de hazarda permuto de diversaj kombinoj de organoj kaj havis nenian superan sencon, krom ilia ĉi-momenta funkcio, – tio iĝis nia heredaĵo kaj devigis niajn plej bonajn intelektojn despere kaj, kiel ni nun vidas, senespere meti ĉion sur unu karton, pruvante, ke la anticipe malsukcesa projekta solvo estis afero de la kreo, lojala rilate al la Kreitoj. Tamen, aldonis la sama filozofo, tio tute ne signifas – kiel povus erare pensi la adresato de la entiaj mesaĝoj, – ke danke al pli favoraj cirkonstancoj la entianoj ricevis pli bonan loton, ol la homoj. Malesto de aliula malfeliĉo ne egalas al propra feliĉo. Paradizo por ili same malproksimas, kiel por ni. Ajna raciĥava specio havas proprajn dilemojn, multaj el kiuj estas nesolveblaj, kaj la regulo de transiro el la fajro sub flamon, ŝajne, veras por la tuta Universo. Tamen, nemalmultas ankaŭ tiuj, kiuj vidas en homa sekso superecon de la *homo sapiens* <sup>[30]</sup> super *homo entiaensis* <sup>[31]</sup>, sed la principo mem de tiaj komparoj estas absurda: ne eblas opinii, ke neatingeblaj por

ni sentoj de aliuloj estas pli bonaj, ol la niaj, kaj ne eblas opinii, ke ili estas malpli bonaj. Se unu racio egalas al alia, – kio, ŝajne, veras, – tiam diferencojn en la konstruo de korpoj, elĵetataj el la lotmaŝino de la evoluo sur planedan scenejon, eblas nur konstati. Ĉio cetera, tio estas – takso de kvalito de ilia estado, restu – silento.

# Kredo kaj saĝo

La unuan, aŭ eble la duan de septembro, ĝuste en la tagmezo, de profunda dormo min vekis telefona voko. Advokato Finkelstein deziris intervidiĝi kun mi. Mi iris al li tuj, esperante post tiu konsulto satdormi ĝis fino de la vespero, kion mi nepre bezonis antaŭ sturmo de la lasta, filozofia bastiono de la arkivoj de MEA. Se mi prenis duŝon, mi vigliĝus, eble, tro; sed se mi tion ne farus, do en duondorma stato nemulte komprenus el tio, kion la advokato volis sciigi al mi. Kiel kompromiso mi prenis sidan banon kaj perpiede direktis min en la oficejon de Finkelstein, tre mirigita de trafiko, de kiu mi jam sukcesis malkutimiĝi. Mi, vere, ne estas solipsisto, sed de tempo al tempo havas senton, kvazaŭ tie, kie mi ne estas, kaj speciale tie, kie mi iam estis, ĉio frostiĝas, aŭ almenaŭ devas frostiĝi. Tio estas miaj personaj pensoj, kiujn mi ne trotaksas, sed nur registras ilin, por plifaciligi vivon por miaj estontaj biografoj, kun, mi diru tiel, profilaktikaj intencoj: ja se al biografoj mankas veraj detaloj el vivo de famulo, ili elpensas tutan amason da fikciaj.

La advokato renkontis min per larĝa rideto kaj deziris regali per taso da kafo, sed mi rifuzis, memorante pri baldaŭa dormo. Mi rimarkis, ke li jam havas novan sekretariinon, tiom belan, kvazaŭ ŝi ne scipovis eĉ tajpi. Ŝi vere ne scipovis, la advokato tion ne kaŝis, krome ŝi faradis koŝmarajn ortografiajn erarojn, kaj, eĉ pli malbone, metadis malĝustajn leterojn en malĝustajn kovertojn; sed rigardi al ŝi estis tia plezuro, ke klientoj vizitadis lian oficejon pli ofte, ol devis. Tio rememorigis al mi fragmenton el libro, kiun mi estis studinta nokte, kaj mi diris al la advokato, ke serpenta magio, per kiu nin sorĉas bela virina vizaĝo, esence estas plena enigmo. Definitive mi komprenis tion dum legado de la menciita libro, trovinte en ĝi mirindan interplanedan miskomprenon. Komisiono de ekspertoj-homistoj, esplorinta programojn de nia televido, speciale konkursojn de beleco, trovis, ke kelkaj tipoj de virinaj vizaĝoj estas evidente preferataj, kaj, cerbuminte, faris oficialan hipotezon, ke la vizaĝo plenumas ĉe la homoj funkcion de marka tabelo, tio estas latuna

ŝildeto kun informoj pri potenco, rendimento kaj tensio, alkroĉata, ekzemple, al elektromotoroj. La entianoj, kiel reprezentantoj de alia specio, deklaris la komisiono, ne kapablas legi en la virinaj vizaĝoj tiujn karakterizojn, ĉar ili estas koditaj ne per cifera nek per analoga maniero; sed iel ili tamen estas koditaj. Koloro de la iriso, formo de la nazo kaj la lipoj, situo de haroj sur la kapo – ĉio ĉi estas signoj, facile legataj de la homoj. Eble ili montras efikecon de la metabolo, rezistemon de la organismo al la teraj malsanoj, kapablon kuri (kvankam, sincere dirante, estus pli facile legi ĝin rekte el la kruroj), ĝeneralan nivelon de intelekto, – ĝenerale, ion ili signifas sendube, ĉar diferenco inter vizaĝoj de la reĝinoj de beleco kaj de ordinara homaj inoj estas ne pli granda, ol inter malsamaj literoj de alfabeto. Do, la afero estas ne en estetikaj konsideroj, – kiom gravas kelkaj pliaj aŭ malpliaj milimetroj da nazo? La komisiono laboris senlace, traktis dek unu alternativajn hipotezojn, komencante, certe, de la biologia: laŭ ĝi, homa masklo ellegas el la vizaĝo de ino trajtojn, kiujn li dezirus vidi ĉe sia ido; sed tiu koncepto montriĝis neakceptebla, se konsideri, ke nek en la socia, nek en la profesia vivo sur la Tero estis ajna prefero de rektaj nazoj al la stumpaj aŭ de disaj oreloj al la strike almetiĝantaj al la kranio. Kaj se masklo deziras havi fortan idaron, do esploro de la inaj muskoloj donos al li pli multe, ol rigardado en la okulojn. Se temas pri senĝena akuŝo, do indus taksu larĝon de la pelvo, tamen al la homoj tia penso eĉ ne venas en la kapon. Ĉar homaj kruroj en la genuoj fleksiĝas antaŭen kaj grandan parton de sia vivo ili pasigas sidante, risortaj kvalitoj de la sidvangoj povas havi ian selektan valoron; kaj vere, ŝajnas, ke por maskloj tio ne malgravas, sed tamen la vizaĝon ili evidente preferas, kaj tio estas klarigebla per nenio sidado sur malmolaj taburetoj. Tiu malfeliĉa komisiono esploris ĉirkaŭ okcent mil fotojn de aktorinoj, televidaj anoncistinoj kaj hejmmastrumantinoj, penante trovi korelacion inter trajtoj de iliaj vizaĝoj kaj tiaj malsanoj, kiel galvezikaj ŝtonoj, variko, ŝvitemo de piedoj kaj eĉ mildeco de karaktero, sed ne trovis eĉ spuron de ia korelacio, kio ĝin plene perpleksigis. Tial ĝi esploris kelkajn teranojn, venintajn sur Ention, sed nenion sciencan sukcesis ekscii de ili, kaj konkludis, ke la informo, kodita en la vizaĝoj de belaj virinoj, estas sur la Tero ŝtata sekreto, kies publikigo egalas al perfido. Allasi, ke la demanditoj mem ne sciis, kial

la vizaĝo de Marilyn Monroe kaŭzas ĉe ajna viro fortan blankiĝon de la pupiloj, dum la vizaĝo de samoficanino – apenaŭ, la entiaj sciencistoj neniel povis.

Advokato Finkelstein longe ridis, kaj poste diris, ke mi ne malŝparas tempon vane, tiom profundiĝinte en studojn, kaj tio lin speciale ĝojigas tial, ke li havas por mi bonan novaĵon. Küssmich poiomete inkliniĝas al kompromiso. La tribunala traktado de la afero prokrastiĝas, ĉar troviĝis gustumistoj, deklarintaj, ke la faman oran kafon neniu trinkos, kaj Küssmich ne sukcesis eltrovi, ĉu tio estas honestaj ekspertoj aŭ ilin subŝovis «Nestlé». Unuvorte, se mi rezignos de la kastelo, Küssmich redonos al mi 75% da mono, elspezita por la riparo, kaj liaj kalumniaj depozicioj estos forprenitaj. Fininte, advokato Finkelstein atende ekrigardis min.

– Ne scias mi, ne scias, – mediteme diris mi. – Principe, tuta tiu kastelo por mi, vidu, estas delonge kiel pasintjara neĝo. Sed, bonvolu diri, pro kio mi devas malprofiti? Ne en la mono estas la afero, sed en justeco. Kiom, propre, jarojn aĝas tiu sinjoro Küssmich? – demandis mi, okupita de nova penso.

– Sepdek ok.

– Li prefere ne pri mono pensu, – diris mi severe. – Kaj kion vi konsilos?

– Mi povas prokrastadi la aferon plu, – respondis li, hihianta, – sed mi volis certiĝi, ke vi insistas pri tio. Ni havas ankoraŭ kvin semajnojn ĝis sekva tribunala sesio.

– Dum tiu tempo multo povas okazi, – diris mi, eĉ ne supozante, kiomgrade profetaj estis miaj vortoj. Adiaŭante la advokaton, mi petis lin, laŭeble, telefoni al mi ne tage, kiam mi dormas, sed inter la sepa kaj la oka horoj vespere, kiam mi vigligas min, antaŭ ol veni en la bibliotekon.

Ne sukcesis mi, atinginte la hejmon, malvestiĝi kaj ekdormi, kiam denove aŭdiĝis sonoro, ĉi-foje ĉe la pordo. Kolerigita, mi malfermis

la pordon, vidis respektaspektan viron kun teko subaksele kaj decidis, ke tio estas nova advokato de Küssmich; sed mi eraris. Tio estis unu el gvidaj kunlaborantoj de redakcio de iu internacia monatrevo; li deziris intervjui min pri kosmaj temoj.

En la unua momento mi preskaŭ elĵetis lin de sur la ŝtuparo, sed en mian kapon venis penso, ke mia advokato tion ne aprobus. Elpaŝo en populara gazeto ja iel firmigus mian pozicion en la batalo kontraŭ la sentaŭgulo, kiu profitas el manĝemo de beboj. Tamen, mi ne aŭdis la nomon de la revuo, kaj el la ŝtuparejo blovis, tial mi proponis al la ĵurnalisto eniri en la loĝejon, kaj kiam li jam eksidis, mi aŭdis, ke li reprezentas redakcion de «Penthouse». Tio min sobrigis. Min evidente persekutis la generaj organoj de superaj teraj mamuloj, se la revuo, okupiĝanta pri ilia reklamo, ne permesis al mi dormi.

– Kion vi deziras? – demandis mi. Tiu homo tute ne konformis al miaj imagoj pri kunlaborantoj de «Penthouse». Anstataŭ okulfrape vestita ulo kun voluptema vizaĝesprimoj kaj poŝoj, plenŝtopitaj per pornografiaj fotoj, antaŭ mi sidis vera diplomato el revua kovrilo: grizharaj tempioj, elegante tonditaj lipharoj, profunda rigardo de intelektulo kaj nigra advokata teko. Metinte la kruron sur la kruron, li blindigis min per brilanta rideto kaj diris, ke venis tempo por malfermi antaŭ la vasta publiko sekretejojn de kosma erotiko. Kiel mi komprenis, tiu eleganta fripono sciis pri miaj studoj en MEA. Nun, kiam li vekis min de la plej profunda dormo, je kiu mi kapablis, ordinara elĵeto de li el la loĝejo jam ne povus esti kalkulata sufiĉa kompenso. Mi decidis aranĝi por li grandan, zorge pripensitan taŭzon, kaj nur poste peti lin foriraĉi al sia tenejo de seksorganoj.

– Mi donos intervjuon, – diris mi, – kondiĉe, ke ĉion diritan de mi vi publikigos sen ajnaj korektoj. Kaj ĉar mi jam ricevis ĉi tie ioman sperton, via buŝa promeso min ne kontentigos: mi bezonas garantiojn pli firmajn...

Li glutis la hokon, kaj komenciĝis longaj intertraktoj. Ju pli solidajn garantiojn mi postuladis, des pli li certiĝadis en opinio, ke mi havas en rezervo fiaĵojn, pri kiuj li eĉ ne aŭdis. Li uzis telefonon.

Li komunikiĝis kun sia redakcio, kaj poste mi – kun mia advokato, por certiĝi, ke la deklaro, kiun lasos ĉe mi la ĵurnalisto, estos sufiĉa jura kaŭzo por ekprocesi pri okdek mil dolaroj en okazo de nepublikigo aŭ ŝanĝo de la teksto de mia elpaŝo. Mi intence postulis tiom multe, por ke tiu redakcia hundaro eksalivegu, kaj mi atingis plenumon de la postulo. Mi metis en la tirkeston la postulitan deklaron, kies tekston diktis al mi advokato Finkelstein, por ke ne estu eble ŝanceli ĝin eĉ je unu punkto, kaj, eĉ pli kolera – ja pri tio, ke mi dormos dum la restinta parto de la vespero, ne eblis eĉ pensi, – verŝis por la ĵurnalisto rare aĉan konjakon, lasitan en la bufedo de la antaŭa loĝanto; kaj mi mem, trinkante teon (kvazaŭ pro stato de miaj renoj), ekparolis ĉe ŝaltita magnetofono.

– Mi elpaŝas ne en la propra nomo, – deklaris mi, – sed kiel reprezentanto de la galaksiaj civilizoj. Erotikon en la tera stilo ili ne konas. Tiurilate ni en la Galaksio estas io simila al monstro, kies vizaĝo, se eblas tiel diri, alkreskis al la postaĵo, sed en tutmonda skalo. Reproduktado ekde la komenco mem devas okazi sub kontrolo de vidkapablo, kaj tiel tio ĉie okazas. Sed en unu okazo el du trilionoj la evoluo miksas direktojn de enirejoj kaj elirejoj de la korpo. Laŭ unuanima konkludo de stelaj ekspertoj, ĝuste tia fatala malbonŝanco trafis al ni. La rekreado lokiĝis en la elirejoj de la organismo. La teraj specioj estis metitaj antaŭ elekto: aŭ ekami tiujn lokojn, aŭ formorti; kaj vere, ĉiuj organismoj, kiuj preferis morton al la fiaĉaĵo, pereis. Restis nur tio, kio montris pretecon ekami la deĵetajn kanalojn. Tio estas nia tragedio, en kiu ni ne kulpas, kripleco de galaksia skalo. Kiel sciante, ĝenerale la procezo de rekreado estas ne tre agrabla. Ne tre agrablas la stato de gravedeco, estas malfacile nomi speciala plezuro la akuŝojn. La naska procezo daŭras naŭ monatojn – de ekfunkciigo ĝis apero «ĉe la pordo» de la preta ekzemplero, – tio estas 389 000 minutoj. El ili plezurigas nur unuaj kvin-ok, eble eĉ dek. Ceteraj 388 990 minutoj ne eblas nomi plezuro, eĉ male, tio estas senĉesaj zorgoj, kaj fine – suferoj. Laŭ aserto de galaksiaj ekonomikistoj, tio estas la plej malbona negoco, kiun nur eblas imagi. Estas same, kiel kvazaŭ por minuta plezuro de manĝita ĉokoladeto vi devus tutan monaton suferi pro ventrodoloro. Ĉar la negoco, kiun proponas al ni la korpo, estis

trudita al ĝi malgraŭvole, en ĝi ne estas dolo aŭ trompo, do sekve, ne estas ies kulpo. Sed ĉio ŝanĝiĝis ekde tiu minuto, kiam pri tio ekokupiĝis granda kapitalo, por ricevi profiton per subtenado de homaj instinktoj en stato de ĉiam ardigita preteco. Estas riproĉinde inciti soifantojn, montrante al ili vicojn da boteloj kun sodakvo kaj plej bonaj limonadoj, se per tio oni elprenas lastan groŝon, ne sensoifigante ilin. Estas malnoble logi malsatantojn per fotoj de frititaj kokidoj kun salato kaj de tortoj, dekoraciitaj per kremo. Sed tio estas nenio kompare kun maĥinacioj de tiuj, kiuj profitas, reklamante ĉiaspecajn, pli aŭ malpli neapetitajn fendojn de la homa korpo kiel pordegojn de paradizo. Aŭskultinte pri tia ekspluatado de homo fare de homo, la Galaksio decidis ĝin fini. Por helpi nin baldaŭ venos ekspedicioj de savantoj. Ĉi-rilatan dokumentaron oni jam delonge estas kolektantaj sur la flugantaj teleroj: ĝuste por tio oni sendis ilin al ni. La supre menciitajn ekspluatantojn oni devigos dumvive okupiĝi pri ĉio, kion ili proponadis al la malfeliĉa publiko, kun deviga uzado de tuta arsenalo de faritaj de ili instrumentoj de volupto. La konsilio vane serĉis mildigajn cirkonstancojn. Estas vere, ke iujn inventojn la homon unue devigis fari la neceso, kaj de tio devenis vapormaŝinoj, rabotiloj, segiloj, tirkestoj kaj botelaj korkoj. Sed redakcioj de gazetoj, kiel la via, ne povas por sia senkulpigo montri iajn inventojn de tia speco. Viaj publikigoj postulas venĝon de la ĉielo. Tial la ĉielo venos kaj faros ĉion, kion opinios necesa. Tio estas ĉio. Adiaŭ.

La ĵurnalisto penis ion diri, montri miajn vortojn ŝerco, sed mi helpis al li eliri. Mi estis tiom kolera, ke ne povis fermi la okulojn ĝis la vespero mem, kun sopiro pensante pri la feliĉaj plumhavuloj de Entio, kiuj kuras unu post la alia kaj polenas unu la alian kiel papilioj. Je la naŭa horo mi kiel ĉiam prenis sakon kun provianto kaj ekiris por daŭrigi miajn studojn, tre malkontenta pri mia hieraŭa intervjuo. Mi rememoradis, kiel mi kun senforta furiozo rigardis al la brilantaj butonoj sur la jako de tiu kanajlo kaj boris per rigardo lian senriproĉe ligitan kravaton. Kun kia ĝuo mi trenus lin laŭ la planko je tiu kravato! Mi aŭdis, ke simile al tio, ke vendistoj de narkotaĵoj neniam uzas ilin mem, same ankaŭ sinjoroj el tiaspecaj redakcioj legas nure librojn pri aventuroj de abelineto Maja. Finfine

en densiĝanta krepusko aperis la granda forĝita pordego de la ministrejo. Kune kun tera polvo mi deskuis de mi la tro terajn pensojn, ja mi devis nun leviĝi al la pintoj de agoj de la aliplaneda spirito.

Legado de teologioj, teodiceoj kaj filozofioj postulis plenan potencon de la cerbo. Tial mi malfermis la fenestron, faris tridek profundajn eksidojn, ŝaltis la kafkuirilon, glutis, por profilaktiko, aspirinon, kaj etendis la manon al unua volumo el jam preparita stako, dum el mia brusto – Dio vidas, ke nevole – eliĝis mallaŭta ĝemo. Malgrandaj strangaĵoj de grandaj pensuloj estas vaste konata fakto. Kvankam lernolibroj pri historio de filozofio ordinare silentas pri tiuj dubindaj kaj nelaŭdindaj historioj. Unu ĵetis de sur ŝtuparo maljunan sinjorinon, eĉ tiel, ke ŝi rompis ambaŭ krurojn, alia faris infanon kaj rezignis de li, sed ĉio ĉi estis pure individuaj fiagoj kaj ekscesoj. Enrampi en barelon, skribi denuncojn pri kolegoj – tio estas, certe, fiaĵoj, sed nur etaj. Sur Entio estis alie, speciale en la malfrua mezepoko, kiam filozofio floris. Aperintaj tiam skoloj ([malsupre mi rakontos pri ili pli detale](#)) polemikis inter si per nekonata aliloke maniero. Ĉiu konas esprimojn kiel «Tio estas vero, alie mi mortu», aŭ «falu mi ĉi tie, se mi mensogas», kaj tiel plu. La firksatika kaj la tirtraca skoloj inkludis tiujn minacojn en la arsenalon de heŭristika argumentaro. La afero estas en tio, ke la bazajn asertojn de filozofio ne eblas konfirmi eksperimente. Ne eblas konfirmi, ke la mondo ĉesas ekzisti, se estas neniu: ja por pruvi, ke ĝi ne estas, necesas iri kaj rigardi, kaj tiuokaze ĝi, memkompreneble, ja estas, kvazaŭ nenio okazis. Tamen la disĉiploj de Firksatiko uzis empirian pruvon, ricevintan la nomon ultimata. Se oponento ne ŝanĝis sian opinion kaj rebatis ĉiujn argumentojn, ili minacis per memmortigo. Ja tiu, kiu pretas morti por siaj konvinkoj, eĉ tuj, devas esti sufiĉe certa pri ili! Kaj tiu, kiu volis plifortigi siajn pruvojn, ordonadis tranĉi rimenojn el la propra haŭto, aŭ ion similan. Tiu maniero iĝis moda, kaj en la dua duono de la XVII-a jarcento ĝismortaj disputoj iĝis amasaj. Kaj ĉiu terure hastis, timante, ke la oponento sukcesos mortigi sin unua, kaj la decida argumento ne atingos lian konscion. Laŭ moderna filozofo Tjurr Mehehet, tiu frenezo havis du flankojn. Unuflanke, pri filozofio okupiĝadis nur tiuj,

kiuj rilatis al ĝi morte serioze, kaj tio estis bona. Malbona estis, memkompreneble, tio, ke la argumento de memmortigo ne havas sencan valoron, estante speco de ĉantaĝo, sed ne racia konvinkado. Kelkaj skoloj, ekzemple, la paletina, tre malmultiĝis rezulte de tiaj disputoj, kaj la ceterajn estis frenezigantaj la solipsistoj. Ilin trafadis neniu argumento, ja se la mondo estas nur iluzio de la pensado, do neniu mortigas sin reale, sed tio nur ŝajnas, do ne indas emociiĝi pri tio.

Tiu morna aberacio daŭris kelkdek jarojn kaj, unuavide, estis nur kolektiva psiĥozo; tamen ĝi montras, kiom abnegacie la entianoj jam tiam meditadis pri la naturo de la aferoj. Tio, ke ni ne havis memmortigemajn filozofojn, atestas eble nian pli grandan sobrecon, sed tute ne antaŭdecidas takson de vereco de filozofiaj sistemoj. Ĉe ni la plej grandan influon al evoluo de ontologio faris, probable, Platono. Menso, sendube, de egala potenco, sed de tute alia stilo, estis Ksiraks, la kreinto de ontomizio – instruo, laŭ kiu la Naturo estas principe malfavora. Ĝia plej granda parto okupas tiom malmulte da loko, ke mi transskribos ĝin tutan. En la kvardeka jaro de la Nova Erao Ksiraks skribis:

Senfavora – signifas neŭtrala aŭ justa.

Senfavora al ĉio donas samajn eblojn, kaj justa mezuras ĉion per sama mezuro.

1. La mondo estas maljusta, ĉar:  
en ĝi estas pli facile detrui, ol krei;  
pli facile turmenti, ol feliĉigi;  
pli facile pereigi, ol savi;  
pli facile mortigi, ol vivigi.
2. Ksigronaj asertas, ke estas ĝuste la vivantoj, kiuj turmentas, pereigas kaj mortigas, kaj sekve, ne la mondo estas malfavora al ili, sed ili mem estas malfavoraj unu al la alia. Sed ankaŭ tiu, kiun neniu mortigis, devas morti, mortigita per sia propra korpo, kio estas parto de la mondo, ja de kio alia? Kaj sekve, la mondo estas malfavora al la vivo.

3. La mondo ne estas neŭtrala, ĉar:  
ĝi vekas esperon pri stabila, senŝanĝa kaj eterna ekzistado, estante, tamen, nek stabila, nek senŝanĝa, nek eterna; sekve, ĝi trompas. Ĝi permesas ekkoni sin, tamen kun tio ĝi entiras en ekkonadon, vere senfundan; sekve, ĝi estas insida. Ĝi permesas ekregi sin, sed nur per nefidinda maniero. Ĝi malkovras siajn leĝojn, krom la leĝo de absoluta fidindeco. Tiun leĝon ĝi kaŝas de ni. Sekve, ĝi estas malbonintenco. Do: la mondo ne estas neŭtrala rilate al la Racio.
4. Narzaroks instruas, ke Dio aŭ ekzistas, kaj tiuokaze, Li estas la Mistero, aŭ ekzistas nek Dio, nek la Mistero. Ni respondu al tio: se Dio ne ekzistas, la Mistero restas, ĉar: se Dio ekzistas kaj kreis la mondon, do estas sciate, kiu faris ĝin maljuste malfavora, tia, en kia ni ne povas esti feliĉaj. Se Dio ekzistas, sed ne kreis la mondon, aŭ se Li NE ekzistas, la Mistero restas, ĉar ne estas sciate, de kie aperis la maljusta malfavoro de la mondo.
5. Narzaroks post la antikvuloj ripetas, ke Dio povis krei krom ĉi tiu Mondo ankaŭ feliĉan Transmondon. Sed tiuokaze por kio li kreis ĉi tiun Mondon?
6. Aŭstezaj asertas, ke saĝulo faras demandojn por respondi al ili. Tio estas malĝusta: li faras demandojn, kaj respondas al ili la mondo. Ĉu eblas imagi mondon, alian ol la nia? Eblas du tiaj mondoj. En la senfavora detruo estus same facile, kiel krei, pereigi – same facile, kiel savi, mortigi – same facile, kiel vivigi. En la mondo universale favora estus pli facile savi, krei, feliĉigi, ol pereigi, detruo kaj turmenti. Tiajn mondojn en nia Mondo konstrui ne eblas. Kial? Tial, ke ĝi ne donas al tio konsenton.

Tiu instruo, nomita la Instruo pri Tri Mondo, plurfoje estis reviziata kaj interpretata novmaniere kaj dum la vivo de Ksiraks kaj post lia morto. Unuj el liaj disĉiploj opiniis, ke Dio ne povis krei pli bonan mondon, ĉar ĉio havas siajn limojn, aliaj – ĉar Li ne deziris. Tio ebligis opinii Dion aŭ neabsoluta estaĵo, dependa de io, aŭ ne absolute bona; tamen, interpretoj estis multe pliaj. Pro predikado

de la Instruo pri Tri Mondoĵ la imperiestro Ziksizar kondamnis Ksirakson al la plej severa puno – du jaroj da mortado, tio estas malrapidaj turmentoj, farataj de medicinistoj ([ekzekutisto en la imperio devis havi medicinajn sciojn](#)) kun tia zorgo, ke la kondamnito ne mortu antaŭ la tempo: oni lin intermite torturadis kaj kuracadis.

La plej fortajn argumentojn kontraŭ la instruo de Ksiraks faris en la Frua Mezepoko Raĥamasteraks, unu el la kreintoj de ĥemio. Li estis pruvanta, ke kaj en neŭtrala, kaj en favora mondoj la vivo multobliĝus lavange, tial en la neŭtrala mondo ĝi, pleniginta la mondon ĝis randoj, rapide pereus pro memsufoko, kaj en la favora necesus specialaj limigiloj, moderigantaj la pereigan multobliĝon. Per tio la mondo, aspektanta neŭtrala, iĝus morta kaptilo, kaj la favora – malliberejo, ja libero de ajnaj agoj tie estus limigita. Tiu argumento, tamen, nerekte plifortigis la ateisman esencon de la Instruo pri Tri Mondoĵ kaj fortigis la sendiulojn en ilia nekredado, demonstrante kurbecon de la mondo rilate al la vivo: estante en ĝi io hazarda, la vivo povas kalkuli nur je si mem. Tial Raĥamasteraks same pagis pri sia vivoverko per morto, sed kiel malpli danĝera herezulo li estis indulge ekzekutita per forhako de kapo.

Sian lastan renaskiĝon la Instruo pri Tri Mondoĵ spertis dum la Nova tempo, en la epoko de vigla evoluo de gravita fiziko. Nousĥoruks, la entia Ejnŝtejno, eksplikis la esencon de la afero simple: por respondi, kial la mondo estas tia, kia ĝi estas, necesas unue rigardi, ĉu eblas alia mondo, kapabla naski vivon ([alie en la mondo estus neniu, kaj per tio la problemo malaperas](#)). Respondi al la tiel starigita demando eblas neniam, ĉar projekto de alia mondo egalas al projekto de alia fiziko. Por tio necesas plene ekkoni fizikon de ĉi tiu mondo, tio estas elĉerpi ĝin en formuloj de absoluta vero, kio ne eblas. Ĝuste ĉi tie sur la scenejon revenas la Mistero de la antikvaj filozofoj, ĉar ni ne scias, kial la mondon ([kaj sekve, la fizikon](#)) eblas ekkonadi senfine. Neniu teoria modelo kapablas ĝin plene elĉerpi, kaj tio signifas, ke la racio kaj la mondo ne ĝisfine egalas. Postaj provoj pruvi, ke ĝuste tiel devas esti en ajna ebla mondo, fiaskis, kaj la lasta konkludo, al kiu venis la entia filozofio, diras: ne ekzistas pruvoj kaj pri stabila malegaleco de la mondo kaj

racio, kaj pri neeblo de tia fiziko, kiu diferencus de la ekzistanta kaj superus ĝin rilate de favoro al la vivo. La multjarcenta batalo por rajto fari al la mondo finan diagnozon finiĝis, laŭ opinio de unuj, nule, kaj laŭ opinio de aliaj – per malvenko.

Tamen ĝi en grandega grado determinis evoluon de la civilizo en Luzanio kaj en la malpli grandaj ŝtatoj norde de ĝi, kiuj estis sub luzania influo. Estas nedubeble, ke la koncepto de etikosfero kiel de absolute fidinda prizorganto de la socio devenas el la «Tri Mondo» de Ksiraks, sed samtempe eĥo de liaj argumentoj resonas en pamfletoj, entombigintaj proponitan pli frue projekton de memevolua refaro de la entianoj. Furiozaj disputoj pri tiu projekto dum kelkdek jaroj ekscitadis la publikan opinion. La filozofio sur Entio ne falis tiom malalte, kiel okazis ĉe ni en la scienca epoko. Tion atestas partopreno de filozofoj en bataloj de subtenantoj de la memevoluo kontraŭ ties kontraŭuloj, kaj antaŭ ĉio – la rolo, kiun devis ludi Ksiksokt en ekkonscio de tiel nomata kontraŭevolua paradokso ([nomata ordinare la paradokso de Ksiksokt](#)).

Ĉiu dezirus havi belan kaj saĝan infanon. Sed neniu deziras, ke lia infano estu saĝa kaj bela cifermaŝino, eĉ se ĝi estus centoble pli saĝa kaj sana ol viva infano. Tamen la programo de memevoluo estas glita klinita ebena sen limigiloj, kondukanta en abismon de sensencaĵoj. En la unua etapo tiu programo estas modesta – ĝi celas nur forigon de genoj, malgrandigantaj fortikecon, kaŭzantaj kripoleon, heredajn malsanojn ktp. Sed tia perfektigo ne povas halti en unufoje atingita punkto: eĉ la plej sanaj ekmalsanas, eĉ la plej saĝaj en maljuneco marasmiĝas. La prezo, kiun necesos pagi por forigo de ankaŭ tiuj mankoj, estos poioma deiro disde la natura, evolue formiĝinta plano de aranĝo de la organismo. Ĉi tie en la kontraŭevolua agado aperas la paradokso de kalvulo. Elfalo de unu haro ankoraŭ ne signifas aperon de kalvo, kaj ne eblas diri, kiom da haroj devas elfali, por ke ĝi aperu. Anstataŭigo de unu geno per alia ne transformas infanon en estaĵon de alia specio, sed ne eblas diri, kie, en kiu momento aperas nova specio.

Se trakti la funkciojn de la organismo dise, perfektigo de ĉiu el ili estas dezirinda. Sango, kiu nutras histojn, pli bona, ol la natura, nervoj, kiuj ne degeneras, pli fortikaj ostoj, okuloj, al kiuj ne minacas blindeco, dentoj, kiuj ne elfalas, oreloj, kiuj ne surdiĝas, kaj miloj da aliaj komponantoj de la korpa perfekteco utilis por ni sen ajna dubo. Sed unu perfektigo neeviteble trenas post si alian. Pli fortaj muskoloj postulas pli fortikajn ostojn, kaj pli rapide pensanta cerbo – pli vastan memoron; se tion postulos sekva etapo de perfektigo, pligrandiĝos volumeno de la kranio kaj ŝanĝiĝos ĝia formo, ĝis fine venos tempo, kiam albuminan materialon necesos anstataŭigi per pli universala, ĉar tiam efikeco de la organismo salte kreskos. Nealbumina organismo ne timas altajn temperaturojn, radioaktivecon, kosmajn akcelojn; sensanga organismo, en kiu provizado de oksigeno estas farata simple per interŝanĝo de elektronoj, sen primitiva perado de sangocirkulado, estas nekompareble malpli rompebla kaj mortema; kaj jen, foje komencinte refaradi sin, la raciĥava raso superos la limojn, kiujn metis al ĝi ĝia planeda lulilo. Postaj paŝoj kondukas al apero de estaĵo, konstruita eble multe pli harmonie, multe pli bone eltenanta batojn kaj malfeliĉojn, ol la homo aŭ la entiano, multe pli universala, racia, lerta, longviva, kaj limese eĉ senmorta danke al perioda anstataŭigo de la eluzitaj organoj, inklude la organojn de percepto, al estaĵo, kiu eltenos ajnan medion, ajnajn mortigajn por ni kondiĉojn, kiu timas nek kanceron, nek malsaton, nek maljunulan kadukiĝon, ĉar tute ne maljuniĝas; unuvorte, tio estos estaĵo perfektigita ĝis limo danke al rekonstruo de la tuta hereda materialo kaj de la tuta organismo, – kun unu sola klaŭzo: la homon ĝi similos ne pli, ol cifera maŝino aŭ traktoro. La paradokso estas en tio, ke ne eblas indiki, kia nome paŝo sur tiu vojo estis eraro, ĉar ĉiu el ili alproksimigas nin al la idealo de efikeco, kvankam tiu idealo iĝos estaĵo jam tute ne homa.

Ĉar tia momento, tia lasta limo ne ekzistas, por kio, propre, necesas tuta tiu sizifa laboro, etendita je multaj generacioj? Se ni rekonstruas ne nin mem, sed posteularon, ĉu ne estas pli facile kaj pli bone tuj adopti cifermaŝinon aŭ eĉ tutan komputilejon? Ja dismeto de la procezo de optimumigo je tuta vico da generacioj estas ordinara kamuflado, programo de poioma specia memmortigo;

do per kio la poioma memlikvido pli bonas ol la tuja? Nur tiu, kiu konsentas adopti komputilejon sur piedoj (aŭ sur aerkuseno), povas sen timo kaj sen klaŭzoj komenci rekonstrui propran idaron por kreo de perfektaj pranepoj. Tio, kio ŝajnas al ni plena absurdo, – adopto de ia blendita kristala organismo, kun kiu eblas konversacii pri aferoj teraj kaj ĉielaj, – aspektas jam ne tiom absurde, se transiro de la natura stato al la optimumigita estos longa serio de negrandaj ŝanĝoj, etenditaj je multaj generacioj; sed la absurdo iĝas evidenta, se esplori la finan rezulton. Ĉu memevoluigo estas kurso de kuraco de malutila kutimo al sia homa esenco? Ĉu ne estas tute egale por ni, fakte, kia cifermaŝino iĝos nia posteulo – ĉu konstruita de komenco ĝis fino de inĝenieroj aŭ traigita komence tra viva utero, kaj poste tra iaj uteratoj? Tiu, kiu donas konsenton al la memevoluigo, konsentas aboli sian propran specion kaj transdoni la heredaĵon de la civilizo al estaĵoj ĉiurilate fremdaj al ni, ĉar ni estas malperfektaj, mortemaj, limigitaj en pensado kaj en tempo; do la adeptoj de la perfekteco liberigu sin de superflujaj klopodoj, unufoje adoptinte tutan pensantan teknologion de la planedo. Kial, propre, nin devas anstataŭigi apartaj sistemaj unuoj, ja pli efika estus planeda kristala cerbo, nia posteulo, heredanto kaj daŭriganto!

Ksiksokt en polemika ardo asertis, ke la adeptoj de la memevoluigo similas al murdisto, kiu murdas viktimon ne tuj, sed poiome, per malgrandaj dozoj de veneno, por kutimiĝi al aspekto de agonio. Lia ironia slogano «Genĝenieroj de ĉiuj landoj, adoptu komputilojn!» serioze senkreditigis tiun grandiozan programon. Por ĉiu elpaŝo de genĝenieroj li havis pretan sarkasman respondon: «Ili deziras konservi eksteran similecon de la perfektigitaj estaĵoj kun ni! – ekkriadis li. – Sed kion tio pruvas? Nur lertecon en farado de falsaĵoj! La simileco devas trankviligi mensojn: kvazaŭ perfektigitaj estas nur nevideblaj por la okulo internaĵoj, kaj la eksteraĵo tute ne ŝanĝiĝas. Tiuokaze farĉu manekenojn per komputiloj, kaj la afero estas farita!»

La genĝenierio, pruvadis li, iĝas des pli absurda, ju malpli da limoj ĝi havas. Tiu, kiu ekposedis nur arton de eta retuŝo, ekposedis nemulton kaj al nenio minacas. Malantaŭ tiaspecaj plibonigoj kaŝiĝas

espero pri pli bona vivo, kiun ni garantios al la idaro. La genĝenieroj mencias tiun fakton, ke niaj prauloj estis verdulet-voraj birdoj kaj grandaj marĉaj nefluguloj, al kiuj ni ne tre similas per korpo kaj spirito. Kaj se en tiu praa transiro de la malsupra, birda stadio al la supra, racia, ni vidas nenion malbonan, do necesas laŭ analogio decidiĝi al sekva paŝo!

Tiu analogio estas falsa, la simileco estas ŝajna, ĉar la plumitaj prauloj de la entianoj ne staris antaŭ ia elekto, sed ni staras. Ilia privilegio estis senracieco kaj senkonscieco; ambaŭ aferojn ni perdis senrevne. Forĵetante sian morteman korpon, ni forĵetas nin mem; kaj ĉi tie kaŝiĝas ankoraŭ unu malfeliĉo – libero, atingita en projektado de plibonigoj. Plibonigoj eblas multaj kaj plej diversaj. Tial konkurencos inter si projektoj de *Homo Novus Entianus* <sup>[32]</sup>, kaj necesos elekti unu el ili ([alie ne eviteblas kunpuŝiĝo de malsamaj specimenoj inter si](#)). Tio signifas, ke ni ricevos posteularon laŭ komuna interkonsento; sed interkonsentinte, ke niaj infanoj devas esti tiaj kaj tiaj, ni trompos nin mem – ĉu ekzistas diferenco, ĉu ili flugos de steloj, por ekposedi Ention, aŭ elrampos el retorto? Memneniigon eblas, certe, esplori, kiel ajnan alian eblon, sed sen iluzioj kaj erariganta ŝminko.

Mi skribis tiom pri tiu filozofia milito tial, ke ĝi, kiel asertas historiistoj, havis ŝlosilan valoron por la posta kreo de la etikosfero. La nocio de Dio dum historio de la entianoj evoluis ne tre ordinare. Komence Dio estis identigata kun la naturo: ĝi estis Li, Lia perfekta enkorpiĝo, unu el vico de aliaj. La astroj estis Liaj membroj, la vivaj estaĵoj – pensoj, altaj kaj malaltaj. La plej altaj pensoj estis raci havaj estaĵoj, do la entianoj mem. Tiu memdiigo konstante postuladis klarigojn – kiel eblas, ke unuj Diaj pensoj ne konsentas kun aliaj kaj eĉ murdas ilin? La klarigo estis simpla: estante Ĉio, la Sinjoro povas havi ĉiaspecajn pensojn, sekve, ankaŭ malbonajn, al kiuj kontraŭstaras la bonaj, ja se Li havus nur la bonajn, Li ne estus la Ĉiomo. Dum religiaj institucioj estis identigataj kun la ŝtataj, tiu interpreto estis sufiĉa, ĉar la potenco, kaj monduma kaj religia samtempe, estis determinanta, kiaj Diaj pensoj ([tio estas kiaj civitanoj](#)) estas malbonaj, kaj kiaj estas bonaj. Tamen en la sino

de tiu kosmo-ŝtata religio naskiĝis herezoj de mizianoj, teokriptanoj kaj servistoj. Laŭ la teokriptanoj, la Sinjoro enkorpiĝas en homojn nur per la plej malalta parto de sia naturo, kaj ilia tasko estas perfektigi, danke al kio ili iĝas ĉiam pli altaj partoj de la Dia racio. Ili povas nek kompreni lin, nek imagi Lin tute, kiel fingro ne povas reprezenti la tutan korpon, kaj unu penso ne kapablas ĉirkaŭpreni la tutan racion. Laŭ la mizianoj, Dio laŭ sia esenco estas estaĵo «nehoma», tamen ne en tiu senco, en kiu oni komprenis tion en la tempoj de persekutado de la mizianoj ([kvazaŭ Li, laŭ ilia instruo, estas simple malbona](#)), sed en tiu senco, ke la Sinjoro estas turnita al aferoj, neekkoneblaj por entianoj, kaj la eklezio estas nenio alia, krom kompasoj, kiu devas agordi direkton de homaj mensoj kun la neekkonebla direkto de Diaj agoj. La servistoj, aliflanke, opiniis Dion la Kreinto de ĉi tiu mondo antaŭ ĉio, – sendepende de tio, pri kio li okupiĝadis krom tio, kaj tial ili metis sur lin tutan respondecon pri ĉio en la mondo. Dion necesis ami kaj esti dankema al li en tia – nesenlima – grado, en kiu li portis la respondecon, ĉar ([kiel klarigis en sia simpleco Miksikiks](#)) botisto, kiu kreus milionon da mirinde kantantaj nubetoj kaj paron da aĉaj botoj, estus malbona botisto, kiel ajn tiuj nubetoj kantu. Pro tio oni lin disŝiris je pecoj per ardigitaj tenajloj antaŭ la imperiestro Sks ([Sks fieris pri sia mallonga nomo, sed tio estas aparta afero, kaj mi pensas, ke estos pli racie prisilenti tutan toponomastikon de entiaj klanaj nomoj kaj ĝian ligan kun okupiĝo de entiano, ĉar tie la okupiĝo respeguliĝas en la nomo](#)).

Krom la menciitaj supre ĉefaj, estis herezoj malpli gravaj, ekzemple, de fragistoj, opiniintaj, ke Dio kreis la mondon, sed la kreaĵo ne tute sukcesis: estante senfine bonkora, li ne volis devigi la kreitojn al io ajn, kaj sekve, ankaŭ al unusola bono, kaj tial donis al ili pli da libero, ol ili povis elteni. Tiu doktrino ([kiel oni diras](#)) plej proksime similas al la instruo pri la unua peko kaj malboniĝo de la naturo de la homo, nur kun tiu diferenco, ke la kulpon pri malbonigo de la praentianoj ĝi metas sur la bonkorecon de la Sinjoro, kiu kontraŭdiris kun la Sinjora arto de kreado. Ĉar la fragismo implicite supozas, ke Dio ne povas krei aferojn, kontraŭdirantajn inter si, – ekzemple, kombinon de absoluta bonkoreco kun absoluta libero de la volo; el tio sekvas, ke super Dio regas la logiko, kiu

ne permesas samtempan ekziston de statoj, logike ekskluzivantaj unu la alian, kaj tio determinas la limojn de la Ĉiopoveco – tamen, la kreintoj de la herezo mem ne konsciis pri tio.

La komencon de la Nova Tempo la entianoj datas per la jaroj 1811–1845. Klareco – aŭ pli ĝuste, ekzakteco, – de ĉio okazanta en la imperio ĉesis ekzisti dum jaroj de regado de la kvar falsaj Ksiksar-oj, nomitaj logokratoj. Komenciĝinta per bruligo de ĉiuj kronikoj kune kun la kronikistoj, la logokratio atingis tian perfektecon, ke ĝiajn fontojn ne eblas trovi precize. Inter apokrifoj, rakontantaj pri la afero, mi hazarde elektu la uvardan. Ksiksar, vica monarko el la dinastio de Ksiksoj, laŭ ĝi havis kutimon ĉiutage antaŭ unua manĝo mortigi en la palaca menaĝerio delonge ne nutritan kaj tial furiozantan kurdlon. Antaŭ la okuloj de la ĉefa imperiestra ĉasisto la kurdlo laŭdire ĵetis la reĝon en malplenanputon, aŭ Ksiksar mem saltis tien, saviĝante de la ekatakinta monstro, kiu poste ellasis en la kavon urinon, por ke la kaŝiĝinto elflosu supren. La ĉasisto mortigis la monstron kaj savis la monarkon, sed tuj komprenis, ke li pagos por tio per la vivo, ĉar la reĝo, por ŝtata utilo, devos ekzekuti sian savinton – atestinton de sia malhonoro. Tial la ĉasisto, kutimiĝinta dum ĉasado agi rapide, ĵetis Ksiksaron reen en la ĝisrande plenigitan puton kaj tenis lin tie kiom estis necese, post kio li mem surtroniĝis kiel Ksiksar. Tiu historio ne nepre estas pura elpenŝaĵo, se supozi, ke li interŝanĝis la veston kun la murdito; la afero estas en tio, ke entianoj de tiu epoko ŝirmadis la vizaĝon, kiel ni ŝirmas hontindajn korpopartojn. La vero laŭdire baldaŭ malkovriĝis, sed nemalmulte da potencaj artistokratoj ekstaris sur la flankon de la Pseŭdo-Ksiksar, vidante en tio sian profiton. Agante neordinare lerte, aliancante kun unuj kontraŭ aliaj, li firmigis la absolutan potencon per absoluta ŝanĝo de ĉiuj nomoj, rekte aŭ almenaŭ nerekte ligitaj kun la regado. Ĉu li mem asertis, ke estas neniam diferenco inter regado de la vera Ksiksar kaj de eksa purigisto de la menaĝerio, aŭ tion sufloris al li cinikaj konsilistoj, ne estas sciate. La logokration oni nomis politika daŭrigo de la vero; Pseŭdo-Ksiksar-on – simple Ksiksar, kvazaŭ neniam mortinta; li prenis titolon de la Unua Popolamanto kaj abolis mortekzekuton kaj ordinarajn en la justico torturojn; tamen personoj, nekonvenaj por la imperiestra kortumo

aŭ por la polico (kiu tamen jam nomiĝis *Asocio de Semantoj de la Socia Bonkoreco*), malaperadis ne sciate kiel aŭ iĝis viktimoj de akcidentoj, kaj tiel nomatajn Malutilulojn aŭ Maliculojn torturadis rabistoj (kiujn celigis, laŭdire, la *Semantoj de la Bonkoreco*). Samtempe venis fino al deklarado de militoj, kaj poste ankaŭ al militoj mem, ĉar imperiaj kronikistoj parolis nur pri rebatoj de malamikaj maĥinacioj; pri tio, ke tiuj maĥinacioj estis farataj de deko da landoj, malpli grandaj, ol provincoj de la Imperio, neniu miris, kaj se mirus, do nelonge. Speciale persistemajn martirojn la popolo mem morttretadis centre de la urbo, kaj laŭdire kun nemalgranda fervoro. Oni ne sukcesis ekscii, kiom longe regis la Pseŭdo-Ksiksar, ĉar pri lia oficiala morto oni ne deklaris. Dum ducent jaroj mortoj de vicaj monarkoj estis prisilentataj, kiel io nekonforma al la supera ordo.

Luzaniaj politologoj klarigas, ke la regado de la Pseŭdo-Ksiksar-oj estas speciala okazo de ĝenerala leĝo de la Galaksio. Ajna civilizo almenaŭ parte trairas etapon de verozio – erozio de vero, kvankam ne nepre ĝuste en tiu logokratia formo, kiel estis ĉe la entianoj. Verozio prenas malsamajn formojn, sed aperas ĉiam dum certa historia epoko, nome en epoko de embria industriigo. Perdante sakramentan aŭreolon, la potenco malfortiĝas kaj serĉas apogon en administra hierarkio, kaj tiu kreas miraĝojn (*fatamorganojn*) de sociaj rilatoj, idealigantajn la realon en grado, respektiva al ĉi-momenta intenseco de kredo, sed kredo burokratia, ne religia. Tiun fenomenon oni iufoje nomas memtrompanta trompo, aŭ memfatamorgano. La kredon je supernatura potenco de la regantoj anstataŭas la polico, kaj la procezo de cirkulado de informo ricevas tian valoron en ĉiuj rondoj de la vivo, ke estas malfacile rezisti tenton monopoligi ĝin. Ekonomia kaj informa monopoloj malsamas laŭ la objekto de alproprigo, sed similas, se temas pri konsekvencoj: ambaŭ kaŭzas sociajn oscilojn. Tiam dominas aŭ ekonomiaj osciloj (*kresko – krizo*), aŭ informaj (*vero – malvero*). Konsolado per elpenaĵo estas la plej simpla stabiligilo de la sociaj strukturoj; tamen ĝi havas tiun bonan flankon, ke multaj maltrankvilaj atendoj, sekvantaj el sciado de malagrablaj faktoj, ne realiĝas, tial per kaŝado de tiuj faktoj oni atingas protekton de homaj nervoj. Sed

ĉi tie estas tre facile troigi. Sindromo de memfatamorgano ([memkonvinko](#)) signifas, ke la produktantoj de elpenŝaĵo mem infektiĝas per la elpenŝaĵo; tio povas konduki al tiel nomata plena interna reflektado kaj absorbo en la procezo de burocirkulado, al socioskizofrenio ([oni unu aferon diras, je alia kredas](#)), kaj ankaŭ al eĉ pli komplikaj patologiaj informaj sindromoj. En normala ([averaĝa](#)) civilizo malpurigo de la informa medio per malvero atingas 10–15%; se ĝi superas 70%, aperas tiel nomataj tremantaj osciloj kun ciklo je 12–15 jaroj, kaj ĉe malpurigo super 80% filtri puran veron jam ne eblas, kaj komenciĝas kolapso. Por ĝin eviti, necesas vole-nevole frostigi la sciencon, ĉar ĝia evoluo komencas kontraŭdiri al evoluo de verozio. Finfine ambaŭ tiuj procezoj definitive disiras, kaj aperas tiel nomata disforkiĝo de Siraksos ([laŭ nomo de sociomatikisto, kiu ĝin malkovris](#)). Necesas aŭ oferi progreson de la scienco por verozio, aŭ inverse, ĉar allasi eblon de ekzisto de fermita enklavo de la vero inter reganta malvero, de iu insuleto de la vera scienco en maro de misinformo, – signifas danĝere iluziigeti. Tia stato nenie konserviĝis dum pli ol 90, ekstremokaze 100 jaroj. Stabila kompromiso inter tiuj du statoj same ne eblas. Kiu penas servi kaj al Dio kaj al Satano, atingas nenion, ricevante rezulte sentaŭgan malveron kaj sentaŭgan sciencon. Dampado de osciloj kondukas al tiel nomata flanka glitado al malraciismo, pseŭdokretenismo k. t. p.

Ju pli granda estas socia akcelo, des pli malfacile estas teni dise informon kaj misinformon; la socio entute komencas balanciĝi inter du ekstremaj statoj – pseŭdorealo kaj pseŭdokredo. Ekonomiaj cikloj surmetiĝas sur la informajn, kaj ĉar ili ne koincidas en la fazo, aperas interferenco, kaŭzanta resonancon kaj tremon. Tiaj tremantaj osciloj aperis en Luzania imperio fine de la XIX-a jarcento kaj laŭvorte displitis ĝin, kiel potenca sono, kiu, resonancante kun la propra frekvenco de glaso, displitas ĝin. Rezulto de tio estis du revolucioj, intermitigitaj de kelkaj jardekoj da kaoso, kiun historiografoj ordinare nomas kaosa anarkio. Kurdlandon tiuj kataklismoj ne tuŝis, ĉar ĝi, intence aŭ hazarde, preferis al verozio tutverismon, kio trovis esprimon en ĝia plena socia stagno; vere, diras Tetrarksiks, ne tial sidas ĉlakoĵ en siaj senĝojaj brutoj, ke ili pri nenio revas, sed male: ili

revas jam pri nenio, ĉar estas hermetike fermitaj en kurdloj; okupiĝi pri scienco eĉ en la plej granda stomako ne eblas, kaj ĝuste tio savas politmobilon de kreskantaj osciloj kaj fina disfalo.

Post tiu ekskurso en galaksian politologion ni revenu, tamen, al niaj ŝafoj, pli ĝuste, al la paŝtataro, ĉar temas pri aferoj religiaj. La eklezio – plej probable, senkonscie, – elpaŝis por verismo kaj kontraŭ verozio, ĉar ĝia hiloisma doktrino vidis en ĉiu nova malkovro kaj invento pruvon de sia praveco: se maŝinoj povis liberigadi la entianojn de malfacila laboro, kaj utilaj mineraloj faciligadis ilian ekzistadon, do, la Sinjoro vere kreis la Naturon kiel ilian servanton, modeste atendantan, kiam oni ĝin vokos. Ja la Plejalta mem ĉirkaŭigis ilin per medio, kiun eblas ekposedi, kaj provizis per racio, sukcesinta fari tion. Ili – probable, ne tre pripensinte, – metis sur la unuan lokon tiun flankon de la naturo de la Sinjoro, kiun eblas nomi «servanta» rilate al la kreitoj; jen kial en la historio de Entio estas konataj multaj konfliktoj inter politiko kaj scienco, sed preskaŭ neniam – inter scienco kaj religio. Kaj ankaŭ tio estis kaŭzo de la preteco, kun kiu la entianoj renkontis unuajn projektojn de kreado de la Etikosfero – vivmedio, nobligita per sciencaj metodoj. Tia medio, kvankam plene artefarita, konstruita laŭ reguloj de psiĥoteĥnologio, sed ne laŭ ordonoj de la eklezio, estis tamen en plena konkordo kun tiuj ordonoj: ja ĝi devis iĝi realigo de la Dia intenco. La Sinjoro donis al siaj kreitoj ĝuste tiun eblon, eblon de plena elradikigo el la socia vivo de krimoj, misagoj, mizero, katastrofoj kaj ajna alia malbono; li deziris, ke ili per propra laboro kaj per propra faro atingu tion, kion Li destinis al ili jam antaŭ la Kreo, tamen ne trudis al ili anticipe kiel pretan Paradizon, lasinte al ili rajton de tute libera elekto.

Tial vere eblas opinii la ĉefan religion de Entio pli «materiisma» kaj samtempe malpli «kalkulema», ol kristanismo, ja ĝi lokigis la Dian Regnon en tiu ĉi mondo kaj ne aldonis al ĝi la transmondon, en kiu estos donita plena repago al pekoj kaj meritoj. Povas esti, ke eblo de alligo de la ĉielo kaj de la geheno al iaj spacaj koordinatoj potenciale estis entenata de la hiloismo ([tiel nomiĝas la dominanta religio, sed, pro Dio, ne postulu, ke mi klarigu etimon de tiu vorto – ĝi](#)

aperis historie, kaj sekve, per treege malrekta maniero; por la esenco de la afero tio estas absolute tutegala), sed sur Entio ĝi ne povis realiĝi, ĉar la paradizo estis metita ĉi tie ne en la komenco, sed en la fino de la historio de la Kreo. Kio koncernas min, do mi ĉiam deziris aŭdi de kompetentuloj, kiel statas aferoj kun la paradizo, kiun la tera Eklezio promesas al virtuloj: ĉu tio estas la sama Edeno, el kie estis elpelitaj la prapatroj? Sed ĉiam, kiam aperas konvena okazo, mi forgesas demandi. Ŝajne tiu komenca paradizo estis iom pli modesta ol la postmorta.

Espero pri eterna vivo montriĝadis en la kanonoj de la kredo nur en aspekto de malklaraj revoj, en la antikveco, kiam la entianoj rimarkis sian similecon kun grandaj plumhavuloj de la suda transkotejo; laŭ ili, al la mortintoj kvazaŭe kreskadis flugiloj, sur kiuj ili forflugadis en la ĉielon; tamen nenio simila al anĝeloj aperis en la ikonografio. Mi havas nenian ideon, kial. Sobre rezonante, tio estus tute logika, sed, evidente, sobra rezonado nemulte taŭgas en tiom delikata demando, kiel anĝelologio. Hiloismo ne permesis elporti la paradizon ekster la limojn de ĉi tiu mondo, ĉar, laŭ la ĉefa postulato de la kredo, Dio donacis al la kreitoj senlimajn eblojn de plibonigo de siaj ekzistokondiĉoj; tial eblis, restante en konsento kun la Eklezio, opinii, ke la kredantoj per siaj propraj manoj atingos senmortecon en ĉi tiu mondo, se nur ne deflankiĝos de la ĝusta vojo.

Teraj teologoj, speciale la kristanaj, riproĉas hiloismon pri nesufiĉa profundeco: vere, en ĝi ne estas Mistero kiel la Unua Peko kaj la Forpelo el la Paradizo en kristanismo, nek la malbonigo de la homa naturo, nek portanta esperon Pentofaro. La entiaj teologoj respondas al tio, ke ilia religio ekde la komenco mem supozis konformon de la Dia intenco al la naturo de la Kreo – la Sinjoro kion volis, tion kreis. La teologio de la entianoj, tamen, diferencas de kristanismo kaj aliaj grandaj monoteismaj religioj en eĉ pli grava afero: ĝi ne insistas pri soleco de la Revelacio. Laŭ la teranoj, diras la hiloistoj, Dio malkaŝis sin al la unuaj homoj rekte, kaj per tio limigis ilian necertecon pri Liaj decidoj kaj Lia persono, – sed ne limigis la liberon de volo, kio iĝis la kaŭzo de la Unua Peko. Tiel asertas judaismo kaj kristanismo, malkonsentante kun aliaj influhavaj religioj,

speciale la proksim- kaj ekstrem-orientaj, en kiuj samtiom nedubsenca Revelacio ne estis aŭ ĝi havis alian karakteron. Kun tia multeco de religioj ili ne penis ion koherigi, kaj ĉiu eklezio opinias sin ekskluziva konservanto de la Dia vero, kaj ĉion ceteran – eraro. Dum la entianoj – ĉu ĉar ili laŭ sia naturo pli emas al racia pensado, aŭ pro aliaj, nekonataj kaŭzoj – la ekzistantan ĉe ili multecon de kredoj metis en la bazon de teologio. La Sinjoro, opinias ili, limigas nenies agojn kaj intencojn. Dezirinte donaci al la Kreitoj superan liberon, la Kreinto kvazaŭ kaŝis sin de ili, kaj malkaŝi lin eblas nur per meditado pri la estado. Se estus alie, asertas la hiloistoj, se Dio vere malkaŝus sin al la homoj, li farus tion tiel laŭte kaj unusignife, ke la enhavo de la Revelacio estus ĉie sama kaj ne aperus multaj religioj. Ke Dio ekzistas, diras ili, videblas el la kosma universaleco de Teogonioj, kaj tio, ke Li ne aranĝis unusolan vojon al si per unusola kosma Revelacio, sed silente konsentas pri multaj kondukantaj al Li vojoj, sekvas el la fakto de multeco de religiaj instruoj. Kiu kredas, tiu ne eraras, sed eraras tiu, kiu opinias sin posedanto de la unusola vero, Revelaciita de la Ĉielo, kaj tiaspeca ekskluziveco estas teologia eraro. La teraj teologoj respondas al tio, ke la supremenciitan rezonon eblas kaj endas apliki al hiloismo mem, kiu por neniu religio agnoskas rajton je ekskluziveco, do sekve, ankaŭ por si mem. Tiu disputo, rimarkis iu dominikano, faligas nin de la ĉielo de la kredo en la gehenon de paradokso. Tamen la luzanoj refutas la argumentojn de la homoj, ĉar la Tero, laŭ ilia opinio, troviĝas en la malpli alta etapo de la diocela moviĝo, ol Entio, kie jam delonge ne ekzistas religioj, kontraŭdirantaj unu al la alia. Ĉi tie la niaj ree montras la decidan rolon de perforto en la religia unuigo de la entianoj, sed sur tiu loko mi ĉesigu la tro longan disputon pri la Revelacio.

La tiea eklezio sufiĉe ĝoje renkontis aperon de raciaj servaj maŝinoj, ĉar ŝajnis ĉiurilate bone, ke senanimaj manekenoj prenu sur sin malfacilan laboron de la vivaj kreitaĵoj; tial malagrabla surprizo iĝis kresko de nivelo de ilia intelekto, speciale kiam ili postulis plenan egalrajtecon kun la entianoj, inklude rajton aliĝi al la eklezio. Tiuj robotoj, entiane arditroj, referencas al la instruo de la eklezio, tamen interpretas ĝin pli vaste, ol tion dezirus la eklezio

mem: ili asertas, ke la entianoj konstruis ilin, ĉar tion deziris la Sinjoro, kreinte la mondon tia, ke en ĝi estu eble konstrui racihavajn maŝinojn, per tio jam ĉesantaj esti maŝinoj. Kaj se Li ne dezirus, neniu povus fari ion similan. Al mi tio ŝajnas konvinka, sed por la tiea eklezio en tio estas malmulte da agrabla: saviĝi el tiu implikaĵo al ĝi helpis ne propra diokonstrua industrio, sed apero de racihavaj sistemoj de nekomputila speco, nome la lertonaj. Dum iuj kelkdek jaroj la robotoj malaperis; tamen, tio estas eŭfemismo, kaj malantaŭ ĝi kaŝiĝas teruraj okazaĵoj, nomataj de multaj kibernocido. Ĉu entianoj mem eĉ per fingro ne tuŝis eĉ unu ardriron? Tio estas ridinda senkulpigo. Anstataŭe pri ili okupiĝis lertonaj sistemoj; ja ankaŭ ĉasisto ne mem pelas leporojn kaj ne per la propraj dentoj kaj ungoj ŝiras ilin. En arbaroj kaj kavernoj okazis, laŭdire, teruraj aferoj, kaj oni diras, ke estis entianoj, pretaj prefere pereji kun siaj ardrirtoj, ol eldoni ilin por malmunto. Estas mirinde, kiom tio memorigas al mi iujn momentojn de nia historio. Se io tia okazus ĉe ni, verŝajne troviĝus dezirantoj montri robotojn kulpantoj pri ĉia malbono, novega enkorpiĝo de Satano. Oni diros al mi, ke pri tio ne indas paroli, tio estas pura abstraktaĵo; sed tio, kio ankoraŭ ne okazis, povos iam okazi.

Al bonaj rilatoj inter religio kaj scienco nemalmulte helpis la pterogenezo de la entianoj; ne hazarde, kiam iliaj natursciencistoj malkovris tiun fakton, okazis nekompareble malpli da bruoj, ol ĉe ni post la Darvinaj simiaj sensacioj. La simi-simila praulo ekde la komenco mem iĝis kaŭzo de brulanta ofendiĝo: ja la homaj popoloj ekde nememoreblaj tempoj opiniis la simion karikaturo je la homo, kaj karikaturo tute ne amika. Simiado, alivorte fiimitado, estas ofenda vorto en ĉiuj lingvoj. Malmultaj animaloj tiom malbone konvenas por idealigo, kiel simio. Tamen birdoj kiel prauloj ne kaŭzis sur Entio eĉ etan reziston, – kiel en la monduma, tiel ankaŭ en la eklezia medio; ilia loĝloko tradicie estis opiniata la ĉielo, do la entia eklezio povis la instruon pri pterogenezo opinii scienca konfirmo de sia propra instruo: praentianoj kvazaŭ deiris de la ĉielo sur la teron. Tiom konkorda dueto de la scienco kaj la kredo estis la plej bona konfirmo de vereco de ili ambaŭ; ĝuste tiel la Sinjoro sciigis, ke la supozoj de la entianoj en ambaŭ flankoj de la estado estis

egale ĝustaj. Samtempe frua kreo de evolua teorio akcelis evoluon de la naturscienco, kaj tial la entianoj atingis genĝenerion fine de la XX-a jarcento, kiam aperis ankaŭ unuaj specimenoj de arditroj. Estas tre karakterize, ke ne teologio, sed filozofio unua elpaŝis por defendo de netuŝebleco de la natura korpo, kiel mi jam diris, citante Ksiksokt-on. Sarkasmemuloj asertas, ke teologio altiras ne la plej altajn mensojn, diference de filozofio, ja en la unua la fina rezulto de esploro estas sciata anticipe, kaj en la dua ĝi rolas kiel absoluta, de neniu antaŭdifinita enigmo; kaj el tio kvazaŭ fontis la infaneca senhelpeco kaj eĉ ĝoja entuziasmo de la hiloismaj teologoj pri la programo de la memevoluiĝo. Ja korpa perfektigo de la entianoj, ŝajnis, rekte sekvis el la baza dogmo pri la mondo kiel materialo, kiun la Sinjoro tiel prilaboris kaj donis en la posedon de la homoj, ke tiuj uzu ĝin kun plej granda utilo por si. Kaj ĉar ili mem estis parto de tiu materialo, nenio montris al tio, ke ilia memrekonstruo en strebo al perfekteco ne plaĉas al Dio. Ksiksokt kaj similaj al li, tamen, agordis la publikan opinion kontraŭ tiu tro fidema kredo.

Kio ankoraŭ? Niaj teologoj diras, ke la entianoj rezignis de la eterneco, kaj ili al ni – ke kristanismo neglektis la teran vivon, opiniinte ĝin atendejo aŭ antaŭscenejo de la transmondo, pri kiu, kion ajn oni diru, nenio estas sciata kun tia certeco, kiel pri tiu ĉi mondo, kaj ja kreis ĝin, laŭ la unuanima opinio de ambaŭ planedoj, la Sinjoro, tial estas malfacile imagi kredon pli strangan, ol la kredo, vidanta en la Dia Kreaĵo provizoran konstruon, detruotan en la Dia Juĝo. Kiaj pretendoj, diras ili, kia orgojlo sub masko de humiliĝo, – anstataŭ kontentiĝi per la Dia pasero en la mano, postuli alaŭdon en la ĉielo, kie estos pli da komforto kaj eternaj trufoj! Por la entiaj teologoj sufiĉa kaŭzo por zorgi nur pri ĉi tiu mondo estas ĝia ekkonebleco por la mortema racio. Kaj se tio malplaĉus al la Sinjoro, la racio kontraŭstarus al la mondo, sed ne povus ĝin ekkoni kaj ekposedi ĝin kun ĉiuj kaŝitaj en ĝi trezoroj kaj potencoj. Tion, ke la afero statas ĝuste tiel, pravas la malfermiteco de la Kreaĵo al la raciaj estaĵoj, kvankam tia malfermiteco ne egalas al tia komuto de komutilo sur la Dia fervojo, ke ajna socio senĝene veturu laŭ ĝi ĝis sia planeda paradizo. Ĝenerale, la tieaj teologoj montras nemalgrandan moderecon en interŝanĝo de interekleziaj deklaroj,

sed eblas trovi ankaŭ tiajn, kiuj asertas, kiel Ksiks Ksass, ke sur la fundo de nia teodiceo kuŝiĝas ne «la pura malbono», sed malbono, en neevitebla maniero kuniĝinta kun erotiko. Ksass asertas, ke la homo ekde antikvaj tempoj sciis aŭ, pli ĝuste, divenis tion, sed ne deziris konfesi tion al si mem, kaj nur kaŝis la konscion de «kulpeco sen kulpo» per la frazo pri «la naturo de la homo, malbonigita jam en la lulilo».

Ĉi tie en la rezonadoj de Ksass pri la teraj aferoj aperas la simio. El demonologia ikonografio estas sciata, kiom malproksime etendiĝas simileco de la diablo kun simio: ja li same havas voston, kaj estas kovrita per hararo, samkiel grandaj antropoidoj, kaj la kranion li havas tute simian, oblikvan, kaj la dentojn same, kiel tio videblas sur pentraĵoj de mezepokaj pentristoj kun bildo de la Dia Juĝo; kaj kvankam ili, sendube, fantaziis, necesas demandi, kial ili prenis kiel modelon ĝuste simion, sed ne, ekzemple, rabobirdojn? Kial birdajn atributojn ili atribuadis plej ofte al senpekaj estaĵoj, ekzemple anĝeloj? Kial ne nur manoj, sed ankaŭ piedoj de la pentrataj diabloj estis kroĉemaj? Kial diabloj paŝas sur du piedoj, kiel superaj simioj, sed ne sur kvar, kiel ekzemple drakoj? Nereligiaj entiaj antropologoj opinias tiun koncepton erara, ĉar en ĝi temas nur pri imagoj de nur unu rondo de la tera kredo, ja daoismo aŭ budaismo ne konas la eŭropajn enkorpiĝojn de la malbono; sed tiujn, kiu interesiĝas pri ekstremaĵoj, mi sendas al la «Kompara anatomio de la diablo», eldonita de la Instituto de Sankta Hiloistiko en Urks, kies patrono estas ĝuste tiu luzania teologo; se li eĉ eraras, do en tre interesa maniero.

Ni revenu al pli gravaj aferoj.

Dum en la sfero de la kristana kulturo la nova erao, datita per la naskiĝo de Kristo, estis seninterrompa atendo de la Fino de la Mondo kaj de la Dia Juĝo ([kaj unuaj kristanaj komunumoj atendis tiun finon tuj, kaj pli malfruj – kun kreskanta prokrasto, ĝis, finfine, la Dia Juĝo forŝoviĝis ien en nekonatan estontecon](#)), la entia mezepoko, koninta nek eŝatologian timon, nek eŝatologiajn esperojn, atendis ion tute alian – nekonatajn ŝanĝojn kaj

sortoturnojn, kiu plenumus la Dian promeson, ke kun Lia zorgo, sed per la propraj manoj la popolo venkos la malsanojn, mizeron, kriplaĵojn, malsaton, kaj fine eĉ la morton. Do, kvankam kaj ĉe ni kaj ĉe ili oni atendadis, sed tiuj atendoj diferencis inter si, kiel la ĉielo kaj la tero.

Nur per tio eblas klarigi, de kie, propre, aperis ĉe la entianoj ĝermoj de feliĉologio kaj gedonistiko kiel doktrinaj sciencoj, komence ekleziaj, kaj poste ĉiam pli kaj pli mondumaj, – sciencoj, kies celo estis trovo de kondiĉoj de speciala kaj ĝenerala beateco. Sian kontribuon aldonis al tia orientiĝo ankaŭ la biologio de la entianoj, malhelpanta transformiĝon de konsumado en misuzadon, ĉar super la entianoj ne pendas plurklinga Damokla glavo de erotika orgiastiko: kvankam ankaŭ ili kapablas trovi ĝuon en kruelaĵoj, tamen sen erotika komponanto, ne ebla sur Entio. Sur ili kuŝas tiu neforviŝebla stampo, kiun sur ĉiujn raciajn (kvazaŭe) estaĵojn metas la rabobesta etapo de la evoluo, alivorte tiu cirkonstanco, ke ne ekzistas kresko de animala intelekto sen inico al sangoverŝado.

En la historio de hiloismo estis skismoj kaj estis skolastiko, sed ne similaj al la teraj. Ne bezonante rompi sian kapon pri problemoj, kun kiuj suferis nia skolastiko – kiel estas aranĝitaj la paradizo kaj la infero, kien iras la animoj de nebaptitaj beboj, kio okazas en la purgatorio, per kio la vivantoj povas helpi al anatemitoj provizore aŭ por ĉiam, kiom da anĝeloj povas sidiĝi sur la pinto de kudrilo, – iliaj teologoj kreis skolastikon, kiu tute konvenis, kiam aperis teĥnologio de izoligo de malbono kaj semado de bono. Tamen, post mil jaroj aŭdiĝis voĉoj, ke tiu antaŭteĥnologia gedonistiko estis proksimiganta la fatalan rezulton, ĉar ĝiaj adeptoj tro facile, eĉ facilanime kaj eĉ kun entuziasmo okupiĝis pri realigo de planoj, proponitaj de teologoj. Sed tio, laŭ la opinio de la specialistoj, estas simpligo: estas absurde opinii, ke la teĥnologio pruntis la agrogramon de la kredo.

Tamen, estas malfacile rakonti pri la feliĉologia skolastiko per du vortoj, ja al ĝi estas dediĉitaj amasoj da inkunabloj kaj manuskriptoj, kiujn oni verkadis dum jarcentoj. Ekleziaj gedologoj,

kiuj esploradis la problemaron de ĉies feliĉigo, penis komence trovi, kiom da specoj de beateco ekzistas, kaj kio ĝin vokas. Unu afero estas mallongaj ĝuoj, alia – *status delectationis* <sup>[33]</sup>, aŭ, finfine, la beata stato. Da similaj distingo estis farite multege, sed sume oni kutimas diri pri maksimumo kaj minimumo de bono. Minimumo egalas nur al plena malesto de malbono, kaj maksimumo estas plena feliĉo. Kiel pri kuriozaĵo mi menciis pri teorio de doktoro de gedomatiko Skirruks: sento de maksimumo ne koincidas kun la vera maksimumo, sed havas du pintojn – en la fazoj de antaŭĝuo kaj retrospektivo, tio estas antaŭ la pinto mem de la kurbo de intenseco de bonaj sentoj kaj tuj post ĝi; tiu, kiu estas sur la pinto mem, pri tio ne scias; oni tion konscias nur dum atendo kaj dum rememoro. Jam el tio videblas, kiom ne simpla estis la gedonistika skolastiko. Mi listigu nur nomojn de kelkaj fakoj de Codex Felicitomanticus, siaspeca leksikono de ĝuigo (la XIII-a jarcento): «Preskaŭ-tuŝo de faciliĝo kaj feliĉo», «Ĝuigo poioma kaj subita», «Ĝuo de asketeco dum saltosimila rezigno pri ĝi», «Infinitezimaleco de feliĉo» (tio estis, laŭdire, tre grava, sed poste forgesita malkovro – ke baldaŭ post atingo de feliĉo komencas fali sensiveco al bonaj sentoj, kaj por teni ĝin sur inda nivelo necesas psiĥoakupunkturo). Aparte staras tiel nomata «Nigra familio de feliĉoj» – ĝuo pri tiraneco, turmento, torturoj; temas pri feliĉo, sekvanta el malfeliĉo de aliuloj. Al la sama fako apartenas pantoklastiko (kontentiĝo pro neniigo de io) – delir-ĥimera (tio jam, fakte, estas la tereno de psiĥiatrio), degenera kaj memmortiga, aŭ suicida. (Iu mezepoka monaĥo elpensis altrucidajn ĝuojn, tio estas ĝuoj, sekvantaj el sukcesa inklinigo de proksimuloj al memmortigo, ja tiu, kiu postvivis aliajn, ricevas de tio plezuron. Necesas substreki, ke tiu monaĥo tute ne nepre estis infera estaĵo; simple lia ordeno – la felicitoj – esploradis ĉion, kio povas plezurigi, malgraŭ morala takso de la esplorataj fenomenoj.) Eĉ la katalogoj de antikvaj kolektoj de eklezia gedonistiko per si mem estas interesege legaĵo: el ili videblas, ke ne ekzistas tia malfeliĉo, kiu en certaj kondiĉoj ne povus iĝi por iu fonto de dolĉaj sentoj. Ĉiaspecajn nuancojn de feliĉo, ricevata per inda aŭ malinda maniero, esploradis fratoj fipraksanoj; Fipraks mem, oni diras, ordonis turmenti sin laŭ plej artifika metodo, por trovi, ĉu hazarde ne estas ankaŭ tie almenaŭ grajno de anima

kontentiĝo, kaj estis deklarita martiro de la scienco pro la sinofero, montrita dum tiuj eksperimentoj.

Ekumenismo ankoraŭ ne iĝis interplaneda, tial nekalkuleblas filipikoj de niaj teologoj kontraŭ hiloismo; sed mi ree limigos min per nur unu ekzemplo – kritika analizo de la entiaj ideoj pri la Kreinto kiel pri «la Dio de la aĵoj», al kiu la kreitoj servas, servante al si mem, kio kvazaŭ reduktas ilian religion al serĉado de Dia sankcio por kolektiva egoismo, kaj en la plej bona okazo – al doktrino de tia perfektigo de la socio, kiun povus tute kaj plene akcepti ajna grupo de laikaj ateistoj. Tiu ĉi kontesto, respondas la entianoj, estas sekvo de malagordo kaj disiĝo de nocioj, aperintaj en malsamaj mondoj. Al hiloismo ne estas fremda la nocio de tute senprofita servado al la Sinjoro. Sed komencante de la Frua Mezepoko, ekde la Unua Koncilio, la deviga por la kredantoj servado al Dio povas esprimiĝi neniel alie, ol en ilia vivmaniero. La patroj de la entia eklezio en siaj enciklikoj klarigas, ke oni ne nur ne menciuj la Dian nomon vane, sed ankaŭ ne petu la Ĉiopovulon pri io ajn. Oni rajtas nur danki Lin pro la ekzisto, sed eĉ tion fari silente, senforte – en sia koro. Kaj oni ne devas peti Lin pro tio, ke tio estus montrado aŭ de infaneca naiveco (en kio ne estas peko), aŭ de nesufiĉa kredo. Tiu, kiu kreis la mondon, ne interesiĝas pri vantaĵoj; la vivo de ĉiu estaĵo kune kun nesciata estonteco por Li estas malfermita libro, ĉar la Sinjoro estas ekster la tempo. Lia atributo estas senfina eterneco. Li kreis la mondon, kune kun ties astroj kaj loĝantoj, do vokis ĝin al ekzisto tia, kian Li ĝin deziris vidi, – ĉiun galaksion kaj ĉiun polveron. Tial estus io infaneca aŭ malaprobinda postuli de Li ajnajn ŝanĝojn, korektojn, komplezojn, enmiksiĝon aŭ neenmiksiĝon por intereso de personoj aŭ grupoj.

Kiel ni vidas, la malpermeson turni sin al la Sinjoro vane, konatan ankaŭ al ni, la entianoj evoluigis ĝis la lasta ekstremo, kio jam estas por ni ne tute komprenebla. Laŭ ilia konvinko, penoj influi al la Dia volo per peto, preĝo kaj eĉ per penso estas atesto de kredo malforta kaj neracia, ja ili signifas malkonsenton kun la Dia penso kaj malfidon al Lia karitato. Ĉe konstantaj prezoj sensencas marĉandi, kaj neniu faras tion kun sobra prudento, kaj eĉ se faras, do pro ŝato

de marĉandado mem; kaj kvankam la entiaj teologoj bonege scias pri psiĥoterapia efiko de preĝo, pri sento de faciliĝo kaj espero, kiu akompanas ĝin, ili, tamen, vidas danĝeran dubon ĝuste en tio, en kio niaj teologoj vidas virton. Kiu ne dubas, diris patro Hiksion la Dua, tiu pri nenio petas. Rememorigi la Sinjoron pri si – signifas rilati al Li kiel al telefonstacio, blokita dum pinta horo; preĝi estas kvazaŭ skui la konektilon kaj frapi la telefonon, kaj arde preĝi – signifas altigi la internan voĉon ĝis krio, por ke oni vin aŭdu. Ĉio ĉi pridubas la absolutan, kaj sekve neperfektigeblan Ĉioscion kaj Ĉiopovon de la Bono. Pensi, ke la Sinjoro rigardas en alian flankon, ne tien, kie troviĝas la petanto, povas nur infanetoj. Se tamen Li ĉion vidas kaj pri ĉio scias, do sensencas ŝoviĝi al Liaj okuloj kaj peni altiri Lian atenton per solenaj votoj kaj altega koncentrado de pieco: la Sinjoro povas vidi nin pli profunde, ol ni mem kun niaj preĝoj kaj votoj. Ĝis la Dua Koncilio estis ankoraŭ permesite preĝi por aliaj, sed ne por si mem; post ĝi – jam ne plu. La psikologia faciliĝo, atingata per preĝo, estis abolita; aliokaze, asertas la entianoj, egoismo, tio estas zorgo de ĉiu pri personaj aferoj, superus la kredon je senpekeco de la Plejsupra. Servado al aliuloj ja estas servado al Dio, ĉar per tio plenumiĝas la intenco de la Kreo, komprenata kiel moviĝo al perfekteco.

Estas nekompreneble, kiel povis konserviĝi la doktrino de la kredo en kondiĉoj de kuniĝo de la eklezia kaj la laika potencoj, – ŝajne, la instruo devus ŝanĝiĝi konvene al la interesoj de regantoj, kiel tio estis ĉe ni sur la Tero (*ĝuste tia, ekzemple, estas deveno de la anglikana religio*). Nemaigrandan rolon ludis tie la celita en estontecon dogmo pri «ĉi-monda paradizo», kiu estos konstruita, kiam aperos ĉiuj necesaj por tio rimedoj. Tian malrapidemon, sekvantan el la dogmaro mem, tio estas agnoskon de neceso de prokrasto en la afero de perfektigo de la socio, oni povas vere opinii ordinara artifiko de la potenco, celanta fortiri la atenton de la simpla popolo for de la nunaj malfeliĉoj kaj zorgoj, kaj ĝuste pri tio riproĉadis la eklezion la entiaj liberpensuloj, kaj ankaŭ herezuloj. Ĉiuokaze, la «enkonstruita en la religion prokrasto de plenumiĝo de deziroj» nemalmulte helpis al disvastiĝo en la socio de humoro de «silenta atendado», kiam la potencon atingadis monstroj kiel la tri

Pseŭdo-Ksiksaroj (mi ne scias, kial oni kutimas paroli ĝuste pri tri, se ne estas sciata io ajn eĉ pri unu aparte; sed mi pensas, ke almenaŭ samtiom da malklaraĵoj renkontus entiano en nia universala historio). Apenaŭ mezepokaj pastroj kaj teologoj povis almenaŭ iel antaŭvidi evoluon aŭ, pli ĝuste, aperon de la scienco (ja ĝi tiam tute ne ekzistis), kiu permesus al la entianoj reale okupiĝi pri plenumiĝo de la ordono pri «perfektigo de ĉi-mondo». Ŝajnas, tamen, ke ili, kvankam ne povis atendi ion similan surbaze de scioj, kiujn ili posedis, kredis je tio ne malpli firme, ol la kristanoj je la postmorta saviĝo.

La influo de la kredo, retenanta la socian evoluon, komencis malfortiĝi en la popolo ĉe la fino de la XXII-a jarcento. Oferto de varoj kreskadis, la socia piramido ĉiam pli kaj pli platiĝadis, kaj, kiel kutime okazas dum industria salto, ĉio komencis akceliĝi: produktado, komerco, komunikado, migrado. Modera bonstato iĝis tute atingebla, kaj ĝuste tio subfosis la fundamenton de la kredo. Almenaŭ tiel asertas la historiistoj. La popolo atendadis la promesitan de la eklezio plenumiĝon de deziroj, plenumiĝon tiom plenan kaj luksan, ke neniu imagis, kiel ĝi devas aspekti, kaj ĝerma bonstato, kiun oni sukcesis gustumi, elrevigis, kvazaŭ ĉiuj subite pensis: «ĉu tio do estas ĉio?» Ĝuste tiam komenciĝis la monda milito, mirinda pro tio, ke ĝi ĝis la fino restis ŝtata sekreto.

Oni nomas ĝin diverse: «la kaŝita milito», «la mirinda milito», kaj malpleje eblas ekscii el la luzaniaj fontaĵoj pri la kontraŭulo, kontraŭ kiu okazis tiu sekreta batalo. De la kontraŭulo mem entute nenio eblas ekscii, ĉar post ĉirkaŭ dudek jaroj tiu senspure malaperis, kvazaŭ neniam ekzistis sur la planedo. Eĉ la nomo mem de la malamika ŝtato ne konserviĝis iom fidinde. Estas sciate, ke amplekse ĝi estis ne malpli granda ol Luzanio, troviĝis sur la antipoda flanko de la planedo, ĉe la Suda poluso, sur la Cetlanda kontinento, kaj ke la luzanoj nomis ĝin Nigra Klivio, kaj la kurdlandanoj – Holivio. De ĝi nenio restis, krom dezerto kun profundiga je kelkcent metroj eterna frosto. La luzania registaro establis sur tiu morta, senhoma teritorio eternan kvarantenon kaj ne permesadis – almenaŭ, laŭ atingeblaj fontaĵoj – eĉ al unu scienca

aŭ milita ekspedicio eniri sur la teron de Cetlando. Niaj luzanistoj kreis pri tio multajn hipotezojn, sed ili ne kuniĝas en iom klaran bildon.

Nigra Klivio, aŭ Holivio, neniam deklaris militon al Luzanio, kaj neniam eniris en militan konflikton kun ĝi, sed penis ekposedi tutan Ention kaŝe, nerimarkeble, ĉirkaŭire. Ĝiaj loĝantoj, tamen, same estis entianoj, sed de alia raso kaj eble eĉ de alia specio. La afero estas en tio, ke, kiam hordoj de nomadoj laŭ la ekvatora istmo trairis el Taraktio en Cetlandon ([proksimume samtiame, kiam ilia alia parto penetris al la vulkana altebenaĵo norde de Taraktio, kie poste aperos Luzanio](#)), – post vico de naturaj kataklismoj aperis profunda subakva fendo, izolinta la antaŭe ligitajn kontinentojn; tiel komenciĝis la granda disiĝo de la praentianoj, kaj post nur cent mil jaroj la konkerintoj de Cetlando fizike ŝanĝiĝis sub influo de la malmildaj kondiĉoj de tiu polusa kontinento. Ili estis malpli altaj, ne tiom longkruraj, ilia staturo, antaŭe tute rekta, iĝis iom klinita antaŭen; en la antikvaj kaj mezepokaj tempoj ili distingiĝis per speciala krueleco rilate al fremduloj, tio estas al la entianoj de Taraktio, kaj, laŭdire, ekstermadis unu post alia ĉiujn ekspediciojn, atingintajn ilin tra la koteano. Komence iliaj triboj okupiĝadis pri ĉasado, poste dum jarcentoj unuiĝadis kaj ree disfalis je malgrandaj ŝtatoj, sed fidindaj informoj pri ilia historio mankas. Tio klarigeblas, laŭ mi, per tio, ke la luzanoj, suferintaj pro la nedeklarita kaj oficiale eĉ neokazanta milito, faris al ili teruran baton, kaj ĝia efikeco montriĝis tiom terurega, ke la venkintojn ekposedis sento de nekompensebla kulpo. Laŭdire, la klivianojn gvidis ia speciala imperativo, ĉu religia, ĉu laika, kiu postulis de ili nenion kompati pro ĉies Ka-Undrio.

Kio estis tiu Ka-Undrio, mi ne sukcesis kompreni, kvankam trafosis tutan bibliotekan ĉambron, kaj tio estas ne malmulte. Tamen, la nomon mem elpensis la pentistoj – la hiloisma ordeno de pentofarantoj, kiu okupiĝas pri rememoroj pri la terura sorto de klivianoj; la luzania registaro rilatas al la pentistoj tolereme, tamen ili ne rajtas turni sin al la luzania socio kaj diskonigi ajnajn informojn pri internaj aferoj de la ordeno. Kaj nur danke al informlika oni scias,

ke la klivianoj, difference de la nordaj entianoj, paroladis preskaŭ senbrue, kvazaŭ kapablis nur raŭke flustri, kaj ilia senvoĉa lingvo ne havas proksimajn analogojn kaj en la kurdlanda, kaj en la luzana lingvoj. Ka-Undrio – tio estas simbolo, per kiu la pentistoj signis – sed propre, kion? Ĉu naciajn interesojn de la klivianoj? Ĉu esencon de ilia ŝtateco? Ĉu planon de konkero de la planedo? Ĉu vojon al feliĉo? Aŭ ĉu la feliĉon mem? Mi volonte diskutus kun iu monaĥo de tiu ordeno pri tio, kiel ĝi estis en la realo, ĉar, kiel mi jam diris, estas malpermesite diskonigi ajnajn informojn pri Klivio. Oni nomis Ka-Undrio iun universalan ideon, postulantan egajn oferojn, inklude la vivon mem, – tio ŝajnas nedubinda. Ĉiujn ceterajn entianojn la klivianoj nomis Hs-Hsce, kio signifas «Nenion-Komprenanta». Kaj ĉar la Nenion-Komprenantojn ne eblis kredigi je Ka-Undrio, kaj tiu kretenaro, laŭ ili, staris sur la vojo al la Plenumiĝo – de mi ne scias kio – tial ili penis sklavigi aŭ neniigi ĉiujn neklivianojn. Probable, ĉi tie okazis tre interesa transformiĝo: unue ili luktis kontraŭ la Nenion-Komprenantoj nur simbole kaj magie ([kaj murdadis ĉiun, kiu trafadis en iliajn manojn, nomante tion Konverto](#)), kaj poste pli kaj pli reale, laŭgrade de ilia ekposedo de teĥnologioj. Ili estis majstroj pri ĉiaspecaj meĥanikaj metioj. Ŝajne, ĝuste ili unuaj inventis aŭtomatajn batalmaŝinojn, el kiuj poste aperis tiel nomataj Ultimitraloj, kaj poiom entiris Luzanion en vetarmadon. Sed ĉar la klivian version de tiuj eventoj, koncernantan la Malfruan Mezepokon kaj la unuan jarcenton de la Nova Tempo, ne eblas aŭdi, kaj la luzanoj, certe, estas partiecej pri tiu afero, honesta esploranto devas meti super ĉio ĉi grandan demandosignon. Ĝuste tiel, tamen, faras la plej multaj luzanistoj.

Komence la ok mil mejloj da koteano, dividantaj Taraktion disde Cetlando, faris la konkuradon de surteraj armiloj ia reciproka frenezo sen ajna milita senco. Estis, tamen, militemaj stabanoj, kiuj postuladis, ke la luzania armeo ataku Cetlandon, tamen nenio tia okazis, kaj ĉiuj ĉi planoj estis abortigataj de pli prudentaj politikistoj. La klivianoj tre bone sciis matematikon kaj scipovis kalkuli malvarmsange. La mistika, aŭ, ĉiuokaze, mistera karaktero de Ka-Undrio, gvidanta ĉiujn iliajn penojn, tute ne malhelpis al ili agi sobre. Kvankam ilia gvidanta ideo de konkero estis, eble, sensenca ([ja](#)

ĉu ekzistas aliaj?), tamen ĝi estis realigata mirinde regule. Ĝi, sendube, postulis gigantajn elspezojn, ja tio estis jam la epoko de industria akceliĝo, kaj necesis ĉiam post kelkaj jaroj projektadi kaj lanĉadi produktadon de tute novaj, ĉiam pli multekostaj armospecoj. Luzanio, kun ĝiaj naturaj riĉaĵoj kaj pli favora klimato, kiu, krome, unua eniris la industrian epokon, ne postrestis de sia kontraŭulo eĉ unu paŝon, sed malkontentis, ĉar financa pezo de armilaroj, nomataj pure sindefendaj, senĉese kreskadis. La granda monda milito komenciĝis silente, sen eĉ unu pafo, sen bataloj de grandaj trupoj, ĉar ĉiuj operacioj estis kriptomilitaj. Oni eĉ ne scias, kiomgrade estas ĝustaj informoj de kelkaj kurdlandaj fontoj (Kurdlando konservis en tiu konflikto neŭtralecon, tre relativan, kiel ni vidas), ke la kontraŭuloj provis malutili unu al la alia, kaŭzante distancan perturbon de klimato kaj tertremojn; eble, tio estis nur minacoj, peno timigi la malamikon aŭ psikologia atako kun celo igi la malamikon investi en senperspektivajn kontraŭrimedojn. Tamen, grandaj centraj lagoj de Cetlando vere malaperis en sisma fendo, sed nenio indikas artefaritecon de tiu katastrofo. Ĉiel ajn, rektan kolizion la afero ne atingis. Preskaŭ samtempe Taraktio kaj Cetlando eniris en la epokon de bioteĥnologio. Ne eblas ekscii, kiu unua uzis tiel nomatan koncipan armilon. Necesas memori, ke la batalintaj trans la oceana vastaĵo kontraŭuloj estis entianoj, kaj ilia kopulacio okazas per polenado. Iu ekuzis «patofekojn» – patogenajn fekundigilojn. Ŝajnas, tamen, ke tion faris la klivianoj. Dum kelkaj jaroj Luzanio devis solvi seriozegajn demografiajn problemojn: naskiĝadis multegaj infanoj kun denaskaj kriplaĵoj. Sed eĉ tiam ĝi ne agnoskis tion, ke la endemio de onkologiaj naskiĝoj estas iel ligita kun Klivio, kaj des pli tion, ke al tiu sekreta atako la luzanoj respondis per neniiga kontraŭbato.

En la biblioteko de MEA, mi ne scias kial, entute malestas milita fako, kaj la verkon de generalo doktoro Brümmel, dediĉitan al la transkontinenta biologia milito sur Entio, mi trovis tute hazarde. Brümmel (sed povas esti, ke Brümmli, mi jam ne memoras) supozas, ke la milito ekde la komenco mem estis genetika: li mem, ŝajne, estas fakulo pri tiaspeca armilaro. La generalo-doktoro (hodiaŭ ne eblas iĝi ĉefstabano sen kelkaj sciencaj rangoj) pretas allasi,

ke Klivio unua komencis dissemi super Luzanio patogenojn, aŭ patofekojn, kreskigatajn en biomilitaj kompleksoj; sed nur parto de tiel koncipitaj infanoj iĝis nevivkapabla. El milita vidpunkto, afereme kaj seke klarigas la generalo-doktoro, neniigo de la viva forto de kontraŭulo biologie, per distanca fekundigo, estas tre komplika tasko. Certe, specialaĵoj de la natura reproduktado de entianoj multe faciligas ĝin, sed la afero estas en tio, ke spermatozoo, tro diferencanta de la normala, estas malakceptata de la ovario, kaj spermatozoo nesufiĉe patogena kaŭzas naskon de kuracebla idaro. Projektado de spermatozoo (ja tio estas veraj projektaj laboroj, kaj ili estas farataj en specialaj projektejoj, kun etato, konsistanta el speciale preparitaj unuaklasaj sciencistoj), kiu ne estus malakceptata de la organismo de femalo kaj samtempe estus detrua por embria evoluiĝo, postulas grandegajn sciojn kaj altan teĥnologian nivelon. Dirante mallonge, la luzanoj bonege finfaris tion, kion la klivianoj komencis ne tre bone, ĉar la unuaj multe pli progresis en la tereno de bioteĥnologio, aŭ pli ĝuste, de milita teĥnobotiko. Ili ne agis impete kaj ne limiĝis per duonrimedoj, sed batis la klivianojn per la «malpura fekundiga armilo» en tia skalo, ke tuta loĝantaro de Cetlando formortis dum vivo de unu generacio: enuteraj embrioj mortigis ĉiujn naskokapablajn klivianojn. La luzanoj, diras generalo Brümmler, uzis «flugfekojn», aŭ flugantajn fekundigilojn, kiuj garantias koncipon, kaj la embrio transformiĝas en malignan tumoron, mortigantan la organismon de la patrino, antaŭ ol okazos nasko. Samtempe la luzanoj uzis ĉe si iajn metodojn de kontraŭkoncipa defendo, timante, ke Klivio respondos per sama bato; sed ĝiaj armilistoj ne havis sufiĉan tempon, aŭ eble ne scipovis kreskigi same mortigajn koncipilojn.

Nesciate kiel onidiroj pri tiu katastrofo atingis terajn ĵurnalistojn; iu Howard Pintel skribis en sciencfikciaj revuaĵoj, ke sur Entio agadis «brigadoj de kontraŭkoncipistoj», kaj ankaŭ «koncipaj polenĵetiloj», sed tio estas evidenta deliro, ĉar entianoj reproduktiĝas ne tiel, kiel imagis la malklera ĵurnalisto. Estis, certe, provoj rompi la ekosferan ekvilibron, sed ne ili donis al Klivio la baton, poste iĝintan genocida. Same ekzistis neniam «militaj abortigistoj» en Luzanio: trupoj de civitana defendo konsistis el speciale preparitaj kuracistoj kaj

biologoj. Finfine, ne eblis kaŝi formortadon de la tuta loĝantaro de la malamika ŝtato, daŭrintan dum longaj jaroj. Tamen, ĝi, probable, ne formortus tute, se la luzanoj ne subtenadus super la malamika teritorio necesan koncentron de la murda poleno. Ĝia centprocenta filtrado ne eblas; la klivianoj, tamen, komencis konstrui gigantajn kaŝejojn, por savi almenaŭ parton de la loĝantaro, sed ne sukcesis, ĉar ne estis pretaj por tia amasa atako. Tamen ankaŭ ĉi tie ne ĉio estas klara, – ekzemple, kial averaĝa jara temperaturo de la suda duonsfero malkreskis je naŭ gradoj dum nuraj ses jaroj; sed se eĉ la luzanoj kulpas pri tio, ili neniam agnoskus tion. La ruinojn de la kliviaj urboj kovris glaciejo, kaj, kiam mi jam menciis, eterna frosto katenis Cetlandon je kelkcentmetra profundo. Nur post cent jaroj la klimato de la suda duonsfero varmiĝis ([kvankam ne revenis al la antaŭmilita nivelo](#)).

En unu el piednotoj doktoro Brümmler mencias tian opinion de sia anonima profesia kolego: tiu, kiu suferas pro altrudiĝemaj insektoj, serpentoj aŭ musoj kaj fine batas la abomenan estaĵon, sed ne ĝismorte, vidante ĝiajn suferojn panikiĝas kaj tiam jam devas plej rapide finmurdi ĝin per io; agonio kaŭzas kaj timon kaj abomenon samtempe, tiel ke oni deziras fini ĝin kiel eble plej rapide, kaj ajnaj rimedoj por tio konvenas. Probable, io racia estas en tio; tial, mi aldonu mem, eĉ se la luzanoj ne atendis tiom teruran efikecon de siaj fluggenoj ([kelkaj ekspertoj ĝuste tiel nomas tiun armilon – flugantan fekundigan polenon](#)), do poste ili ekuzis ĉiujn rimedojn, kiujn ili havis en arsenaloj, por neniigi la klivianojn ĝisfine, kvankam komence, eble, ili ne havis tiajn intencojn. Povas esti, ke ili strebis nur malfortigi la klivianojn, neniigante ilian «vivan forton» ([kiel dirus fakuloj-konfliktologoj](#)), devigi ilin cedi, eble konsenti pri intertraktoj, interpaciĝo, paco; sed la nekredebla skalo de la mortigo ([en Klivio loĝis milionoj](#)) faris ajnan interkonsenton de la venkintoj kun la venkitoj malebla. Tiel, almenaŭ, opinias generalo Brümmler kaj liaj kolegoj. La gena biologia armilaro, aldonas Brümmler, enhavas danĝeron de memakcelado. Eĉ ordinaran bakteriologian epidemion estas pli facile voki, ol ĉesigi. Tio, indikas la sciencisto-generalo, estas nekontrolebla armilo, kaj la luzanoj, sendube, pli volonte uzus kontraŭ Klivio nevivan distancan armilon; tamen ili ĝin ne havis, kiam

la konflikto eniris en la decidan fazon. Ambaŭ flankoj tiam ankoraŭ ne superis la tiel nomatan «superkomputilan sojlon» de vetarmado. Brümmler entute tre multe povus diri pri tiu temo, sed tute nenion – pri la mortigo de la ŝtato, kiu pro sia Ka-Undrio ([Brümmler tamen skribas «Kon-Undrio»](#)) memmortige koliziis kun la pli potenca kontraŭulo.

Ĉio ĉi kontuzis min, kvazaŭ bato per bastono al la kapo. Mi jam kreis mian imagon pri luzanoj kaj kurdlandanoj, ne idilian, certe, sed tamen sufiĉe senpekan, – eĉ pri tio, kion mi ne povis kompreni. Hiloismo, ŝajne, estis simple deviganta la luzanojn uzi pacaman politikon, kaj kuriozecon de la kurdlanda politmobilo eblus opinii specifa loka formo de alligiteco al kamparana vivmaniero. Mi jam tiom multe eksciis pri la unuaj kaj la duaj, kaj jen subite devis eĉ ne revizii miajn ideojn, sed simple anstataŭigi ilin per novaj. Eble, eĉ pli grandaj iĝis perdoj de Kurdlando – en la milito, en kiu ĝi eĉ ne partoprenis; sed ventoj, pelintaj nubojn de koncipa polvo, ignoris ŝtatajn limojn. Tio, tamen, same estas nur luzania supozo; Kurdlando mem ne agnoskis iajn ajn militajn perdojn. Entute la historio de tiu milito estas diabla labirinto, ja ambaŭ restintaj ŝtatoj havas siajn proprajn plurŝtupajn sistemojn de sekretigo de informo, kaj ne indas miri pri tio, ke dokumentoj kun titolo «tute sekreta» ne estas elsendataj en la kosman eteron, kaj tio estas la ĉefa kanalo de informoj – ĝuste ĝi permesis al la ministrejo plenigi la bibliotekajn ĉambrojn per miloj da volumoj. El treege malmultaj fontaĵoj pri historio de la granda entia milito mi ellegis multe pli da demandoj, ol da respondoj. Kial Cetlando kovriĝis per kontinenta glacio? Se pri tio kulpas la luzanoj, kiel aludas generalo Brümmler, do kial eĉ post tricent jaroj – kaj ĝuste tiom da tempo pasis post la tutmonda konflikto – la glaciejo plu kovras la ruinojn de la kliviaj urboj? Venas, tamen, penso, ke la luzanoj ne deziris, ke oni trovu tiujn ruinojn, la spurojn de la okazinta genocido, kaj preferas, ke la glaciejo iĝu por ĝi tomba ŝtono; sed oni ne forgesu, ke averaĝa temperaturo de la planedo pro la postmilita malvarmiĝo malkreskis je du gradoj, kaj tio devas negative influi ankaŭ Luzanion. Ĉu la granda ŝtato povis tiom longe, dum jarcentoj, memori pri farita de ĝi milita krimo kaj tiom honti pri ĝi? Ĉio ĉi donis al mi nur unu kaŝitan konsolon ([kvankam, kompreneble, en tio ne estas io laŭdinda](#)), ion similan

al zorgeme kaŝata sento de faciliĝo, kiun oni havas, eksciinte, ke homoj, ŝajne respektindaj kaj estimataj, havas sur la konscienco ne malpli da pekoj, ol oni mem.

### III. En la vojo

Jam estas oktobro, steloj flaviĝis kaj iĝis iom malvarme, kaj mi estasfluganta. Mi ne asertos, ke mi atendis pli probable morton, ol tiun ekspedicion: ja mi de la komenco mem eksuspektis, ke la neordinara favoro de la konsiliano iamaniere estas ligita kun nia komuna servistino. Tamen, nun jam estas tutegale. Kion mi farus en la raketo kun la vizitanta servistino, kaj de kie ŝi venus en la raketon? La fakto estas, ke mi flugas laŭ kurso al Taŭro, kuŝante en duonpeltaĵo, kaj tio, interalie, konformas al tiu cirkonstanco, ke mi flugas kiel diplomata duonkuriero. Tiel decidis, post longaj konsiliĝaj kaj kunsidaj suferadoj, la Departemento de Profilaktiko de Plendoj kaj Kvereloj. Ne plena kuriero, ĉar ni ankoraŭ ne interŝanĝis ambasadorojn kun Entio, kaj ne privata turisto, ja temas ne nur pri korektado de prezeraroj en vica eldono de la «Taglibroj», sed pri prevento de incidento, kiun deduktis moduloj de la Instituto de Historiaj Maŝinoj. La rezulto de tiu vojaĝo estos – en la jura lingvo – abolo de akuzo pri dolo, kaj en la futurologia – memabolanta prognozo. Mi rakontos puran veron, la malnovan eldonon oni sen troa bruoj elprenos el la biblioteko, kaj mi jam ne plu estos stumbloŝtono por entiologoj. Mi estas skribanta ne nur en la duonpeltaĵo, sed ankaŭ kvazaŭ en duondormo, kaj tial mi ne scias, ĉu eblas diri pri aŭtoreco de ŝtono? Se almenaŭ de ŝtono en reno aŭ en galveziko, sed ĉu de stumbloŝtono?.. Miaj pensoj dronas en metafora mineralogio. Decidinte serĉi en la «Frazologia vortaro», mi faligis gladilon sur la piedon, – ja mi havas modernan ŝipon kun artefarita gravito, – kaj, sakregante pri tiuj novegaj inventaĵoj, kiujn mi preferus tute ruinigi, kun sopiro pensis pri antaŭaj primitivaj ekspedicioj, kiam astronauto senĝene flugetadis tra la ŝipo, kiel senkorpa spirito. Mi rezignis pri penso alligi la dormosakon al la vando – ja tro malfacile estis elrampi el ĝi matene, – kaj estis io amuza en tio, ke mi sciis, kie mi kuŝiĝas (pli ĝuste, pendiĝas) por ripozo, sed neniam sciis, kie mi vekiĝos je nigra mateno. Kun la dormosako mi naĝadis tien kaj reen, sub la kuseneto mi havis poŝlampon, kaj nemalofte, tuŝinte dum tia ŝvebado la librobreton, mi,

ne plene vekiĝinte, kaptadis ĝin per la mano, la libroj ekflugadis, kiel timigitaj birdoj, kaj mi, kaptinte ajnan, eklegadis en lumo de la poŝlampo, en la dormosako, hastante ekscii, per kio ĉi-foje regalis min nokta hazardo. La enŝipa gravito havas, propre, nur tiun bonan econ, ke post reveno sur la Teron vi ne faras al si tian damaĝon hejme dum la unua monato; ja estas sciate: kutimiĝinte, ke, elpremite dentopaston sur la dentobroson, vi povas tute trankvile starigi glason kun akvo en la aero, kaj poste preni ĝin, sen danĝero, ke ĝi ŝtone falos malsupren, samon vi instinkte faras ankaŭ sur la Tero; kaj samaj zorgoj, ho ve, estas ankaŭ kun bovlo, teleroj, nu, kaj vi ĉiam balaas rompaĵojn. Kaj kio koncernas raketan spiritismon, do mi ĉiam mokadis tiujn, kiuj ĵuras, ke ion hororan ili vidis inter Antareso kaj Betelĝuzo. Tio simple blankas subvesto, pendigita por sekigo; iam io skrapas kaj susuras, kaj vin ĝoje tremigas penso, ke vian solecon ornamas kunvojaĝanto en formo de ia museto, sed, aliflanke, muso en kondiĉoj de senpezeco tute perdas la kapon, kaj eblas trovi ĝin en plej nekredeblaj lokoj; mi ion scias pri tio, kaj en tio mi estas tute sur la flanko de la progreso.

Mi permesis instali en la ŝipo diskutan komputilon – diskutilon. Kiel videblas jam el la nomo, tia kompaniano devas amuzadi astronauton per konversacioj, krome, profesoro Bourr de Calance trovis por mi novegan, dissplitiĝantan ekzempleron. Mi aĉetis modelojn de ĉiuj personoj, kun kiuj mi emus babili. Estas mirinde, kiel simpla estas la ideo de kasedaj modeloj, – kaj kiel malfrue oni ĝin elpensis! Unue oni faras bioelektran portreton de la modelata persono, poste bitigas ĝin, tio estas, enigis en programon, kaj en formo de plej ordinara kasedo enmetas en la diskutilon; nur unu klavopremo, kaj en la ĉambro aŭdiĝas konata voĉo, kaj tio estas tute ne persono en propra senco, kaj ĉiuminute ĝin eblas senĝene malŝalti, ŝanĝi kasedon aŭ iri dormi. Certe, ia minimumo de deco, bontono ne malutilos, – kaj ne tial, ke la modelo povas ofendiĝi, ne, kia povas esti ofendiĝo, ja tio estas pure racia ekstrakto, – sed pro persona mensa higieno necesas obei kelkajn regulojn de kunloĝado. Nermalbonas havi sur la ŝipo tian psiĥotekon, sed ne malutilas scii, kia ĝi, propre, estas. Ja ŝajne ajna kulinara libro enhavas ĉiujn informojn, necesajn, ekzemple, por bakado de nuksa torto; tamen

tortoj, faritaj laŭ sama recepto de du mastrumantinoj, similas unu al alia ne pli, ol Chopin en plenumo de Rubinstein al Chopin en mia plenumo. Recepto, kvankam enhavas en si ĉion, estas malviva, kaj necesas enblovi en ĝin animon, por ĝin vivi. Amasa produktado de dolĉaĵoj – venis tempo finfine diri tion laŭte – estas formo de pagata prostituado, sed ne de vera amo. Al torta bakformo necesas aliro individua, mi dirus eĉ, plenigita per konscio de sia misio; jen kial torto, en kiun, krom nuksoj, estas enmetita sincera, freŝa sento, konservas sur kulereto ion, se eblas tiel diri, virge intiman, kvazaŭ ĝi permesas sin manĝi unuan fojon en la vivo. Do, la komputilo-diskutilo estas kulinara libro; formale ĝi enhavas ĉion, sed tiu ĉio pri nenio interesiĝas, por ĝi ĉio estas egala, kaj nur modelo de konkreta homo vivigas tiujn malvivajn tavolojn de informo, alivorte aranĝas la saĝecon. Resume, la afero estas en la stilo. Mi mendis kelkajn famulojn de luzanistiko, Bertrand-on Russel-on, Popper-on, Feyerabend-on, Finkelstein-on, Ŝekspiron, kaj krome Alberton Ejnŝtejnon mem.

La traflugo tra la sunsistemo estis, kiel ĉiam, tre interesa; mi aranĝis la kurson tiel, ke mi povu spekti Marson – mi ŝatas ĝin ekde la infaneco; mi aliris al la vidluko ankaŭ tiam, kiam mi flugis preter malnovaj, tondrantaj per fulmoj Jupitero kaj Saturno. Mi ĉiufoje pensas, ke indus paŝi sur almenaŭ unu el ili, sed kion fari, ankaŭ muzeojn ni vizitas kie ajn, sed ne en la patrourbo, – ja tutegale ili nenien malaperos, – kaj forvojaĝas por tio en ian Italion; tiel okazas ĉe mi ankaŭ kun tiuj ĉi, – tamen tre efektaj, – muzeaj eksponaĵoj. Kaj nur malproksimiĝinte je kelkaj lummonatoj for de la Suno kaj de la Tero kune kun Svisio, kie la afero «Küssmich kontraŭ Tichy» ankoraŭ ne iĝis objekto de asizo, kaj ne baldaŭ iĝos, mi ekpripensis, pri kio mi okupiĝu, kaj tiu afero estas tiom delikata, mi eĉ dirus, malĝojiga, ke mi ĝis nun ĝin ne menciis eĉ per unu vorto. Do, venis tempo diri pri tio laŭte: astronautiko odoras per prizono. Se ne estus vidlukoj, eblus vere pensi, ke vi ricevis longan prizonpunon – ne jaron kaj ne du, sed minimume du dekojn, kaj eĉ ne eblas esperi je mallongigo de la prizonado pro modela konduto, nek je sendaĵoj, nek je intervidiĝoj. Antaŭe inter transgalaksia navigado kaj malliberejo estis videbla diferenco – manko de gravito, sed nun

restis praktike nenia diferenco, kaj ne estas mirinde, ke ekzistas homoj, speciale emaj al tiaj vojaĝoj. Propono de unu teoriisto – varbi ŝipanarojn de kosmoŝipoj el dumvivaj prizonuloj el teraj specialaj striktareĝimaj malliberejoj – estis ne tiom absurda, kiel oni asertis. Ĉu vi staras, aŭ kuŝas, aŭ turniĝas sub plafono, tutegele vi estas inter kvar muroj, do malliberas; kaj tio, ke ekstere anstataŭ muroj kaj gardistaro estas kosma vakuo, neniom faciligas. El la plej fortika prizono eblas fuĝi, sed el pendigita inter astroj raketo nenien eblas forgliti. Tia estas la morna flanko de mia profesio, kiun mi antaŭe ne menciis. *Per aspera ad astra* <sup>[34]</sup>, sed esprimante ne tiom romantike – la vojo al astroj iras tra multjara mallibero. Certe, mi mem tion volis kaj volas. Ankaŭ ĉi-foje: kvankam mi pligrandigadis mian valoron en la estrarkunsido de MEA, kredigante, ke mi tute ne deziregas veturi, tamen ĉion ĉi mi faris nur por ke ili ne tro orgojlu kaj ne rilatu al mi kiel al iu galaksia knabokuriero. Sed, sincere dirante, mi vere deziris – preskaŭ ekde tiu minuto, kiam mi transiris la sojlon de la biblioteko.

Kiam la bona malnova suneto malaperis, dissolviĝis en nigra supo de neekzisto, mi spertis bone konatan, plurfoje travivitan de mi senton de malpleneco kaj decidis, ke tuj necesas fari elekton: ĉu dormi aŭ uzi la diskutilon. Tamen centjara dormo ne estas bagatelo. Certe, mi preparis ĉion necesan, funkciigis vekhorloĝon, por ke ĝi eksonoru antaŭ kvin milionoj mejloj de Entio: manĝo ŝpariĝos, kio ne malgravas; faris grandan purigon, kvankam mi scias, ke tutegele post tia daŭro ĉio kovriĝos per koto. Plej malbonas la vekiĝo. Mi ne eltenas hirtitan barbon kaj ĝisgenuajn harojn; nu, kaj ungoj estas kiel serpentoj – kvankam mi ĉiam tenas ĉe la mano tondilon kaj hartondmaŝineton, sed lastfoje mi forgesis, kie ili estas, kaj devis duonon de la raketo renversi, implikiĝante en la propra barbego kaj blasfemante, antaŭ ol mi trovis la barbirajn instrumentojn, sen kiuj – kiu povus pensi? – la astronaŭtiko ne eblas. Prenante littolaĵojn el ŝranko, mi rimarkis, ke ili estas rigidaj, kiel faritaj el lado, – sed mi ja petis la servistinon zorgi pri tio en la lavbutiko; kolerante al ŝi, mi pli ŝiris, ol malvolvis, la kunglutan per amelo tolon. Krome mi kontrolis, ĉu sur la kusensakoj ne estas drataj ĉirkaŭfadenitaj butonoj, pro kiuj sur la vango aperas klare videblaj

stampoj, kion devas eviti ĉiu astronaŭto, alie post centjara dormo li devas paradi per fizionomio, tute kovrita per negativoj de la butonoj, ja aliastraj estaĵoj opinias ilin nepra trajto de la homa vizaĝo.

Preparante por mi diversajn abomenajn likvaĵojn, kiujn oni devas trinki antaŭ hibernado, mi poiomete perdadis deziron hiberniĝi. Finfine, por kio mi prenis en la flugon la komputilon kun personiga aldonajo kaj tiom da enkasedigitaj famuloj? Mi pli atente pririgardis tiujn kasedojn. Sur ĉiu staris nomo, kaj sube – instrukcio pri priservado de la personigilo kaj ruĝa surskribo LIVE [\[35\]](#) aŭ POST MORTEM [\[36\]](#). Memkompreneble, sur la kasedo de Ŝekspiro estis POST MORTEM, kaj de Finkelstein – LIVE, ja la dua estis viva, kaj la unua mortis, sed ĉu tio gravas por aŭskultanto? Mi rigardis en la instrukcion kaj eksciis, ke personeco de mortintoj estas ekstraktata el iliaj verkaroj, kaj tio, interalie, rezultas en tio, ke la vivigitoj parolas ne tiel, kiel ili parolis dum la vivo, sed tiel, kiel ili verkis, tio estas, ekzemple, poetoj parolas nur per versoj. En la instrukcio, kiel ĉiam, estis multe da nekompreneblaj terminoj kaj malklaraj lokoj; estis indikite, ekzemple, ke, ju pli frue iu mortis, des malpli li estas «instruebla», sekve de kio oni ne rekomendis voki el la neekzisto antikvajn agantojn, konatajn de neniu krom historiistoj, ĉar nehistoriisto tutegale ne povos subteni konversacion kun ili, ne havante aŭtomatan tradukilon. Mi ne povas diri, ke tio estis sufiĉe komprenebla, tial post nelonga pripenso mi enmetis en la komputilon kasedon kun Rupert Trutti, esperante, ke tiu *professor of computer sciences* [\[37\]](#) donos al mi necesajn klarigojn. Vere, preminte klavon «GO [\[38\]](#)», mi ekaŭdis agrablan baritonon, kaj eksidis, atentante ĝin kun ioma miro, – tute ne atendente miajn demandojn, li komencis paroli sen ĉeso.

– Mi estas Rupert Trutti el Masaĉuseca aŭtofuturologia instituto, kaj mi okupiĝas, kiel indikas la nomo de mia scienca centro, pri prognozado de prognoj, tio estas, mi penas ekscii, kion prognozos prognozistoj de estontaj jarcentoj. Mi havas honoron informi vin, ke, estante kasedano, kiel oni en la ĉiutaga vivo nomas enkasedigitajn personojn, mi povas uzi rezervojn de memoro de la komputilo, en kiun mi estis enigita, sen ajnaj limigoj.

– Interalie, profesoro, – interrompis mi lin, – kial vi povas, sed tiuj, kiuj mortis antaŭlonge, ne povas? Mi legis pri tio en la instrukcio...

– Por ion ekscii, – respondis Trutti, – necesas jam ion scii. Ja ekscii – signifas enŝovi aŭditaĵon en la kapon en certa ordo. Jen kial neniu memoras siajn unuajn sentojn, kiam li estis suĉinfano kaj tute nenion sciis. Tamen, atestimata mia reviviginto, ju pli iu eksciis en unu epoko, des malpli li povas ekscii en la alia, ĉar lia kapo estas troplenigita per malnovaĵaĉo, kaj troplenigita ĝi estas tial, ke hieraŭa sankta vero iĝas nuna superstiĉo kaj cerba rubaĵo. Kvankam mi estas ciferulo, mi povas uzi aliajn partojn de la memoro de la komputilo, en kiun vi min enigis, ja mi havas iajn sciojn pri biologio, psiĥoniko, fiziko, kaj tial scias, kio estas ekspertolizo kaj enspertolacio; sed sidigu ĉi tien Platonon, kaj vi vidos, ke li tute nenion komprenos...

– Kaj vere, kio estas tio? – interesiĝis mi.

– Ekspertolizo estas dissolviĝo de ekspertoj en maro de superflua informo, kaj enspertolacio estas defenda kondiĉa reflekso, memmalŝalto de ekspertoj pro timo. Kio koncernas ekspertolastikon...

Eble tio estis malĝentile – sed mi malŝaltis la profesoron, timante, ke pluaj klarigoj nur malklarigos tion, pri kio mi sukcesis ekscii de li; sidiĝinte super amaso da kasedoj, mi ekpensis, kiel mi aranĝu rondon de kleruloj, por ĝui intelektan lukson. Pri hibernado mi tute forgesis. Ĉu, povante mendi al mi spiritan festenon en kompanio de la plej grandaj intelektuloj, mi fordonus min al senpena centjara ronkado? Finfine mi enmetis en la komputilon kasedojn kun Bertrand Russel, Karl Popper, advokato Finkelstein (*kvankam tio estis intelekto *minorum gentium** <sup>[39]</sup>, mi decidis inkludi lin en tiun societon kiel mian simpatian konaton) kaj, ignorante la avertojn de profesoro Trutti, aldonis Ŝekspiron. Mi pretas ĵuri, ke mi mendis ankaŭ Ejnŝtejnnon, sed, kvankam mi elŝutis surplanken la tutan enhavon de la skatolo, mi trovis nur Feyerabend-on; furiozante, ke mi ne povas plendi – ja mi traflugis jam kelkajn trilionojn da mejloj – mi

prepariĝis al la diskuto, tio estas, starigis pli oportune tableton kun salitaj biskvitoj kaj tonik-akvo, ŝovis kusenon malantaŭ la dorson, kaj ŝaltis la komputilon. Mi formanĝis ĉiujn biskvitojn kaj fortrinkis la tutan tonikon, kaj nur tiam komprenis, ke miaj kasedaj kunvojaĝantoj jam delonge diskutas, nur la sono estas surdigita. Mi turnis la necesan regulilon, kaj ekaŭdis voĉon de Bertrand Russel.

– Inteljekto, sinjoro Feyerabend, estas kapablo disronĝi malmolajn nuksojn, tial la plej brilan intelekton eblas uzi por solvado de la plej stultaj demandoj. Tamen saĝo supozas krom tio ankaŭ scipovon elekti problemojn.

– Mi kuraĝos ne konsenti kun lordo Russel, – respondis Feyerabend. – Saĝo estas, pli ĝuste, memkono, esprimante klasike, kaj se esprimi pli moderne – ĝi estas serĉado de mankoj kaj malperfektaĵoj en la propra racio. Certe, laŭ la Sokrata maniero. Kiel estas sciate, al idiotoj ŝajnas, ke ili ĉion komprenas. Idioto, speciale plena idioto, pretas tuj iĝi prezidento de Usono, vi nur proponu al li. Homo pli saĝa unue pensos, kaj vera saĝulo preferos salti el fenestro. Tre alta koncentriĝo de saĝeco efikas ŝoksimile kaj ofte silentigas saĝulon, kvankam la silento de Wittgenstein havis alian kaŭzon.

– Juĝante laŭ via elokventeco, kolego Feyerabend, mi dubas, ke al vi minacas troeco de saĝo, – rimarkis Russel. – Ne nur homoj estas idiotaj, ekzistas ankaŭ idiotaj filozofiaj sistemoj; tio estas ligita kun fenomeno, kiun mi nomus fenomeno de historia monumentigo de ĉio ajn. Estis angla reĝo, kiu deziris kaj resti religia, kaj dormi kun iu fraŭlino kiel laŭleĝa edzo, kvankam li jam estis edziĝinta. Kaj kio? Ne dezirante ŝanĝi sian volupton, li ŝanĝis la religion, disigis la anglan eklezion de Romo kaj kreis per tio anglikanisman. Kiel scias ĉiu, kiu min legis, Hegel estis pensulo el la klaso de tiel nomataj vortoĵonglistoj, kaj ĝuste al tio li ŝuldas sian popularecon, kvankam jam ne tian, kia estis antaŭ cent jaroj. Klare esprimiĝanta stultulo ne tiom danĝeras, kiom stultulo nebula, ĉar en nebulo estas facile mem iĝi stultulo. Mi permesis al mi aludi tion en mia «Historio

de la okcidenta filozofio», kaj, memkompreneble, tuta hundaro de ofentitaj kretenoj ekmordis miajn kruojn. Tiu Dewey, ekzemple. Bedaŭrinde, reguloj de bontono estas devigaj ne nur en la Ĉambro de la Lordoj, sed ankaŭ en filozofia polemiko. Nur post la morto oni povas permesi al si diri ĉion, kion oni pensas, rekte. Sed mi eĉ sentio ĉiam diradis veron malkaŝe, kvankam tio tre multe kostis al mi. Tiu, kiu proponas novan filozofian sistemon, per tio montras, ke li alproksimiĝis al la vero pli, ol ĉiuj, kiuj vivis antaŭ li. Do, ĉiu tia sistemo supozas nesupereblan saĝecon de ĝia aŭtoro. Sed ja la normala kurbo de distribuo de intelekta nivelo estas ĝusta ankaŭ por filozofoj, inter kiuj sufiĉegas kretenoj. Estas interese, ke miaj observoj, al neniuj konkreta adresitaj, vokis tian furiozan reagon...

– Kaj kie vi metis vin mem sur la kurbo de distribuo de saĝeco, lordo Russel? – per senkulpa voĉo demandis Feyerabend.

– Dirante objektive, pli supre ol vin, ĉar mi komprenis ĉion, kion vi verkis, kaj vi la verkitan de mi ne komprenis, ĉiuokaze, sufiĉe fuŝis min.

– Ĉu? Sed mi ja publikigis post via morto...

– Kaj mi legis post la transporto de mi en la kasedon. Vi nemalmulte pruntis de mi, kaj en tio, certe, ne estas ia malfeliĉo, sed oni devas indiki siajn instruistojn...

– Ĉar mi estas pura spirita ekstraktaĵo, – deklaris Feyerabend, – do mi precizigas, ke akompanas ĉi tiujn vortojn per facila ŝultrolevo kaj degna rideto. Lordo Russel ĉiam penis mordi de la filozofia kuko pli, ol li povis digesti.

– Tio estas jam el Quine, – malvarme rimarkis Russel.

– Ja ne povas mi doni bibliografian referencon al ĉiu mia vorto! – iom incitite ekkriis Feyerabend. – Lordo Russel, kiu post la morto, vere, estas eĉ malpli ĝentila, ol estis dum la vivo, ne permesas al mi fini eĉ unu mian frazon. Do, jen: li ne nur mordis pli, ol povis, sed ankoraŭ atakadis la kukon ĉiufoje de malsama flanko, kvazaŭ

la ĝenerala ontologio estas tavolo kuko aŭ babao, el kiu eblas nur elpreni sekvinberojn...

– Ejnŝtejno, – subite respondis per profunda pensema voĉo Karl Popper, – komparis tion kun tabulo, ne kun babao. Li diris, ke stultuloj serĉas la plej maldikan lokon, por trabori en ĝi kiel eble plej multe da truoj, dum geniuloj atakas plej malmolajn, branĉetajn blokojn...

– La duan parton alpenŝis vi mem, lordo Popper, – sarkasme rimarkis Feyerabend. – Dankon al Dio, ke en la filozofio ekzistas nek titoloj, nek rangoj, alie mi devus sidi inter du lordoj mallaŭte, kiel museto. Laŭ mi, racio kaj erudicio devas ekvilibrigi unu la alian, kiel du pesujoj. Tro vasta erudicio trenas malfortan racieton je la piedoj al fundo, kaj racio, libera de solida pezo de scioj, ŝvebas kien ĝi deziras, kaj plej ofte en direkto de senrespondecaj fantazioj. Plej gravas la ora mezo. Tamen mi ne opinias la ora mezo taktikon, kiu konsistas el citado de si mem sola, kaj krome malhonesto, kiam, anstataŭ polemiki pri la esenco, oni sendas en piednoto al malnovegaj suflorkartetoj, en kiuj kvazaŭe tiu demando estis sufiĉe prilumita, post kio restas nur akiri plenan verkaron de la aŭtoro, sendanta leganton ien malproksimen, kaj nur poste komenci legi liajn artikolaĉojn. Sed niatempes tio estas jam troe.

– Mi timas, ke sinjoro Feyerabend aludas al mia estimata najbaro en la Ĉambro de la Lordoj, – diris Russel. – Io estas en tio! Sed eble, jam sufiĉas da pikado *ad personam* <sup>[40]</sup>. En tiu malvarma kaseda ĉerko mi multe meditis pri mia teorio de tipoj. Eblas apliki ĝin en ontologio, kaj ne nur en logiko. Ekzistas ontologiaj antaŭinklinoj, simile al antaŭinklinoj rilate de la ina sekso. Mi persone ĉiam inklinis al blondulinoj, kaj la tuta problemoj estis en tio, ke ili ne ĉiam inklinis al mi. Povas ekzisti ankaŭ diversaj tipoj de ekkono. Memkompreneble mi diras tion ĉi nur kiel modelon! Tamen, mi proponus prefere vorton «maketo», ĉar ĉiuj ni estas viroj, eĉ se en pluskvamperfekto.

– Maketo – kiel paketo, ĉu? – demandis Feyerabend kaj ekridis. Komence li ridis ironie kaj mallaŭte, poste ŝaltis duonon de potenco kaj fine ekridegis tiel, ke ektintis la laŭtparoliloj.

– Per kio do vin tiel ridigis mia modesta terminologia korekto? – interesiĝis Russel.

– Ne, ne gravas, – respondis Feyerabend, plu luktante kontraŭ rido, – simple mi rememoris unu nigraharulinon, ĉar lordo Russel...

– Sinjoroj, – prononcis mi kun milda riproĉo, – mi kuraĝos atentigi vin, ke la kasedoj kostis por mi pli ol naŭ mil frankojn, des pli svisajn! Mi soifas inicon en altajn sferojn de ekzistado, deziras, ke vi donu al mi helpan manon, certe, en figura senco, kaj kvankam mi ne povas egali al vi en intelekta rilato, mi tamen kalkulis pri bonaj fruktoj de jarcenta komunikado kun tiaj mensoj... kaj jen ĉi tie tiuj blondulinoj kaj nigraharulinoj...

– Se iu deziras ien alveturi, – diris Bertrand Russel, – tiu peni trovi bonajn ĉevalojn kaj jungi ilin kiel necesas. Sed ni, sinjoro Tiĉi (tiel li elparolis mian nomon), nenien vin alveturigis, ĉar ne konsistigas amikan jungaĵon. Ĉiu el ni en filozofio veturis en sia direkto... Do, se vi deziras ion ekscii, mi petas malŝalti miajn tiom alte estimatajn kolegojn...

Aŭdiĝis unuvoĉa protestanta ĥoro. Mi superkriis ĉiujn, alvokante ilin diri ion pri la demando de la entia etikosfero. Pri tio ili konsentis.

– Povas esti, – komencis lordo Russel, – tiuj birdidoj eĉ sukcesis konstrui tiel nomatan etikosferon, sed per tio ili faris individuajn malliberejetojn, egan kvanton da nevideblaj trudkiteloj. Ajna sufiĉe potenca impeto al ĉies feliĉo finiĝas per konstruado de prizonoj. Tiu ideo mem estas nenio alia ol malracia fatamorgano de la racio...

– Mi ĉiam tion asertis, – resonis per forta maljunula voĉo lordo Popper. – *Corruptio optima pessima* <sup>[41]</sup>, kaj tiel plu. La spektro de eblaj statoj de la socio estas unuaksa, kaj ĝi lokiĝas inter la fermita kaj malfermita socioj. La maldekstra ekstremo estas

totalisma diktaturo, reganta ĉion, kio estas homa, inklude enhavon de kantetoj en infanĝardenoj, kaj la dekstra ekstremo estas anarkio. Demokratioj lokiĝas proksimume meze. Tiuj entianoj evidente penis kunigi ambaŭ ekstremojn, por ke ĉiu povu vivi en socio malfermita kaj fermita samtempe kaj barakti por sia plezuro, katenita en nevidebla veziko de ordonoj, kiujn ne eblas rompi. Eblas nomiti tirarkio, sed nenion bonan ĝi promesas. Mi pensas, ke tie estas plej multe da malfeliĉo, ol ie ajn.

– Kial, lordo Popper? – demandis mi.

– Ĉar en polica ŝtato torturata homo povas almenaŭ kredi, ke, se oni lin ĉesos torturi, li kune kun aliaj konstruos feliĉan mondon. Kaj homo, karesegata senlace sub observado de la ŝtato per tiu ĉi fifama sinturo, ne povas eĉ en pensoj ien eskapi, ĉar ne estas loko kien eskapi. Tolereblas nur mezaj ŝtatoj de socia agrego.

– Kaj mi opinias, – diris Feyerabend, – ke tie, kie ne estas *law and order* <sup>[42]</sup>, venkas dentoj, kubutoj kaj ungoj; kaj kie estas *law and order*, ekde infanlulilo ĝis kremaciejo, tie estas, ĝenerale, samtiom da malfeliĉo, sed ĝi havas alian guston. Lordo Popper kun lia apologio de malfermita socio devus rimarki, ke tio estas nur ĝentila nomo de tia aferŝtato, kiam ekzistas grandaj hundoj kaj malgrandaj, kaj al ili estas permesite unu alian priboji, sed vori estas malpermesite. Kiam mi estis infano, mi ŝatis legi miraklajn historiojn pri estonta mondo, kiam hejmmastrumantinoj rekvalifikiĝos al docentoj de limnologio, stratpurigistoj – al profesoroj de ĝenerala teorio de ĉio en la mondo, kaj ceteraj kreados kiom povos, kaj rezultos nekredebla disfloro de artoj. Estas mirinde, kiom multe da tute ne stultaj homoj kredis tiujn deliraĵojn. Ja plej granda parto de la homaro tute ne deziras foruzi sian vivon por kolektado de malnovaj konkoj, kaj ĝi entute fajfas pri ajnaj konkoj, krom la konko de necesejo, kaj pensi pri eternaj demandoj ĝi komencas nur post vizito al kuracisto, kiu al demando pri diagnozo donas evitemajn respondojn. Sekvo de totala aŭtomatigo estos nova eldono de tio, kion en la Mezepoko oni nomis *Höllenfahrt* <sup>[43]</sup>. Malsamaj vojoj kondukas en la inferon. Kelkaj el ili estas superŝutitaj

per rozoj kaj superverŝitaj per mielo. La malfermita socio pli bonas ol la fermita en tiu rilato, ke el ĝi eblas fuĝi. Sed ne estas sciate, kien. Tamen estas pli agrable havi malantaŭ si malfermitajn pordojn, ol kraditajn kaj alnajlitajn al la porda kadrumo. Mi, ĉiuokaze, tiel opinias.

– Sed ĉu mi iam skribis, ke la malfermita socio estas ia idealo? – ekatakis Popper Feyerabend-on. – Simple kiel skeptikulo mi ĉiam pledis por malpli granda malbono.

– Estas bedaŭrinde, ke vi ne limigis vin per tio, – rimarkis Feyerabend, – ĉar via koncepto de la scienca ekkono ne eltenas kritikon, kiel mi montris – tamen, ne la unua kaj ne la lasta.

– Ejnŝtejno mem agnoskis mian pravecon, – komencis ofendita Popper, sed Feyerabend ne permesis al li fini.

– Pri la cirkonstancoj, en kiuj Ejnŝtejno – homo de vere kolomba koro – agnoskis vian pravecon, vi, lordo Popper, skribis jam tiomfoje, ke eblas limiĝi per piednoto. Kiel diris al mi doktoro Chippendale, Ejnŝtejno tiam suferis pro hemikranio, kaj prenis sufiĉe multe da pulvoroj kontraŭ kapdoloro, kies obtuziga influo estas bone konata.

Ofendita Popper eksilentis. La tro longan silenton rompis finfine Russel.

– Mia estimata kolego-filozofo el la Ĉambro de la Lordoj havis malfeliĉon naskiĝi sistema filozofo en la epoko, kiam sistema filozofio jam ne povas ekzisti. Necesas agnoski la realon, kolego Popper! Sinjoro Feyerabend estas modera anarkia ekstremisto en epistemologio, kaj mi estas neimperativa kontraŭintuicia kategoriisto de analiza stilo, kaj lordo Popper estas aŭtoro de kelkaj interesaj konceptoj, sed ĝenerale – nesinkategoremata varmiganto de ontologie neŭtraligitaj kotletoj en saŭco de *Circulus Vindobonensis* <sup>[44]</sup>. El la Rondeto, en kiu Wittgenstein brilis, brilis, kaj fine ĉesis. Kaj la Rondeto ekde tiam pendas sur paliseto. Ja eklektika sinkretismo de la verkoj de sinjoro Popper...

– Vi ŝanĝas opiniojn pli ofte, ol kalsonetojn! – kriis kolerigita, tute sociostatike malekvilibrigita lordo Popper. – Diru al mi, lordo Russel, kio restis al vi post la juneco? Tri volumoj de «Principia Mathematica», verkitaj suferi dum longaj jaroj. Do: mi hastas informi, ke Chang Wen aŭ iu alia Ping Pong – ne memoras mi tiujn ĉinajn nomojn – programis komputilon tiel, ke ĉion pruvis de B. Russel en liaj famaj «Principioj» la komputilo pruvis dum ok minutoj kun averaĝa rapido de memmortiganto, kiu ĵetiĝis el naŭdeka etaĝo sur Jupitero, kie, kiel sciante, la gravitforto estas tiomoble pli granda ol la tera, kiomfoje la servistino de sinjoro Tiĉi eraris en fakturoj de lavbutiko por sia profito.

Tiuj lastaj vortoj ŝajnis al mi tiomgrade nekonvenaj, ke mi faris streĉon kaj vere tuj malfermis la okulojn. Plej malbone estis, ke mi ne sciis, kiam ĝuste mi ekdormis, sed konfesi tion mi hontis. Ŝajnis, tamen, ke mi perdis ne tro multe, ĉar ili plu disputadis, kvankam ne tiel malĝentile, kiel mi sonĝis. Por iomete vigligi ilin, mi subĵetis en la komputilon du luzanistojn – unu el li nomiĝis Bionizio Röhren, kaj dua – Pierre Saumon – kaj, probable, sub influo de ia obtuzeco de la pensado pro longa estado en vakuo, mi pensis, ke se ili estus unu homo de indiana deveno, do ili nomiĝus *Muĝanta Salmo* [45]. Profesoro Saumon iĝis valora akiraĵo por nia kolektivo kiel sciinto de luzania filozofio. Ekde la XXII-a jarcento, klarigis li al ni, tio estas filozofio laŭ sia subjekto relativisma, kaj laŭ la objekto – aplika. Alivorte, dum sur la Tero subjekto, aŭ simple dirante filozofo, ĉiam estas homo, sur Entio filozofias ankaŭ maŝinoj kaj eĉ nuboj, ĉar kelkaj specoj de lertonoj, forportataj de vento, kuniĝas ĉe la limo de la troposfero en neordinare raciajn saĝnubojn, kiuj, ne havante aliajn okupiĝojn, rezonadas pri la senco de la ekzistado. La tempoj, kiam vivis Aks Titoraks, la detruanto de aŭtoritatoj, eĉ sur la morta lito ĉirkaŭigita de fidelaj disĉiploj kaj polico, forpasis senrevene. En pasinteco foriris ankaŭ problemoj de potenco, tia aŭ alia. Veraj dilemoj aperas antaŭ filozofio nur tiam, kiam bonfarto ricevas terurigajn skalojn. Ĉar malagrablaĵoj devas ĉiam malpliigi, kaj ĝojoj pliigi, do kun logika neceso optimumo koincidas kun maksimumo de bonoj, liberoj, plezuroj kaj amuzoj kaj kun minimumo de danĝeroj, malsanoj kaj trudlaboro en oficejo. La minimumo egalas al nulo, tio

estas: nenia laboro, neniaj malsanoj, neniaj danĝeroj, kaj maksimumo lokiĝas tie, kie dolĉeco de la vivo iĝas neelĉerpebla. Sed tiun maksimumon, tiom precize difinitan, neniuj povas elteni. Ie survoje la progreso transformiĝas en sian malon, sed kie – neniuj scias. Ĝuste tio konsistigas tiel nomatan paradokson de Schlappenrock kaj Kiks.

Profesoro Röhren, ekparolinta post sia kolego, klarigis al ni, ke la afero ne tiom malbonas, kiel eblus supozi. En ajna socio ekzistas plendemuloj-reakciuloj, kiuj strebas malantaŭen, al tiel nomataj «bonaj malnovaj tempoj», sed reveno al la pasinteco ne eblas. Male: la etikosferon necesas levi sur novan alton. Dume tio estas nur registara projekto, ellaborita de la Konsilio de Ŝatantoj de Entio. La ideo estas sufiĉe simpla. Ajna socio plej konvenas al homoj de certa karaktero. Tiuj homoj tute ne nepre devas aparteni al ĝia elito. Danke al siaj denaskaj inklinoj ili kun plezuro faras ĝuste tion, kio gravas kaj eblas en ilia epoko. En la epoko de kolonia ekspansio tio estos konkerantoj, kaj kiam la ekspansio etendiĝos al vastaj teritorioj – komercemaj homoj. Tio povas esti ankaŭ sciencistoj – tie, kie regas scienco. Aŭ pastroj – en la epoko de batalanta eklezio. Ekzistas homoj, al kiuj ne plaĉas trankvilaj tempoj, kvankam ili mem ne nepre konscias tion. Ili eliras sur antaŭscenejon dum ĝenerala katastrofo aŭ milito. Ekzistas ankaŭ entuziasmuloj, kiuj ne imagas sian ekziston sen helpado al proksimuloj, kaj asketoj, kiuj ekfloras pro abstinado. Historio estas teatro, kaj socioj – trupoj de aktoroj, inter kiuj estas distribuataj la roloj, sed neniuj el la prezentitaj spektakloj en ĉiuj historiaj epokoj permesis reveliĝi al talentoj de ĉiuj aktoroj senescepte. Denaska granda tragikisto ne havas lokon en farso, kaj kirasitaj kavaliroj ne trovas rolon en burĝaj ĉambraj dramoj. Egalismo estas viva programo, en kiu ĉiuj devas roli egale kaj nemulte, kaj neniuj povas ludi grandan romantikan rolon, ĉar por ĝi tie simple ne estas loko. Tiaj kompatinduloj estas kondamnitaj konkuri inter si pri nombro de manĝitaj kuiritaj ovoj, pri biciklado retroen, akompanata per violona skerco F-minora, kaj similaj ekscentrikaĵoj, kiuj atestas nur abismon inter pretendoj kaj la knaranta realo.

Unuvorte, malsamaj tempoj donas preferon al malsamaj karakteroj, kaj en ajna tempo plejmulto de la socio servas nur kiel fon-aktoroj por elektitoj de la sorto, ĉar nur pro pura hazardo konvena temperamento aperas en la plej konvena por ĝi momento de historio.

Tion eblas esprimi ankaŭ iom alie. Mondo, en kiu individuo kun certaj spiritaj trajtoj kapablas plene realiĝi, estas mondo speciale favora al li, sed ne ekzistas tiom universala favora mondo, kiu samgrade kontentigus ĉiujn specojn de homaj karakteroj. Tian eblon donas nur kreo de artefarita medio, kapabla montri favoron, tajlitan kaj alĝustigitan laŭ individua mezurilo ([kaj en kelkaj okazoj necesas agnoski favoro ankaŭ «reziston de la medio», ja ekzistas karakteroj, kreitaj por lukto kontraŭ vivaj malfacilaĵoj](#)). Tiu medio estos defio por riskemaj homoj, kvieta haveno por pacemuloj, nekonata tero por denaskaj pioniroj, mistera kaŝaĵo por romantikuloj serĉantaj aventurojn, por sindonemuloj – altaro, por strategoj – batalkampo, laborejo por laboremuloj, kaj ankoraŭ nur ne estas sciate, kio devas esti tia mondo por malnobluloj, kiuj same ne malmultas. Se ni pli atente rigardos, ni vidos grandegan kvanton da nuancoj de heroeco kaj malkuraĝeco, sciemo kaj indiferenteco, luktemo kaj trankvilemo, kaj la samo rilatas al malnobleco. Favora kaj intelekta vivmedio devas, sekve, iĝi tajlisto de ŝtofo de la ekzistado, kunkudrante ĝin tiel, ke ĉiu ricevu vivkondiĉojn plej konvenajn por li. Sed kiam ĉiuj teĥnikaj rimedoj jam estos pretaj, kiam jam estos kreita medio, senerare adaptiĝanta al la naturo de ĉiu homo, restos venki nur unu, tamen teruregan malfacilaĵon, nome: ĉiu devos havi senton de absoluta aŭtentikeco de ekzistado. Neniu devas opinii, ke li ludas, kvazaŭ sur scenejo, kaj sekve, ke li povas ĉiumomente ĝin forlasi. Ke lin ĉirkaŭas speciale turnitaj al li dekoracioj. Tio estu ludo aŭ, pli ĝuste, sistemo el multaj ludoj, proponataj de la vivmedio al siaj prizorgatoj, sed ludo sen apeloj al la sorto kaj sen interaktoj, morte serioza, kiel vivo, sed ne konvencia, kiel amuzo. Ludo, en kiu ne eblas forlasi la ŝaktabulon de sia socio, por rigardi al ĝi elekstere. Ne eblas permesi, ke ludanto sciu pri tio, kio estas destinita al li, kaj neniu rajtas pretendi krei regulojn de propra aŭ aliula ludo, ja ĉi tie tiuj prerogativoj egalas al la Diaj.

Ĉi tie aperas demando, malnova, kiel la mondo: quis *custodiet ipsos custodes* <sup>[46]</sup>? Kiu iĝos tiu *Deus ex Machina* <sup>[47]</sup>, kiu observas niajn protektantajn anĝelojn, kaj kiu per iliaj manoj zorgas pri optimumigo de la Estado, samtiom justa, kiom perfekta? Malantaŭ ĉia, eĉ la plej sukcesa respondo al tiu demando kaŝiĝas fantomo de sekreta potenco, kaj oni luktos por ĝia forigo, por ke distribuado de sintezitaj sortoj iĝu plene malcentralizita. Tiu socioteĥnika problemo en traduko en la lingvon de la tradicia religiologio signifas ekfunkciigon de panteismo. Sekretan potenculon ne eblas trovi tute same, kiel ne eblas trovi Dion, ĉar li estos ĉie samtempe. Sed se en tiu novmaniere retajlita harmonio io paneos, kiu riparos ĝin? Kaj ĉar iu devos ĝin krome projekti kaj lanĉi produktadon, tiu persono aŭ grupo de personoj emos malkaŝe aŭ, kio pli malbonas, kaŝe preni al si rolon de la Sinjoro Dio en tiu spektaklo. Dume oni parolas pri poetapa transiro de ordinara etikosfero al nova, kaŝprovidenca. Ĝenerale, denove preskaŭ kiel en la Biblio, pralertonoj naskigos lertonojn, lertonoj naskigos lertenojn, kiuj estos komenco de sekvaj generacioj, ĝis stabiligiloj-absolutigiloj, per sia kapablo al memkorektado kaj per sia fidindeco ne cedantaj al la elementaj fortoj de la Naturo. Kaj tio estos vera Rekrea Kreo en la kadroj de la Kosma Prakreo. La vojo ankoraŭ longas kaj estas kovrita per obstakloj, sed la celo jam estas distingebla, kaj optimistoj opinias, ke post iaj du-tri jarcentoj plena paradizigo de Luzanio iĝos fakto.

Tiu prelego faris al la kasedanoj impreson fortan, sed negativan. Jam la konscio mem pri la nekomprenebla reĝisorado de la sorto, deklaris lordo Russel, estas katastrofo por la racio kaj alvoko al ribelo. Necesas timi, ke en tiu tute nova socio aperos abundego da novaj formoj de frenezo, sufero kaj despero. Eĉ Karl Popper konsentis ĉi tie kun Russel. Tamen Feyerabend rimarkis, ke tio ne nepre estas tiom terura. Ja estas io nekompareble pli malbona, ol eĉ diligente dozata ĉies feliĉo. La aliaj ne volis konsenti kun li. Subite petis vorton silentinta ĝis tiam advokato Finkelstein. Mi konvinkis ambaŭ lordojn kaj Feyerabend-on permesi al la advokato eldiri sian vidpunkton, pri kio ili finfine sendezire konsentis.

– Sinjoroj, – komencis Finkelstein, – kvankam mi estas nur ordinara advokateto kun ne tre interesa klientaro, – escepte de la ĉeestanta sinjoro ljon Tichy, – kaj dum la tuta vivo mi ne legis tiom da saĝaj verkoj, kiom ĉiu el vi dum nur unu tago, mi tamen volus aldoni ankaŭ mian modestan kontribuon, se mi trafis en tiun ĉi kasedan kompanion. Mia patro – estu eterna memoro pri li – havis en Ĉortkovo antikvaĵojn kaj amason da libera tempo, tial li legadis filozofojn kaj neniam drinkis alkoholaĵojn, krom paska rosinvodko unufoje dum jaro. En Lvovo tiam aperadis kontraŭalkohola gazeto «Benita sobreco», kaj unu el la redakcianoj, sciante pri altaj interesoj de mia patro, petis lin verki artikolon. Alkoholismo, respondis al tio la patro, estas abomena afero, kaj estus pli bone, se ĝi ne ekzistus. Sed eĉ se lanĉi la plej grandkalibrajn argumentojn, tutegele nenio rezultos, ĉar «Benitan sobrecon» legas ne drinkuloj, sed nure sobruloj, por firmiĝi en sento de sia supereco, kaj se por drinkulo oni hazarde envolvos haringon per tiu gazeto kaj liaj okuloj trafos al mia artikolo, do li aŭ uzos ĝin por vi mem scias kio, aŭ tuj ebriiĝos pro ĉagreno, ke li cedis al tia malutila kutimo. Mi tre pardonpetas, sed mi ne kredas, ke verkado de tiaj saĝaj, profundaj libroj pri feliĉo kaj moralo, kiujn verkis lordo Russel, povis eĉ muŝon savi de forŝiro de la flugiletoj. Kiam mi estis etulo kaj ludadis ĉe mi, la patrino de tempo al tempo kriadis al mi el alia ĉambro: «Spuĉjo, ĉesu!»: ŝi ne sciis, kion mi faras, sed nenion bonan atendis; samon eblas diri pri la homaro. Ĝi, bedaŭrinde, ĉesi ne deziras. La patro abonis «Ilustritan semajngazeton» kun fotoj, montrantaj la Devon de la Blanka Homo: kun korka kasko sur la kapo kaj vinĉestro en la mano li tretas per la piedo rinoceron, kaj malantaŭ li staras amaso da ŝvitaj nudaj negroj kun pakaĵoj sur la kapoj kaj kun ansoj de kaftasoj en la nazoj. Tiam mi revis, ke la negroj deĵetu de si tiujn pakaĵojn kaj forpelu la blankulojn el Afriko, anticipe rompinte la vinĉestrojn je iliaj dorsoj. Mi kolektadis staniolon de ĉokolado «Hazet» por elaĉeto de negridoj kaj faradis el ĝi grandajn globojn, sed mi ne povis ekscii, kien poste necesas iri kun tia globo, por elaĉeti negridon. Kaj nun jam ne ekzistas tiuj blankaj ekspluatantoj, estas nur nigrahaŭtaj ekskaporaloj el la Eksterlanda Legio, kiuj aŭ mem buĉas siajn nigrahaŭtajn samgentanojn, ricevintajn doktorecon en Cambridge, aŭ komisias tion al sia gvardio, kaj ekzekutilojn importas el Anglio kaj

aliaj alte evoluintaj landoj. Nun nigruloj ordonas kroni sin al nigruloj, kaj nur intestoj, kiujn oni ellasas el ili, estas same ruĝaj, kiel antaŭe. Nun ni aŭdas ne pri punaj ekspedicioj, sed pri ŝtataj intereso, tamen mi dubas, ke por la ekstermatoj tio faras specialan diferencon. Jam ne ekzistas Deutsch-Ostafrika, kaj entute neniam kolonioj, sed nur unu plena sendependeco, kaj eksteruloj ne rajtas enmiksiĝi, por ke neniu malhelpu al la suverena buĉado. Vi, sinjoroj, parolis ĉi tie pri ĉies plena feliĉo, ke la plenan havi ne eblas, sed nur etan. Feliĉo, certe, estas afero relativa. Kiam mi aĝis dek kvin, mi trafis en neniigan koncentrejon, kie oni homojn venenigadis per gaso, kiel cimojn. Mi restadis viva nur tial, ke Katzman, dua vickomandestro, prenis min al si por purigo de la domo, kaj la afero estis somere, mi frotadis la plankon sen ĉemizo, sur genuoj, kaj al li plaĉis mia dorso. Kiom mi scias, li deziris fari donacon al sia edzino, kiu vivis en Hamburgo, kaj elpensis kloŝon por noktolampo. Inter prizonuloj li trovis specialiston pri tatuoj – tie estis eĉ sciantoj de sanksrĉito, kio, tamen, ne havis por ili praktikan valoron, – kaj ordonis al li montri sur mia dorso kortuŝan bildon. Li estis tre bona homo, tiu tatuisto, kaj tatuadis tiel malrapide, kiel nur eblas, kvankam Katzman lin urĝigis, ĉar estis proksimiĝanta la *Geburtstag* <sup>[48]</sup> de Frau Katzman. Sur la pantalona rimeno mi faradis tranĉmarkojn – kiom da tagoj da vivo restis al mi, kaj poste Katzman ricevis leteron el Hamburgo, ke lia edzino pereis kun la infanoj dum avia atako. Li ne ŝatis novajn vizaĝojn, aŭ eble, deziris krome kontroli, kiel moviĝas plenumo de tiu bildo, unuvorte, mi same plu purigadis lian domon kaj vidis lian malesperon. «Ho Gott, ho Gott, – ripetadis li, – pro kio sur min falis tia malfeliĉo?!» Li ricevis forpermeson por entombigo, forveturis kaj jam ne revenis. Danke al tio mi iel restis viva, ĉar lia posteulo por ajna okazo tenis min apude, – eble Katzman ankoraŭfoje edziĝos aŭ io tia, kaj la kloŝo necesos denove. Li nur ĉirkaŭrigardadis min kaj diradis, ke li bonege tion faris, tiu tatuisto, kiun dume oni sendis en la gasejon. Feliĉo, sinjoroj, interplektiĝas kun malfeliĉo per plej bizara maniero. Se mi estus ĉi tie vive, mi montrus tiun ĉi bildon. Ekde tiam al mi ŝajnas, ke al homoj tute devas sufiĉi, ke ne estas malfeliĉo. Por ke neniu povu premi homojn, kiel pedikojn ĉe fajro, kaj aserti, ke tio, ekzemple, estas supera historia neceso aŭ anticipa etapo de la vojo al perfekteco, aŭ, ke entute nenio okazas, kaj ĉio ĉi estas malamika

propagando. Mi ne volus ofendi iun el vi, sinjoroj kasedanoj, mi ne ĵetas ŝtonojn en ies legomĝardenon, mi ne deziras ies sangon, sed multege da sango estis verŝita ĝuste pro diversaj specoj de filozofio. Ja ĝuste filozofoj malkovris, ke ĉio estas ne tia, kia ĝi ŝajnas, sed tute alia; kaj jen kio estas interesa: konsekvencoj de humanismaj sistemoj estis, esence, nulaj, tamen konsekvencoj de tiuj, aliaj, kiel de Nietzsche, estis koŝmaraj, kaj eĉ la ordonon pri amo al proksimulo kaj la programon de konstruado de surtera paradizo oni sukcesis transformi en sufiĉe amasajn tombojn. Ajna filozofo, certe, respondos, ke tiuj refaraĵoj havis nenion komunan kun la filozofio, sed mi ne konsentas. Havis, kaj tre multon. Eblas tiujn refaraĵojn de la ordonoj nomi tute alie, kaj ĝuste en tio estas la malfeliĉo de la racio. Eblas pruvadi, ke ordinara libero estas nenio kompare kun la vera libero, kaj se tiun ordinaran forpreni, rezultas ĉies utilo. Kiu okupiĝis pri tiuj refaroj? Malĝojinde, filozofoj. Laŭ mi, se mi jam savis mian haŭton de la lampokloŝo, mi ne rajtas ŝajnigi, ke tio ne okazis. Nun oni skribas pri tio kun teruro kaj pento, speciale en Germanio – tie ja estas la plej demokratia demokratio de Eŭropo. Nun, kaj antaŭe tie estis faŝismo. Skribas, ke tio estis morna periodo de historio kaj tia neniam plu estos. Sed la morna periodo samkiel antaŭe plu estas. Same kiel antaŭe. Ĉio interne turniĝas en homo, kiu kredis je malkoloniigo, kaj nun legas, ke nigruloj verŝis pli da nigrula sango, ol antaŭe la blankuloj. Tial mi estas konvinkita, ke ekzistas aferoj, kiujn oni ne rajtas fari en la nomo de ajnaj aliaj aferoj. De ajnaj! Nek de bonaj, nek de malbonaj, nek de altaj. Nek en la nomo de la ŝtata utilo, nek en la nomo de ĉies bono, ĉar post dudek jaroj eblas pruvi ĉion. Por kio tuj-tuje la ideala stato? Ĉu ne estas pli bone, se neniu povas el iu fari kloŝon por noktolampo? Tio estas tute konkreta, kaj por mezurado de ideala stato ankoraŭ neniu elpensis mezurilon. Tial mi ne malbenus tiun etikosferon. Certe, malebligi fari malbonon – ankaŭ tio estas malbono por multaj homoj, tiuj, kiuj estas tre malfeliĉaj sen malfeliĉo de aliaj. Sed prefere ili estu malfeliĉaj. Iu ĉiam estos malfeliĉa, alie ne eblas. Tio estas ĉio. Mi neniun volis ofendi, kaj mi ne plu havas kion diri.

En la kasedoj, ŝajne, estiĝis ĉies konfuzo. Ĉiuokaze, sufiĉe longe neniu respondis, ĝis, finfine, en la kosma silento aŭdiĝis la voĉo

de lordo Russel.

– Sinjoro Finkelstein, vi pravas kaj ne pravas. Se filozofio iam semis malbonon, tio estis nur pro tio, ke la malbono estas inversa flanko de la bono kaj unu sen la alia ne ekzistas. La homa mondo estas trapaso en la spaco kaj la tempo de la raciaj (kun kelkaj esceptoj) estaĵoj, suferigantaj unu la alian. Kvankam neniu tion kalkulis, mi opinias, ke sumo de suferoj kaj turmentoj estas historia konstanto, pli ĝuste, ĝi estas rekte proporcia al kvanto da vivantoj, alivorte ĝi konstantas kalkulante je unu homo. Mi ĉiam penis kredi, ke ia malrapida plibonigo tamen okazas, sed la realo ĉiam pruvadis la malon. Mi dirus, ke la homaro montras nun pli bonan edukitecon, ol en Asirio, sed tute ne pli bonan moralon. Simple anstataŭ malkaŝa fiero de buĉistoj venis ĉiaspecaj pretekstoj kaj kamufloj. Ne ekzistas publikaj ekzekutoj, ĉiuokaze en plejmulto da landoj, ĉar decas opinii, ke tio ne decas al deca ŝtato. Sed «ne decas» estas io alia, ol «ne devas». La unua aserto rilatas al reguloj de bontono, la dua – al etiko. En sia bazo la homaro ŝanĝiĝas tre malrapide kaj negrande. Neniu jam memoras, ke etendo de la mano kiel signo de saluto havis iam celon kontroli, ĉu ne estas en la mano de la salutanto akra ŝtono. Krome, en etiko ajna aritmetiko ne estas allasebla. Se ĉi tie pereas kvin milionoj en mortkoncentrejoj, kaj tie – nur okdek mil pro malsato, ne eblas kompari tiujn nombrojn, por diri, kiu estas pli bona. Ne povas esti tia kalkulo, kiu permesus konstati, ke malfeliĉo de patrino de almenaŭ unu tia infano, kiam li mortas pro malsato, kaj ŝi havas nenion por li, krom la sekiĝinta mammo kaj la disŝiriĝanta koro, malpli grandas, ol malfeliĉo, farita de la ulo kun diplomo de Sorbono, kiu buĉis en Azio kvaronon de sia popolo, decidinte, ke ĝuste tiu kvarono malhelpas plenumiĝon de lia nobla ideo pri ĉies feliĉo. Mi eĉ ne disputos kun vi pri amplekso de objekto de filozofio. Estu tiel: filozofio estas ĉio. En certa senco – jes, ja eĉ kokino, metante ovon, per tio montras, ke ĝi staras sur pozicioj de empirismo, raciismo, optimismo, kaŭzismo kaj aktivismo. Ĝi metas ovon, do agas, do ĝi estas aktivisto. Ĝi kovas tiun ovon kun konvinko, ke ĝin eblas elkovi: tio jam estas neordinara optimismo. Ĝi kalkulas pri apero de kokido, el kiu kreskos nova kokino, do, ĝi estas ankaŭ prognozisto, kaj krome kaŭzisto, ĉar agnoskas ligan

de kaŭzoj kaj sekvoj inter varmo de sia sino kaj evoluiĝo de la birdido. La kokino nur ne povas ĉion ĉi kluki, kaj ĝia filozofio havas instinktan karakteron – ĝi estas enkonstruita en ĝian kokinan cerbon. Sed tiuokaze, sinjoro advokato, de filozofio ne eblas fuĝi. Tio simple ne eblas, kaj malveras, ke *primum edere, deinde philosophari* [49]. Dum ekzistas vivo, ekzistas ankaŭ filozofio. Filozofo, certe, devas esti fidela al la propraj konvinkoj. Pli ofte okazas alie. Do li almenaŭ penu. Mi penis. Mi kontraŭstaris al malbono same sufiĉe naive, komike kaj sensukcese, sidiĝante per la postaĵo sur pavimon proteste kontraŭ milito. Mi nenion atingis, sed se mi elrampus el la kasedo, mi farus la samon. Ĉiu devas fari la sian, kaj punkto. Mi ne pensas, ke ni sukcesis gajigi la animon de nia soleca mastro. Kial vi silentas, sinjoro Tichy?

– Mi dezirus post filozofoj kaj juristoj doni vorton al artisto, – respondis mi kaj ŝaltis la kasedon kun Ŝekspiro. Io malklare eksusuris, kaj finfine aŭdiĝis voĉo:

*Pro kies volo mi el cindro ree  
Ekstaris viva, sed sen peza karno?  
Kaj kie? Sentas mi, ke tiu nigra  
Kvadrat' ne estas mia ĉerkkovrilo,  
Kaj ne fenestro, malfermita nokte,  
Trans kiu pluvigas sur ĝardenajn arbojn,  
Kaj sekve, mi ne estas en Anglujo,  
Sed ankaŭ ne en lando de l' anĝeloj.  
Kaj kvankam la spirito min obeas,  
Sed karnan pezon mi ne sentas plu –  
Nur aŭdi kaj paroli povas. Do,  
Min vokis ne l' Ĉiopovulo,  
Por ke mi staru ĉe l' vizaĝo Lia,  
Per ĉiuj sentoj miaj rearmita.  
Mi estas renaskita per la arto  
Mistera kaj mirakla, kaj ĉi tie  
Nun mi senvida kaj senvesta tremas  
Per penso, kiun mi ĵus reakiris:  
Do, kiu faris ĉion ĉi kaj kial? Kiu*

Deziris, ke fantomo mia pala  
Fantoman servistaron amuzadu  
Per teda versofaro post la morto,  
Konversacion fremdan ornamante?  
Mi estas kio, kaj pro kio estas  
Ĉi tie mi, mortinta pro tumoro,  
Versoplektant'-komedianto Vilĉjo,  
Post morto kiu kreskis super reĝoj,  
Ĉi tie katenita en karcero, –  
Sed tute ne de l' digna Tur' Londona,  
Sed kvazaŭ en barelo de biero,  
Kuranta vigle tra la Laktaj Vojoj  
Multmilajn mejlojn, tedajn, vakajn,  
Kaj sur la gruzo de senfinaj steloj  
Knaranta per teniloj nevideblaj.  
Sed min timigas multe pli ne tio,  
Sed mia propra internaĵo mensa:  
Ja tie sidas kvazaŭ araneo  
Scianta ĉion, kaj teksaĵon teksas  
De vortoj, nesciataj de mi hejme,  
Pri bitoj, kodoj, kvarkoj kaj spinoroj.  
Ja kiel povas scii mi, el kio  
Aer' konsistas, kio estas foto,  
Kaj milon da similaj bagateloj?  
Mi sciis iam nure pri Falstafo,  
Kaj nun eksciis: sango estas ruĝa  
Pro tio, ke ĝin kolorigas hemo,  
Kaj ke scipovo mia post la morto  
Surfadenigi vortojn sur la ritmon,  
Malgajan, kiel de horloĝ' pendolo, –  
Estas en mi, sed tamen ekster mi.  
Per mia voĉo kvazaŭ diras io  
El skatolet' kaŝita meĥanika,  
Al kies dentoj puŝas tim' babila –  
Eterna adorant' de l' Mort' maljuna.

– Sinjoro Ŝekspiro, trankviliĝu. Vi estas nur modelo. Sed eble, iu el vi, sinjoroj, klarigos tion pli bone? Eble vi, lordo Russel?

Bertrand Russel, al kiu vokis kun tiuj vortoj la advokato, vere eksplikis al la kaseda Ŝekspiro, de kie li aperis, kiel tio estas farata kaj por kio. La ekspliko estis tute populara kaj sufiĉe longa, tamen mi dubis, ĉu povos Ŝekspiro, klerigata pri bazoj de kibernetiko kaj psiĥoniko, kompreni ĉion ĉi. Neniu tamen petis vorton, kiam Russel finis. Ree dum ioma tempo regis silento, ĝis finfine respondis la instruito:

Komprenis mi – fantomoj estas ni,  
Kaj ne miraklo faris tion, vere.  
De l' sorto de Lazar' nin savu Di' –  
Restari post la ĉerko degenere.

Mi estas en maŝin', ne estas kie mort'  
Kaj same viv'. *Tertium datur* <sup>[50]</sup>, lordoj!  
Dentradoj nevideblaj en akordo  
Subtenas la fantomon nur per fort'.

Vi jam scipovas nure por humur'  
Senkorpajn parolantojn manifesti;  
Mi, tria inter «esti» kaj «ne esti»,  
Nur ombro estas, spite al Natur'.

Vi l' cindron ne perturbis de l' poet',  
Do vi ne aŭdos anatemon mian,  
Sed restus por eterno monstro fia,  
Kiu animon prenis el skelet'.

Publikon amuzadis mi pajace,  
Sed porti tiun krucon post la mort'  
Ne povas mi. Permesu, mia lord',  
Foriri el ĉi tiu mondo pace.

Ne plu mi volas jam aŭskulti vin,  
Respondi rime al paroloj viaj,

Alie sonos ne versaĵoj piaj  
Sed antaŭmortaj muĝoj de ursin'.

Mi ne distingas ĝuon kaj turmenton,  
Egalas kaj Infer' kaj Paradiz'.  
Plu daŭru de la vivo improviz' –  
Elektas por eterno mi silenton.

## **IV. La surloka esploro**

Koto, marĉoj, ŝmacantaj truoj de kavoj, putraj vaporoj, gasaj vezikoj, blu-bruna nebulo, kiu skrapas la gorĝon, – jen kio estas la loko de mia kurdlanda alplannediĝo, jen kien mi trafis post 249 jaroj, kiel indikas la nombro. Ĉirkaŭfluginte je granda distanco la brilantan lunon, kiu min iam tiel trompis, mi direktis min al la nordo, verdanta ĉe rando de la polusa neĝo, lasinte for malantaŭ la poŭpo grizan ekzantemon de urboj. Kiam mi unuafoje malleviĝis laŭ la ŝtupetaro, mi preskaŭ dronis en koto – humida, briletanta herba tapiŝo evidentiĝis kovrilo de marĉo. Ion pli kovritan de koto, ol la poŭpo de mia raketo, mi verŝajne ankoraŭ ne vidis. Pri bivako eĉ ne eblas pensi. Probable, mi devos elĉizi por mi pirogon, aŭ pli bone preni akvo-kotajn skiojn. Nokte – gluglado, plaŭdado, ŝmacado de marĉaj gasoj. Kaj kia fetoro! Mi ne devis tiel hasti.

La raketo poiomete sinkas en gluecan kaĉon. Mi kalkulis: ĝi dronos ĝis la pruo jam post semajno. Necesas komenci rapidan skoltadon. Sed kiel ĝin rapidigi en tiaj kondiĉoj? Ĉar la hieraŭa tago estis nula, mi atribuas al la hodiaŭa numeron unu. Mi revenis kotkovrita kiel cent diabloj, tamen vidis kurdlon. Nu, kun sama sukceso tio povus esti Kuerdlo aŭ QRDL. Estis tro malhele, eĉ en la vidkampo de noktovidilo, por kompreni. Monstra estaĵo. Ĝi preteradis min, preteradis kaj preteradis, kaj ne estis fino al tiu preterado, kvankam ĝi ĉiam trotis. Por ĝi koto ne gravas, ĝi ja havas krurojn kiel turoj. Mi taksis ĝin je kvarono de angla mejlo, aŭ, prefere, de mara mejlo – atentante akvecon de la teritorio. Do, mi vidis naturan kurdlon. Kurdloj ekzistas. Tio estas animaloj, sed ne iaj urbosaŭroj. Sed ĉu povas mia observo esti pruvo?

Ja ne povas mi preni kurdlon en la raketon. Necesas pensi. Morgaŭ estos sekva skoltado, ĉi-foje tage.

### **La dua tago**

Sur tiu ĉi planedo okazas nekredeblaj aferoj. Pli ĝuste, abomenaj. Mi ankoraŭ ne trankviliĝis post la ŝoko. Mi per propraj okuloj vidis, kiel granda kurdlo aliris al la malpli granda – tio estis en ebena kampo, eĉ sufiĉe seka, kovrita per rufa herbeto, en kia sur la Tero ofte kreskas rufaj fungoj, – do, ĝi alkuris al tiu etulo, kiu trankvile paŝtiĝis, atente priflaris ĝin, kaj tiam la giganto vomis, kaj post tio la alia, malgranda, malleviĝis unue sur la antaŭajn, poste sur la malantaŭajn genuojn, precize kiel kamelo ([pli granda ol baleno](#)), formanĝis ĉion ĉi, lekis sin kaj ekhurlis. Kaj ekhurlis tiel sovaĝe, obtuze, raŭke kaj triste, tiel senespere kaj morne, kvazaŭ kriis tiuj ĉi eterne malserenaj vastaĵoj, – mi eĉ sentis froston sur la korpo, ankoraŭ troplenigita per abomeno. Tiam tiu, kiu estis pli granda, kaptis la genufleksitan je la orelo, kaj, forŝirinte ĝin per unu klako de la faŭko, komencis maĉi, regule ŝmacante kaj movante lipojn supren kaj malsupren, kiel bovino, ronĝanta junajn ŝosojn. Poste ĝi subronĝis al la etulo duan orelon, sed tuj elkraĉis, kvazaŭ ĝi ne plaĉis al ĝi. Tiam la etulo, alpremiĝinte al la tero, ekmoviĝis. Ĝi evidente naŭzis. La granda kaj la malgranda kurdloj, reciproke rigardante en siajn vitrecajn elorbitiĝintajn okulojn, ekgraŭlis tiel, ke miaj haroj ekstaris. Poste ili leviĝis, ekfosis la teron per la malantaŭaj piedoj kaj nehaste disiris en malsamaj direktoj. Kion tio povus signifi? Mi singarde proksimiĝis al la tretita loko, kun vere put-similaj kavoj – la spuroj de iliaj piedoj; iliaj piedoj larĝiĝas ĉe la kalkano, kaj ĉiu estas pli larĝa, ol malgranda dometo. El verdeta laget-granda flako silente, senbrue estis elrampantaj malaltaj, ĝibetiĝintaj estaĵoj, tute homsimilaj, dupiedaj, sed malantaŭe ĉiu el ili havis aldonan paron da etaj ekstremaĵoj, laŭ kiuj estis defluanta ne akvo, sed pli ĝuste likvaĵo, pri kies deveno mi preferis ne pensi. Ili evidente estis civilizitaj, ĉar havis vestojn, eĉ duklapajn, kun butonoj antaŭe kaj malantaŭe, kaj larĝajn rimenetojn – precize kiel ĉe raglano; kaj tiuj iliaj aldonaj apendicoj estis tute ne kruroj, sed baskoj de la vestaĵo, simila al frako, kudrita el du pecoj. Mi opiniis ilin piedoj, ĉar ili sakece disŝoviĝadis kaj regule balanciĝadis dum irado; sed poste iu el ili ŝovis tien la manon, kaj en ĝi aperis felsaketo, kiu tuj estis almetita al la buŝo. Do, tio estis poŝoj por manĝaĵo kaj trinkaĵo. De tempo al tempo trinkante el siaj felsaketoj, ili plukadis en la sakojn algojn, flosantajn en la flako, poste unu el ili, la pli alta,

ion tuse kriis, ĉiuj viciĝis en longan spaliron, kaj de ie – mi havas nenian ideon, de kie – aperis skribotablo. Probable, faldebla, kaj iu portis ĝin sur la dorso, kiel dorsosakon. La plialtulo eksidis ĉe la tablo, kaj aperinta antaŭ miaj okuloj longa vico komencis malrapide moviĝi antaŭen; trairante antaŭ la sidanto – ia oficisto, mi jam ne dubis pri tio, – ĉiu laŭvice montradis al li blankan triangulon, premitan en la mano, ĉu legitimilon, ĉu simple karteton el densa papero aŭ plasto. La oficisto, sidiĝinta kun larĝe dismetitaj kaj fleksitaj malantaŭen genuoj, kun ĉiuj kondutis same: rigardadis al la karteto, poste al la vizaĝo de la kontrolato kaj fine rigardadis en malgrandan, sed tre dikan, malsekan, malpuran libron aŭ kajeron, movante la fingron laŭ paĝoj, kvazaŭ serĉis tie necesan numeron. Poste li prenadis la triangulon, metadis ĝin sur la tablon, frapadis ĝin per sigelilo kaj aŭdigadis abruptan tuson; kaj mi ne povis kompreni, kiel li povas fari ĉion samtempe: ja por foliumi la libron, necesis tria mano, kaj li, sendube, havis nur du, sed tiam mi rimarkis, ke li sidas ne sur seĝo, sed sur unu el siaj kunfratoj, kaj tiu, fleksiĝinte sub pezo de la oficisto, ĉiuminute subŝovas al li ian liston aŭ katalogon. Tio okazadis sufiĉe glate, sed mi jam ne plu sentis miajn piedojn pro starado en maloportuna pozo malantaŭ kotbulo; finfine la kontrolado finiĝis, la tablon kun falditaj piedoj oni metis sur ies dorson, ĉiuj viciĝis je trikolumna kolono kaj ekpaŝis rekte al la horizonto, tien, kie bluis densa arbaro. Mi dum tuta ĉi tempo sidis kliniĝinte, ne kuraĝante rektiĝi. Reveninte en la raketon, mi longe lavadis min, purigadis la veston, speciale la piedveston, kaj meditis pri la viditaĵo.

## **La tria tago**

Mi fordonus multon por kompreni tion, kion mi hodiaŭ vidis. Mi deiris de la raketo je preskaŭ dek kvin marmejloj, tie lokoj estas multe pli sekaj, sed el situanta najbare marĉo super la tero tiriĝas grizaj strioj de nebulo. Unue mi renkontis solan virkurdilon – ĝi dormis sub la suno, kiu pendis ankoraŭ sufiĉe malalte. Probable, ĝi vidis malbonajn sonĝojn, ĉar ĝi terure raŭkis, kaj kiam ĝi suspiris, el ĝia duonmalfermita faŭko eliĝis vera kirlovento, disiganta humidajn vaporojn. La fetoro preskaŭ faligis min, tial mi faris ĉirkaŭiran

manovron kaj aliris de la venta flanko, por fari kelkajn fotojn. Tion mi sukcesus plej bone, sed, ve, dum reŝargo la kasedoj falis en kavon, plenigitan ĝis la randoj per akvo kaj koto, – en la spuron de ĝiaj piedoj, sed mi ne kuraĝis plonĝi en tiun gluecan flakon. Tiu kurdlo estis vera koloso. De malproksime mi opiniis ĝin ia ŝipo, elĵetita de tempesto sur bordon, ĝis ekvidis, kiel larĝiĝas pro spirado ĝiaj flankoj. De ĝia dorso pendis pecoj de ŝanĝata felo. Granda parto de la vosto mankis. Poste en gvidlibro mi trovis priskribon de tiaj ekzempleroj – ili perdas la voston, ĉar mem ĝin ronĝas. Tia kurdlo, ordinare jam griziĝinta kaj serioze malsana je sklerozo, nomiĝas vostkalvulo. Kiel mi baldaŭ konvinkiĝis, la maljunulo estis loĝata. Mi fotadis ĝin el diversaj flankoj, registradis ĝiajn dormajn ĝemojn, kaj poste, malsatiĝinte, subtenis min per seka provianto, kiun mi prenis kun mi. Jam vesperiĝis, kiam en plu malfermita faŭko aperis lumoj. Do, kurdloj vere eligas fajron, pensis mi, pensante, ke tio estas memekflamiĝo; sed tio estis lanternoj de irantaj unu post alia estaĵoj, samaj, kiel la renkontitaj de mi hieraŭ. Tamen tiuj ĉi estis vestitaj iomete alie. Sur ili estis triangulaj ĉapeloj, iom senformiĝintaj pro malseko, kaj malgrandaj frakoj, ĉirkaŭzonitaj per diverskoloraj skarpoj. Sur la skarpoj io brilis, eble ordenoj aŭ medaloj, sed post ĉiu minuto iĝadis ĉiam pli malhele, kaj eĉ helpe de binoklo mi ne povis vidi pli bone el mia kaŝejo. Ĉi-okaze el la kurdlo elfalis tre multe da estaĵoj, preskaŭ du cent. Antaŭ miaj okuloj ili kuris renkonten unuj al aliaj, kvazaŭ atakante, sed anstataŭ batali, komencis rampi unuj sur aliajn, saltetante kaj fleksiĝante. Tio aspektis kiel akrobata programero; ili faris kvar centrojn de surrampado, kvar fostoj el kunkroĉiĝintaj estaĵoj tremis pro streĉo apud la dormanta giganto, kaj ĉiuj aliaj saltadis sur ilin kaj haste rampis supren, kvazaŭ decidinte, en kolektiva frenezo, konstrui el si mem ŝtuparon ĝis la ĉielo mem, vivan Babilonan turon; finfine el la pintoj de la kvar korpaj kolonoj ili komencis fari arkojn, kunvolvante manojn kaj piedojn, kaj tiam mi kvazaŭ sentis elektrobaton: mi komprenis, kion ili fakte estis farantaj. El la propraj korpoj ili kreis modelon de kurdlo! Sed tio tute ne estis frenezo, kaj se eĉ estis, do en ilia frenezo estis sia sistemo, ĉar unu el ili, pli granda, tute ĉirkaŭpendigita per skarpoj kaj insignoj, kriadis en megafonon; li evidente estris ilian peneman suprenrampadon. Rememorinte tion, kion mi legis en la biblioteko

de MEA en la plej malnovaj raportoj pri ekspedicioj, mi decidis, ke la pseŭdokurdlo ekmoviĝos, kvankam samtempe mi konsciis, ke tio estas neebla fizike. Tiutempe leviĝis la luno, kaj kvankam mi ĝenerale ne simpatiis ĝin – ĝi rememorigis min pri la okazinta konfuzo, – nun ĝi helpis al mi per sia brilo. Sub la plena luno mi rigardadis la pseŭdokurdlon per nokta binoklo, ĝis trovis en ĝia konstruo interesajn detalojn. La ĉlako, montrantaj per si la piedojn, havis skarpajn sufiĉe mallarĝajn, de nedifinita malhela koloro – plej verŝajne, simple malpurajn. Tiuj, kiuj surrampis pli supre, portis skarpajn pli larĝajn kaj helajn, probable, flavajn aŭ hel-oranĝajn, kaj la ĉlako, kuŝintaj en la supro mem, montrante la skapolojn kaj la spinon, estis kruce zonitaj per du rubandoj, brilantaj tiel, kvazaŭ en ili estis enplektitaj arĝentaj fadenoj. Tamen, tiu viva konstruaĵo ne povis stari longe – la piedoj kaj la ventro ĉiam pli kaj pli rimarkeble tremis pro streĉo; sed ilia estro, aŭ dirigento, ĉirkaŭita de malgranda sekvantaro, plu ordone kriadis, kaj poste laŭ lia signo aperis trumpetistoj, kaj kun akompano de trumpetoj aŭdiĝis mallaŭtigita, sed tute distingebla kantado. La impresoj estis neordinara kaj treege forta, kaj mi ne povis diveni, por kio entute ili bezonas ĉion ĉi. Kio estas tio: ĉu cirka programero, ĉu ŝtata ceremonio, ĉu milita parado aŭ, finfine, religia rito? Tamen, kun sama sukceso tio povus esti io tute alia, por kio ni eĉ nomon ne havas. De tempo al tempo iu el la aktoroj defaladis de la pseŭdokorpo kaj kaŝe, sur kvar piedoj forrampadis en mallumon, kvazaŭ ege honta aŭ timigita pro sia nevola dizerto. Tio daŭris dum duonhoron, aŭ eble eĉ pli, ĝis la kurdlo komencis poiomete vekiĝi. Tiam la kvarobla piramido momente disfalis, centoj da korpoj disflugis en diversajn direktojn, ektrumpetis la trumpetoj, kaj kvar spaliroj de ĉlako ekhastis al la oscedanta giganto, por en lumo de saltantaj lampoj malaperi en ĝia faŭko. Nubo ŝirmis la lunon, kaj mi, jam nemulte vidante, tamen sukcesis vidi, ke la urbomobilo iom post iom ekstaras unue sur la malantaŭajn, poste sur la antaŭajn piedojn, kaj solene ekvojaĝas. El ĝia ventro aŭdiĝis tiaj bruoj kaj tondroj, kvazaŭ ĝi suferis pro dispepsio. Mi estis revenanta al la raketo en mallumo, tute mirigita. Ja oni diras, ke jam ĉio okazis sub la suno, ke ne estas io nekomprenebla, se la leĝoj de la Naturo estas universalaj; tiuokaze kial do ili unue elrampis el tiu abomena maljunulaĉo, kaj

poste enrampis reen? Kial tiom multe da ili penis provizore transformiĝi en kurdlon? Kio estis tio? Blufo? Deliro? Rito? Adaptiĝo? Ŝtataj interesoj? Genetika drivo? Polica ordono? Mia kapo estis krevanta, precipe pro sciavido. En la gvidlibro pri io simila ne estis eĉ vorto, ja ĝin verkis fakuloj, ne kredantaj, ke urbomobiloj povas esti kurdloj, vivaj kaj loĝataj samtempe. Tamen, mi jam komprenis, ke endas multe pli fidi al la propraj okuloj kaj oreloj, ol al la kunprenita literaturo.

## La sesa tago

Mi mallonge indikas, kion mi hodiaŭ observis: A: kolizion de du urbosaŭroj; el unu elfalis preskaŭ tuta familio kun paralizita avo; B: atakon de kvar etuloj kontraŭ giganto; per kornopikado en malfortan lokon ili igis ĝin malhonore fuĝi; dum la fuĝo ĝi konvulsiis kaj eligis kurdlidon, kiu tuj kovriĝis per koto en flako, ekstremis, prancis kaj gaje forkuris en arbaron, do ĉio ĉi aspektis kiel frata helpo de la etuloj al la glutito; C: promenantan kadavraĵon.

La lasta fenomeno meritas pli detalan priskribon. Ŝvitegante, mi estis pene trairanta altan scirparon inter du vicoj de nekrutaj montetoj, kaj sur fono de la ĉielo, sur pinto de unu el tiuj kalvaj montetaĉoj, mi rimarkis kurdlon. Ĝi ne altiris mian apartan atenton, – ĝi havis nenion specialan, kaj simple iris proksimume en la sama direkto, kiel mi, sed je preskaŭ mejla distanco de mi. Tamen, batalante kontraŭ scirparo, kroĉiĝanta al la dorsosako, la oksigena aparato, la kasedujoj kaj la fotilo, mi malpleje pensis pri tiu soleca koloso – pli pri tio, kiel mi eliru sur pli firman lokon; mi simple dronis en ŝlimo, kies fetoro, sendube, ĝis la morto mem akompanos miajn rememorojn pri tiu kvazaŭe altevoluinta planedo. Finfine, tute senfortiĝinte, mi haltis por restarigi la spiradon, kaj nur tiam la paŝanta fore antaŭe kurdlo ekŝajnis al mi iel stranga. Ĝi iris, tamen, sufiĉe glate, sed alie, ol tiuj, kiujn mi jam vidis. La kapon sur la longa kolo ĝi tenis rigide, kvazaŭ glutis bastonon, aŭ, pli probable, la falantan Pizan turon, la vosto treniĝis post ĝi kvazaŭ rompita, kaj la piedojn ĝi dismetadis larĝe kaj dum ĉiu paŝo kliniĝadis, fojfoje tiel forte, kvazaŭ tuj falos, sed lastmomente denove restarigadis

la ekvilibron. Eble, ĝi estas malsana, ja ili ĉiuj ĉi tie perdas duonon de la vivo por eligi manĝitan, pensis mi kaj, viŝinte ŝviton de la frunto, ekiris pluen en la scirpojn – antaŭe en ili vidiĝis interspaco. Nun mi jam pli ofte rigardadis al la kurdlo kaj ne preterlasis la gravan momenton, kiam ĝi haltis – tiel abrupte, ke ĉiuj ĝiaj kvar piedoj disglitis, – kaj komencis fari plenan turnon malantaŭen, tre mallerte, implikiĝante en la propra vosto, kiu vere nur malhelpis al ĝi, kiel ŝtipo sub la piedoj. Turniĝinte, la kurdlo ree ekiris laŭ la sama vojo, laŭ kiu ĝi venis, kaj kiam ĝi stumbladis sur grundaj malglataĵoj, ĝia kapo saltetadis, kvazaŭ vere anstataŭ elasta vertebraro en ĝia kolo estis ŝtala trabo aŭ io simila. Nu, kian senvivan voston ĝi havas, pensis mi, kio kun ĝi okazis? Preninte el la ujo la binoklon, mi celigis ĝin al la giganto. Tiu estis balanciĝanta, kvazaŭ ŝipo dum forta flanka ondado, kaj inter ĝiaj skapoloj, en larĝa kalvaĵo de la felo – tie ĝi estis tute trivita, – vidiĝis io diverskolora kaj striita; fokusiginte la binoklon, mi ŝtoniĝis pro miro. Tie, sur la pinto mem de la kurdla spino, inter gigantaj traboj de la skapoloj, laborantaj dum marŝado, kelkaj ĉlakoĵ estis sunbanantaj sin sur kuŝejoj. Kiam mi celigis la binoklon al la kapo de tiu mirinda kurdlo, mia mirego transformiĝis en teruron: mi ekvidis kranion, elŝoviĝantan el sub putrinta felo, anstataŭ la okuloj oscedis nigraj kavoj, kaj tio, kion mi komence opiniis nefinmanĝita peco, branĉo kun folioj aŭ arbeto, pendanta el la kurdla buŝo, estis terura stumpo de la lango. Do, tio estis kadavro, sed ĝi moviĝis, kaj eĉ sufiĉe vigle; mi observadis ĝin longe, ĝis finfine vento ne portis al mi egalmezurajn sonojn, kaj subite mi rekonis en ili tamburon – aŭ ian alian muzikilon. En la kurdlo – ja kie ankoraŭ? – ludis orkestro. La kurdlo estis paŝanta laŭ batoj de tamburo, certe, surdigitaj, ja ili esis venantaj el la profundo de la ventro.

Reveninte al la bazejo, mi kun glaso da persika kompoto en la mano ([kies rezervo jam finiĝis, bedaŭrinde](#)) komencis kompili planon de agado. La raketo profundigis en la grundon je triono kaj ne plu dronis, tial mi povis resti ĉi tie plu, ja danke al la defenda koloro ĝi estas preskaŭ nevidebla; sed ŝajnis, ke plua restado en tiu ĉi loko nemulton donos al mi. Tial mi decidis fari ankoraŭ unu, lastan rekognoskon por kapti aborigenon, tamen, ne tute esperante

sukceson: la kurdlandanoj ne aperadis solaj, kaj mi neniam renkontis taĉmenton kun malpli ol tridek ĉlako, kaj kun tia bando mi preferis ne komenci konversacion: la intuicio sufloris al mi, ke tio ne finiĝus bone. Sed mi ne tiom facile rezignas esplorajn projektojn, kies plenumblo estas pagita per jarcentoj da glacia dormo, vera inversigebla morto; tial mi refortigis min kaj preparis noktan ekipaĵon, tio estas la noktovidilon, poŝlampon, nemalgrandan kvanton da ĉokolado, varmobotelon kun trinkaĵo, kaj krome tradukilon – modelon, se fidi al la firmaa katalogo, nekredeble oportunan, sed ne eblas diri, ke lanuge malpezan, se vi devas trairi densajn marĉajn arbustojn – ĝi pezis preskaŭ ok kilogramojn. Tamen tio estis la modelo por «unua kontakto», agordita, ŝajne, al dek ok alt- kaj malalt-kurdlandaj dialektoj, kaj se mi jam decidis riski vivon kaj sanon, do ĝi tute konvenis. Estas malfacile diri, kial, sed post leviĝo de la luno mi ekiris nord-okcidenten, tien, kie mi tage vidis la kadavron, paŝantan sur la kalvmontaro. Tamen mi, ŝajne, misvojiĝis, kvankam iris laŭ azimuto, ĉar mi trafis en arbodensejon, pri kiu mi povas diri nur tion, ke tie estis terura fetoro, kaj branĉoj vipadis mian vizaĝon, kaj se mi ne havus oksigenan maskon, kovrantan la okulojn, mi devus reveni senrezulte. Tamen mi sukcesis traŝoviĝi tra tiu ĝangalo kaj suriris iun solecan monteton, por ĉirkaŭrigardi sub lumo de plena luno.

Estis silento, super herbejoj sternaĝis nebulo, io ĉirpadis – kiel insekto, ne kiel birdo; kaj nur fore, preskaŭ ĉe la nigra horizonto, estis rimarkebla ia moviĝo. Mi rapidis al la noktovidilo – kaj jam pluran fojon dum mia estado ĉi tie, unue kun miro, kaj poste kun ĉiam pli granda timo mi rigardis al etendiĝinta sur tiuj marĉoj ĉeno de kurdloj, paŝantaj rekte al mi kiel distirita krescento; inter ili brileradis lumetoj – plej verŝajne, de lampoj en la manoj de piedirantaj ĉlako. Ial mi tuj decidis, ke tio estas ĉaspelado. Ĉu al mi aŭ ne al mi – pri tio mi ne pensis, tiaj nuancoj nun ne gravas. Necesis kaŝiĝi, kaj tre bone kaŝiĝi. La kurdloj ja iris paŝe, sed ilia paŝado egalas mian trotadon. Kaj la plej danĝeraj estis la piedirantoj kun lampoj, ja ili estis ne malpli lertaj, ol mi. Ĝis la antaŭaj restis nur iaj du mil paŝoj, aŭ eĉ eble malpli, do necesis aŭ tuj komenci retiriĝon, aŭ kuraĝi je renkonto – kun neantaŭdireblaj sekvoj. Dio

scias kial speciale min terurigis la rememoro pri la kurdano, sidanta kun sigelilo en la manoj sur la subulo.

Ĝuste tiu bildo kvazaŭ donis al mi flugilojn. Dum tiu nokto mi, probable, faris personan rekordon en kurado sur malglata grundo. Mi kuregis, falante kaj restariĝante, precize norden, kie estis finiĝanta la linio de la ĉaspelado, kalkulante ĉirkaŭiri ĝin laŭ granda arko kaj antaŭ la tagiĝo malaperi en scirpoj. Tion mi, feliĉe, malsukcesis. Mi diras «feliĉe» pro du kialoj: unue, mi preskaŭ certe ne sukcesus kaj trafus en «sakon», kaj, krom tio, ne renkontus la estaĵon, pri kiu mi agrable rememoras ankaŭ nun, kiel pri mia Vendredo. Mi eĉ ne sciis, ke mi kuras rekte al minita teritorio, krome prironĝita per malnovaj, disfalintaj ter-dometoj ĉe forputrintaj arbostumpoj, kaj ke ĝuste tio estas la sola vojo al saviĝo; astronaŭtiko, same kiel multaj aliaj metioj, krom inĝenieco postulas ankoraŭ iomete da fortune.

Snufante kiel lokomotivo, mi kuregis per lastaj fortoj, kun timo liberigante la piedojn el sub iaj kurbaĵoj, mukaj radikoj, estante tute certa, ke, se mi tordos la piedon, en tio estas nemulte da bono, kaj tiam la tero fendiĝis sub mi kaj mi falis en nigran kavon; ŝlima koto mildigis la baton, kaj preskaŭ sammomente en tiu mallumego mi kunpuŝiĝis kun ia estaĵo, kun estaĵo racia, kun aborigeno; kiam ni ambaŭ ekkriis pro neatenditeco – aŭ pro timo, – sub mia mano mi eksentis malsekiĝintan, pezan, krudan ŝtofon de lia vestaĵo. Jen la «unua kontakto»! Nek mi povis vidi lin, nek li min. Ni desaltis unu de la alia, kiel brogitaj. Probable li tuj fuĝus, kaj mi ĝin neniam plu vidus (pli ĝuste, tuŝus); li kaŝiĝadis en tiuj truoj delonge kaj konis ilin kiel proprajn poŝojn; tamen mia multjara sperto ne estis vana. Mi ŝaltis la tradukilon kaj diris, pli ĝuste raŭkis en la mikrofonon: «Ne fuĝu, fremda estaĵo, mi estas via amiko, mi venis de malproksime, sed kun bonaj intencoj kaj ne faros al vi malbonon». Ion tian, ĉar kun aliastranoj oni ne enprofundiĝu en detalojn; estas facile imagi, kion spertus altevoluinta luzano, kiu nokte elŝipiĝus, ekzemple, en Irano aŭ ankoraŭ ie en Azio: li povus opinii sin feliĉulo, se li pasigus duonjaron en prizono. Verdire, mi ne kalkulis je favora reago de la najbaroj, kaj tio, ke li subite eksilentis, estis por mi agrabla surprizo.

«Kiu vi estas?» – demandis mi singarde kaj aldonis, ke mi mem estas scienca esploristo kaj venis ĉi tien por esplori vivon de kurdloj. Li ne tuj liberiĝis de suspektoj, sed finfine cedis al miaj admonoj kaj palpis min, kontrolante, kian ekipaĵon mi havas sur mi; strange, li rekonis la noktovidilon, kvankam tian modelon li ne povis koni – ja ĝi estis japana.

Vorton post vorto, kun multaj miskomprenoj, ni tamen trovis komunan lingvon, kaj jen kion mi aŭdis de mia nokta kamarado. Li estis juna kaj promesplena kurdlanda sciencisto, absolute fidela al la Prezidanto, kaj egale al la ideo de politmobilo, tial la potencoj permesis al li daŭrigi lernadon en Luzanio. Post ĉiu semestro li revenadis hejmen, tio estas en sian kurdlon. Malfeliĉe, dum la lasta reveno li faris eraron kaj ricevis kvin jarojn da PuKo. Li ne apelaciis, ĉar apelacio, kiel atesto de speciala persisto pri eraroj, kaŭzas ordinare pliseverigon de verdikto. Mi nenion komprenis. La tradukilo funkciis senripoĉe, sed ĝi tradukadis vortojn, sed ne sociajn fenomenojn, starantajn malantaŭ ili. Ni sidis flanko ĉe flanko en nepenetrebla mallumo, sur arbostumpo, elstaranta el ŝlimo, kaj manĝis ĉokoladon, kiu tre plaĉis al li. Li rimarkis, ke ion similan li manĝis en Lulavito – en la universitato de tiu luzania urbo li laboris super disertaĵo pri astrofiziko. Malrapide kaj tolereme li klarigis al mi, en kio estis lia malfeliĉo. La kurdlanda gazetaro, vere, atingas Luzanion, sed «La voĉo de kurdlo», kiun li legadis regule, silentas pri ĉiuj malagrablaj faktoj; tial li ne sciis, ke en la patrujo jam estas nova Prezidanto, kaj la antaŭa kune kun tri aliaj Superestroj konsistigas tiel nomatan Bandon de la Kvar, aŭ KriGruKreMon ([Kriman Grupaĉon de Kretenoj kaj Maliculoj](#)). Apenaŭ li sukcesis krei ordinaran saluton «O-ku-ku!», per kiu oni salutas Observantojn kaj Kuratorojn de Kurdlando, dirante en ĝusta ordo iliajn titolojn, ordenojn kaj nomojn, li estis senprokraste arestita. Klarigoj ne helpis. Tamen, li sciis, ke ili neniam helpas. Li ricevis kvin jarojn da PuKo ([Puna Kurdlo](#)) kaj fuĝis el tie antaŭ du semajnoj. La kurdlo, el kiu li fuĝis, profitinte malatenton de gardistoj ([ilia disciplino tute nuliĝis, diris li, ili preferas nur sunbaniĝi sur la spino](#)), vere estas kadavro, kadavromobilo, aŭ kadavlero, kiel diras la prizonuloj, kiuj movas ĝin per propraj fortoj, kiel galeron. Tiam mi komencis rememori, ke mi

legis pri io simila en la arkivo de MEA. Tamen mi demandis pri nenio – li parolu libere.

Estante sciencisto, eĉ astrofizikisto, la informon pri mia tera deveno li perceptis sen specialaj emocioj. Li, tamen, aŭdis pri la Tero kaj sciis, ke ĉe ni estas neniam kurdloj, pro kio li kondolencis min. Mi unue decidis, ke tio estas amara sarkasmo, sed ne, li diris tute serioze. Estis interese, ke li nenium kulpigis pri sia sorto, ne plendis pri la verdikto kaj la punlaboro, kvankam plendis, ke oleon por lubrikado de artikoj la gardistoj preskaŭ tute forspekulacias, pro kio la spino preskaŭ krevas, kiam la monstraĵoj ekmoviĝas, kaj grinco kaj knaro estas tiaj, ke eblas freneziĝi. Kio koncernas naciomobilismon, li plu estis por ĝi, firme kiel roko. Li nur opiniis, ke sendatajn eksterlandajn stipendiulojn oni devas antaŭ reveno informi en la kurdlanda ambasadorejo; ĉu tio utilas por la ŝtato – igi talentulojn perdi tiom da jaroj en PuKo? Oni al neniu senkulpe rompu la karieron! En Luzanio, kredigis li min, estas multege da entuziastoj de politmobilismo, speciale inter studentoj kaj profesoroj. Ili tie simple velkas pro ĉiea feliĉo.

Ĉokolado aŭ io tia estas, certe, pli bona, ol brrbicio ([supaĉo el putraj sfagnoj kaj algoj](#)), sed apartajn faktojn ne eblas trakti izolate de la Tutaĵo. Mi singarde rimarkis, ke, se «La voĉo de kurdlo» donadus fidindajn informojn, do neniu riskus veni al tia fino, al kia venis li. Li mansvingis. Mi ne vidis tion, sed sentis, ja ni alpremiĝis unu al la alia sur tiu ĉi putra arbostumpo, saviĝante de penetra nokta humido. Sed tiam, diris li, necesus priskribi ankaŭ luzaniajn frandaĵojn, kaj la simpla popolo, freneziĝinte, amase fuĝus el kurdloj, kaj kio okazus kun la ideo de politmobilo? Ni supozu tion, rimarkis mi, do ĉu la mondo renversiĝus pro tio? Tiuj vortoj forte lin tuŝis. Kiel do, laŭtigis li la voĉon, cent kvindek jaroj da ideoj serĉadoj, malurbigado kaj naturigado de la socio, – ĉu ĉio ĉi devas iĝi vana nur tial, ke ie estas io pli bongusta ol brrbicio?

Por trankviligi lin, mi demandis pri la ĉaspelado. Li respondis per sia antaŭa, glata, iom malgaja voĉo, kaj la tradukilo knaris en mian orelon liajn vortojn. Nu certe, li sciis pri la ĉaspelado, ĝuste tial

li kaŝiĝis ĉi tie, antaŭe tio estis politika trejnejo, li mem ĉi tie finis la kurson antaŭ tri jaroj, do ellernis la lokon ĝis lasta buleto. Li ankaŭ sciis, kiel trairi la minkampojn, ja li mem metis tiujn minojn. Tio, ke mi ne eksplodis, iom miris lin, sed li havis pli gravajn zorgojn. Ni babiladis tiel dum duono de nokto. La ĉaspelado preteris nin; la luno malleviĝis, kaj estiĝis silento, kvazaŭ en tombo. Mi nomis la nevideblan eks-pukanon Vendredo – lian veran nomon mi ne sukcesis enmemorigi, kvankam li prononcis ĝin silabe ses fojojn. Tamen, kian tio havis signifon? Li nomis min «sinjoro Tobler». Kial Tobler? Tiel nomiĝis la firmao, produktanta la ĉokoladon kun nuksoj, per kiu mi lin regalis, kaj li opiniis tion mia nomo. Propraj nomoj pleje embarasas tradukilojn. Al mi ŝajnis, ke mian veran nomon li opiniis priskribo de mia karaktero ([Tichy ja signifas «kvieta»](#)). Mi, tamen, ne penis lin malkonvinki, mi deziris ekscii pli pri naciomobilismo. Kiel eblas okupiĝi pri astronomio en kurdlo? Certe, ne eblas, respondis li degne, sed politmobilo estas antaŭ ĉio ideo, kaj per sola ideo ne eblas longe vivi, necesas io konkreta por ĉiu tago. En ĉi tiu okazo – kurdloj. Tamen, vivo en kurdlo estas bonega lerno, formanta spiriton de kunlaboro en malfacilaj kondiĉoj, kaj malfermanta perspektivojn por estonteco. Kiajn? Nu, adiaŭi kurdlon kaj loĝiĝi ie apud Kikirikso ([aŭ eble Rikkiksikso](#)); la klimato tie estas tre sana, estas neniam marĉoj, nek kurdloj, en la centro estas la registara kvartalo, sed la Prezidanto mem, kaj la Konsilio de Superestroj loĝas ie aliloke.

Mi havis impreson, ke li scias la adreson de la supera kurdlanda estraro, sed li, kvankam fratiĝis kun mi en tiu nigra truoj, tamen ne ĝisfine fidis al mi. Oni diras, informis li min sekrete, ke neniuj el la Superestroj dum la vivo vidis eĉ unu vivan kurdlon, sed nur Surrampodontojn, tio estas la pitoreskajn komponaĵojn de tiuj potencaj animaloj, kreatajn de civitanoj dum ŝtataj festoj antaŭ la honora tribuno, sur kiu staras la Prezidanto mem. Verŝajne, antaŭ tio, nokte, mi vidis provludon de tia spektaklo, ja necesas multe labori, por montri sin brile antaŭ la estroj, sub sonoj de la himno kaj susurado de standardoj. Li mem iam feliĉis iam esti supera parto de la maldekstra malantaŭa piedo de tia Surrampodonto. Li ekrevis kaj malfacile suspiris. Riskante kolerigi lin, mi demandis, kion belan,

propre, li vidas en tiu timiga estaĵo? Anstataŭ ol indigniĝi, li ironie ekridis kaj diris, ke li ne estas tiom malklera pri la teraj aferoj, kia mi lin sendube opinias. Vi ja havas ŝtatajn blazonojn, ĉu? Leonojn, aglojn kaj ceterajn birdojn. Kaj kio bela estas en tiuj plumkovritaj estaĵoj? Aŭ ĉu vi ne scias, ke aglo disŝiras per siaj ungegoj kaj beko ĉiaspecajn senkulpajn animalojn, kaj krome fekas sub sin en la nesto? Ĉu tio malhelpas al vi klini la kapon antaŭ ĝia bildo? Sed ni, kontraŭis mi, loĝas nek en agloj, nek en leonoj. Ne loĝas, levis la ŝultrojn li, ĉar vi ne lokiĝus tie. Al ni simple pli fortunis. La naciomobilismo estas tradicio, sanktigita de la tempo, la kurdlo estas ĝia enkorpiĝo, la kurdla biologio estas nia ŝtata ideologio, kaj tiu, kiu havas cerbon en la kapo, ne finos siajn tagojn en ventro, kaj, se ne okazus la fatala hazardo, li jam post jaro sidus ĉe bonega importita teleskopo apud Kikirikso. Tamen, en la sana korpo estas sana spirito. Nenio luzano (li malestime diris «luzulaĉo») eltenus eĉ tri tagojn en tia kavo, nutrante sin per radikoj, kaj jen li loĝas ĉi tie jam du semajnojn kaj ne plendas, ĉar en la PuKo manĝaĵo estis nemulte pli bona.

Mi demandis, kiel lin impresis Luzanio. Ja tie li vivis bone, ĉu? Certe, respondis li, kaj li eĉ intencas iri trans la limon en Lulaviton kaj daŭrigi okupiĝojn en la fakultato de profesoro Gzimks, lia scienca gvidanto. Li okupiĝos pri doktora disertacio, por reveni, kiam oni deklaras amnestion aŭ kiam la nuna Prezidanto iĝos demono kaj monstro. Kaj li estas patrioto kaj sekvas principon: *right or wrong my country* <sup>[51]</sup>. Tamen, kia wrong! Ĉiu, kiu sidas en kurdlo, vartas esperon loĝiĝi apud Kikirikso, kaj tiuj luzanoj esperas jam pri nenio. Ĉu vi aŭdis pri sinturo, gedustriigo kaj feliskalado – feliĉiga eskalado? Jen. El kurdlo oni povas eliri unufoje dum jaro por 24 horoj, ricevinte pasbiletan, kaj el la etikosfero, tiuj ĉenoj kaj katenoj de lertonizita feliĉo – neniam, neniel, kaj se mi nur scius, kiel enviis al li liaj junaj kolegoj, kiam li revenis en Kurdlandon por ferioj... Mi demandis, kion oni farus kun li, se lin kaptus la ĉaspelistoj, kaj per tio mi ege lin ofendis – aŭ indignigis. Li nomis min senhonta fremdulo, derampis de la arbostumpo sur la teron kaj kuŝiĝis por dormi. Mi sidis super ili dum ia tempo, poste kuŝiĝis apude kaj momente ekdormis. Vekiĝis mi ĉe la sunleviĝo sola. Vendredo

senspure malaperis. Li eĉ ne klarigis al mi, kie estas la trairejo de la minkampo. Feliĉe, mia propra pado frostiĝis en glacia kaĉo kaj, singarde ŝtupante laŭ la propraj spuroj, ĝis la tagmezo mi atingis la raketon, renkontinte nur etan kurdlon, baraktantan en flako. Danke al Vendredo mi sciis, ke tio estas aŭ neokupita loĝejo, aŭ unufamilia dometo de meznivelaj funkciuloj. Sed mi jam estis satega je kurdloj – de ajna speco, formato kaj temperamento.

Mi ĉion lavis, gladis la vizitan kostumon, iom manĝetis kaj startis sur tian altan orbiton, de kiu eblis reveni sur Ention kun kosma rapido – mi ne intencis informi luzanojn pri mia estado en Kurdlando. Mi deziris aperi sur iliaj radaroj kiel venanta rekte el la Tero ties duonoficiala ambasadoro. Tiel estus pli fidinde. Kontaktinte kun la kosmodroma regcentro apud Lulavito kaj ricevinte dezirojn pri sukcesa alplanediĝo, mi preparis min al ceremonioj, neeviteblaj en tiaj okazoj: oni aludis al mi, ke krom prezidanto kaj aktivuloj de la Societo de entiana-homa amikeco estos reprezentantoj de la ŝtataj organoj. Kiel grandega brilanto ekbrilis sur mia ekrano la ĉefurbo de Luzanio – nelonge antaŭ noktomezo; tiel okazis, ke mi alplanediĝis, kiam la suno jam antaŭlonge subiris. Kaj kiel du belegaj smeraldoj en sama kadro ekbrilis ĝiaj satelitaj urboj Tlitalutlo kaj Lulavito. Mi alplanediĝis kaj sur kuŝigita seĝo, jam en mia plej bona kostumo, aŭskultis katan muzikon, tondrantan el la ŝipa aŭskultilo. Ŝajne, la luzanoj, ne kompreninte mian ŝtatan apartenon, renkontis min per himnoj de ĉiuj ŝtatoj – anoj de UNO. La rezulto estis terura, sed mi komprenis, ke tiu paŝo estis kaŭzita de politikaj, sed ne melodiaj konsideroj. Je tri minutoj post la unua mi staris en malfermita lukso de la ŝipo kaj en flamanta lumo de lumĵetiloj, falanta de ĉiuj flankoj, sub sonoj de orkestroj mi komencis malsupreniri laŭ la tapiŝa vojeto de la ŝtuparo, ridetante al kunvenintaj homamasoj kaj salute svingante la manojn super la kapo. Samtempe mi ne forgesis kaŝe rigardi la korpon de la raketo kaj konvinkiĝis, ke la atmosfera frotado karbigis ĝin kaj kaŝis spurojn de la koto, atestantaj mian kurdlandan aventuron. Preskaŭ galope oni kondukis min preter salutantaj spaliroj ĉiam plu kaj plu – eble, pensis mi, por liberigi min de trudiĝemaj televidkameraistoj kaj ĵurnalistoj.

De la giganta kosmohaveno en la memoro restis nenio, krom bruego kaj brilaj lumoj. Mi eĉ ne sciis, kiu min ĉirkaŭas; oni min gardeme kondukadis, direktadis, puŝetadis, ĝis mi finfine mergiĝis en ion molan, kaj ni ekveturis sur nesciate kio, nesciate kien. Perpleksita de transiro el nebulaj marĉaj vastaĵoj en vorticon de nokta metropolo, mi perdis parolkapablon, portata ien kun freneza rapido; rampoj, startejoj, zumoj, briloj, ŝrikoj falegadis sur min de ĉie, kvazaŭ mi estis la centro de ĥaoso, je hardika distanco de transformiĝo en ian kaĉegon; mi jam ne distingis tegmentojn disde vojoj, aŭtojn disde lampoj en tiu brulado kaj en tiu rapidveturado, streĉita, kiel krevonta kordo; mi ŝrumpis, kiel sovaĝulo, kun granda peno ŝajnigante trankvilon. Mi ne scias, kien oni min alveturigis, tie estis parko, antaŭpordo, kiu evidentiĝis lifto, nia veturilo malfermiĝis, kiel distranĉita oranĝo, ni eliris, miaj oreloj surdiĝis, dika luzano kun tute homa vizaĝo enpikis en bukedon en mia butontruo orkideon, kiu tuj ekparolis – tio estis mikrotradukilo, ni trairis kelkajn halojn, pensigantajn pri palaco kaj muzeo samtempe, statuoj deiradis de mia vojo, – ĉu robotoj? – ne, dioidoj, diris iu; tapiŝoj, aŭ eble gazonoj – ĉu en domo!? – bronzo, altaroj (aŭ tabloj?), iu rimarkis, ke mi ne havas nigrajn okulvitrojn, oni donis ilin al mi, mi dankis, vere, ĉirkaŭe estis tro multe da oraj blindigaj surfacoj, pordoj malfermiĝadis, kvazaŭ etenditaj irisoj de kataj okuloj, de supre faladis sur nin rozkolora florpolvero, aŭ eble tio estis ia nebulo; meblaro kantadis – aŭ tio estis sonorilaro? – sed la ĉapelo de la luzano, irinta apud mi, same kantetis ion, ĉar, kiam li ĵetis ĝin al dioido, estiĝis silento; en duoncirkla halo kies fenestroj rigardis al la urbo, flamanta en la nokto per siaj galaksioj, al ni alflugis malgrandaj Amoretoj sur flugiloj, kun pletoj, plenigitaj per manĝetoj, sed antaŭ ol mi komprenis, kio estas tio, unu el la kondukantoj faris signon – ne necesas; ili elvapiĝis; jen ankoraŭ unu halo, supre malhela, tamen lumis palmoj aŭ arbustoj. Oni kondukis min en sekvan ĉambron. Mi ekvidis nudajn murojn, en la angulo – ion similan al hejma metiejo, blankan tapiŝon, malpurigitan aŭ trabruligitan per ĥemiaĵoj, hokon en la muro, kolringon sur ĉeno, kaj mi haltis, malagrade surprizita de ĉio ĉi, sed ili petegis min aliri kaj rigardi, unu el ili prenis la kolringon, surmetis sur sin, iom turnis

la okulojn kvazaŭ pro ravo, demetis, la ceteraj rigardis atente, kun streĉo, iel katenite ridetis – do, ĉu mi surmetu tiun kolringon?

Finfine, tio povus esti ia loka rito, sed mi ne deziris. Mi mem ne scias, kio min haltigis. Eble tio, ke ili ne parolis kun mi, sed nur montradis per gestoj plej humilan respekton; ili ĉiuj havis tradukilojn, en la butontruoj, kiel mi, tamen ili silentis. Mi rigidiĝis meze de la ĉambro. Ili ĝentile puŝetadis min, kun gestado de surduloj aŭ kretenoj, sed mi jam ekobstinis, komencis forpuŝi ilin, komence ne senceremonie, riverencante, – ja en tia palaco necesas konservi decan aspekton, ja tro abrupta estis la transformiĝo – kial ĝuste ĉi tie, en kio estas la afero, pro kia diablo? – ili puŝadis min jam preskaŭ malĝentile, des pli forte, ju pli forte mi rezistis; mi ne scias, kiam, en kiu momento omaĝoj transformiĝis en batojn. Propre, ne ili min batadis, sed mi ilin; al la pufa vizaĝaĉo de iu dikulo – ricevu! – per la kapo en la ventron – lasu min, kanajlo! do liberigu min, atendu, ĉi tie estas ia miskompreno, mi estas fremdulo, venis kiel diplomato – la tradukilo pepe ripetadis ĉiun mian vorton, ili ne povis ne aŭdi, sed tamen plu puŝadis min al la muro – do, ĉu jene? nu, ni parolos alie, mi batis la kantantan vestaĵon, kaj ĉu piedbaton vi ne deziras? – la tradukilo krakis kaj eksilentis, dispremita, ili falis sur min per la tuta maso; ja mi rezistis ne tiel, kiel povis, ĉar mi ne sciis, kiom granda estas la prezo. Mi tute ne scias, kiam, sed la kolringo klikfermiĝis sur mia kolo, kaj ili deziris nur elturniĝi, desalti, foriri, ja mi jam estis ĉenita; sed mi premis sub la maldekstra kubuto la kapon de la dikulo kaj draŝadis lin anstataŭ ĉiuj ceteraj, tiuj trenis lin je la piedoj, li muĝis kiel bubalo, kaj finfine mi lin lasis, ja ĉio ĉi estis tro stulta. Ili dekuris de mi for, kiel de kolera hundo, malfacile spiregante, en ŝiritaj vestoj, kiuj kantis terure false, – ja mi sufiĉe pridraŝis ilin; sed ili rigardis al mi kun ĝojo – tute alia, ol tiu, kiu estis antaŭe, en la kosmohaveno; tio estis ĝojo de posedo de mi. Ĉu mi sufiĉe klare esprimas? Ili ĝuis mian aspekton, kvazaŭ mi estus granda rabobesto, trafinta en kaptilon. Tio diable malplaĉis al mi. Satrigardinte min, ili vice foriris.

Mi restis sola, ĉenita, kaj ankoraŭfoje ĉirkaŭrigardis la ĉambron. Mi kun plezuro eksidus, la kruroj ankoraŭ tremis pro streĉo, ja al unu

el ili mi ŝiris la orelon, kaj al la dikulo difektis la nazon; sed simple sidi tiel, ĉe la muro, kun kolringo sur la kolo, mi ne povis – almenaŭ nun. Paŝi mi same ne deziris, tio estus tro hundece. Antaŭ miaj okuloj plu staris la ora lukso de la palaco, kelkaj Amoretoj kun pletoj kunflugis sub la plafono, sed neniu el ili provis regali min per manĝaĵoj. Mi penis sugesti min, ke tio estas ia giganta miskompreno, sed sensukcese. Plej suspektinda al mi ŝajnis eĉ ne tio, ke oni min ĉenis, sed la ĝojo, kun kiu ili rigardis al mi antaŭ la foriro. Mi pensis, kiel mi kondutu plu, por ne perdi dignon; en tia stato en la kapon venas tute idiotaj pensoj, ekzemple, ŝirmi la kolrington per la kolumo de la ĉemizo, kaj la ĉenon kovri per la propra korpo. Tamen la okuloj per si mem turniĝis al la similaĵo de metiejo en la angulo, tie kuŝis iaj tranĉiloj kaj pinĉiloj, mi rimarkis, ke la angulon oni iam kurtenadis – sub la plafono estis stangeto, laŭ kiu povis moviĝi kurteno kun radetoj, sed nun ĝi estis malfermita. La tranĉiloj ion rememorigis al mi – iom similaj al segiloj, sed sen dentoj, duoncirkla pinto, kun fustoj, – jes, precize kiel ledaj tranĉiloj. Por prilaboro de led. Sed kion komunan ili povis havi kun mi? Estas klare, ke nenion! Mi ripetis tion al mi dek fojojn, sed tute ne konvinkis min. Voki helpon mi hontis. En la poŝtranĉilo mi havis fajlilon, sed ne por tia ĉeno – tiu eltenus ne nur ĉenhundon, sed eĉ sesopan jungaĵon.

Proksimume post horo la irizaj pordoj subite malfermiĝis. Eniris miaj kaptintoj kun iu nova luzano, alta kaj tre dika. Li portis rozkolorajn okulvitrojn, tenis sin majeste, kvankam anhelis tiel, kvazaŭ malfruis trajnon. Li malalte riverencis al mi ĉe la sojlo mem kaj malŝaltis kantadon de sia vestaĵo. Aŭ eble, de la ĉapelo. La ceteraj, montrante al mi, babilis senĉese kun sama ĝoja kontenteco. Ĉu mi estis ostaĝo? Eble, politika? Aŭ temis pri elaĉeto?

La rigardado okupis kelkajn minutojn, sed la majesta luzano rimarkis la malfermitan metiejon kaj komencis kriaĉi al la komplicoj, kaj al unu el ili eĉ minacis per la pugno. Ili vetkuris por fermi la ŝirmilon. Kretenoj – mustardon post tagmanĝo; sed tio, ke ili ŝirmis tiun benkon kun tranĉiloj, fine frostigis mian sangon. La altulo ordonis, duopo elkuris el la ĉambro kaj preskaŭ tuj revenis kun statuo, el tiuj, kiujn ili nomis dioidoj. Tiu ĉi dioido aspektis precize kiel

nia tera, preĝeja anĝelo, nur moviĝanta. Oni alportis fotelojn, la anĝelo puŝis unu el ili al mi, ekstaris apude kaj komencis parolegi nekredeble rapide; mi komprenis, ke tio estas tradukisto; krome ĝi ventumadis min per la flugiloj, kio same ne estis superflua – post ĉiuj ĉi paroloj kaj atencoj kontraŭ mia vivo mi ŝvitegis. Ili eksidis ronde, sen ne tre proksime – ekster la atingita zono de la ĉeno, – nu, kaj la afero komenciĝis. Kia ĝuste afero, estas malfacile diri. Unue ili prezentis sin al mi, sed ne ĉiuj. Tiuj, kiuj aspektis pli ferocaj, sidiĝis inter la foteloj kaŭre kaj entuziasmigadis la oratorojn per hurlado, ŝrikado, eksplodoj de satana ridego, kaj la elpaŝantoj laŭvice okupadis liberan lokon rekte kontraŭ mi kaj senbridigadis sian senton de malamo – ne tiom kontraŭ mi, kiom kontraŭ la tuta mondo.

Iam oni min jam ŝtelis por elaĉeto, ankaŭ pri ideaj homŝtelantoj mi aŭdis, kaj tiuj ĉi pretendis esti ĝuste la ideaj; sed io ĉi tie estis malkonvena. Mi ne scias, kiel, diable, tion esprimi. Mi ja ne dubis pri sincereco de iliaj malbonaj intencoj. Mi eksciis, ke la majestulo, kun rozkoloraj okulvitroj, estas prezidanto, aŭ pli ĝuste, kontraŭprezidanto de ilia Unio de verkistoj, ke unuj el ili okupiĝas pri kontraŭpastrismo, aliaj estis Tutkontraŭpentristoj, sur la tapiŝo sidis neonisto ([li ne lumis neone – simple oni tiel nomis novnihilistojn](#)), apud li estis du socitorturistoj, kaj apud la anĝelo – unu apokalipsisto ([eskatisto](#)), du rezististoj, luktantaj kontraŭ mi-ne-memoras-kio, unu mallumisto kaj kelkaj ekstremistoj malpli grandaj, plenumantaj rolon de aplaŭdantoj. Minacante al mi, ili transiradis de furiozo al entuziasmo, iliaj sentoj ŝajnis sinceraj, sed... kvazaŭ ne estis kontentigantaj ilin mem. Per io ili similis al aktoroj, tro maltrankviliĝintaj antaŭ la spektaklo, per io – indianojn, dancantajn ĉirkaŭ tortura fosto, sed indianojn, kiuj ne tre kredas je sia Manituo kaj ja la Lando de Eterna Ĉasado kaj dancas, kiel dancis iliaj avoj, sed kun ia maltrankvilo... ilin tute nenio estis moderiganta, estis nenia kompatato, tute ne, pli verŝajne, estis grajno de dubo, silentigata per ĥora hurlado... aŭ rememoru ploristinojn dum entombigo – ne tiujn, al kiuj oni pagas pro lamentoj kaj ŝutado de cindro al la kapo, sed la parencojn, kiuj penas varmigi temperaturon de malespero pli, ol ili kapablas... kaj tial ili devas elŝiri da haroj sur la kapo eĉ pli, ol necese, kaj tiel ploregi, ke oni ilin aŭdu ekster la tombejo.

Unuvorte, ili iel troe penis. Iliaj vizaĝoj estis homaj, sed tio ne estis maskoj, kvankam videblis, ke tio ne estas iliaj ordinaraĵoj vizaĝoj. Tiam mi ankoraŭ ne sciis, kiel ili tion faras, kaj, verdire, tio ne tre zorgis min. La anĝelo, starinta apud mi, superis tutkosmajn rekordojn de rapido de tradukado. Li tradukis eĉ ĥoran ŝrikon: «Libero kaj Prospero! Diablo vin ĉiujn prenu! En pikogantojn la kanajlojn, kiberaĉulojn, sciencidojn, konstruaĉitajn en lulilo-matraso, ŝmacantajn en ĉiesa kremeco, kadukajn molaĉajn vomulojn-lipmukulojn». Tiamaniere ili sin ardigadis, kaj poste unu el ili dispuŝis la ceterajn, kaj, saltetante surloke, kiel virkoko, kaj svingante la manojn, kvazaŭ li deziris leviĝi sub la plafonon, al la Amoretoj kun pletoj, ekmuĝis:

– Aŭskultu, terulo, diablo prenu vian kurieran diplomoŝton! Ja estas vero, ke ĉiu, ĉu granda aŭ malgranda, bela aŭ malbela, nobla aŭ malnobla, kripla aŭ svelta, dum vivas en malĝojo kaj, ĝibiĝinte, disvolvas la fifvadenon, tio estas vivfadenon, vekas en ni mizerikordon, kompaton, karitaton, kunsenton, piecon, sanktecon, amen! Kaj privomita voluptulo, abomena lascivulo, dikega manĝegulo, tretanto de floroj kaj mondoj – estas ne pli ol dupieda malpuraĵo de estado, malsatega vorulo, malica cinikulo, naŭziga mukulo, ĉu vere? Se vi renkontos sur marĉo dum malbona vetero malfeliĉulon en truita sakaĵo, via galo incitiĝos pro kompatato netolerebla kaj vian koron malgajigos pala fajrero de zorgoj. Aĥ, diablo, se mi fakte renkontus ie infanon orfan, duĝiban aŭ eĉ malpligradan kriplulon aŭ malfeliĉulon ajnan, mizerulon senlangan, malvarmiĝintan, sen subpantalonoj, ho, kiel mi lin varmigus, karesus, al la koro premus kaj flustrus en lian nelavitan, krudan, sed popolan orelon kanton mian! Sed neniam tio sukcesos – la sinturo ne permesos, lertonidaĉo! Kiam mi iris al kiberkonfesprenanto, tiu konsilis al mi estingi soifon mian de mizerikordo per sintesentoj – sintezitaj sentimentoj, anstataŭ la Vera Kompatato, ĉu aŭdas vi, laktosuĉulo tera? Ho, tiam kuris mi tuj hejmen por preni benzinkruĉon, por propramane fajrigi tiun kiberon, pri kio, kiel vi senĝene divenas, neniu min malhelpis. Sekvan tagon oni instalas tie novan, centkanalan kiber-konfespreniston, por seanco de samtempa konfesado. Tiam mi komprenis, ke venis tempo

la popolon inciti, kaj ke tio estas la Sola Savo. Ho! kiel min esperigis tiu granda malkovro! Savanto de amasoj, komprenis mi, povas iĝi sole teroristo-detruisto, kiu la liberojn abomenajn, tuŝitajn per milionoj da malpuraj manaĉoj, premos, tranĉos, nitos kaj firme fermos, kaj el ĉiesa maldisciplineco, post malestimindaj lamentoj kaj plendoj, restariĝos kun terura muĝo la Dezirata Fantomo, kiu estis por mi aŭroro en la nokto de putrinta liberalismo... Ho restaĵoj de liberaluloj, amasoj de fiegalistaĉoj sub la kalkano de mia sankta kolero! Ho, lumbrila foro kaj ĉifonuloj eskarkovritaj! Venu, dolĉega domo de mallibero, diris mi al mi, mallibero plej eble simpla, vera, bastona, dentodraŝa, floru, mia ĝarden'! Kiom estas da steloj sur la ĉielo, tiom da batbluaĵoj estu sur la korpoj de la donacintoj de la malutilaj bonoj! Tiel mi foriris subplanken. Konkrete kontraŭ vi mi ne havas ofendiĝojn, kaj kolegoj miaj same, sed vi devas pere, ĉar ne endas komenci grandan aferon per ajnulo. Komenco bona – laboro duona, kaj por alta celo troveblas fortoj! Se ni ne faros tion, ĉio dronos en kibergraso kun sakarino. Nenio alia fareblas – necesas tranĉi! Ĉiu granda revolucio komenciĝis per tio, eĉ sen ajna ideo, kion do diri pri la nia. Unuvorte, pli da faro, malpli da vortoj!

– Ĉu vere vi, ho sinjoro, – ekkriis mi tiel, ke la ĉeno sur mi ektintis, – havas intencon senigi min je la vivo?

Mi mem ne scias, kial mi diris tion tiel malnature. Kaj tiu ulo, anstataŭ ol komenci plenumon de siaj sangaj promesoj, paliĝis, ŝanceliĝis kaj falis sur manojn de siaj kamaradoj, kiuj komencis lin konsoli, kaj li nur malfacile spiregis, kvazaŭ pro nekutimo. Sekva oratoro eniris en la rondon kaj, levinte la manojn al la Amoretoj kun manĝetaĵoj, per mistika flustro diris:

– Ni pereas, sinjoro Tichy!

Tiel malĝoje li tion siblis, ke, malgraŭ la kolringo, mi iel eĉ ekkompatis lin kaj demandis:

– Do kial kaj pro kio?

– Pro la prospero...

– Sed ĉu ĝi estas deviga?

Li eĉ paroksis en venena sarkasma rido, kiu, tamen, transiris en ploron. La ceteraj ŝtelintoj same kaŝe viŝis la okulojn.

– Ne, tute ne, – ĝemis li, – sed eĉ se la paradiza pano ŝtopus la gorĝon, neniu ĝin libervole fordonos. Absoluta feliĉo absolute koruptas! Oni ne atendu faron de la popolo. Oni povas kalkuli al ĝi, kiam ĝin ĝenas mizero, sed ne kiam ĝin perfortas lukso. Ne deziras ĝi, ke estu alie, ja alie – jam signifas malpli bone, sed ne pli bone! Certe, iam estis moda asketismo – supaĉo el arbaraj radikoj, lignodometo sub pajla tegmento, kurdlo en stalo, plugilo kaj sakvesto, riĉuloj paŝas nudpiede, sed ĉio ĉi estas sintezita, la radikoj estas trufaj, la kurdlo sur radoj, la pajlo el nilono, la plugilo aŭtomata kun transistoroj, falsa tio estis asketismo, kaj baldaŭ tedis. Aĥ, fremdulo, se vi scius, kiel la popolo suferas! Nur pro vido de elektokibero, laŭdanta vican ĝuon, la civitanojn skuas buridana tremo, kaj multaj disbatas aŭ malmuntas ĝin, sed senrezulte – ĝi tuj riparas sin mem. La plej terura estas tio, ke nin, pledantojn por popola bono, la popolo malamas, ne dezirante kompreni, ke ĝi pendas sur hoko de pereco. Tial, bedaŭrinde, ni devas mortigi vin, ho altestimata fremdulo...

Eble, tio estis ilia gazetara ataŝeo – mi ne scias, ĉiuokaze, li ne kontentigis ilin per tiu komunikaĵo. Vi forgesis aldoni, kriis ili, malhelpante unu alian, ke granda afero postulas grandan oferon! Vi nesufiĉe emfazis la historian signifon de tio, kio nun okazos! Kio ĝuste? Senfeligo. En tiu senco, ke de mi oni demetos la felon. La perspektivo de Tiĥi-buĉado ([mi ripetas post la anĝelo, kiu rapide tradukis](#)), propre, ne timigis min pli multe, konkretan minacon mi preferas al mortigaj aludoj, tiklantaj la vertebraron; mia pensado akriĝis, kaj mi tute koncentriĝis, pripensante eblojn de defendo, ĉar mi ne intencis malmultekoste vendi mian felon; samtempe mi ekdisputis kun ili, emfazante tion, ke ne endas firmigi altan ideon per murdo, sed tio estis dialogo kun surduloj. En iliaj idealisme larĝigitaj okuloj flamis tia fanatikeco, ke kristnaska meleagro pli facile povus konvinki kuiristinojn rezigni siajn sangavidajn intencojn, ol mi

povus malkonvinki tiujn entuziastojn, kiuj, murdinte min, deziris konkeri nesciate kion, nesciate kiel; mi etendis la manon al la poŝtranĉilo en la poŝon de la pantalono, sed tiam min atendis nova surprizo: tio, kion mi opiniis epilogo, evidentiĝis nur prologo de vera disputo. Ili vice postuladis vorton, la prezidanto – teologo aŭ kontraŭpastro – listigis oratorojn, poste oni aprobis tagordon kaj membraron de komisiono pri konsidero de proponoj; aŭskultante iliajn elpaŝojn, mi finfine komprenis la esencon de la afero. La murdo per si mem estis decidita afero – sed ne ĝia interpreto. Nun ili diskutis, el kiaj pozicioj okazu tio, kio okazos. Post viglaj debatoj en la mezon eliris la Portretisto-Ekstremisto, riverencis kaj ekkriis:

– Ho altestimata Fremdulo, pereonta de mia mano! Mi opinias mia devo klarigi, kial mi forlasis mian amatan paletron pro vi. Ĉu sangon mi deziris? Neniam! Do kion mi soifis? Krei. Pentri! Sur krudan kanvason meti farbojn, konfesante proprajn sonĝojn, kaj por ke iu, iu ajn, almenaŭ foje rigardus kaj ekkrius pro ravo. Kaj tio estas ĉio, mi ĵuras per la honoro. Sed rigardu: kiel mi povas verki pentraĵojn, se sufiĉas deziri kaj muro, danke al sia ornamanto sur integraj cirkvitoj kaj legilo de deziroj, mem, vikle kaj lerte, kovras sin per freskoj?!! Tial, kiam mi, estante infano, montradis emon al pentroarto, oni min starigadis kun la nazo al muro. Kio restis al mi? Dum ioma tempo mi komisiis tion al ĝi, sed bedaŭro bruligis la koron. Tamen, baldaŭ al la muroj venis fino, ĉar aperis nova skolo – bildparolo. La skolo estis ne malpli bona ol aliaj, sed kio do? Ne sukcesis mi kutimiĝi al ĝi, kiam ĝi nur dum kvaronjaro mem komputiliĝis. Kaj poste, dum iaj ses semajnoj, naskiĝis ĉe ni duoblismo. Nu, se pentraĵo povas paroli kun si mem, do ĝi povas ankaŭ pentri sin mem, ĉu ne? Sed mi estis persista homo, mi atendis, kaj jen aperis ekskrementismo. Granda kulero da oleo por unu kanvaso aŭ kvar – por ses. Se mankas inspiro – do ricinoleo. Kiel eblas kontraŭstari al la Tiranio de la Arto? Kaj tial ni ĉiuj veneniĝadis per zinka blankilo kaj ceruzo, sed tio tre baldaŭ eksmodiĝis. Kaj venis suicidismo, nomata ankaŭ memismo. Unue estis ventrismo – artisto iradis kaj demonstradis sian ventron, lakitan kaj kun diversaj umaĵoj, kiuj teniĝis sur plastro, aŭ estis enplantitaj, sed ankaŭ tio tedis al la publiko; tial en ekspozicio oni komencis lasi

nudan betonan muron, kaj pentristo, superverŝinte sin per fiksilo, rapide kuradis kaj batiĝadis per la kapo kontraŭ la muro, por tiel resti por ĉiam – muta naturo en suicida stilo. Kvankam tion eblis fari nur unu fojon, tamen troviĝis martiroj por la arto! Mi, tamen, havis tro firman kranion, krome, la betono baldaŭ moliĝis – konata afero, la lertonoj zorgas pri ni... Kaj kiam mi aĝis dudek ok jarojn, jam modiĝis genismo. Nu, ni prenu miksilon kaj miksu diversajn genojn, de ansero ĝis hieno, por ricevi pitoreskan monstron, sed ankaŭ tio pasis, brutpentraĵoj eksmodiĝis. Poste estis detruismo, aŭ murdismo de kolegoj, sed ankaŭ ĝin anstataŭis nova skolo, kreismo. Tio estis ne ia fingrumado en argilo kaj gipso, sed verkoj, indaj je sia epoko, – satelitoj en formo de oraj altaroj kun akvarioj, en kiuj por ĉiu ŝarko aŭtomato purigas dentojn, aŭ multpreĝeja sengravita urbistiko, kiam orbitaj katedraloj etendas siajn teleskopajn turojn en vakuo, kiel omaroj; sed ĉio ĉi, ve, sen vervo, sen kredo, kaj tute private, persone; ĉiun tian verkon necesis tuj kovri per nigra vitreca pasto, por konservi de fremda okulo, kaj eĉ pli bone – dispolvigi, sed ankaŭ tio malbone firmigadis la malfortiĝintan volon de kreado...

– Ksiĉjo, ne bagatelumu! – kriegis ili. – Tuj al la celo! Nu do! Kuraĝe, sen detaloj, tuj! Ni estas kun vi! Estu firma, amiko, ne krevu antaŭ la tempo!

– Ja mi ne krevas, – jam graŭlis li, – ars pro arte <sup>[52]</sup>, ho-ho-ho, rolos vi mortulon, dioido, batu lin, kanajlon-terulon, tuj mi lin ornamos!!!

– Senfeligu, senfeligu! – ektondris la ceteraj, eksaltante; verŝajne, tio estis ilia himno; ili ekkuris malantaŭ la kurtenon, probable, por preni ilojn, ankaŭ mi eksaltis, kaj la ĉeno tintis.

– Ĉu vi freneziĝis! Haltu! – ekkriis mi, rimarkinte en la angulo de la okulo, ke la anĝelo tradukis la ordonon, donitan al li de la pentristo, sed ne moviĝis por ĝin plenumi. Ĝi staris, pli alta ol ni ĉiuj je du kapoj, egalmesure susurante per la flugiloj. Malgraŭ tia intensa ventolado, mi preskaŭ sufokiĝis.

– Dioido, kio estas? – kriis ili. – Prenu la terulon... Ĉu ne deziras?.. Ĉu la krimistoro forbrulis? Tiam ni mem helpos! Ksiĉjo estas forta, hej, knaboj-plumuloj, viciĝu kojne!

Kaj vere, ili viciĝis per triangula falango kaj ekmoviĝis al mi, sed – strange – retroe, puŝante antaŭ si la pentriston kun tranĉilo en la mano. En mia mano ekbrilis la poŝtranĉilo. Se mi ĝuste memoras, similan batalaranĝon uzis Aleksandro la Makedona, sed kun pli bona rezulto, ĉar iliaj piedoj mezvoje disglitis, kvazaŭ la tapiŝo estis glitejo, kaj ili rulfalis al miaj piedoj unu post alia. Unua kun kriĉo ekstaris la dika prezidanto de la kontraŭverkistoj, – falante, li kroĉiĝis per la krurumo je la pinto de mia tranĉileto. Mi nur ete skrapvundis lian sidvangan, kaj, fakte, eĉ senintence, sed li kriegaĉis, kiel buĉata. La ceteraj estis en tia malespero pro sia fiasko, ke eĉ ne hastis restariĝi. Kuŝante tie, kie ili falis, ili mallaŭte ĝemetis:

– Mankis kredo...

– Ĉio pro Ksiĉjo. Malkuraĝulo, malseka pantalone!

– Mensogo! Ĉio ĉi pro vi! Pro vi! – ekploregis la ekstrema pentristo.

– Kio-o? For de ĉi tie, malseka kokino! Huŝ, tuj!

– Sentis mi, ke la farbisto la aferon fuŝos, garolo lin kornobatu!

La pentristo ekstaris kaj komencis deŝiri de si vestaĵojn.

– Ksiĉjo, ĉesu! – ordonkriis ilia gazetara ataŝeo. – Kaj vi lasu lin, malfeliĉulon. Ganserĉjo, eliru – estas via vico!

– Jes, jes, Ganserĉjo! – ekkriis ili entuziasme. – Nu, batu la malnovan mondon! Anserĉjo, superu la artiston-portretiston! Kaj ni por vi donos brulaĵon!

– Batu lin, Anserido, per aikido!

– Provu kun kolofono, por ne falaĉi...

– Kolofono ne sufiĉas, ĉi tie necesas vibroplandumoj...

La anĝelo tradukadis rapidege, la ekstremistoj regrupiĝis, la malhonorigita pentristo malaperis, kaj al mi aliris tiu, kiun oni nomis Ganserĉjo, larĝaŝultra kriplulo abomenaspekta, – lia nazo platiĝis kaj ŝoviĝis ien sub la maldekstran okulon, probable, pro la ĝenerala tumulto. Do, tio tamen estas masko, pensis mi, kaj ĉe la aliaj same; sed necesis koncentri la atenton sur la novan kontraŭulon.

– Silenton! – kriis li, kvankam ĉiuj jam sen tio eksilentis. Li paŝis de unu piedo al la alia kaj kelkfoje balanciĝis sur la kalkanoj antaŭen kaj malantaŭen, kaj dume lia nazo estis revenanta al la ĝusta loko. – Vi, laktosuĉulo! – daŭrigis li per tomba voĉo. – Umbilikulo, kreita per disŝprucilo, vi, harkovritulo, eksciu por tiuj kelkaj minutoj, dum kiuj vi ankoraŭ vivaĉos, kun kiu vi renkontiĝis! Mi estas kurdlisto-idealisto, aŭtoro de himno, kiu glorigas la Grandmobilon. Vivu la kurdlo, la ordo plej socia, kaj krome organe lumoportata! Mi scias, se vi povus fuĝi el ĉi tie, vi tuj kurus denunci min, sed la kolringo de la historia justeco, la ĉenoj de la progreso tenas vin firme, kaj neniam lertonon vin helpas, vi, vojperdiĝinta kapro! La ĉenoj de hontinda prospero falos de mia popolo, same kiel defalos de viaj ostoj karno; kaj la popolo iros sur la kolektivaj kruroj en helan estontecon! Venas horo de rekompenco pri ĉiuj kalumnioj, misfamigantaj la noblajn idealojn, pri siteloj da mensogaj malpuraĵoj, verŝitaj sur la kapojn de politmobiloj, kaj atendas vin la sankta venĝo, sankta venĝo por nia honoro, ho, donu al mi forton, amikoj-akcipitroj, sendi lin en tomb...

– Iel malforte, – diris mi.

Eĉ bato per briko ne konfuzus lin ĝis tia grado.

– Kio? – elkriis li. – Kiel vi arogas?.. Huŝ, fuŝulo!

– Ti-li ti-li kuko, – obĵetis mi. – Flanke kun veruko. Kaj via kuzino dancas kun pingvino...

Li ekstremegis tuta, kaj la ceteraj simple ekstremis pro teruro. Ne estas facile klarigi, kiel mi elpensis tiun improvizon, ja fakte mi tute ne sciis, kio ĝuste malhelpas al ili fari rapidan kaj sangan ekzekuton; sed la intuicio sufloris al mi, ke ili devis eksciti sin mem per kolektiva rito, kvazaŭ sukceso de ilia murda entrepreno dependis de koncentrita ĝis necesa nivelo etoso de koŝmaro.

– Venu ĉi tien, sinjoro birdido, – aldonis mi, – mi diros ion sekrete en vian orelon...

– Ŝtopilon en lian buŝon! Tuj! – ekkriĉis Ganserĉjo-kurdlemulo. – Mi ne povas tiel, tiu kanajlo fuŝigas min...

– Por kio vi bezonas ŝtopilon, – kun malespero en la voĉo respondis la kontraŭprezidanto de verkistoj. – Batu lin sub la dorson kaj fino...

– Mi, Gansero, estas plena de kolero... – siblis la kurdlemulo, prenis el sub la zono ledan tranĉilon kaj ĵetiĝis al mi. La ĉeno abrupte tintis kaj ekstremis, kiel kordo, ĉar mi desaltis malantaŭ la dorson de la anĝelo, tiu ŝanceliĝis, tuŝita de la tranĉilo, Ganserĉjo stumblis kaj falis sur la genuojn antaŭ la anĝelo.

– Mi tuj... mi ankoraŭ foje provos... – konfuze balbutis li. Li estis tiom perpleksita, ke mi facile povus preni de li la tranĉilon aŭ bati lian birdan orelon, sed mi eĉ ne moviĝis. Nun mi jam atente rigardis al tri uloj, kiuj, kaŝe malferminte la irizajn pordojn, aŭskultis nin, starante sur la sojlo. Neniu, krom mi, vidis ilin – ĉiuj ceteraj rigardis al mi, – kaj mi, pro la kolĉeno kaj ĝenerala aferstato, estis alpremita al la muro. Komence mi decidis, ke tio estas ankoraŭ iuj artistoj-ekstremistoj, sed mi eraris.

– Ne moviĝu! Tio estas atako! – kriis la plej alta el ili, enirante en la ĉambron. La kurdlemulo eksilentis kaj rigidiĝis, kaj nur du dikaj larmoj, preparitaj de li por fino de la fiasko, defluis laŭ lia vizaĝo. Unu el ili dissolviĝis sur la jako, la dua falis sur la tapiŝon. Nur Dio scias, kial la memoro tenas tiajn stultajn malgravaĵojn – des pli en tiaj cirkonstancoj. Miaj ŝtelintoj ekstaris, protestante; ekflamis arda

disputo. La anĝelo kiel antaŭe tradukadis ĉiun vorton, sed ili tiel freneze skuis unuj la aliajn kaj tiel kriegaĉis, ke mi ĉesis kompreni ion ajn. La esenco de la disputo atingis min nur skize. La fremduloj estis ekstremistoj el iu alia grupo, kiu havis nenion komunan kaj kun arto, kaj kun teologio, kaj kun la ĝenerala teorio de ekzisto. La interbatado (ili jam ekuzis siajn pugnoj) okazis pro mi. Avantaĝo de profesiuloj super amatoroj, kio, pro sia esenco, estis la artistoj, montriĝis senprokraste. Plej longe rezistis la prezidanto de la unio de kontraŭverkistoj, premita en la angulo kun la ilaro – tie li armis sin per senfeliga tenaĵo kaj agis per ĝi kiel per klabo; tamen nur post kelkaj minutoj la venintoj iĝis mastroj de la afero. Tuj estis videble, ke ili estas specialistoj. Ili nenion pruvadis, ne teoriumis, ne ceremoniis, ĉiu, verŝajne, havis anticipe planitan taskon, kiun li plenumadis mirinde ĝuste, kaj en aliaj cirkonstancoj mi, eble, kompatus miajn ekstremajn artistojn. Eksilentintaj, en disŝiritaj kostumoj, el kiuj anstataŭ muziko estis venanta mizera kakofonio, ili estis sidigitaj sur planken kun vizaĝoj al la muro, tute apud mi, – vere, kia mirinda ŝanĝo de la sorto. Nur la kontraŭprezidanto ankoraŭ estis rebatanta la atakojn, sed ankaŭ li jam estis perdanta fortojn. Dum la batalo iu batis la anĝelon, tiu falis en angulon kaj ĉesis traduki. Anstataŭe sur lia, antaŭe senmova, ĉiela vizaĝo aperis stranga rideto, kaj iom sube de la brusto, sur la alabastra torso, nesciate kiel komencis eklumiĝi kaj estingiĝi diverskoloraj surskriboj: «Didr beuns ganatoproksul? Fornikadorissimur, Dominul? A driksi piksi kuak supirito? Miluolak, sinjoro estro?»

Samtempe la anĝelo prenis min je la mano kaj ektiris kun mistera vizaĝesprimo tiel forte, ke mi preskaŭ sufokiĝis, kiam la ĉeno finiĝis. «Helpu!» – deziris mi kii, sed ne povis, – la kolringo premis la gorĝon. Feliĉe, la venkinto de la prezidanto hastis al mi. Mi ne scias, kion li kaj lia kamarado faris kun la anĝelo, sed kiam mi malfermis la okulojn, tiu denove estis staranta rekte, svinganta per la flugiloj kaj tradukanta. Tamen, propre, ne estis io tradukinda – miaj novaj ŝtelintoj estis homoj de agado. Ili deŝovis min de la hoko, el teko, portita kun si, ili prenis necesajn instrumentojn, kaj la hoko – sen ajna varmego kaj fumo – eliris el la muro, kvazaŭ el peco de butero. Mi retenis dankajn vortojn, kaj prave, ĉar ilia posta

konduto neniel similis konduton de liberigantoj. Unu el ili tiris min je la ĉeno, du aliaj puŝis, sen ajna aludo al delikateco, al kiu mi jam komencis kutimiĝi inter la artistoj. El la palaco ni eliris ne tra la brila ĉambraro, sed, plej verŝajne, tra la ŝakto de kuireja lifto, kaj al mi estis malfacile orientiĝi. Ekstere regis plena mallumo, la nokto estis malvarma, kaj mi en miaj silkaj ŝtrumpetoj tuj malsekigis la piedojn en iu flako. Dum sur miaj piedoj estis lakitaj ŝuoj, mi tre suferis: mi laŭ mia naturo estas neordinare sentema, tute senarmita kontraŭ novaj nemoligitaj ŝuoj, kaj tiuj ĉi ŝuojn mi surmetis ĝuste antaŭ la alplaniĝo, atendante bankedon, sed, kiel videblas el la supra rakonto, ne ĉio okazis tiel, kiel mi atendis. La ŝuoj suferigadis min, dum mi estis ĉenita, tial, aŭskultante unu deklaron post alia, preskaŭ ĝis la maleolo dronante en la lanuga tapiŝo, mi nerimarkeble demetis ilin, decidinte, ke, se jam min atendas entombigo, tute ne necesas strikte sekvi etiketon. Mi tute forgesis pri tio, perpleksita de la nova atako. En luna lumo mi rimarkis en la butontruo de unu el la atakintoj rozeton-tradukilon kaj uzis tion por peti pri malgranda prokrasto: mi nur por minuto revenos por la ŝuoj. Ion mi klarigadis al li pri eblo kapti nazkataron, sed tiu senkultura (kio sentiĝis tute klare) ulo raŭke ekridis kaj diris:

– Kia nazkataro? Vi ne sukcesos ĝin ricevi, kotleto.

Evidente, moknomoj el vianda menuo ĉi tie havis ne malpli grandan popularecon, ol en Italio. Oni min ŝovis en iun keston, aŭ, eble, kofron, kaj jen, tintante sur kavoj per la ĉenoj – evidente, ni veturis en senvoja loko, – post kvaronhoro, ne pli frue, mi trafis en betonan kelon, duonsufokita. Mi ne scias, kiel enveturis tien la veturilo de la ŝtelintoj. Ĝi tute malaperis. Malaltaj nudaj muroj mornigis la humoron. Tuta meblaro konsistis el kelkaj tripiedaj taburetoj, ŝtipo por hakado kun oblikve enbatita en ĝin hakilo, amaso de brullignaĵoj, simpla ligna tabulo kaj, certe, cementita en la muron ringo, en kiun oni tuj enigis mian ĉenon. Do, mi agis prave, ne flamigante en mi fajreron de espero. Apud la tablo staris benko; mi sidiĝis kaj demetis malsekigitajn ŝtrumpetojn, pripensante, kie mi ilin pendigu por sekigo; sed mia nova ŝtelinto, ĝuste tiu, kiu jam sukcesis malĝentili al mi, balbutis:

– Vana peno.

Demetinte de si drapan jaketon, li prenis el la forno karbiĝintan flanon kaj avide ekmordis ĝin per la dentoj. Strange – mi sciis, ke la vizaĝoj de la entianoj ne similas niajn, sed jam tiel kutimiĝis al la homeca aspekto de miaj unuaj ŝtelintoj, ke mi ne povis liberiĝi de penso, ke la gardanta min malĝentilulo estis en masko – kvankam ĝuste li estis sen ĝi. La aspekto de la entianoj same malagrablas por homo, kiel por ili – la homa aspekto. En ilia etendita antaŭen vizaĝo, kun nazotruoj, dismetitaj same larĝe, kiel ankaŭ iliaj rondaj okuloj, estas, verŝajne, pli da similo kun ĉevalaĉo aŭ tapiro, ol kun birdo. Tamen, nenia priskribo povas anstataŭi personan konatiĝon. Satiĝinte, mia gardanto kelkfoje frapis sian barelsimilan bruston, vere anseran aŭ strutan, ĉar ĝin kovris blanka kaj densa, kiel lano, lanugo, kaj komencis juki sub la akseloj, pluki sur si malgrandajn plumetojn (*ŝajne, ili tiklis liajn nazotruojn*), kaj fine – koncentriĝinte fosi en la nazo. Finfine li – verŝajne pro enuo – ekparolis, kaj komence turnis la parolon kvazaŭ ne al mi, sed al nesciate kiu, metante akcentojn per pugnobatoj al la tablo. Mi plu silentis, kaj tiu entia viraĉo, rektiĝinte, deklaris, ke la tradicio, propre, postulas klarigi al la ŝtelito, fare de kiu kaj pro kio li estos ekzekutita, kaj kvankam mi estas speciale malutila kreaĵo, malinda aŭskulti lin, li degnos al mi, ĉar mi estas fremdulo. La ceteraj ankoraŭ ne venis, kaj li prenis el la poŝo folieton kaj, ĉiuminute rigardante ĝin, komencis.

## **La deklaro de la estro de la duaj ŝtelintoj**

Aŭskultu atente, tervizaĝulo, ja mi ne kutimas longe paroli. Antaŭ jarcentoj ĉi tie estis nenio Luzanio, nur Gidio, sed venis fremduloj kaj forprenis la teron de la prauloj. Ni estas ruĝplumaj gidianoj, sed ne videblas tio, ĉar senkoloriĝis ni pro subtera vegetado. La teroj super ni estis tutaj niaj, laŭ la justo kaj laŭ la leĝo. La Granda Spirito ordonis al ni kapti Malbonulojn, kaj ni ilin kaptadis kaj dancigadis la lastan dancon. Kaj nun nenio ni faras, nur pli bonan tempon atendas, horojn kalkulas kaj gazetojn legas. Kaj antaŭnelonge venis al ni sciigo, ke frato

venas al ni, sur nian astron, fremda, de malproksime, tamen frato laŭ racio. Kaj demandis ni niajn parencojn klerajn, kiuj sidas en oficejoj, kia do frato venas kiel gasto en la landon de niaj prauloj? Ili ja, kvankam ilia lanugo blankiĝis, plu ruĝplumas en la animo, do ili rakontis al ni, kiu venas kaj de kie. Ke oni lin honoros kun granda gloro, pro tio, ke li estas de steloj, kaj ne el birda gento, ŝajne eĉ tute male. Kaj pro kio tia gloro kaj honoro grandaj, pro kiaj meritoj? Skribas oni: sendito, sed de kiu? Kaj malkovris ili al ni, kiuj vi estas. Militojn vi amas, armilojn amasigas, ekstere estas paco, kaj interne – perfido. Kaj tuta via militado estas plena malicaĵo, ĉar preparis vi jam dek ok atomajn tomahokojn por ĉiu via kapo, kaj tio al vi ne sufiĉas. Plu vi armiĝas, venenojn mortigajn kuiras, sen ripozo, sen paŭzo, kaj se iu ion diros – subridas: «ni ja estas pacaj homoj» – tial, ke en via koro estas ne honesta batalo, sed ruzaĵoj kaj perfido. Najbarojn vi turmentas, vin mem venenigas, kaj nun vi ekpensis veni kiel gasto por spioni kaj elflari, kie estas ia predo. Kaj ni kion faras responde? Ni (li jam estis muĝanta, frapegante per la pugno la tablon) same decidis vin saluti, raba ambasadoro! Ĉu aŭdis iu en la tuta Galaksio, laktu ĝia vojo, ke Tervizaĝuloj, ĝuste tiuj, kiu mortigas samgentanojn kaj eĉ malgrandajn infanetojn, laŭ sternita tapiŝo de paco paŝu al la okuloj de virtaj gidianoj, kiuj la ordonojn de la patroj pri fremdaj rabantoj ne forgesis? Vi pensis per ŝajnigita mildeco kretenojn-luzanojn trompi, sed ni ja ne estas tiaj! Nin tiel vi ne trompos! Ho, trompiĝos via racio alta, nutrigita per kadavraĵo! Ĉu jam ne sufiĉas ĉe vi flavvizaĝuloj, verdvizaĝuloj, nigrvizaĝuloj por ekstermado? Se vi sidus en via tundro, ĉe tiuj viaj tomboj, tiam, eble, savus vian kalvan felon, kiu ne valoras tanadon, sed ne ĉi tie, kie gardas la ruĝpluma viro! Batadis vi, buĉadis, rabadis viajn samgentanojn, kaj poste – mortintojn en la teron, plej bonajn vestaĵojn – sur sin, kaj ek konatiĝi kun «fratoj laŭ la Racio», ĉu tiel? Nu, do la ruĝa fraĉjo laŭ la racio klarigos al vi, la frato zorgos, elfosos la militan hakilon kaj enterigos mortulon-terulon, skribos sur la frata felo fakturon kaj sekigos ĝin por memoro... Nu, Tervizaĝulo, ĉu vi aŭskultas la ruĝpluman fraton laŭ la racio? Vidas mi, ke aŭskultas... Kaj silentas? Aŭdas mi,

ke silentas... Do: nun la ruĝpluma frato per la propraj manoj mortigos la fifraton, kondukos lin en la landon de Eterna Malhonoro, kien jam multajn Malbonulojn oni sendis, sed tia, kiel la Tervizaĝulo, ankoraŭ ne estis...

Mi eĉ ne scias, kiam kaj kiel li renversis la benkon kune kun mi, saltis trans la tablon, forĵetis jam nenecesan folion kun la teksto, kaj, ekkaŭrdancinte, per terura, sovaĝa voĉo tondris:

*Ni mamulon kaptis, kaptis  
Lian kapon batis, batis,  
Nudpiede dancos ni jam  
Super tombo lia...*

Ŝoviĝinte en la angulon apud fumtubo, mi eĉ unufoje ne tintis per la ĉenoj en takto, – mi sciis, ke la afero estas malbona. Malpli bone eĉ ne povis esti. Tiu ŝtelinto ne estis, bedaŭrinde, tiom malklera, kiel ŝajnis al mi komence, se lin atingis fragmentoj de nia ĝenerala historio, kaj la distanco inter du niaj mondoj anticipe kondamnis al malsukceso ajnajn penojn defendi sin: li opiniis min spiono de krima kosma raso, kaj mi ne imagis al mi, kiel mi klarigu al li nuancojn, konvinkajn por ajna tera juĝo, sed ne ĉi tie, en aliplaneda kelo. Mi estis kvazaŭ paralizita, havante nek fortojn, nek volon ree elpreni la poŝtranĉilon, kiam subite aŭdiĝis iaj malklaraj krioj, paŝbruo, kaj en la pordon enfalis krieganta volvaĵo de entianoj. Mi rekonis la pentriston Ksiĉjon, la kontraŭprezidanton kaj Ganserĉjon – ili plu havis homan aspekton, sed kelkajn mi ĝis nun ne vidis, probable, tio estis kamaradoj de mia gardanto, mi ne scias, ja neniun el ili mi povis vidi en mallumo, kiam ili ŝovis min en la kofron. Unuamomente al mi ŝajnis, ke ili batas unu la alian, sed tio estis io alia, multe pli mirinda: ĉiu el ili kvazaŭ luktis kontraŭ si mem. Mia gardanto saltleviĝis de la planko, neniom mirigita, kaj ekkriis:

– Demetu la veston, tuj, – ĝi vin jam kaptas, diable, verŝajne la krimfildoj likis! kalsonoj nin ligos! Nu, rapide, jam rigidiĝas... – kriegante tiel, li samtempe estis demetanta de si la pantalonon, sed faris tion ĉiam pli malfacile, ĉiam pli malrapide, kaj la ceteraj, tiriĝante kaj fleksiĝante, kiel fiŝoj sur bordo, same luktis, iu kun jako,

iu kun ĉemizo, aŭ eble, tuniko, kaj tamen moviĝis ĉiam malpli rapide, kvazaŭ ili estis priverŝataj per iu nevidebla, rapide rigidiĝanta gluo, ia densa siropo, – kaj post nur duonminuto ili apenaŭ movis la manojn kaj piedojn, ĝuste kiel muŝoj en nevidebla araneaĵo. Mia cerbero, kiu antaŭ la danco demetis sian jakon, havis aferon nur kun sola pantalono, sed ĝi tenis lin tiel, ke li povis nur rampi sur la planko, levinte la kruojn al la traba plafono; li estis ŝiranta plumojn sur la kapo kaj terure blasfemis. Do, ĉu savo? Ĉu helpo? Tamen, en la kelo estis neniu, krom mi – plu neniom ĝenita en la moviĝoj, kvankam ĉenita... kaj ili, kuŝante jen surflanke, jen surventre, jen surdorse, kriis furioze kaj despere:

– Kanajlaĵo... la krimfiltro likis... ho, mi sufokiĝas... Gurgakso, helpu do, vi ja havas liberan manon... kien vi kun viaj piedaĉoj, kreteno... tio estas ne mi, tio estas la pantalono... prezidanto, ĉu vi havas krimistoron?... de kie?!.. oĥ, oni ligis nin sen policistoj... mi pere-e-e-as!!!

Iliaj malfeliĉaj ĝemoj kaj jeloj tiel min konfuzis, ke mi, tute forgesinte pri la ĉeno, ekstaris de la benko. La kolringo premis mian gorĝon, mi falis, kaj la gorĝo estis premita ankoraŭfoje, sed ŝajne pli milde, kaj, por mia mirego, la ĉeneroj disiĝis... mia kapo turniĝis, mi malleviĝis sur la genuojn, plu restante en la kolringo, sed kiam mi instinkte ŝovis fingron inter ĝi kaj la kolo, mi eksentis, ke la kolringo estas kvazaŭ el pasto... nekredeble facile mi disŝiris ĝin kaj rektigis la fleksiĝantajn kruojn, rigardante al miaj ŝtelintoj, de la unua kaj de la dua vico, kiuj plu baraktis sur la planko – malvigle, senhelpe; mi jam komprenis, ke tio estas ne agonio, ke al ili, fakte, nenio minacas kaj ilin tenas nur la vestaĵoj, rigidiĝintaj, kiel gipsaĵo, katenante la manojn, la piedojn, la korpojn...

– La mamulaĉo foriras, kaptu lin, kiuj kredas je la honoro... – ekraŭkis Gurgaks, tiu, kiu antaŭ minuto kantis kaj dancis por mia pereco.

Videblis, ke li estis pli furioza, ol la ceteraj, – tiuj penis kvazaŭ tute ne rimarki min en sia hontinda stato... kaj mi staris super ili, anhelante, kun la moliĝinta kolringo en la mano, ne sciante, ĉu mi

kuru kien ajn aŭ ekparolu kun ili... ĉu trudi al ili mian helpon? Mi konfesu, ke tion mi ne kapablis. Mi laŭorde preteris la rigidiĝintan Ksiĉjon, Ganserĉjon kun brakoj, levitaj supren en la ŝtoniĝintaj manikoj de la jako, kaj silente eliris tra la pordo, ĉiam atendente, ke ankaŭ mia vesto subite ribelos per sama, nekomprenebla por mi maniero; sed mia timo estis vana.

Mi trovis ŝtuparon, pezaj ŝtalaj pordoj estis duonmalfermitaj, iliaj grandegaj rigliloj pendis, kvazaŭ degeligitaj per fajra varmego, kvankam ili estis tute malvarmaj; ial penante ne tuŝi la pordofoston, mi leviĝis laŭ la ŝtuparo, ekvidis la superŝutitan per steloj ĉielon, eksentis malvarman blovon de vento... mi estis libera. La luno malaperis senspure. Estis nigra, netrasidebla mallumo. Etendinte antaŭ mi la manojn, mi singarde paŝadis sub la stela ĉielo; subite iu stelo ŝanĝis sian koloron kaj ekmoviĝis al mi. Antaŭ ol mi komprenis, kion tio signifas, aŭdiĝis bruoj, la stelo iĝis pulsanta lumbulo, kiu superverŝis min kaj ĉion ĉirkaŭe per hidrarga lumoj, mi ekkuris, stumblis kaj falis en ian dornarbuston. Io mola falis sur min de supre, mi ekkriis kaj, probable, tiam svenis. Mi ne scias, kiom longe mi restis en tiu stato. Rekonsciiĝinte, mi ekaŭdis nekompreneblajn voĉojn, sed ne kuraĝis levi la palpebrojn. Mi kuŝis sur io malvarmeta kaj tre malpeza, kvazaŭ sur balono. La brakoj kaj la kruroj estis liberaj. Mi fende malfermetis unu okulon. Super mi kliniĝis entiano en arĝenta mantelo kun malgranda fajreto en la frunto.

– Ksa, ksa, – diris li.

Sammomente io sub mi – kvazaŭ el profundo de tiu blovita kuseno – ekparolis:

– Karega sinjoro Tiĥi, rekuraĝiĝu. Vi estas ĉirkaŭita de amikoj nuraj, sub observo de spertaj medicinatoroj kaj medicinistoj, kaj eĉ haro ne falos de via kapo. Ĉu povas vi paroli? Bonvolu eligi teran voĉon el via naturo, por ke ni sciu, ke vi nin ekkomprenis.

– Ekkomprenis, oĥ, ekkomprenis, – ĝemis mi, kaj mem miris pri tio, ĉar fartis mi bonege.

– Ksu, ksu, – diris la plu kliniĝanta super mi arĝenta entiano kaj estingis sian fruntan fajreton, kaj la voĉo el la kuseno kun karesaj intonacioj diris:

– La oficiala parto de la celebrado de karega sinjoro ljon Tiĥi okazos ne pli frue, ol Li ĝuos merititan ripozon. La ĉambroj de la registara gastejo estas en Lia plena dispono, kaj al Li – al Vi – nenio minacas. La malfeliĉo okazis kaŭze de duobla insido. Tamen ni ĉion klarigos, la aferon ordigos, la konfuzon forigos. Do Via altenobla Naturo dormu pace...

«Nur ne por ĉiam» – sukcesis pensi mi, sed tiam la arĝenta entiano diris:

– Kso, kso... – kaj min tuj venkis dormo.

En tiu ĉi kliniko oni tenis min dum nur unu tagnokto, post kio oni decidis, ke mi jam estas sufiĉe forta por transloĝiĝi en la gastejon. Dio scias, kial la malsanulejaj tradukiloj tiel strange esprimiĝis – mi nenie plu renkontis tiajn. Mi eksciis, kiel lerte min insidis la ŝtelintoj el la grupo de Ganserĉjo kaj Ksiĉjo, kaj la Unio de Kontraŭverkistoj. Verdire, mi povus esti pli singarda. Transiro de nebulaj marĉoj kaj petolantaj kurdloj al urbego estis tiom subita, ke mi iom konfuziĝis, kaj, kiam sur la kosmodromo al mi venis kvar elegantaj luzanoj, mi opiniis ilin delegacio de la Societo de entian-homa amikeco. Ebriigita per lukso kaj neordinara afableco de tiuj uloj, mi permesis sidigi min en la memveturilon, kaj min eĉ ne atentigis raba hastemo, kun kiu ili puŝis min internen. Kaj dum ili veturigis min en la palaceton, kie la okulojn blindigis jaspo, oro kaj Dio scias kio ankoraŭ, dum mi permesis konduki min kiel ŝafon inter mebloj-altaroj nesciate kien, anticipe preparita sozio-Tichy trompadis la veran delegacion kaj ĉe unua eblo fuĝis, do la oficialaj organoj ne havis eĉ paseron en la mano, nek eĉ etan ideon, kie serĉi min. La ŝtelo tial okazis sur la kosmodromo, ke la etikosfero, kiel oni al mi klarigis, ankoraŭ ne konis min kaj pro tio ne povis ĝustatempe helpi min. En mian kapon oni enigadis multegajn aferojn, por mi nekompreneblajn, sed mi, ne dezirante montri min stultulo – jam

sen tio mi tro stulte kaptiĝis je la truko kun la kolringo – preferis diplomate silenti.

La transloĝiĝo en la gastejon iĝis transloĝiĝo al vera Olimpo. Tiuj kompatinduloj jam mem ne sciis, kiel komplezi min, por rekompenci pro la travivitaj malagrablaĵoj. Ne sufiĉas tio, ke mia dormoĉambro estas ora kaj la oron eblas lumigi aŭ estingi per ŝaltilo (*mi portas ĝin en la poŝo*), ne sufiĉas tio, ke en kavo de la plafona volbo sidas Amoretoj (*kaŭzantaj, tamen, ne tre agrablajn rememorojn*), kiuj, kiam mi nur malfermas la buŝon, kunflugas kaj subŝovas vazojn kun dolĉaĵoj, sed krome pri miaj vestaĵoj okupiĝas Merkuro mem, kaj en niĉoj inter kristalvitraj kolonoj de la lito (*mi dormas sub baldakeno*) staras garde du Afroditoj – Anadiomena kaj Kallipygos. Estas ne tre klare, por kio, ja ili nenion faras, kaj demandi mi iel ĝeniĝas. La ŝuojn al mi purigas Zeŭso, per io simila al ŝpinilo. En la muro kontraŭ la lito estas spegula ŝildo kun kapo de Meduzo, sufiĉe malsimpatia, kaj krome la serpentoj sur ŝia kapo moviĝas kaj rigardas, ĉiuj kiel unu, al mi, kien ajn mi iru; sed apenaŭ indas tuj ĉagreni la mastrojn per plendoj, mi ja vidas, kiel ili penas. Tuta tiu Olimpo, farita por mi sola, por ke mi sentu min kiel hejme, treege ĝenas min. Sed mi ne rajtas kaprici – jam sen tio mi sentas min stulte; la prezidanto de la Societo de amikeco venis al mi akompanata de du portistoj, trenantaj sakon – kiel evidentiĝis, kun cindro, kiun li ŝutis sur sian kapon, falinte antaŭ mi sur la genuojn. Krom ĉio ĉi, la prezidanto similas min kiel unu akvoguto similas alian. Malferminte ŝrankon, por pendigi tien la ĉemizon, mi ŝtoniĝis pro miro: tie staris centaŭro, tamen malgranda, kiel poneo. Ĝi ion deklamis al mi, probable, en la antikva helena. Ĝi krome estas masaĝisto, kaj scipovas elekti vinojn. Matene min vekis sufoka nubo de ambro, nardo kaj mosko. Ambaŭ Afroditoj staris apud la lito kun incensiloj en la manoj; mi tuj forpelis ilin reen en la niĉojn, spasme tusante kaj kun larmoplenaj okuloj. Laŭ mia ordono Merkuro aerumis la ĉambron. Sed mi tamen preferus iom moderigi la gastamon de la mastroj, – kaj ke tiuj Afroditoj, finfine, ion surmetus. Mi komencas diveni, kiel ili ĉion ĉi programis: surbaze de fotoj el Luvro kaj ceteraj teraj muzeoj. Krom la centaŭro, en la ŝranko sidas Apolono. Ĝi jam ne kantas – pro mia eksplicita ordono.

La transiro de la kurdlandaj marĉoj kaj de la kelo kun kolringo al tiu fantastika lukso estis tiom subita, ke ĉion ĉi mi perceptis kiel sonĝon. La manĝo estas bonega, se ne atenti la malhelan saŭcon, per kiu oni ĉion surverŝas. Mi estas en la ĉefurbo, nomata SPR. Unu tradukilo tradukas tion kiel Espri, alia – kiel Hesperido. Do estu Hesperido. De nun mi komencas indiki datojn. Hodiaŭ estas la kvina de kotembro. Tio estas ne saŭco, tio estas nektaro. De kie ili povus preni recepton, se eĉ ni ĝin ne scias? La gusto similas majonezon kun glicirizo. Mi ĝin elverŝas, kaj restaĵojn mi deskrapas de kotletoj per kulereto. La prezidanto ree venis, por pridiskuti la programon de mia vizito. Morgaŭ mi havas renkonton kun la supera felicisto. Aŭ eble oni lin nomas alie, mi ne memoras. La prezidanto jam ne tiel similas min, kiel en la unua tago. Tia, eble, estas ilia tradicio. Mi pelas la Amoretojn for per ĉiuj fortoj, timante dikiĝi. Necesas pripensi, kiel, ne ofendante la mastrojn, liberiĝi de tiu olimpa grego. Meduzon mi kovris per viŝtuko, al Kallipyga donis mian banĥalaton. Sed tio estas nur paliativo.

# La unua inhibitoro

Mi ne scias, kioma de kotembro estas hodiaŭ, – mi perdis la kalendareton. Dankon al Dio, mi liberiĝis de Olimpo, kaj samtempe de la Prezidanto de Amikeco, kiu iĝis jam simple neeltenebla. Li kredigadis min, ke mia vizaĝo preskaŭ ne vokas abomenon. Pri mia liberiĝo mi ŝuldas al Kikeriks. Tio estas juna historiisto kaj samtempe homisto ([homologo](#)). Li venis al mi en la gastejon, aŭdinte pri veno de homo. Interalie, li montris al mi, kiel ŝalti Meduzon ([kiun mi kovradis per viŝtuko](#)), por ke ĉiuj dioj ŝtoniĝu kaj disŝutiĝu en blankan pulvoron, memstare kaŝantan sin sub la lito. Mi ne scias, kio ĝin entiras tien, sed mi ne demandis. Ĝenerale mi penas pli malmulte demandi, ja kion oni pensus en «Hilton» pri gasto, kiu demandus, kial lumas lampo kaj kiel reproduktiĝas ĉambristino. Mia nova konato tiel amikiĝis kun mi, ke mi nomas lin simple Kiks. Li venigis min en sociomaton, al demonstra lekcio pri historio.

La aparaton oni agordas al ajna socio, kun parametroj, ekzemple, romantikaj aŭ mezepokaj, kaj manipulas ĝin – plej ofte duope. Unu ludanto regas, la dua ludas por la regata socio. Tamen, ludi modelatan historion povas ankaŭ kelkaj homoj, regante partiojn, armeon, mezajn tavolojn kaj tiel plu. Gajnas tiu, kiu ricevas superpezon fine de duonhora seanco. Ĉio ĉi, kune kun sociaj moviĝoj, okazas kun milobla plirapidigo, kaj necesas nemalgranda lerteco. Mi estis imperiestro, kaj Kikeriks estis gvidanto de popolamasoj. Li detronigis min post kvin minutoj, ŝaltinte por si fortan karismon. Vane penis mi malhelpi al li per ediktoj, kaj vidante, ke la afero iras malbone, mi faris decidan eraron, malaltiginte impostojn. Necesas ja scii la teorion. Forigo de mizero tuj kondukas al troa kresko de apetitoj kaj minacas per tumultoj pli danĝeraj, ol ĉe mizero. Sociomatiko estas malsimpla arto. Mi ne sciis, ekzemple, ke malesto de mankoj estas tute ne pluso, sed nulo kaj ke plej gravas nevideblaj parametroj, speciale parametroj de emocioj. Ju pli alte vi staras en la socia hierarkio, des malpli

vi sentas malfeliĉojn de via epoko, estante plenkontenta, sed eĉ pli grava povas esti tio, kion ne eblas vidi. Observataj valoroj ne egalas al la sentataj: ekzemple, por aristokratino neinvito al kortega balo estos sama malfeliĉo, kiel por malriĉa kamparanino – manko de pano por la infanoj. Tion, ŝajne, scias ĉiuj, sed nur ĉe la regilo de sociomato oni povas konvinkiĝi pri tio per propra sperto. Vere, tio estas mirinda ludo, ja la socio kondukas kiel viva; oni povas influi ĝin, formi publikan opinion, trankviligi per promesoj, sed nur ĝis certa grado kaj tempo, ĉar la socio memoras ĉion kaj reagis siamaniere. Krome, historiaj ludoj havas malsamajn nivelojn de malfacileco. Post ŝalto de scienc-teĥnika revolucio la potenco aŭ tute mildiĝas, aŭ, male, rigidiĝas, – estas diable malfacile ekvilibri meze. Envio de la subaj tavoloj, diris Kikeriks, subtenita de idealismo de reformistoj, puŝas historion al egalismo, kiu donas pli da elreviĝoj, ol da kontentiĝoj, ĉar eĉ en socio de egaluloj ŝajnas, ke pli bone vivas aliaj.

Strange, sed estas fakto: en Svisio mi iel preteratentis historiografion de la antaŭlertona epoko. Ili havis samajn zorgojn, kiel ni: koŝmaron de motorizado, energetika krizo, mona ĥaoso, politika tumulto, – kaj same kiel ni ili opiniis, ke ili falas en abismon. Kiam energetika krudaĵo elĉerpiĝis tute, ili sukcesis sintezi mikrobojn, transformantajn ajnan rubaĵon en brulaĵon. *Bacillus benzinogenes*, *Spirocheta oleopoetica* <sup>[53]</sup>, – ilin oni aĉetadis en tablojdoj, kiel vinan giston, ĵetadis en rubujon, priverŝadis per akvo, kaj tiel venis fino al la naftaj Krezoj. Dum la tuta hieraŭa tago mi iradis kune kun Kiks al muzeoj. En Muzeo de Teĥniko mi vidis bakterian teksilon. Necesas malvestiĝi plene kaj enrampi en ujon, tre similan al kuvo. Vi kuŝas en varma solvaĵo, kaj kiam post kvaronhoro vi eliras, sur vi jam estas preta vesto, produktita de tajlora bakterio (*Bacterium Sartoriferum*); restas nur distranĉi tiun vestaĵon, demeti, gladi kaj pendigi en ŝranko. Ne necesas alkudri butonojn, ili kreiĝas el solidiĝanta sekreciaĵo de malgranda tineo en la ŝranko, – memkompreneble, ne ordinara tineo, sed genetike rekonstruita. Se necesas vintra kostumo, oni aldonas *Vibrio Pelerinae* <sup>[54]</sup> aŭ ian parenkan stamon, kaj rezultas io simila al vata ŝtofo. Ekzistas eĉ subŝtofaj vibrioj, konforme al deziroj de klientoj pri fasono, koloro,

teksturo kaj tiel plu. Sed tiuj ĉi tajloraj novaĵoj estis renkontitaj kun unuanima abomeno kaj mortis per natura morto, ne iĝinte komune uzataj. Tamen la teksaj bakterioj preskaŭ tute likvidis la pakan industrion, kaj iliaj rubmanĝantaj kaj venensorbantaj specioj purigadis la medion.

Tiutempe kune kun la biotika mikroinĝenierado plu evoluadis aŭtomatigo, kaj kvanto de senlaboruloj kreskadis kiel geometria progresio. Okupiteco iĝadis escepto, senlaboreco – regulo, komenciĝis ribeloj, neniigado de industriaj robotoj, strataj bataloj; ŝajnis, ke tio jam estas fino. Sciencistojn-esploristojn, kaj speciale inventistojn kaj raciigantojn, la registaro devis kaŝi en subteraj bunkroj, protekti kaj savadi ilin, kiam la popolo atakis ilin kiel kulpulojn de la progreso, iĝinta katastrofo. Tamen nenio jam povis forturni la luzanojn de tiu ĉi vojo, kaj la sekva generacio ne plu persekutis ilin.

Ĝuste tiam malkovriĝis neforkonsumebla fonto de energio, ĉerpata rekte el la kosmo ([kvankam mi plu ne scias, kiel ili faras tion](#)). Kikeriks nomas tiun epokon la konsuma diluvo. De ĉenstabloj deiradis milionoj da aŭtoj, kaj komenciĝis vera akcelo de ilia kirasa defendo pro kresko de agresemo. Tiam tiujn aŭtojn ([sufiĉe similajn al la teraj](#)) oni produktadis ankoraŭ el ŝtalo per stampado, kaj laŭ deziro de aĉetantoj la produktantoj unue komencis plifirmigi la karoserion, poste munti en la bufroj specialajn dentegojn kaj spronojn, kaj tiu, kiu ne deziris veturi en kirasaŭto, riskis esti frakasita en plej proksima vojkruciĝo. Tribunaloj pri aŭtaj krimoj estis superŝutitaj per lavango da procesoj, kaj ramado iĝis tute laŭleĝa; damaĝon kompensadis asekurkompanioj. Junularo amuzadis sin per ĉasado al priservaj aŭtomatoj, speciale preferante telefonĉelojn; helpadis nek blenditaj vitroj, nek ŝtalo, per kiu oni kirasis telefonlibrojn. Kio koncernas hejme produktatajn bombojn, do ilia submetado estis tiom ordinara, diris Kikeriks, ke, kiam straton skuadis vica eksplodo, sur la teron faladis nur tiuj preterpasantoj, kiuj estis plej proksime. La ceteraj eĉ ne turnadis la kapojn, tamen, jam tiam oni portadis individuajn defendajn kokonojn, kiuj ĉe bruo de eksplodo pleniĝadis per kontraŭsplita ŝaŭmo – tute necesa

antaŭzorgo, ĉar se kliento estis malkontenta pri bakejo, poŝtejo aŭ riparejo, li ne zorgigis sin per reklamacioj, sed simple eksplodigadis la malamatan oficejon. Oni vivis ĉiam pli riĉe kaj pli danĝere; kune kun sortimento de senpagaj ĝuoj kreskis sento de ĉies minaco. En la muzeo mi vidis vesperajn kostumojn kun subŝtofo el superfirma tantala fibro; la modo, obeante al diktado de la neceso, leĝigis blenditajn ĉapelojn, sed kvanto de viktimoj plu kreskis.

Aŭtomatojn de memdefendo unue ekuzis priservaj oficejoj, kio kaŭzis aperon de novaj fontoj de danĝero; kiel klarigis al mi Kikeriks, se en telefona budo vi gratis vian kapon tro abrupte aŭ nesufiĉe glate etendis la manon al la parolilo, vin tuj kaptadis je la kolumo ŝtala mano kaj elĵetadis sur la straton, kaj okaze de rezisto iufoje krakadis la ripoj. Tiamaj sensiloj estis ankoraŭ nesufiĉe selektivaj. Dum tuta tago sur stratoj hurladis sirenoj de «urĝa helpo», kaj vespere pezaj rubskrapiloj purigadis pavimojn de aŭtaj restaĵoj. Ŝanĝiĝis ankaŭ arkitekturo – neatendita gasto ne povis trafi en fremdan domon, kaj premante la butonon de la sonorilo ĉe la enirejo, oni devis forŝoviĝi flanken kaj duonsidiĝi, por sukcesi desalti, se pro miskompreno la pordo kun terura forto malfermiĝos eksteren, penante frapi la veninton al la frunto. Ajnan antaŭĉambron eblis dum du minutoj superverŝi per rapide densiĝanta likvaĵo, kaj nemalmultaj nevokitaj gastoj dronis, kiel muŝoj en rezino. En pordaj ansoj estis kaŝitaj magnetmezuriloj, kaj por submeti bombon al najbaro, oni devis preni platan; sed eĉ tio ne garantiis sukceson: aperis universalaj indikiloj, tiom sensivaj, ke sufiĉis havi en la poŝo malnovan fajrilon, por ĉe la enirejo mem fali en kaptilon, kiu estis sub konstanta televida kontrolo de la polico. Malfermitaj scenejoj kaj estradoj foriris en la pasintecon, ĉar ĉe la unua falso de tenoro aŭ de violonisto, kaj eĉ ĉe disputinda traktado de adaĝio fare de plenumanto indigna melomano elprenadis el sub la seĝo anticipe rezervitan mitraleton; tial ĉiuj seĝoj, kaj en la partero, kaj sur la balkonoj, estis kovritaj per diafana kloŝo, kiu malfermiĝadis nur post sonoro pri komenco de interakto. Kaj eĉ se vi devis eliri pro urĝa neceso, vi devis ion elpensi, ne forlasante la halon, – ekde kiam kontentigo de tiuj necesoj iĝis ŝatata ŝirmo de bombistoj. En metroo

kaj tramoj bruladis veraj bataloj, ĝis finfine en vagonoj estis instalitaj subfundaj katapultoj; el tramoj, kurantaj laŭ reloj, iam per tutaj grupoj elfaladis pasaĝeroj, alkroĉiĝintaj unuj al la aliaj, kaj kiel fadenbulo ruliĝadis sur pavimo, kaj kirasitaj preterpasantoj diligente ĉirkaŭiradis ilin.

Mi kuraĝis rimarki, ke tio estas terura, ridinda kaj simple nekredebla; tamen trafis falĉilo sur ŝtonon: ja Kikeriks estas homisto, kaj li tuj rememorigis al mi pri nia banditeco rilate al diplomatoj; dum ambasadorojn, eĉ plej bongustajn, sur la Tero ne tuŝis eĉ kanibaloj. Speciale multe da klopodoj estis kun robotoj, kiuj iĝis ŝatata objekto de urba ĉasado. La stratoj estis superŝutitaj per kadavroj; kaj kvankam, penante savi sian kiber-ĉambriston de kuglo, la mastroj nemalofte vestadis lin en sian propran kostumon, plej fervoraj ĉasistoj, anstataŭ priesplori kaj pridemandi la ĉasaĵon, preferis faligi ĝin per trafa pafo, kaj poste pravigi sin, ke ili prenis la viktimon por roboto. Malgraŭ strikta malpermeso, kelkaj tamen armadis siajn robotojn, por ke tiuj povu respondi per pafado al pafado; kaj ideaj kontraŭuloj de robotmurdoj intence sendadis al la paflinio kaptajn robotojn, kapablajn nek al ĉambropurigado, nek al vazarlavado, tamen priverŝantaj la ĉasistojn per mitralaj pafoj, aŭ specialajn modelojn, kiuj intence faladis ĉe sono de pafo, kaj kiam la pafisto, feliĉa kaj fiera, metadis la piedon sur la faligitan ĉsakiron kaj alportadis al la lipoj kornon, por proklami sian triumfon, la ŝajna trofeo enpikadis en lian femuron ŝtalajn dentegojn. Kio, siavice, furiozigadis membrojn de la ĉasista klubo kaj instigis ilin al uzo de misiloj. Aliaj, male, opiniis la akcelon de la ĉasaj armiloj ne nur tute natura, sed eĉ pikanta: laŭ ili, ju pli riska estas sporto, des pli interesa, kaj ĉasado al tigro estas multe pli honora, ol mortigado de leporoj. Kiam enmodiĝis ĉasado de sur aŭtoj, ĉiam pli similaj al kirasaŭtoj kun flamĵetiloj, kaj duonon de Hesperido neniigis incendio, kaŭzita de kunpuŝiĝo de du ĉasistaj komunumoj, la registaro ekstaris sur la flankon de la heroldoj de etikosfero – ĝuste en la lasta momento, kiel asertas nun ties defendantoj.

Konsciante, ke la agresemon, akumuligintan en la socio, ne eblas neniigi tuj kaj necesas permesi al ĝi malstreĉiĝi, la etikigistoj

ne avaris pri financado de malbonabsorbaj sociaj institucioj. Multaj el ili ekzistas ĝis nun. Mi menciis nur pri kelkaj – ili, mi estas certa, ne malhelpus ankaŭ al ni. Mi komencu per malgranda: la luzanoj havas tradicion fari monumentojn al elstaraj kaj samtempe malamataj personoj – «monumentojn de malgloro»; anstataŭ bronzaj urnoj la postamenton ĉirkaŭas grandaj kraĉujoj. La unuan tian alegorian grupon kun cizelitaj en bronzo malbenoj oni faris jam en la pasinta jarcento al la tri Pseŭdo-Ksiksar-oj. Krome, ĉiu politikisto, farinta speciale grandan kontribuon por la afero de ĉies malbonfarto, havis sian monumenton aŭ almenaŭ buston. Kikeriks kredigis min, ke tiu speco de plastikaj artoj havas speciale altajn postulojn kiel al aŭtoroj de projekto, tiel ankaŭ por plenumantoj. La afero estas en tio, ke bildoj de malgloruloj estas plenumataj per materialo facile deformebla, sed dum nokto ĝi restarigas la antaŭan formon. Tamen, kiel montris praktiko, estas tute celkonforme el samaj materialoj fari monumentojn al tute meritaj agantoj: ĉiam troviĝos iu, kiu pridubas iliajn meritojn, kaj elspezoj por riparo de monumentoj, speciale de ampleksaj, estas tre grandaj. Por provincanoj ([kaj ankaŭ por lernejanoj](#)), organizite pririgardantaj la Malnovan urbon, malantaŭ ĉiu «malglora monumento» estas preparitaj kestoj kun respektivaj iloj. Ili estas kaŝitaj en heĝo, kaj ilia detrua forto precize konformas al rezistemo de la monumento. Escepto el la regulo, dislimanta gloron kaj malgloron, estis farita nur por la patroj-fondintoj de la etikosfero. Por fini eternajn kverelojn kaj malpacojn ĉe iliaj piedestaloj, oni devis eternigi tiujn virojn per du memorigaj kompleksoj; ĉiu deziranto konforme al siaj konvinkoj povas direkti sin aŭ al la unua, aŭ al la dua – kun flora bukedo aŭ kun io tute mala.

Tiel sukcese okazis, klarigis al mi Kikeriks, ke aŭtomatigo metis finon al la fizika laboro ĝuste tiam, kiam aperis unuaj lertontrustoj, kaj, kvankam la lertonoj estis tre malproksimaj de perfekteco, jam en la tria jaro kvanto de subitaj mortoj komencis malkreski. Eĉ malgraŭ tio, ke la krima mondo kune kun la ĉasistaj komunumoj kaj huliganaj bandoj, kaj ankaŭ ekstremistoj kaj ceteraj grupoj, por kiuj vivo sen sangoverŝado ne havis eĉ etan sencon, amase migris el urboj en ankoraŭ ne lertonizitan kamparon. Siavice, amasoj

de fuĝantoj el kamparo ekfluis en grandajn urbojn; unuvorte, komenciĝis vera transmigrado de popoloj.

Tio estis epoko de kuraĝaj eksperimentoj. En unu el distriktoj nemalproksime de la ĉefurbo oni eksperimente enkondukis nelimigitan senpagan konsumadon – malgraŭ protestoj de parlamenta opozicio, esprimanta interesojn de grandaj industriistoj. Ili plu pledis por la leĝoj de merkato kaj vara produktado, kvankam memkosto de ajnaj produktoj evidente strebis al nulo. Energio kostis jam neniom, atingebla kiel aero, kaj eĉ pli atingebla, ĉar ĝi estis ĉerpata el la kosma spaco.

Ve, senpageco de bonoj kaj servoj kondukis al terurantaj rezultoj. Ĉiuj konkure komencis amasigi montojn da nenecesa havaĵo, elpensadi frenezajn ekstravagancojn, por superi parencojn, najbarojn, konatojn, kaj tiuj same ne postrestis. Al familiaj palacetoj oni devis alkonstruadi tenejojn de vestaĵoj, trezoroj, provianto, ties parto pereadis sen ajna utilo, kaj la laboro de akumulado iĝadis simple neeltenebla; tio metis la novriĉulojn en tian deprimon, ke ili fojfoje reagordadis pacajn robotojn kaj formadis el ili privatajn sturmajn taĉmentojn, por molesti ĉirkaŭantojn; ekbrulis kolizioj kaj eĉ tutaj militoj, litere intercivitanaj – inter apartaj civitanoj. Pro kio? Pro nenio. Oni devis ĉirkaŭigi per pikedoj kaj senarmigi tutan urbon, kaptitan de incendia fajro, skuatan de bombaj eksplodoj.

Ŝajne jam delonge oni scias, ke absoluta prospero absolute malĉastigas, tamen troviĝis idealistoj-optimistoj, kredantaj, ke la popolo baldaŭ trankviliĝos kaj ĉesos ekscesi. La nun ekzistanta sistemo, kreiginta antaŭ pli ol cent jaroj, dispelis tiujn infanajn revojn. Al ĉiu civitano por jaro oni disponigas strikte certan kvoton de energio. Li povas uzi ĝin por kio li deziras. Ekzemple, por tricent mil pantalonoj kun oraj galonoj, aŭ por ĉokolada monto kun marcipanaj interkrutejoj, aŭ por naŭcent platenaj flugantaj gramofonoj de tia povo, ke, eĉ kiam ili malaperas trans horizonto, ankoraŭ aŭdeblas ilia jeriĥa muziko; sed neniu jam disipas siajn rezervojn tiel senprudente: oni devas kalkuli elspezojn, kaj la kvoton oni ne rajtas akumuli aŭ unuigi kun kvotoj de aliaj personoj, por

ke ne aperu sekretaj koalicioj aŭ aliaj subfosaj asocioj. Ĉion, kio necesas, oni kreas por ioma tempo, kaj poste malŝaltas, kiel ni – elektran lumon. Jam ne plu ekzistas unikaj objektoj, kaj donaco povas iĝi nur originala informo pri io tia, kion dume neniu havas, ĉar li pri tio ne aŭdis, kaj mem ne sukcesis elpensi. Alivorte, donaco povas esti nur io simila al recepto aŭ instrukcio. Esence, vere nova informo tiaspeca ne ekzistas: ajnan eblan informon entenas komputilaj listoj de bonoj, kaj ĝian neatingeblecon kaŭzas nur terura redundeco de la akumulitaj scioj.

Kun Kikeriks mi estis en arta galerio; sur honora loko ĉi tie staras statuo de Daksaroks, politikisto, kiu la unua komencis propagandi konstruadon de diboĉejoj. En tiuj ejoj, malfermitaj por ĉiuj plenaĝuloj, oni povas liberigi agresajn pasiojn. Nemalmultaj entianoj opinias Daksaroks-on plej granda ŝtataganto de la epoko de ĉies senagado, sed li havas ankaŭ mallaŭdantojn.

Laŭ konsilo de mia mentoro mi vizitis aŭtoklazon. Tio estas grandega sfera konstruaĵo, simila al velodromo. En grandega subtera parkumejo vi elektas aŭton, kaj poste laŭ ramplo enveturas sur ordinaran urban placon, sub malfermitan ĉielon. Tie estas permesita ĉio – rami aliajn aŭtojn, ĉasi piedirantojn, kovrante la vojon per kadavroj kaj frakasitaj aŭtoj, kaj eĉ enveturi domojn, farante ilin amaso de rompopecoj kaj nuboj de kalkaĵa polvo. Mi ne scias, kiel oni faras tiujn miraĝojn, sed sento de realeco de la okazanta estas plena. Kelkaj klientoj, oni diras, ne eliras el aŭtoklazo, terurigante ĉe penso pri reveno sub la prizorgon de la etikosfero, tiom ĝi tedeĝis ilin. Ekzistas ankaŭ diboĉejoj de alia tipo – tie eblas senpune murdi, bruligi, rabi kaj torturi iun ajn ĝis centa ŝvito kaj ĝis perdo de la spirado, sed mi ial ne deziris.

Kikeriks opinias, – eble, prave, – ke inter frekventuloj de tiuj ejoj kaj ŝatantoj de sangaj spektakloj kiel taŭrobatalo aŭ filmoj, plenaj de krimoj, diferenco estas ne esenca, sed nur grada. Unuj sciuloj de la problemo vidas en la diboĉejoj amplifilojn de malaltaj instinktoj, pliakrigantajn senton de premateco ĉe homoj, laŭ sia naturo kruelaj, sed aliaj nomas tion deĵeto de negativaj emocioj, sekurvalvo, kiu

donas malstreĉiĝon al tro insiste pacigata psiko de la civitanoj. Cirkulas onidiroj, kvazaŭ la diboĉejoj estas sub sekreta kontrolo de la Ministerio de Preventaj Rimedoj kaj ĉiu, kiu diboĉos fiktive, trafas en sliparon de personoj kun perversaj inklinoj, kaj poste al ili oni sendas animmildigantajn lertonajn. Opoziciuloj evitas tiujn ejojn kiel diablo krucon kaj taksas ilin treege malestime. Ne estas manko de fatamorganaj imitiloj ankaŭ eksterurbe, en specialaj ĉasejoj, kie pasiaj ĉasistoj elspuras la plej grandan beston – kurdlon, kaj eĉ miltunajn flamĵetantajn pirosaŭrojn. Verŝajne, ĝuste el tio aperis en la teraj materialoj kontraŭdiraj mesaĝoj pri fajrospirantaj flamurdloj: estante fantomoj, ili ekzistas kaj ne ekzistas samtempe. Ne mi sola misis, opiniinte amuziĝojn de la fremdplaneda civilizo ĉiutaga realo. La samo rilatas al la fifama manekenigo; manekenojn je natura amplekso, vide nedistingeblajn de la originaloj, oni vere povas mendi en filioj de firmao AVH ([Ajnajn Varojn Hejmen](#)); AVH produktas ĉion necesan por hejma mastrumado, ankaŭ laŭ individuaj mendoj, kaj neniu demandas klienton, kion li intencas fari kun la menditaj varoj, ja tera vendisto de vesto same ne tre interesiĝas, por kio ĝi necesas al la aĉetanto. Tio simple nenion zorgigas, kaj la diferenco estas nur en tio, ke sur Entio mendi androidon estas ne pli malfacile, ol fridujon.

Kikeriks diras, ke laboras ne pli ol 10% de ĉiuj entianoj, tamen tiu nombro konstante kreskas; malgraŭ ĉies lukso kaj sennombraj amuzoj, senlaboreco tedas multe pli, ol eblis imagi en la antaŭa epoko de mizero kaj senfortiga laboro. La ĉefa problemo restas, laŭ lia opinio, atingebleco de bonoj kaj amuzoj por ĉiuj. Kio estas donata senpage, valoras neniom; la dolĉa neniofarado tro multajn malesperigas, kaj oni jam komencas pensi, kiel fari la vivon pli malfacila. Aĥ, se la socio konsentus aprobi tiajn projektojn! Sed jen malfeliĉo – ĝi ne deziras, kaj fino. Sian nedeziron ĝi konfirmas en regule aranĝataj plebiscitoj, kaj la sola eliro estus kreo de iaj tute novaj obstakloj sur la viva vojo. Ja temas ne pri tio, ke en unu bela tago simple mankus nutraĵoj kaj la popolo, anstataŭ iri en diboĉejon, starus en vico por fromaĝo. Sed kiel efektiviĝi tiajn ideojn? Ajnaj ŝanĝoj postulas konsenton de plimulto, kaj la novtipaj malfacilaĵoj devas esti akceptitaj bonvole, sed ne truditaj. Tio estas ege komplika

demando, skuis sian birdan kapon mia mentoro, tiuj hezitoj intertentoj de sekreta potenco kaj hedonismigo; kaj nemalmultas tiuj, kiuj vivas kiel anakoretoj: ne eliras el la hejmo, portas la saman veston, ĝis ĝi forputros, kaj ĉion ĉi ili faras tial, ke la neceso de elekto ĉe reganta troabundo tute paralizas ilian volon.

Mi demandis pri Nigra Klivio, kaj al mi ŝajnis, ke la demando ne plaĉis al li. Anstataŭ respondo li komencis elesplori, kion mi scias pri Klivio, post kio li deklaris, ke je 98% tio estas mensogo, konsistanta el miskomprenoj kaj misprezentoj, kaj la cetero estas dubinda. Kiel do estis efektive? Efektive, respondis li, ni faris por klivianoj ĉion, kion ni povis. Pro malbonaj klimataj kondiĉoj ĉe ili ofte okazadis rikoltomanko, ni provizadis ilin per provianto (same, kiel [Kurdlandon](#)), kaj ili, tio estas iliaj potencoj, plu malsatigadis la popolon, akumulante strategiajn rezervojn por okazo de milito, kiun ili intencis komenci kontraŭ ni; kaj eĉ se en la eksportatajn nutraĵojn estis aldonataj substancoj, malebligantaj ilian longan konservadon, de nia flanko tio estis elementa antaŭvidemo, ne pli. Sed kio povus esti «pli», demandis mi; li nedefinite ridetis kaj diris, ke sur tiu grundo aperis multaj elpensadoj kaj kalumnioj, pri kiuj mi pli aŭ malpli frue aŭdos. La interparolo pri Klivio kondukis al rimarkebla malkonkordo inter ni.

\* \* \*

De veturado en la Instituton de Nobligo de la Medio en mia memoro restis nur miro, kaŭzita de ekflugo de lifto: ĝi ekiris vertikale, kaj poste per klako de kartoĉo, enmetata en magazenon, transsaltis super la tegmento de la gastejo sur trakon, kiu per plata ĉielarko, sen ajna subtenilo, fleksiĝis super la urbo kaj kiel ĉielarko brilis per sep koloroj de la suna spektro. Poste venis mallumo, la planko milde falis sub mi, la ĉelo haltis senmove, ĝia muro malfermiĝis laŭ nevidebla suturo, kaj sur fono de plantoj kun grandaj blankaj floroj mi ekvidis altan luzanon kun homa vizaĝo, en kostumo kun unu butonvico kaj en neĝblanka ĉemizo, kvazaŭ li ĵus eliris de pariza tajloro: eĉ la roversoj de la jako kaj la kolumo de la ĉemizo estis tajloritaj laŭ la lasta modo – la modo de ducentjara aĝo! Ankaŭ tio

estis parto de ĉiea respekto al mi, ja ili mem vestas sin alie. La luzano atendis min, anticipi etendinte la manon, kvazaŭ li timis forgesi, kiel oni salutu homon; ĉe la manpremo lia polmo malaperis en la mia kune kun la dikfingro. Tio estis Tipp Tippilip Tahalat, la direktoro de INM, nigraokula blondulo. Mi dezirus scii, kiel ili tion faras. Anstataŭ tradukilo – sur roverso – mi havis po unu malgranda metala rondeto sur ĉiu orelkonko; tera parolo kvazaŭ elnaĝadis el la buŝoj de la renkontantoj. Ili, verŝajne, aŭdis min same. Rimarkinte ĝeniĝon, montritan de Tahalat ĉe la renkontiĝo, mi sentis ioman faciliĝon: en lia kono de teraj moroj evidentiĝis mankoj, kaj nenio tiel premas, kiel aliula perfekteco.

Tahalat kondukis min en vere mirindan ejon. Tio estis preciza kopio de kunvena halo de antikva tera banko – proksimume de fino de la XIX-a jarcento. Longa, kovrita per verda drapo tablo inter du vicoj de nigraledaj foteloj, laktovitraj fenestroj, inter ili – vitraj ŝrankoj; en unuj staris libroj – inter ili mi rimarkis volumojn de jarlibroj de Lloyd, – en aliaj staris modeloj de velŝipoj kaj vaporŝipoj; kaj mi ree pensis, ke ili, je Dio, tro penas, aranĝante tian spektaklon por unusola konversacio kun terano! Ni eksidis al malgranda tableto ĉe fenestro, sub rododendro en majolika tino, inter ni vaporis kafaparato kun mokao, staris unu taso – por mi – kaj arĝenta sukerujo, ŝajne, kun brita leono; kaj por la mastro estis preparita io simila al piro sur tigo aŭ fungo kun lazura ĉapelo. Tahalat pardonpetis, ke li ne trinkos samon, kiel mi; li ne kutimas al tio kaj atendas mian indulgemon. Mi certigis lin, ke li faras al mi tro multan atenton; tiel ni konkuris en ĝentileco, mi – kirlante sukeron en la taso, li – turnante en la manoj la piron-fungon, kiu anstataŭ tigo havis tubeton, kaj interne – ian likvaĵon. Tahalat ekparolis pri mia malfeliĉa aventuro. Li rememorigis, ke mi restis viva danke al la etikosfero, kvankam, eble, mi ne klare konscias tion. Ĉe la kontraŭartistoj al mi nenio minacis, aldonis li, kio koncernas la gidianojn, do ili loĝas en rezervejo, lertonizita nur supraĵe. Tial, kiam oni eksciis pri mia kidnapo, oni plifortigis lokan koncentriĝon de lertonoj, kaj tiam ili tralikiĝis en la kelon.

– Finfine mi ekscios de vi, kiel ili funkcias, tiuj lertonoj, – diris mi, mense mirante pri bonega gusto de la luzana kafo.

– Plej bone – per eksperimento, – respondis la direktoro. – Ĉu mi povas peti vin vangofrapi min?

– Kio, kio, pardonu?

Mi pensis, ke en la traduko estas eraro, sed la direktoro kun rideto ripetis:

– Mi petas vin komplezi min, frapinte mian vangon. Vi vidos, kiel efikas la etikosfero, kaj poste ni diskutos tiun eksperimenton... Mi, eble, ekstaru; ankaŭ vi ekstaru – tiel estos pli oportune...

Mi decidis frapi lin, se li tiel deziris. Ni ekstaris unu kontraŭ la alia. Mi levis la manon – modere, ĉar mi ne deziris faligi lin, – kaj rigidiĝis kun la mano, formovita flanken. Io tenis min. Tio estis la maniko de la jako. Ĝi iĝis malmola, kiel lada tubo. Mi penis fleksi la brakon almenaŭ en la kubuto kaj kun grandega peno fleksis ĝin – sed nur duone.

– Ĉu vi vidas? – diris Tahalat. – Kaj nun mi petas vin rezigni vian intencon...

– Ĉu rezigni?

– Jes.

– Nu bone. Mi ne frapos vian...

– Ne, ne. Ne en tio estas la afero, ke vi tion diru. Vi devas sugesti tion al vi, doni internan solenan promeson.

Mi faris proksimume tiel, kiel li diris. La maniko moliĝis, sed ne fine. Mi plu sentis ĝian nenaturan malmolecon.

– Tio estas tial, ke vi ne tute rezignis tiun penson...

Ni plu staris vidalvide. Post minuto la maniko jam estis tute mola.

– Kiel tio estas farata? – demandis mi.

Sur mi estis jako, alveturigita el la Tero, – ĉeviota, cindrokolora, kun etaj griz-bluaĵoj punktoj. Mi atente pririgardis la manikon kaj rimarkis, ke viloj de la teksaĵo nur nun kuŝiĝis, kvazaŭ tio estis lano de unue streĉiĝinta, kaj poste trankviliĝinta animalo.

– Malbonaj intencoj kaŭzas ŝanĝiĝojn en la organismo. Adrenalino iras en la sangon, la muskoloj iomete streĉiĝas, ŝanĝiĝas proporcio de jonoj kaj per tio – elektra ŝarĝo de la haŭto, – klarigis la direktoro.

– Sed tio estas mia tera vestaĵo...

– Ĝuste tial ĝi ne defendis vin ekde la komenco mem, sed nur post proksimume tri horoj. Tamen, nesufiĉe sukcese – kvankam lertonoj saturis la teksaĵon, vi restis por ili nekonata estaĵo, kaj ili vere reagis nur tiam, kiam vi komencis sufokiĝi – ĉu vi memoras? – en tiu kelo...

– Do ĉu estis ili, kiuj disŝiris la kolringon? – miris mi. – Sed kiel?

– La kolringo disfalis mem, lertonoj nur ordonis. Mi devas klarigi al vi pli detale, ja tio estas ne tute simpla.

– Kaj kio okazus, – interrompis mi lin, – se mi demetus la jakon?

...Kaj mi tuj rememoris, kiel tie, en la kelo, la ŝtelintoj malespere penis senvestigi sin.

– Je dio, bonvolu... – respondis la direktoro.

Mi pendigis la jakon sur la dorson de la seĝo kaj pririgardis la ĉemizon. Io estis okazanta al rozkvadratita poplino – ĝiaj mikroskopaj fibroj hirtiĝis.

– A ha... la ĉemizo jam aktiviĝas, – komprene diris mi. – Kaj se mi ankaŭ ĝin demetos?..

– Mi tutkore invitas vin demeti la ĉemizon... – prete, eĉ entuziasme respondis li, kvazaŭ mi divenis la deziron, kiun li ne kuraĝis eldiri. – Ne ĝeniĝu, mi petas...

Estis iel strange senvestiĝi en tiu rafinita halo, en hela niĉo ĉe fenestro, sub palmo. Tio, verŝajne, aspektus ne tiel neordinare en pli ekzota medio; tamen mi diligente malnodis la kravaton; senvestiginte min ĝis la zono, mi tiris supren la pantalonon kaj demandis:

– Ĉu nun mi povas, sinjoro direktoro?

Li iel eĉ tro volonte submetis la vizaĝon por bato, kaj mi, ne dirante plu eĉ vorton, turniĝis, starante sur iomete dismetitaj piedoj, kaj ili disglitis tiel subite, kvazaŭ la planko estus el glacio, kaj eĉ priverŝita per oleo; mi falegis rekte al la piedoj de la luzano. Li zorgeme helpis al mi leviĝi, kaj mi, rektiĝante, kvazaŭ nevole batis lian ventron per la kubuto kaj tuj ekkriis pro doloro: la kubuto trafis kvazaŭ al betono. Ĉu li havis kirason sub la vesto? Ne – inter la roversoj de lia jako mi vidis maldikan ĉemizon. Do, la afero estis ne en ĝi. Ŝajniginte, ke mi eĉ ne intencis bati lin, mi eksidis kaj komencis pririgardi la plandumojn de la ŝuoj. Ili tute ne estis glitemaj. Tute ordinaraj ledaj plandumoj kaj reliefaĵ kaŭĉukaj kalkanumoj – mi preferas tiajn, kun ili la iro estas pli risorta. Mi rememoris, kiel falis la artistoj, kiam ili per la tuta bando ekiris al mi, staranta sub la flugilo de la anĝelo. Jen kial! Mi levis la kapon kaj ekrigardis al la senmovaj okuloj de la konversacianto. Tiu bonkore ridetis.

– Ĉu lertonoj en la plandumoj? – diris mi la unua.

– Prave. En la plandumoj, en la kostumo, en la ĉemizo – ĉie... Mi esperas, vi nenion kontuzis?...

La kaŝita senco de tiuj vortoj estis malpli ĝentila: «Se vi ne svingus la manon tiel forte, vi ne falus».

- Bagateloj, ne gravas. Kaj se mi senvestiĝus ĝisnude?..
- Nu, tiam okazas diverse... Mi ne povas diri ĝuste, kio okazus: mi simple ne scias. Se oni povus scii, tiam eblus ĉirkaŭiri amorojn, tio estas amplifilojn de moralo... Atentu: filtrilo de agreso estas la tuta medio, sed ne nur vesto...
- Kaj se ĉi tie, ie en izola loko, mi ĵetus ŝtonon al via kapo?
- Mi pensas, ĝi deflankiĝus dum flugo aŭ disŝutiĝus en la momento de la bato...
- Kiel do ĝi povas disŝutiĝi?
- Escepte de nemultaj lokoj – ekzemple, rezervejoj, – nenie restis nenobligita substanco...
- Do, ĉu ankaŭ platoj de trotuaro? Kaj gruzo sur vojoj? Kaj muroj? Ĉu ĉio estas artefarita?
- Ne artefarita. Sed lertonizita. Kaj nur en tiu senco, se vi deziras, artefarita, – parolis li pacience, zorgeme elektante vortojn. – Tio estis necesa.
- Ĉu ĉio, tute ĉio estas el etaj logikaj elementoj? Sed tio ja postulis nekredeblajn elspezojn...
- La elspezoj estis grandaj, sendube, tamen ne eblas diri, ke nekredeblaj. Finfine, tio estas nia ĉefa produkto...
- Ĉu lertonoj?
- Jes.
- Kaj nuboj? Kaj vintro, kiam akvo glaciĝas? Kaj ĉu entute eblas lertonizi akvon?
- Eblas. Ĉio eblas, estu certa.

– Ĉu ankaŭ manĝaĵojn? Ĉu tiun ĉi kafon?..

– Jes kaj ne. Eble, mi nevole miskomprenigis vin pri nia teĥnologio. Vi opinias, ke ĉio konsistas el nuraj lertonaj. Nur el ili. Sed estas ne tiel. Ili simple troviĝas ĉie, kiel, ekzemple, ŝtala armaturo en ferbetono...

– Aĥ, jen kio! Do, ni diru konkrete: ĉu en tiu ĉi kafo? ĉu ili naĝas en ĝi? Sed kiam mi trinkis, mi nenion sentis...

Verŝajne, sur mia vizaĝo aperis grimaco de abomeno, ĉar la luzano kompate dismovis la manojn.

– En tia kvanto da kafo povus esti ĉirkaŭ miliono da lertonaj, sed ili estas malpli grandaj, ol teraj bakterioj kaj eĉ virusoj – por ke ilin ne estu eble forfiltri... Same estas kun via vesto, kun la ledo de la ŝuoj, kun ĉio.

– Do, ili senĉese penetras en profundon de organismo? Kun kiaj konsekvencoj? Ĉu ili estas en mia sango – kaj en la cerbo?

– Trankviliĝu! – Li levis la manon, kvazaŭ defendante sin. – Ili eliras el organismo, neniel ŝanĝante ĝin. La korpo por ili estas netuŝebla teritorio, konforme al niaj ĉefaj leĝoj. Ekzistas, tamen, specialaj kontraŭbakteriaj lertonaj, sed ilin uzas nur kuracistoj okaze de malsano, enportita el ekstere, ja en la aera spaco de Luzanio jam ekzistas neniuj malsanigaj mikroorganismoj... Nu, ĉu ni daŭrigu niajn eksperimentojn?..

Li aliris la tablon kaj eltiris tirkeston. Tie kuŝis kelkaj najloj – grandaj kaj malpli grandaj, martelo kaj plattenajlo.

– Ĉu vi bonvolos enbati najlon en la tabloplaton? – Li frapis per la fingro la palisandran tablotabulon.

– Mi ne dezirus malutili la meblon...

– Ne gravas, tio estas bagatelo.

Mi prenis la duonkilograman martelon kaj kelkajn grandajn najlojn, tintis per unu najlo je alia, kaj poste per kelkaj fortaj batoj enbatis kvarcolan najlon en la lignon ĝis la mezo. La verniso disŝprucis per brilantaj splitetoj. Mi frapis la najlon flanke – ĝi eksonoris, kiel agordforko. La direktoro etendis al mi la plattenajlon, kaj mi kun peno, ĉar la najlo sidis profunde, eltiris ĝin; ĝi preskaŭ ne kurbiĝis.

– Kaj ĉu nun mi devos enbati ĝin... en vian kapon? – divene demandis mi.

– Jes, estu afabla...

Por ke al mi estu pli oportune, li eksidis, iomete kliniĝinte, kaj mi nehaste demetis la ŝuojn, la ŝtrumpetojn – mi tute ne deziris ankoraŭfoje trafi sur la plankon, – almetis la najlon al lia kranio kaj faris simbolan baton per martelo, tre facile, sed tiel, ke la direktoro tremis. Mi rigidiĝis hezite; li hastis kuraĝigi min:

– Mi petas vin, pli decide... sentime...

Tiam mi bategis per la martelo al la aspra ĉapelo, kaj la najlo malaperis. Simple malaperis – nur en mia polmo restis pinĉaĵo da cindra polvo.

Tahalat ekstaris kaj eltiris alian tirkeston. Tie kuŝis kudriloj, pingloj, raziloj. Li prenis manplenon da tio, metis en la buŝon kaj, malrapide movante la makzelojn, komencis maĉi, ĝis glutis tute. Ĝuste kiel iluziisto.

– Ĉu vi deziras provi?.. – proponis li al mi.

Do, mi prenis razilon, movis laŭ ĝi la fingropinton – akra! – kaj metis sur la langon kun konvena singardemo.

– Kuraĝe, kuraĝe...

Sur la lango sentiĝis metala gusto, kaj estis malfacile liberiĝi de penso, ke mi tuj terure kripliĝos; tamen astronaŭtiko fojfoje

postulas oferojn. Mi mordis la razilon, kaj ĝi disŝutiĝis en la buŝo en delikatan pulvoron.

– Ĉu vi deziras najlon? aŭ kudrilon? – regalis li min.

– Ne, dankon... Probable, sufiĉas...

– Tiukaze ni konversaciu...

– Kiel tio estas farata? – demandis mi, ree preninte mian tason. Mi rimarkis, ke, kvankam pasis sufiĉe multa tempo, la kafo plu estas same varmega, kiel ĉe la unua gluto. – Ĉu ĉio ĉi estas pro lertonoj? Sed lertonoj estas nur logikaj elementoj... kaj tio, – mi almontris la najlojn, disĵetitajn sur la tablo, – verŝajne, estas vera ŝtalo?..

– Jes, solaj lertonoj nenion farus sen nia teĥnologio de solidaj korpoj... Vi, sendube, scias, kiel aperas televida bildo?

– Certe. Ĝin desegnas sur ekrano radio de fokusigitaj elektronoj...

– Ĝuste. La bildo aperas kiel impresio de la okulo; en fotoj kun tre mallonga eksponaŭro videblas nur apartaj situoj de la luma makulo. Ĝuste tiu principo kuŝas en la bazo de nia teĥnologio de solidaj korpoj; najlo aŭ ajna alia metala objekto ekzistas nur kiel certa nombro de atomaj nubetoj, kiuj moviĝas ene de formo, determinata de speciala programo. Tiuj atomoj kreas ion similan al mikroskopaj fajlaĵoj kaj, kurante laŭ siaj trajektorioj kun grandega rapido, kreas impreson de najlo. Aŭ de alia objekto el ŝtalo aŭ ajna metalo. Tamen, tio estas ne nur impresio, iluzio, kiel bildo en televidilo, – kun tia najlo oni povas fari ĝuste samon, kiel kun ordinara najlo, forĝita aŭ stampita, ĉu vi komprenas?

– Kiel do? – perplekse demandis mi. – Do, moviĝantaj fajlaĵoj... atomoj... Kaj kun kia rapido ili moviĝas?

– Depende de tio, kian objekton necesas krei. En tiuj ĉi najloj – ĉirkaŭ 270 000 km/s. Ili ne povas moviĝi malpli rapide: la objekto ŝajnus tro malpeza; kaj ĉe pli grandaj rapidoj relativismaj efektoj

manifestiĝus en troa kresko de maso, kaj al vi ŝajnus, ke la najlo pezas multe pli, ol ĝi devas... Imito de la natura stato devas esti senriproĉa! Tiuj atomaj nubetoj kuras ĝuste laŭ difinitaj orbitoj – kaj per tio «ĉirkaŭdesegnas» la formon de la necesa objekto, kiel – se ni uzu primitivan komparon – brulanta pinto de cigaredo desegnas cirklon en mallumo...

– Sed tio ja postulas konstantan alfluon de energio!

– Kompreneble! La energion liveras nukleona kampo, interaganta kun la gravita. Ĝin ne eblas forŝirmi, kiel ne eblas forŝirmi la graviton. Kaj se vi prenos ion el ĉi tie, – li desegnis rondon per la mano, – en vian ŝipon, ĉio ĉi disŝutiĝos al polvo, tuj kiam la ŝipo forlasos nian stabiligan kampon.

– Do, ĉio, kio estas ĉi tie, – kaj la mebloj, kaj la tapiŝo, kaj la palmoj...

– Ĉio.

– Ĉu ankaŭ la muroj?

– En tiu ĉi domo – jes. Sed estas ankoraŭ iom da malnovaj, nelertonizitaj konstruaĵoj...

– Kaj ĉu okaze de paneo de energiliverado ĝi disŝutiĝos?

– Vidu, paneo estas neebla.

– Kial? Panei povas ĉio.

– Ne. Ne ĉio. Tio estas ne pli ol superstiĉo. Ekzistas fortoj absolute senpaneaj, se nur elvoki ilin. Atomoj ne konas paneojn, ĉu ne? Elektrono neniam falos sur la nukleon...

– Sed atomo en kvieta stato ne absorbas energion.

– Jes, tial ĉi tie tio estas aranĝita alie. Alfluo de energio estas necesa.

– Sekve, ĝi povas ĉesi.

– Ne, ĉar ni ĉerpas ĝin rekte el la gravita kampo de nia planeda sistemo. Ĉu vi komprenas? Per tio ni, certe, iom bremsas la moviĝon de la planedo ĉirkaŭ la Suno, sed la malrapidiĝo, kaŭzata per tia ekspluato egalas nur al ĉirkaŭ 0.2 sekundoj dum jarcento...

– Tamen iuj maŝinoj aŭ aparatoj devas produkti tiun energion, kaj sekve, povas panei, – insistis mi.

Li nege balancis la kapon.

– Tio ne estas maŝinoj, – diris li. – Ili ne havas triviĝantajn meĥanikajn partojn. Same, kiel ne havas tiajn partojn atomoj. Tio estas rezulto de interferenco de speciale kunigitaj kampoj. Energio en kosmo estas ĉie, en neelĉerpebla kvanto, necesas nur scii, kiel ĝin atingi...

– Kaj via vizaĝo – ne ofendiĝu, mi petas, – ĉu ĝi aspektas homa same danke al tiu teĥniko?

– Kial mi ofendiĝu? Jes, vi divenis. Tio estas simple ago de ĝentileco... Mi rakontis al vi, kiel ni produktas metalajn objektojn. Ĉion ceteran fari estas pli facile... sed tio estas ligita kun strukturo de konkretaj solidaj korpoj. Mi timas, ke traktado de aliaj teĥnologioj kondukus nin tro malproksimen – en terenon de fiziko, nekonata de vi... Tamen la principo ĉiam estas la sama. Ajna materia objekto estas svarmo de atomoj en vakuo. Atomoj, inkluditaj en strukturon, konforman al ilia stato. Ni direktas tiujn strukturojn, jen ĉio. La orkestro estis preta ekde la momento de apero de la Universo kaj nur atendis direktistojn...

– Vi, probable, havas industrion de monstra skalo, – rimarkis mi.

– Ne tiom monstra, kiel vi pensas. Ĝi estas aŭtomata, memsufiĉa kaj mem regas sin.

– Sed ĉu en akvo ja eblas iun dronigi?.. – demandis mi kun espero en la voĉo.

– Ne. Ĉu vi deziras provi? En tiu ĉi domo estas baseno...

– Ne indas, verŝajne. Vi nur diru al mi, kiel la akvo vin savas? Ĉu elpuŝas sur la supraĵon?

– Ne, ĝi disociiĝas al hidrogeno kaj oksigeno, kaj per tiu miksaĵo oni povas spiri...

– Disociiĝas – ĉu danke al lertonoj?

– Jes, pli ĝuste, lertonoj ordonas al molekuloj, kiuj estas retenataj de fortokampoj.

– Vi, eble, opinios min sovaĝulo, – diris mi, – sed mi konfesu: ĉio, kion vi diras, ŝajnas al mi fantazio. Tio estas simple nekredebla!

– Kvazaŭ mi rakontas fabelojn, ĉu? – ridetis la luzano. Li ekstaris, aliris al la muro, malŝlosis gardoŝrankon kaj prenis el tie ordinaran grizan ŝtoneton. – Tio estas ne lertonizita kaj ne sintezita, – diris li kun mistera vizaĝesprimo. – Tio estas aŭtentika, natura sabloŝtono... Kaj kio? Mi petas vin pensi: ĉu ĝi estas konstruita «simple»?

– Nu, el atomoj, el kombinaĵoj de silicio...

– Tio estas facile direbla! Sed vi ja estas klera homo, vi scias, ke tio estas miliardoj kaj trilionoj da atomoj; sian makroskopian formon – ĝuste tiun ĉi – ili konservas nur pro senlaca revoluo de elektronaj ŝeloj, stabiligataj de barieroj de nukleaj potencialoj, kaj ankaŭ pro tio, ke 8000 specoj de virtualaj kvazaŭpartikloj retenas de disfalo la pseŭdokristalan kradon kun ties anomalioj, tipaj por sabloŝtono, kaj tiel plu. Se vi ien ĵetos tiun ŝtoneton, tiam ĝiaj atomoj, ĝiaj fortokampoj, ĝiaj elektronoj, estante en konstanta moviĝo, retenados la senŝanĝan formon de la firma mineralo dum milionoj da jaroj; kaj ajna natura objekto estas rezulto de sennombra aro

da tiaj procezoj... Kaj ni ellernis fari siamaniere ion, ne malpli kaj ne pli, sed nur iomete alie komplikan... La limo, kiun faris la Naturo inter detrueblaj kaj nedetrueblaj teĥnologioj, iras iomete pli alte ol la atoma nivelo. Tial necesis subiĝi – laŭ la ampleksa skalo – al la partikloj, el kiuj la Naturo konstruas la atomojn, kaj el tiuj subatomaj elementoj konstrui tion, kion bezonas ni. Kompreneble, ĉio ĉi estas nur ĝeneralaj indikoj, sed ne teĥnologia recepto... Ni produktas solidajn korpojn kun ajnaj necesaj por ni ecoj... kaj ilian sorton regas lertonoj, al kiuj ni taskis la regadon.

– Do, ĉu vere ĉe vi najloj estas racihavaj? Kaj ŝtonoj, kaj akvo, kaj sablo, kaj aero?

– Nu, ne tute racihavaj... Racio subkomprenas universalecon kaj kapablon ŝanĝi programon de agado, kaj tion la lertonoj ne povas. Ili estas pli ĝuste io simila al ege akraj sendormaj instinktoj, enkonstruitaj en la medion. En ordinara lertona sistemo estas ne pli da racio, ol, ekzemple, en mandibloj aŭ kruro de insekto.

– Ni supozu, – diris mi, – sed ni revenu ankoraŭfoje al la etikosfero... ĉu? Mi ne scias, kiel eblas teksu ŝtofon el lertonizitaj fibroj, sed ni supozu, ke mi scias. Kio plu? Eblas kudri el tiu teksaĵo kostumon: mi konsentas. Sed kiel okazas, ke en tiu kostumo ne eblas bati la dentojn de proksimulo?

Li levetis la brovojn:

– Vin tio iomete incitas, ĉu? Tio estas ordinara interna rezisto kaj eĉ ŝoko, tute komprenebla ĉe kunpuŝiĝo kun teĥnologio de alia stadio de civilizo. Ne, la afero estas ne en lertonoj, entenataj en la teksaĵo. Ja via vesto komence ne estis lertonizita – lertonoj sedimentiĝis sur ĝi poste, tio postulas certan tempon, ĝuste tial vin opiniis potenciala predo, alloga viktimo tiuj – niaj tiel nomataj ekstremistoj... Ja ili, klare, ricevis iomajn informojn pri nia civilizo, almenaŭ en lernejo. Ajna viva estaĵo kvazaŭ altiras lertonojn. Lertonoj kreas ĉirkaŭ ĝi nevideblan nubon. Ĝi neniel influas ordinaran vivagadon. Ĝi estas tute nesentebla. Tiu nubeto ellernas tipajn reagojn de certa persono; tio necesas tial, ke stato de preteco

al agreso ĉe malsamaj personoj manifestiĝas malsame. Kion do diri pri reprezentantoj de alia raciĥava specio, tia, kiel la homo! Niaj lertonoj komence ne sciis, kio kaj kiel minacas al vi. Se sur via loko estus ordinara luzano, oni ne sukcesus lin enĉenigi, se li ne dezirus tion mem. Unuvorte, la etikosfero en ĉiu konkreta okazo ne posedas momentan kaj absolutan efikecon dekomence, sed ĝi ekposedas tiun post tempo. Krome, lertonoj estas malsame specialigitaj – kiel... ni diru, kiel virusoj, tamen tio estas virusoj de bono. Se al vi oni donus iun neordinare raran venenon, kiun viaj personaj lertonoj ne sukcesus rekoni ĝustatempe, do la unuaj simptomoj de veneniĝo iĝus alarmaj signaloj. Laŭ tiu signalo flugantaj grupoj de lertonoj kuniĝas en pli grandajn formitaĵojn, cetere kun rapido de lumo – aŭ de radiondoj, – kaj por helpo estas vokataj lertonoj, kapablaj efiki kiel kontraŭveneno. Ili ne nepre penetras en vin materie. Ili nur fore reguligas konduton de aliaj lertonoj de via medio, kaj tiuj jam sub tiu diktado povas, ekzemple, dum kelkaj sekundoj malbloki en la ĉeloj venenitajn spirajn enzimojn. Vi por nelonge perdos konscion kaj rekonsciiĝos iom malforta. Jen ĉio. Kiel vi jam, verŝajne, divenas, ni ne bezonas postan medicinon, kiu plu dominas sur la Tero; nia medicino estas anticipa: ajna organismo estas sub senlaca prizorgado...

– Ĉu lertonoj okupiĝas pri profilaktiko?

– Certe.

– Do, ili komprenas ĉiujn fakojn de medicino? Sed tio subkomprenas altan gradon de universaleco...

– Ne. Mi petas min pardoni, sed vi plu pensas per kategorioj de via tempo, de via nivelo de scioj, kaj tio nenion donas. Mi demandas – ne por ofendi vin, sed por pli bone klarigi al vi: ĉu povus eĉ la plej saĝa terano de antikva tempo kompreni, kiel funkcias radio aŭ ŝaka komputilo? Ja por tio necesas almenaŭ ion scii pri elektro, pri elektromagnetaj osciloj, pri ties modulado, entropio, informo...

– Tamen nek radio, nek komputilo estas absolute fidindaj, – insistis mi. – Do kion vi faris, ke egaliĝis kun Sinjoro Dio?..

Li subridis:

– Sinjoro Dio ne kreis la mondon el tiel absolute fidinda materialo, kiel ŝajnis antaŭe. Materio eblas neniigi. Materio, se premi ĝin pli forte, iĝas nesenpanea kaj povas simple malaperi – ekzemple, en gravitaj brakumoj de kolapsanta stelo, – kaj tiam de ĝi, super la nigra, senfunda kavo, nenio restos, krom gravito, ĉu ne? Tie, en la nigraj truoj, kie materio ellasas sian gravitan spiriton, estas la limo de ĝia fidindeco. Kaj, kompreneble, la limo de fidindeco de ĉiaj teĥnologioj. Sed por ĉiu tago niaj atomoj estas ne pli malbonaj, ol tiuj de Dio. Ni subrigardis la Naturon sur la necesa nivelo de ĝia strukturo. Jen ĉio. Atomo de hidrogeno ne povas panei tiel, ke ĝi ne estu kapabla kuniĝi kun atomoj de oksigeno al H<sub>2</sub>O. Kaj tute same ne «paneas» la lertonj.

– Bone, – diris mi, sentante, ke mi transiras al retreto, – sed ĉu signifas tio, ke mia vesto observas min? Aŭ ke la manikoj gvas sian mastron?

– Vidu, – respondis Tahalat, – vi, mem ne sciante tion, ripetas argumentojn de nia opozicio. Kravatoj-agentoj, ĉemizoj-denuncistoj, manikoj-spionoj. Ho Dio, repreziaj kalsonoj! Ja estas nenio simila, kedu min. En humida grundo grajno ĝermas. Ĉu ĝi observas temperaturon? Ĉu nefideme taksas perspektivojn de kresko? Meditas pri vetero, antaŭ ol faros gravan decidon ekĝermi? La lertonj kondutas tute same. La leĝoj de la Naturo estas antaŭ ĉio malpermesoj: oni ne povas ricevi energion el nenio; oni ne povas superi la lumrapidon kaj tiel plu. Ni enmuntis en la ĉirkaŭantan nin Naturon ankoraŭ unu malpermeson – defendantan la vivon. Kaj nenion pli. Ĉio cetera estas paranoja deliro, persekutmanio, komprenebla tiomgrade, kiomgrade en la antaŭlertona epoko oni trovadis racion en ĉio, kio almenaŭ en iu rilato kondukis kiel racia Estaĵo. El la samo fontis stranga mikso de nocioj kaj timoj pri prakomputiloj. Ke ili kvazaŭe povas ekribeli kontraŭ la socio. Fabeloj! Sed ĉi tie, – li signis rondon, – nenie estas persona racio. Estas nur

lertonizitaj fenestroj, mebloj, muroj, kurtenoj, aero – ĉio ĉi, kompreneble, estas pli komplika, ol kontraŭincendiaj indikiloj, sed tute same estas destinita por strikte limigitaj celoj.

– Sed kiel ili distingas ludon disde vera batalo? Amikan premon disde sufoka? Almenaŭ en sporto. Aŭ ĉu vi ne konas sporton?

– Ne, certe ni konas. Vi deziras scii, sur kio baziĝas la scipovo de la lertonoj rekoni? Do, mi respondu. Tia scipovo estas vere necesa. Socio, ekposedanta fortojn de la Naturo, emas al fortaj kataklismoj. Dezirata bonfarto kaŭzas nedeziratajn konsekvencojn. Novaj teĥnologioj malkovras antaŭ perfortemuloj novajn eblojn kaj perspektivojn. Ekŝajnas, ke ju pli granda estas potenco super la Naturo, des pli granda estas demoralizo de la socio. Kaj tio estas vero – ĝis certa limo. Tio sekvas el sinsekvo mem de malkovroj. Estas pli facile preni de la Naturo ĝian detruan povon, ol ĝian bonvolon, kaj ĝuste la detrua potencialo iĝas dezirata celo. Tia estas nova historia danĝero. Eĉ pli: logikaj konsekvencoj de teĥnologioj subfosas ilian fundamenton; vi tion konas laŭ ekzemplo de agonio de la natura medio. Poste – sed tion vi ankoraŭ ne konas – aperas ekokancero. Io simila al degenero de grandaj aŭtomatigitaj kaj komputilizitaj sistemoj. La nova, absorbanta celo – ĉiam pli granda grado de ekposedo de la mondo – kvazaŭ iĝas substituata de la diablo. Malnovaj fontoj de bonoj sekiĝas pli frue, ol malkovriĝas novaj, kaj plua progreso pendas super abismo. Ordo, atingata per teĥnologio, kreas pli da ĥaoso, ol ĝi kapablas digesti! Por superi ĉiujn ĉi barojn ([kies fonto estas en nefidindeco de la teĥniko kaj en la homa naturo, kiu same estas nesenpanea, ĉar ĝi estis formita en aliaj kondiĉoj, en alia mondo](#)), necesas grimpi sur novan, pli altan nivelon de teĥnoevoluo, ŝteli de la Naturo la trezoron, akiri kiun estas plej malfacile, – tiun, kaŝitan en la subatomaj fenomenoj. Ĉe ni por tio servas sintezo de novaj solidaj korpoj kaj novaj metodoj de ilia regado, tio estas la lertonoj. Tiaj estas la du fundamentoj de nia civilizo. Ilia simbiozon ni nomas etikosfero. Lavanga kresko de scioj minacas fari la sciencon kaĉo de sennombraj fakoj, kaj tiam laŭ konata aforismo eksperto scios ĉion pri nenio! Tion oni ne rajtas permesi. La sava turno iĝas kreo de tutmonda sistemo de scioj,

atingeblaj sen ajnaj limigoj, – sed jam ne por vivaj estaĵoj. Neniu el ili sukcesos regi tiun grandegaĵon. Ajna el apartaj polvoj, kiaj estas lertonoj, tute ne estas universala, tamen universalaj estas ili ĉiuj kune. Kaj tiun ilian universalecon ĉe neceso povas uzi ĉiu, kiel mi penis montri al vi per la ekzemplo de rara veneniĝo. Bonvolu noti, ke la tuta nevidebla nubeto de lertonoj, kiuj vin prizorgas, mem scipovas ne tro multe – kaj samtempe ĉion, al kio kapablas tuta nia etikosfero, se ĝi povas dum iaj sekundoj atingi ajnan informon, entenatan en la tutmonda sistemo. Tiun povon eblas voki al helpo en ĉiu minuto, kiel ĝinon el fabelo. Sed tio estas permesita nur al lertonoj! Neniu povas fari tion mem, senpere, kaj sekve, uzi la nevideblan koloson de la etikosfero kontraŭ iu ajn...

– Kaj ĉu oni ne povas trompi lertonojn? – demandis mi. – Ĉu tute? Ial mi ne emas kredi...

Li ekridis, sed iel negaje.

– Ja vi konvinkiĝis per vi mem. Viaj ŝtelintoj tion sukcesis – parte kaj por nelonge – nur tial, ke vi ankoraŭ estis estaĵo nekonata al la etikosfero.

– Sed ja listo de ĉiuj penseblaj pravigoj de krimoj estas senfina... Malbonon eblas fari ne rekte, sed per miloj da ĉirkaŭiraj manieroj...

– Sendube. Sed mi ja ne diras, ke Luzanio estas realigita paradizo...

Mi subite ekrigardis al li, absorbita de nova ideo:

– Ŝajne, mi scias, kiel superruzi lertonojn...

– Ĉu mi povas ekscii, kiel?

– Miaj ŝtelintoj ĝuste tion penis fari. Nun mi komprenis! Ili penis ŝanĝi kvalifikon de sia ago...

Li ekrigardis al mi kun maltrankvila scivolemo:

– Kion vi volas diri?

– Nun mi pensas, ke ili penis transformi ekzekuton en oferon... Kvazaŭ sanktigi ĝin. Por ke murdo iĝu io alta kaj nobla. Kiel helpo. Kiel savo. Oni devis oferi min al io pli valora, ol la vivo.

– Al kio do? – demandis li kun malkaŝa ironio.

– Ĝuste tio restis sufiĉe malklara. Ili ŝajnis certaj pri si, ĝis komencis la aferon... Kvazaŭ ili ĉiuj kune faris elanon, penante transsalti barieron, – kaj ne povis...

– Ĉar ilia kredo estas malvera! – interrompis li min. – Ili deziris kredi sian mision, sed ne sukcesis. Ne eblas kredi nur tial, ke vi tion deziras!

– Tamen al aliaj povas fortune pli, – grumblis mi. – Ne al buĉistoj, kompreneble. Sed povas esti homoj, vere konvinkitaj, ke, farante murdon, ili faras bonon. Kiel en la mezepoko, kiam oni forbruligadis la korpon, por savi la animon. Unuvorte, trompo jam ne estos trompo, se la kredo iĝos vera...

– La mezepokon ne eblas renaski per sola deziro, eĉ plej pasia, – kontraŭis Tahalat. – Mi diros al vi pli: furiozeco de tiaj penoj malkovras ilian kaŝkaŭzon – en ĝi ne estas eĉ grajno da sankteco! Per falsa rito de oferado estas pli facile trompi homojn, ol lertonojn...

– Tio estas ĝuste tio, kion ne sonĝis niaj saĝuloj, – rimarkis mi. – Logika poleno, distinganta kredon disde nekredo. Sed kiel?

– Tio nur ŝajnas nekomprenebla enigmo. Lertonoj tute ne taksas sincerecon de kredo. Ili simple reagas al simptomoj de agreso kaj ne agas, se tiuj ne estas. Ne ĉiu kredo ekskludas agresemon. Kio povas estas pli agresema, ol fanatikeco? Tial ĝi ne dormigos ilian atenton. Agresemon ekskludas strebo al bono, sed ĝi, siavice, ekskludas murdon. Certe, ne ĉiam estis tiel, sen en la pasinteco ne eblas reveni.

– Mi ne ĵurus! – kontraŭis mi. – Speciale kiam jam estas konata la necesa formulo: fiksitaĵ en la strukturo de materio ordonoj perdas forton, se la murdanto kredas je bono de sia ago. Krome, kredo kaj nekredo ne estas reciproke ekskluzivaj logikaj kategorioj. Oni povas kredi parte, de tempo al tempo, pli forte, malpli forte... kaj ie sur tiu vojo finfine transsalti la lertonan barieron...

La luzano ĵetis mornan rigardon al mi:

– Vere, tia sojlo ekzistas. Mi ne trompu vin. Sed ĝi estas pli alta, ol vi opinias. Multe pli alta. Tial oni sturmas ĝin vane...

Divenante, ke mi laciĝis – la konversacio daŭris preskaŭ tri horojn, – la direktoro jam ne insistis pri vizito de laboratorioj. Reen min akompanis lia silentema asistanto. Kiam ni ŝvebis super la urbo, mian atenton altiris granda makulo de verdaĵo, borderita per helmoj de brilantaj turoj; eksciinte, ke tio estas urba parko, mi petis veturigi min tien.

Dum ioma tempo mi vagadis sur aleoj, apenaŭ rimarkante ilin – el mia kapo ne povis foriri la interparolo kun Tahalat, – kaj finfine mi eksidis sur benkon; apude en sablokesto ludis infanoj. La benko estis ne tute ordinara, kun niĉoj por kruroj, kiujn la entianoj, eksidante, submetas sub sin. Sed la infanoj el malproksime aspektis tute kiel niaj, ili eĉ havis siteletojn, por fari kukojn el sablo. Kukojn estis faranta nur unu eta, eble trijaraĝa, knabino, sidanta kaŭre aparte de ĉiuj. La ceteraj ludis alie. Ili ĵetadis manplenojn da sablo, penante trafi en la okulojn de aliulo, kaj ridegis, kiam la sablo, reflektita per nevidebla blovo, ĉirkaŭŝutadis la ĵetinton mem.

El trans heĝo eliris etulo – ne pli aĝa, ol la ceteraj, – kaj ion ekparolis. Lin oni ne aŭskultis, tiam li komencis mokimiti la ludantojn, ĉiam pli krude, ĝis tute furiozigis ilin. Ili ĵetis sin al la arogantulo, sed, kvankam ili estis pli altaj kaj iris triope kontraŭ unu, li tute ne ektimis, kaj ne mirinde: la atakantoj nenion povis fari al li. Mi ne scias, kio rebatis iliajn batojn, sed tiu knabo, la malplej alta, trankvile staris inter la ofensivantaj al li, jam serioze koleraĵ infanoj; finfine ĉiuj kune ili renversis lin kaj komencis salti sur li. Sed la knabeto, ŝajne, iĝis

glita, kiel glacio; vane penis ili teni unu la alian por ne fali, aŭ salti post elano. La infanaj krioj ĉesis; la infanoj silente komencis senvestiĝi, por venki la ofendinton nudaj. Du infanoj tenis lin, kaj la tria, farinte el laĉo maŝon, ĵetis ĝin sur la kolon de la viktimo kaj streĉis. Mi nevole ĵetiĝis, sed ne sukcesis ekstari, kiam la laĉo krevis. Tiam tiuj etuloj iĝis vere frenezaj. Komenciĝis tia tumulto, ke en la sablokesto leviĝis polva nuboj. El ĝi ĉiuminute iu aperadis, por levi kuŝantajn apude fosileton aŭ rastileton, kaj kun levita mano ĵetadis sin al la neatingebla malamiko. Furiozo de la infanoj estis iĝanta malespero. Unu post la alia, forĵetante siajn ludajn instrumentojn, ili eliris el la sablokesto kaj eksidis sur gazono malproksime unu de la alia, malleviste la kapojn. La etuloj ekstaris, li ĵetadis al ili sablon, aliradis proksime, ridis pri ili – finfine unu el ili ekploris, ŝiris sian kostumeton kaj forkuris. La nerealiĝinta viktimo forpaŝis en alia direkto. La ceteraj longe kolektadis siajn aĵojn, poste ekkaŭris en la sablokesto kaj ion tie desegnadis. Finfine ankaŭ ili foriris. Mi ekstaris kaj trans la kapo de la knabineto, kiu plu senpasie renversadis siajn kuketojn, ĵetis rigardon al la desegnaĵo, lasita de la infanoj: mallerta konturo de figuro, distranĉita laŭlonge kaj transverse per profundaj batoj de fosileto.

# La ektoko

La vojo al la plej grandaj malkovroj iras tra absurdo. Kiel oni scias, la sola metodo ne maljuniĝi estas morti; per tia konkludo ordinare finiĝas serĉoj de eterna juneco. Por entianoj tiu fino iĝis komenco de senmorteco. Hieraŭ mi vidis filozofon, kiu maljuniĝos neniam, ĉar li jam dum tricent jaroj estas kadavro. Kaj mi ne nur vidis, sed eĉ konversaciis kun li dum pli ol horo. Kun li mem, ne kun lia maŝina kopio aŭ ia alia sozio. Tio estis Aniks, kiu antaŭ tricent sesdek jaroj ricevis de la lasta el Ksiksar-oj titolon de Krona Saĝulo, kaj sekve, memoras ankoraŭ la tempojn de la imperio. Sur Diĥtonio mi aŭdis iam pruvon de neatingebleco de eterna vivo sen grandegaj prizorgantaj maŝinoj kaj vidis tiujn maŝinojn, ampleksan aparataron, en kies sino la senmortigato trenas sian vivon de vera paralizulo. Diĥtoniano Berdegar pruvis, ke ĝuste tiom da aparataro necesas, por enmetadi reen en la organismon la informon, perdatan dum maljuniĝado. Entianoj evidentiĝis pli inĝeniaj, ol diĥtonianoj. Ili ne malkonfirmis la pruvojn de Berdegar, ja tio estas neebla. Ili agis alie: faris ĉirkaŭiran manovron kaj atingis senmortecon per morto.

Mi devas klarigi tion pli detale. La tasko ŝajnas absurda: tiun, kiu deziras ekzisti eterne, oni devas mortigi. La tuta afero estas en tio, kiel okazas tiu mortigo. En la organismon oni enkondukas lertonojn, programitajn tiel, ke ili penetras en ĉiujn histojn, irante laŭ la molekulaj procezoj de la vivo. Tiuj lertonoj estas konstruitaj el subatomaj partikloj, do ili estas malpli grandaj ol la plej malgrandaj virusoj. Ili ne estas observeblaj eĉ ĉe plej forta pligrandigo. Iom post iom ili «algluiĝas» al ĉelnukleoj kaj plenigas ilin. Ili estas tiel malgrandaj, ke la organismo ne rimarkas ilin kaj ne ŝaltas sian sistemon de defendo. En la komenca stadio de ektokigo tiuj lertonoj ankoraŭ ne laboras, sed nur lernas sian estontan laboron, kvazaŭ legante ĉiujn informajn fenomenojn, el kiuj konsistas la vivo. Ili ne malutilas la histojn, restante ties pasivaj ombroj, – kvazaŭ spektanto, kiu memvole eliris sur la scenejon kaj kopias ĉiujn moviĝojn de pantomimo. Aspekto en la organismo nenio ŝanĝiĝas,

ĝis la saturiĝintaj per informo lertonoj komencas preni al si funkciojn de vivaj eroj de la protoplasmo. Energion, necesan por tio, ili ĉerpas el atomnukleaj reakcioj, nomataj kvietaj. Tamen tiuj reakcioj poiomete mortigas la organismon.

La ektokigato tion ne sentas. Li moviĝas, pensas kaj agas same kiel antaŭe, li povas manĝi kaj trinki, sed post ioma tempo, mezurata per jaroj, li jam ne bezonas nutron. Lia korpo iom post iom mortas; sedimentiĝintaj en ĝi trilionoj da lertonoj organiziĝis en nevideblan subatoman skeleton, kiu tute ne bezonas interŝanĝon per viva materio. Ĝuste tio estas ektoko, alivorte kadavro, malkomponiĝanta tute nerimarkeble, paŝon post paŝo. Lia antaŭa karno iom post iom malaperas kune kun elĵetaĵoj de la organismo, sed li pri tio ne scias, ĉar, foririnte el la vivo, li plu ekzistas. Kvazaŭ se malnovan vaporan maŝinon de Watt funkciigus elektromotoreto, kaŝita en la ŝafto de la inercirado, tiel ke krankojn kaj piŝtojn movas jam ne vaporo, sed elektra energio. Tia maŝino estos nur funkcianta maketo – kaj la samon eblas diri pri la korpo de ektoko. La entian terminon ni tradukas al la helena: «ektos» signifas «ekstera», ja senmorteco ĉi tie venas el ekstere. Specialistoj nomas substituitan korpon pseŭdomorfozo: la malvivaj logikaj sistemoj, lertonoj, anstataŭas la vivan protoplasmon. La organismo, remburita interne, kiel ĉifonfiguro, konservas sian aspekton, formon kaj funkcion, tamen – jen vere kruela ironio! – la surogata materialo estas pli longviva kaj efika, ol la natura. Dum ioma tempo ambaŭ sistemoj – la organika kaj la lertona – agas paralele, sed la malviva iom post iom neniigas la vivan, kaj la ĉefa problemo de ektoteĥniko estis sukcesa sinkronigo de la rampanta morto kaj de la same rampanta pseŭdomorfozigo. Tio, kaj nur tio, ŝajnis komence nerealigebla. Por sukceso oni devis pagi per hekatomboj da laboratoriaj animaloj. Kiam metabolo komencas ŝiriĝi, kiel putriĝinta tolo, ĉiujn funkciojn de la viva materio jam sukcesis preni al si la lertonizita portanto, kaj la korpo kun flagretantaj en ĝi restaĵoj de vivo nun estas ne pli ol malplena ŝelo, preskaŭ tute seninternaĵa pupo, postiĉo, sub kiu sensone pulsas la energia skeleto de lertonoj.

La ektokigato ne povas juniĝi: ja lertonoj ricevas de la korpo nur tiun informon, kiu estis en ĝi en la momento de ilia invado. Oni devas vivi la pseŭdovivon en la aĝo, en kiu estis lertonizita la korpo. Tial la plej bonajn rezultojn donas ektokigo en juneco. Cent jarojn post ĝia komenco la homo estas biologie mortinta. En lia organismo jam ne estas eĉ spuro de muskoloj aŭ nervoj. Restis iliaj senriproĉaj anstataŭaĵoj, kaj ili mem estis plene pseŭdomorfozigitaj – substituitaj de lertonoj, iĝinte nutra substrato de senmorteco. Do oni devas vere morti, por ĝin ricevi. Post proksimume ducent jaroj iomete ŝanĝiĝas la ekstera aspekto, sed, kiel oni asertas, rimarki tion kapablas nur specialisto. Nun jam nenio restis de aŭtonomio de la vivaj procezoj. Ĉiuj organoj de la korpo funkcias kiel la vapora maŝino, nerimarkeble movata de elektro, do, substituita. La okuloj povas provizore malklariĝi: ĉi tie la pseŭdomorfoza sinkronigo fojfoje misas, sed ankaŭ ili baldaŭ ricevas firman diafanecon de vitro. La haŭto iom post iom malheliĝas, ĉar lertonoj en procezo de nukleaj transformoj eligas jonojn de pezaj metaloj. Tiu metala brileto aperas post ĉirkaŭ tricent jaroj. Oni opinias, ke neniam aliaj flankaj efikoj ekzistas dum almenaŭ kvin mil jaroj. La sango plu fluas en la vejnoj, sed tio estas nur senutila ruĝa likvaĵo, kiu ne portas en si oksigenon, – io simila al kutima dekoracio. Se la koro haltus (kvankam halti ĝi ne povas, same kiel substituita vapormaŝino), ektoko plu pensus kaj moviĝus, ja lia koro estas imitaĵo. Ĝi, tamen, devas funkcii plu: sento de obtuza silento kaj vakuo en la brusto povus kaŭzi maltrankvilon. Do, ĉiuj signoj de la vivo konserviĝas plene – krom ĝi mem. Biologie tio estas kadavro, kiu ĝuste tial timas nek vakuon, nek malsanigajn bakteriojn, nek mortigan malvarmegon. Lertonoj en procezoj de nukleaj transformoj eligas varmon, dozatan tiel, ke temperaturo de la korpo de ektoko ne diferencu de la temperaturo de viva korpo. Sed la aspekto konserviĝas nur tiom, kiom tio necesas por normala farto. La internaĵo de la ektoka kranio estas malvarma, ĉar la lertonizita cerbo pli bone funkcias ĉe malaltaj temperaturoj.

Kiam komenciĝis amasa ektokigado, esploristoj konstatis ĝian egan fiziologian fidindecon kaj samtempe – danĝerajn psikajn konsekvencojn en formo de ĉiaspecaj neŭrozoj kaj eĉ frenezo, ĉar oni ne povas devigi senmortigitojn forgesi pri la prezo, kiun ili devis

pagi. Ektoko ne kapablas reproduktiĝi. Kiu scias, eble, ankaŭ tion oni sukcesus atingi, sed por kio serĉi teĥnikajn solvojn, se malvivuloj tute gale genus malvivulojn. Ektoko per nenio aŭ preskaŭ per nenio diferencas de vivulo, sed li scias, ke li estas malviva. Li spiras, sed liaj pulmoj ŝvelas kiel senutila balgo. Dormon li same ne bezonas. Li pensas pli rapide kaj pli bone ol tiuj, kiuj havas varman, provizatan de sango cerbon. En spirita senco li restas la sama estaĵo, kiel antaŭe: la cerbaj strukturoj, kreantaj personecon, ne nur ne ŝanĝiĝis, sed eĉ plifirmiĝis. Ne vivante, li povas nek maljuniĝi, nek morti. Li ne malsanas kaj ne sentas doloron. Oni ne povas nomi lin androido aŭ roboto, ja li ĝis la lasta osto, ĝis la lasta ĉelo estas sama, kiel antaŭ la ektokigo. Tio, ke li ne estas sama, estas trovebla nur per biopsio kaj elektrona mikroskopo, en kiu videblas la plej subtila atoma strukturo de lia organismo. Temas, sekve, pri falsaĵo, kiu estas en multaj rilatoj pli perfekta, ol la originalo, ĉar ĝi estas pli fidinda kaj longviva, ol tiu. Tiela estis ĉe la aŭroro de la lertona epoko ties grandega triumfo. Dekoj da miloj soifis tiun senmortecon, – sed evidentiĝis, ke ili ne povas elteni ĝin. Kiel rimarkis Irrks, unu el la kreintoj de ektoteĥniko, necesis, verŝajne, naskiĝi malviva, por «elteni» esti ektoko. (Kvankam ektologoj opiniis, – kiel evidentiĝis, erare, – ke psikologiaj malfacilaĵoj de ektokigo mildiĝas pro tio, ke la ektokigato mortas ne en unu momento, sed dum longaj jaroj, iom post iom, rimarkeble nek por si mem, nek por la ĉirkaŭantoj). Tio estis fino de la entiaj revoj pri senmorteco. Nenia alia metodo, oni klarigis al mi, povas egali ektoteĥnikon – neniu donas tiom evidentan kaj senduban garantion de eterna ekzistado. Tiu, kiun oni revivigis el cindro, estos jam alia estaĵo, eble, simila al la mortinto kiel du akvogutoj inter si, sed tamen iu alia – kiel sozio. Ĉar ĉe la limo inter morto kaj reviviĝo aperas ekzistadaj paradoksoj, kiujn ne eblas superi, tio estas solvi: KIU, propre, malfermas la okulojn kiel revivigito – ĉu TIU SAMA aŭ nur TIA SAMA homo. Male, ektoteĥniko, estante malrapidema metodo, garantias kontinuecon de ekzistado per evidenta maniero. Tio, ke neniu kapablas elteni konsekvencojn de la tiom elstara atingo, estas tute alia afero – kaj teĥnika perfekteco ne kapablas helpi en tio.

«Malakcepto de senmorteco» okazas diverse, sed la ĉefaj simptomoj estas similaj: abomeno al la propra korpo, faŭkanta spirita vakuo, timo kaj malespero, kreskanta al manio de sinmortigo. Aldonendas ankaŭ, ke la socio ne plifaciligadis la vivon de la ektokigitoj, montrante en rilatoj kun ili siaspecan malestimon, miksitan kun envio. Pri tio, kial nur sola Aniks, eksa imperiestra filozofo, ne rezignis tian ekziston, mi aŭdis multajn kontraŭdirajn versiojn. Kvazaŭe li mem foje nomis sin eterna atestanto de la pasanta mondo, sed tio, ŝajne, estas nur unu el la duonlegendaj historioj, ligitaj kun lia nomo. Sciencajn okupiĝojn li forlasis antaŭ pli ol cent jaroj. Kaj li neniun akceptas: jam neniun el liaj disĉiploj estas viva. Oni diras, necesas mem iĝi ektoko, por senti guston kaj pezon de tia ekzisto. La luzanaj historiistoj per ĉiuj fortoj penas ĉirkaŭiri la ektoteĥnikan stadion de sia civilizo. Ŝajnas, por ili tio estas epizodo same ĝena kaj prisilentata pro samaj konsideroj, kiel la pereco de Klivio. Kvazaŭ se kaj tie kaj ĉi okazis io, ĉiurilate hontinda, jam ne korektebla, nek forstrekebla el la memoro.

Aniks loĝas en negranda unuetaĝa eksterurba domo kun ĝardeno, kovriĝinta per trudherbo kaj kampaj floroj. Li mem deziris renkontiĝon kun mi, kaj tio estis, kiel oni certigis min, rara distingo. En la junaj jaroj, tio estas ankoraŭ en la epoko de la imperio, li publikigis sian ĉefan verkon, aperintan sub influo de la Instruo pri Tri Mondo, tiu fundamento de la entia penso. En lia trakto la Instruo estis reduktita. Aniks venis al konkludo, ke eblas nur du specoj de mondoj. Mondo aŭ estas lojala al siaj loĝantoj, aŭ mallojala. Lojala mondo estas mondo, en kiu ne ekzistas nepercepteblaj ecoj kaj neatingeblaj lokoj. Tio estas mondo sen nesolveblaj enigmoj kaj eternaj misteroj, mondo, absolute travidebla por ekkonanta racio. Kaj mallojalan mondon ekkoni ĝisfine ne eblas. Ĝi estas neperceptebla kaj neelĉerpebla. Ĝuste tia estas nia mondo. Aniks komparis ĝin en sia ĉefa verko kun puto, kies amplekso estas limigita kaj finhava, sed el kiu eblas ĉerpi akvon senfine. La Universo estas ĝuste tia: finhava kaj neelĉerpebla. Post ducent jaroj, jam estante ektoko, li enkondukis en sian instruon korekton, unuavide negrandan. Li konservis la antaŭan klasifikon de mondoj, tamen agnoskis, ke nur mondon, kiun li antaŭe nomis mallojala, oni povas opinii favora. Nur

tia mondo eterne defias la racion, kaj la racio pli ŝatas vojon, ol la vojfinon, ekkonon – pli, ol la finan formulon, kaj la fina venko por ĝi signifus finan malvenkon. Kion farus la racio, ekkoninta «ĉion»? Tial Aniks ŝanĝis la signumon de lojaleco kaj mallojaleco en sia tipologio de mondoj. Jen kion mi sciis, kiam mi transpaŝis la sojlon de lia domo.

Kikeriks, mia akompananto, en la domon ne eniris. Eble, Aniks deziris renkontiĝon malpublikan, mi ne scias. Mi pri tio ne demandis. Li sidis sur ligna verando, en radioj de la suno, neordinare hela por la nordaj regionoj de Luzanio, kaj rigardis, kiel mi iras al li inter altaj vicoj de arbustoj, kovritaj per lanugo de jam velkantaj floroj. Li sidis ĉe malalta ligna tablo, sur tia stranga por miaj okuloj seĝo, konstruita tiel, ke oni povu submeti sub sin la kruojn laŭ la entia maniero, kaj similis pli al giganta grandkapa bufo, ol al kalva birdo. Lia vizaĝo, firma, reliefa, grandega, kun larĝe sidantaj okuloj kaj naztruoj, havis koloron de mahagono kun malbrile blua nuanco. Sub lia blanka mantilo, aŭ, eble, monaĥa froko estis divenebla potenca skeleto; siajn grandajn malhelajn manojn li metis sur la tablon kaj rigardis al mi senmove, ne palpebrumante per siaj okuloj, flavaj, kiel ĉe kolera kato. Ekvidinte lin, mi tuj ekkredis, ke li aĝas preskaŭ kvarcent jarojn. Kvankam mi ne rimarkis ĉe li eĉ unu falton, kaj lia voĉo sonis forte, estis en li io terurante maljuna. Ne laco, pli verŝajne pacienco – pacienco ne de homo, sed de ŝtono. Aŭ, eble, indiferenteco. Kvazaŭ li jam ĉion vidis kaj nenio povis mirigi lin, nek interesi.

– Saluton, veninto el la Tero, – diris li, kiam mi surpaŝis sur knarantajn lignajn ŝtupojn de la verando. – Mi aŭdis pri ĝi antaŭlonge. Eksidu. Mi havas tabureton por homoj...

Kaj vere, la tabureto, kiun li almontris por mi, estis de la tera speco. Mi eksidis, ne sciante, kion mi diru. Oni min certigis, ke li foriris el la vivo, sed, eble, tio estas nur terminologia demando?

– Vi similas al ni, – diris li. – Vi iras laŭ la sama vojo, kiel ni, kaj, verŝajne, venos samtien.

Li rigardis en la ĝardenon. La suno lumis rekte al liaj grandaj flavaj pupiloj, sed, ŝajne, ne estis blindiganta lin. Tra la blanketa lanugo sur la kapo videblis la haŭto, malhela ĝis blueco.

– Unue mi respondos la demandon, kiun vi deziras fari al mi. Kial neniŭ kuraĝas al ektokigo? Jen la respondo. Tial, ke mortemuloj ne bezonas senmortecon. Ekzistado, purigita de ĉiuj danĝeroj, perdas ajnan valoron. Kutime oni nomas tion morta enuo. Ĉi-okaze la sobra prudento trafis ĝuste.

– Kaj vi? – demandis mi mallaŭte.

– Mi ne enuas, – respondis li, plu rigardante en la ĝardenon preter mia vizaĝo. – Pri kio vi ankoraŭ deziras demandi min?

– Pri Nigra Klivio. Vi devas ĝin memori.

– Mi memoras.

– Kio estis Ka-Undrio?

Li turnis al mi sian grandan kapon sur la ĝibetaj ŝultroj.

– Do, ankaŭ vi serĉas misteron en ĝi? Mi devas vin elrevigi. Sur ajna loĝata planedo aperas multaj kulturoj, kaj venkas tiu, kiu la unua ekposedas materian povon kaj universalan ideon. Nur sola povo aŭ nur sola ideo ne sufiĉas. Ili devas aperi kune, kiel du aspektoj de la samo. Tiurilate la Tero ne diferencas de Entio. La venkinta ideo pri sia sukceso ŝuldas ne al militaj konkeroj, sed al bonoj, kiujn ĝi promesas. Sed eĉ plenumitaj promesoj elrevigas, ja historio ne povas halti, nek en la ora epoko, nek en la nigra, kaj la venkinta ideo, strebanta al tiu ĉi mondo aŭ al alia, kondukas ne tien, kiel ĝi almontras. Aspekto la kurdlanda kaj la luzana ideologioj estas absolute kontraŭaj, sed ilia esenco estas sama. Temas pri ĝuo de bonoj de iu sociordo sen akompanantaj ĝin malbonoj. Kaj tie, kaj ĉi tie liberon oni strebas pacigi kun mallibero ne per interna laboro de spirito, sed per ekstera forto. Ĉe tia rigardo al la aferoj vi vidos, ke inter ni kaj ili ne estas esenca diferenco. Politmobilo estas solvo

de la dilemo, diferencanta de la lertonsfero per metodo, sed ne per celo. Niaj malliberejoj estas pli komfortaj, ol la kurdlandaj kaj ne tiom rimarkeblaj, tamen ni estas samaj prizonuloj, kiel ili. Kaj ĉi tie, kaj tie limigoj estas truditaj el ekstere. Tia aliro al ĉiuj fenomenoj estis karaktera por ni ekde la plej antikvaj tempoj. Mi nomas ĝin ektotropa. Vi sur la Tero nomas ĝin instrumenta. El vidpunkto de la antaŭaj generacioj ĉiu sekvanta stadio de civilizo estas aŭ koŝmaro, aŭ, por optimistoj, paradizo. Sed vidita el ekstere, ekzemple, per viaj okuloj sur Entio, ĝi ŝajnas simple frenezo, mirinde kruela en sia strebo realiĝi ĝis la fino. Ĉu vere?

Li faris paŭzon, sed mi silentis, kaj li ekparolis ree:

– Apartaj stadioj de teĥnologio estas kiel flosantaj glacipecoj, kaj la socio de la planedo moviĝas antaŭen, saltante de unu el ĝi sur alian. Kiom granda estos distanco inter najbaraj glacipecoj, kaj sekve, ĉu sukcesos la sekva salto aŭ ĝi finiĝos en akvo, dependas de la kosma loterio – tiu, kiu modlas planedojn. Katastrofo ĉiam ĉeestas en la sfero de la ebla. Sed se la sorto permesas al ni transsaltadi ĉiam plu kaj plu de glacipeco sur glacipeco, tio ne signifas, ke finfine ni eliros sur firmaĵon. Vi, eble, ne scias, ke la etikosfero estis por ni plie pajlero, je kiu penas teni sin dronanto, ol miraĝo de perfekteco. Bonfarto stultigas, ĝi naskas perforton, sekvantan el malespero, – primitivecon de mizero anstataŭas primitiveco de senbrideco. Ni ne havis alian vojon. Iam ankaŭ vi konvinkiĝos pri tio, se la glacipecoj sub viaj piedoj ne disiros pli frue. Kompreneble, tio ne signifas, ke vi eniros en etikosferon; alternativaj ektotropaj solvoj estas nemalmultaj, sed diferencas ili unu de la alia ne pli, ol la luzana de la kurdlanda. Tute malfermita socio finfine devas iĝi senforma kaĉo; tiu tute fermita – same, kaj inter ili ne ekzistas stato de stabila ekvilibro. Tial estas ne mirinde, ke la eternon ni same prenis per sturmo el ekstere. Vi demandis pri Ka-Undrio. Neniu scias, kio estis ĝi por la klivianoj. Kiel blankojn de fiŝo oni ne povas klarigi ekster la akvo, tiel ankaŭ nocion ne eblas klarigi ekster la kulturo, kiu naskis ĝin. Mi opinias, ke Ka-Undrio estis ankoraŭ unu rimedo de kombino de libero kun mallibero. Mi ne scias kia ĝuste, sed mi ne pensas, ke detaloj de la solvo gravas: absolute

bonaj solvoj ne ekzistas. La klivianoj ne tiom forte diferencis de la ceteraj entianoj. Se vi komprenis – aŭ ne komprenis, – demandu plu.

– Kiel vi murdis ilin? – demandis mi. – Ĉu estas vero, ke preskaŭ neniuj sciis pri la milito? Viaj fontoj diras pri tio malsame...

– Niaj fontoj mensogas, – respondis la granda maljunulo. Li plu senmove rigardis al la ĝardeno, prilumita de la suno. – Sed mensogas ne tie, kie vi vidas mensogon. Historiistoj plu ne povas decidi, kio estis tio – ĉu preventa aŭ responda bato. Kaj per kia armilo ĝi estis farita – ĉu per biologia aŭ ia alia. Kvazaŭ tio tiom gravas. Gravas tio, ke la ektokigo aperis kiel rimedo de neniigo. Nur poste ĉe la lertonistoj falis vualo de la okuloj, kaj ili trovis, ke mortigo kapablas daŭrigi vivon. Tute ne tion ili deziris. La lertonoj de la unua generacio estis ilo de ektocido.

– Do, la lertonoj aperis kiel armilo?

– Jes. Ili mortigadis iom post iom, nerimarkeble kaj nereturneble. Iam komenciĝintan procezon de ektokigo eblas nek returni, nek interrompi. Lertonoj, dissemitaj super Klivio, murdis ĝin dum iomaj kelkaj jaroj.

– Kaj la glaciejo? Ĉu estas vero, ke...

– La glaciigo de la Nordo venis poste. Mi ne esploris detalojn de milita historio kaj ne scias, kiel aperis glaciigo de la tuta kontinento. Sed mi ne pensas, ke pro pura hazardo. Se vi deziras scii pli multe, direktu vin al la pentantoj. Ĉu vi scias, kiuj ili estas?

– Jes. Ordeno, rememoranta la sorton de Klivio.

– Ne tute tiel. Ĉio ĉi estas pli komplika. Sed vi iru al ili. Tio estas nemalbona konsilo, kvankam vi ekscios ne tion, kion vi deziras ekscii.

– Ĉu vi pensas, ke mi sukcesos?

– Mi pensas, ke neniu malhelpos al vi en tio. Ĉiuokaze, vi povas provi. Ĉu vi deziras demandi ankoraŭ pri io?

– Diru, kial vi deziris renkontiĝon kun mi, se vi mem pri nenio demandas?

– Mi deziris vidi homon, – diris Aniks

# La instruo pri tri mondoj

La personeco de la maljuna saĝulo pli impresis min, ol liaj vortoj. Aniks enkorpigis en si tion, kio nur ŝajnis al Ŝekspiro: li estis kaj viva kaj malviva samtempe. Li estis ne surogato de mortinto, imito, sed reala daŭrigo de la estaĵo, vivinta antaŭ tricent jaroj. Tamen mi ne povis kredi tion, kion li diris pri fiasko de ektoteĥniko. Mi estis certa, ke multegaj homoj decidiĝus al tia transformo, por atingi senmortecon, – kial ĉi tie devas esti alie? Mi silentis pri miaj duboj, kaptita de subita antaŭsento, ke ne la maljuna filozofo respondos mian demandon, sed nubo de lertonoj, prenintaj lian aspekton. Kvankam mi konvinkadis min, ke mi pensas kiel sovaĝulo, serĉanta en radiricevilo parolantajn gnomojn, sed nesuperebla forto fermis mian buŝon. Ĉu vere gradeco de aŭtomorfozo garantias kontinuan ekziston de personeco? Kiel konvinkiĝi pri tio? Solvo de tiu demando ŝajnis al mi pli grava afero, ol ekspedicio al la pentantoj, kaj mi prokrastis ĝin.

Tiutempe oni invitis min al renkontiĝo kun studentoj kaj instruistoj de Instituto de Lertonetiko. La halo estis plenŝtopita, sed falintaj sur min demandoj montris plenan malklerecon rilate de la teraj aferoj. Iu blankpluma studento en okulvitroj entiris min en disputon pri anĝeloj. Konante ilin laŭ bildoj, li asertis, ke sur tiaj flugiloj ne eblas flugi. Krome nur plumita vosto garantias stabilecon – aŭ plumitaj stabiligiloj ĉe la maleoloj. Mi respondis, ke tio estas spiritaĵoj, objektoj de kredo, sed ne de aerodinamikaj esploroj. Tio lin ne konvinkis. Verŝajne, la homoj kaŝe diigas plumitojn, aliokaze la flugiloj de la anĝeloj estus ne plumitaj, sed, ekzemple, membranaj. Li deziris, ke mi klare difinu nian rilaton al plumoj. La flugiloj estas simbolaj, klarigis mi, kaj ne signifas birdojn, kaj ĉi tie temas ne pri svingaj plumoj kaj lanugo, sed pri ĉielo, kien kredanto iros post la morto. Sekvis demandoj pri sekso kaj maniero de reproduktiĝo de anĝeloj. Mi klarigadis al ili, ke anĝeloj ne povas havi idaron, sed, estante ne tro forta en anĝelologio, perdis la grundon sub la piedoj. Iu aŭdis pri gardantaj anĝeloj kaj demandis, ĉu ne estas tio tera

analogo de la etikosfero? Finfine ankaŭ tiu ĉi temo estis elĉerpita, sed mi ne sukcesis ripozi, kiam oni demandis min pri niaj gepatraj ludoj. Mi divenis, pri kio temas: foje mi observis sur la urba stadiono ĉiujarajn geedzajn vetkurojn. Tiu sporto anstataŭas por la luzanoj erotikon. Junularo de ambaŭ seksoj, feste vestita, eliras sur kurejon, kaj la tribunoj instigas la gekurantojn, furioze aplaŭdante al ĉiu sukcesa ago de fekundigo. Do, mi klarigis al ili, ke ni ne reproduktas nin dum kurado, tial reproduktiĝo ne povas ĉe ni esti sporto. Tiuokaze kio ĝi estas? Mi ekbalbutis ion pri amo. Bedaŭrinde, de amo mi glitis al amoro, por ili nekomprenebla, kaj trafis sub krucpafadon. Amoro? Kio estas tio? Jes, jes, ni scias, vi havas alian anatomian konstruon, vi ne kuras, tre bone, vi faras tion alie, ol ni, sed por kio estas tiuj sekretoj, aludoj, ambiguaĵoj, eŭfemismoj? Kial en via gazetaro tiom multas reklamo kun laktoglandoj? Ĉu tio iel rilatas al politiko? Al lukto por potenco? Ĉu ne? Do al kio? Ĉu familia vivo? Kaj kio? Mi ŝvitis, kiel muso, ili premis pli forte, nepre dezirante aŭdi, kion hontindan ni vidas en fekundigo? Kiu hontas, ĉu femalo aŭ masklo? Kaj pri kio, propre? Eble, la religio malpermesas al vi reproduktiĝi? Ĉu ne malpermesas? En la halo, malfeliĉe, ĉeestis kelkaj studentoj el fakultato de kompara religiologio, kaj de ili mi ricevis plej multajn batojn. Ne sukcesis mi diri, ke la religio nenion havas kontraŭ infanoj, kiam unu el tiuj doktuloj rememorigis pri votoj de ĉasteco pro savo de la animo, el kio sekvas, ke ju pli multe da idoj vi generis, des pli malproksima vi estas de la savo, laŭ la tera kredo. Mi obstinis, dirante, ke tute male. Li ion kaŝas! – kriis oni al mi el diversaj flankoj. Mi arde kredigadis, ke ne. La aŭskultantaro bolis, ĝi deziregis scii, el kio aperas tiu nekomprenebla honto, tiuj izoliĝoj, tiu intimeco – ja ili havas nenion pli publikan, ol fekundigon, kaj mi, tute obtuziĝinte, ne povis ion ajn klarigi al ili. Iu studentino demandis, ĉu ni demetas ovojn, sed aliaj, pli informitaj, priridis ŝin. La homoj devenis de kvarmanaj surarbaj haruloj el klaso de mamuloj, kaj ili estas vivonaskaj. Ĉu mamuloj? Jes ja. Patrino nutras infanon per la mammo. Ĉu per la mammo? Per lakto el la mammo, per sia karno nutras siajn idon pelikano. La lakto faris sensacion. Ĉu ankaŭ per kazeo? Kaj kio pri butero? Mi respondadis konfuze. Eble, finfine mi sukcesus klarigi al ili pri duunueco de erotiko – spirita kaj sensa samtempe, sed la bariero inter unu kaj la alia, levanta la unuan

damaĝe al la dua, estis tute nekomprenebla por ili. El kio sekvas tia divido? Ĉu ĝi konformas kun la sferoj de virto kaj peko? Jes? Ne? Iu juna logikisto, perle griza, kiel turto, komencis pruvi, ke la homoj ne konfesas vere la propran religion, alie ili antaŭlonge formortus, ne lasinte idaron. Kolektiva celibata memmortigo! Ili pekas, sekve, ili ekzistas! *Pecco, ergo sum, et nihil obscoenum a me alienum puto* [55]. Ili enbatis en sian kapon, ke mi scias ĉion, sed elperfidi tion mi ne rajtas. Pro malespero mi ekuzis la Sokratan metodon kaj demandis, kio ĉe ili estas opiniata maldeca. Ve, evidentiĝis, ke nenio speciala. Ofenda, kripla, malagrabla, abomena, kruela, tiujn nociojn ili konis, sed la noción de maldeca – ne. Estas maldece manĝi per malpuraj manoj! Fosi en la nazo dum ekzameno! Mokimiti kaj mokpriridi aliulojn! Ili kriis, interrompante unu la alian, penante doni al mi ĝustan spuron. Nenio rezultis. Konfuzita de ilia kriado, fajfado, piedfrapado (*la afero jam odoris per skandalo*), mi finfine agnoskis min venkita.

Post la prelego estis bankedo. Mi konatiĝis kun juna sciencisto, sidinta maldekstre de mi, – dekstre sidis la rektoro. La juna entiano ekinteresis min pli multe. Li estis doktoro de lertonetiko, aspekte similis gufon kun kufo, lia nomo estis Tjukstl. Li interesiĝis ankaŭ pri homologio, sed estis rimarkeble, ke la terajn problemojn li konas nur teorie. Li opiniis, ekzemple, ke ni fortimigas malamikojn, hirtigante la harojn, kiel hienoj. Mi penis certigi lin, ke estas tute ne tiel, sed li citis terajn librojn. Kaj jen, provu klarigi al fremdplaneda estaĵo, ke tio ne estas argumento, ja ĉe ni ankaŭ la animo ne forkuras en la piedpinton, kvankam tiel oni diras metafore. Aŭdinte pri mia renkontiĝo kun Tahalat, Tjukstl ironie ridetis. Oficiala propagando, diris li, foiraj truko kaj artifiko, lertona blufo. Li konsentis iĝi mia mentoro kaj rakontis al mi multan novan pri la etikosfero.

Pri produktado de lertonoj okupiĝas lertontrustoj. La centran regejon estras duumviroj – la Unua Inhibitoro kaj la Unua Gedomatikisto. Iliaj taskoj ekvilibrigas unu la alian: unu zorgas pri profilaktiko de malbono, do pri limigo de certaj agoj, la dua – pri seninterrompa liverado de bono, kaj sekve pri maksimumo de liberoj. La profesio de Tjukstl, tio estas lertonetiko, estas ne instruado

al lertonoj pri fundamentoj de etiko, sed arto de enkorpiĝo de etiko en fiziko. Jam ĝiaj patroj-fondintoj komprenis, ke tio estas necesa. La plej ĉagrena manko de ĉiuj moralaj kodoj estas nekompareblo de diversaj agoj; provu decidi, kio estas pli malbona: priŝteli orfon, ne doni loĝejon al maljunulo aŭ bati pastron per sankta relikvo? La etikosfero ne devis preni al si rolon de psikologo-edukisto, spiono kaj kontrolisto, nevidebla arbitracianto aŭ policisto kaj des pli – rolon de flanko en disputo, kun kiu eblas disputi pri takso de agoj. Tia ĉiea kaj trudiĝema prizorgado estus neeltenebla. Tial malbonkapacito de la etikosfero manifestiĝas kiel pure fizika karakterizaĵo. En la nobligita medio oni ne povas iun truddevigi al io, same, kiel ne eblas truddevigi elektronojn ĉesi rivoli ĉirkaŭ atomaj nukleoj. En ĝi ĉio viva estas nedetruenda, kiel nedetruendaj estas materio kaj energio. La leĝoj de fiziko estas antaŭ ĉio malpermesoj, alivorte, ili signifas neblon de io; kaj fari krimon en la etikosfero ne eblas tute same, kiel en la natura medio ne eblas konstrui eternan movilon. Jen kial ĉiuj decidoj, kiujn devas fari lertonoj, estas transportendaj el netrairebla labirinto de psikologio sur la firman grundon de ekzaktaj sciencoj. Ĝuste pri tio okupiĝas lertonetiko.

Tjukstl montris al mi, kiel tio estas farata. Unu el la aksiomoj de etikosfero diras: «Neniu povas esti senigita de libero». Ĝi efikas kiel fizika leĝo. Pri tio estas facile konvinkiĝi, peninte kateni iun, aŭ surĵeti sur ties kolo maŝon, aŭ, ekzemple, encementi la piedojn de la viktimo en sitelon kaj ĵeti la sitelon en puton. La katenoj kaj ligiloj disfalos momente, la cemento dispolviĝos, sed la viktimo nepre devas fari penojn por liberigi sin. Alie disfaladus eĉ vestaĵoj, kaj neniu povus porti zonojn kaj ŝelkojn. Se mi ŝiriĝus en la ĉeno, mi reliberigus min, sed mi – terano – pri tio ne sciis. Ĝuste pri tio kalkulis miaj ŝtelintoj, aldonis kun rido Tjukstl. Lertonoj ne komprenas (kaj ne povus kompreni) vian animan staton, sed nur difinas, ĉu ne estas ĝenita libero de viaj moviĝoj. La arto de lertonetikistoj montriĝas en traduko de morala senco de ajna situacio al la ekzakta lingvo de fiziko, por ricevi optimuman solvon sen entrudiĝo de psikologiaj taksoj. Lertonoj tute ne kontrolas tiun, kiu intencas murdon, kaj ne pridiskutas kriman atencon, sed nur malkovras kaj neŭtraligas ĝin. La programo konsistas el «inĝenieraj»

leĝoj, ekzemple: «Neniu falu rapidege»; tio signifas, ke meteorito ne falu sur urbon, ke neniu pereu, elfalinte el fenestro, sendepende de tio, ĉu li mem elsaltis aŭ estis elĵetita, – kvankam metodoj de kontraŭagado al tio estas malsamaj. Ekzistas, ekzemple, likvidonoj kaj absorbonoj – subatomaj partikloj, absorbantaj energion aŭ liberigantaj ĝin laŭ signalo de lertonoj. Triliono da absorbonoj, dissemitaj super unu kvadrata mejlo, povas malaltigi temperaturon de la aero je 20° nur dum minuto. (Ĉu ne tiel, pensis mi, Luzanio faris Nigran Klivion glaciejo?) Jen alia leĝo de lertonetiko: «Se viktimojn ne eblas eviti, ili devas esti kiel eble malplej multaj». Tio estas principo de minimumo de malbono. Se, ekzemple, la piedo de infano, transiranta fervojon, enkaptiĝos inter reloj, kaj abrupta bremsado de trajno kaŭzos katastrofon kun multegaj viktimoj, la trajno transveturos la infanon. Tiun ekzemplon Tjukstl elpensis speciale por mi: en Luzanio ne estas fervojoj. Ankoraŭ unu leĝo: «Neniu estu malsana». En Luzanio jam dum ducent jaroj ne ekzistas medicino de la tera tipo; medicina observado pri ĉiuj, ekde la naskiĝo ĝis la morto, estas komisiita al lertonoj, tial operacioj kaj ĉiaj kuracaj proceduroj ne necesas. Ne eblas, ekzemple, embolozo aŭ volvulo – ajnan malsanon lertonoj likvidos en la embria stato mem. La samo rilatas al ĉelaj eraroj kaj distordoj, nomataj malignaj tumoroj. Jen kie estas la fontoj de la revolucia ideo – konkeri senmortecon per ektokigo.

La ripar-sava servo, tiu ĉiam aktiva parto de la lertonsfero, ne estas io tute nevidita kaj neekzistinta antaŭe, substrekadis Tjukstl, ja ion tre similan ni vidas en ajna viva organismo. Ankaŭ en ĝi, dum ĝi funkcias bone, unuj organoj aŭ histoj ne povas malutili aliajn, ne povas kreski je ilia konto, kaj ĉio, kio invadas elekstere, ĉu mikroboj aŭ obusaj splitoj, estas neniigata, izolata aŭ forigata el la organismo. La organismo, same kiel la lertonsfero, ne enprofundiĝas en iajn moralajn rezonojn, por difini, kia estas kaŭzo de tiu ĉi atenco al la sano kaj vivo, ĉu ĝi estas justa aŭ maljusta. La organismo agas tute ne per metodoj de konvinkado – ekzemple, kiam ĝi malakceptas transplantitajn organojn. La korpon oni povas superruzi kaj mortigi, ja ĝi reagis laŭ ŝablono, ĉiam same; male, la etikosfero ĉiam perfektigis danke al lertonetiko. Tio ne signifas, ke ĝi estas perfekta

aŭ povos iam iĝi perfekta. En tiu rilato Tjukstl evidentiĝis skeptikulo. Li donis al mi legi antaŭ-duonjarcentan pamfleton kontraŭ lertonetikistoj. La aŭtoro de la pamfleto, filozofo Ksaimarnoks, mem estis lertonetikisto, ĝis radike ŝanĝis siajn konvinkojn. Li asertis, ke la etikosfero kontraŭstaras tute ne al la socia malbono, kiel oni ordinare pensas.

«Prospero, – skribis Ksaimarnoks, – estas ne tio, kion oni jam posedas, ĉiukaze, ne nur tio, sed miraĝo, celo, transportita en la estontecon. Mizero estas terura kaj neeltenebla, sed ĝi almenaŭ devigas agi, por eliri el ĝi. Sed prospero, facila kaj atingebla kiel aero, estas pli malbona, ĉar el ĝi ne estas eliro, restas nur ĝin pligrandigi, por havi ne nur ĉiam pli multe da aĵoj kaj ĝuoj – tuj, senprokraste, ĉe la mano, – sed ankaŭ ĉiam pli multe da novaj, neelprovitaj ebloj. Vi devis rekonstrui la mondon, ĉar vi ne deziris aŭ ne povis okupiĝi pri rekonstruo de vi mem, – tamen, tio donas kvankam aliajn, sed ne malpli fatalajn rezultojn. Nenio tiel pereigas homon en la homo, kiel prospero, ricevita senpage, – kaj sen partopreno, sen subteno, sen kunagado de aliaj homoj. Jam ne necesas esti bonkora al iu ajn, ne necesas komplezo, mizerikordo; da senco en tio estas ne pli multe, ol en almozdono al Krezo. Se ĉiu havas pli multe, ol li povus deziri, kion oni povas proponi al li? Ĉu sentojn? En tia situacio ilin povas montri eble nur asketo rilate al alia asketo. Sed asketeco iĝas kruela moko pri la paradiza civilizo, kreita kun tia peno. Tamen, erozio de amikeco, korinklino, estimo, amo okazas iom post iom, dum pli ol unu aŭ du generacioj. Unue aperas primitivaj robotoj-servistoj, kaj meĥaniko nur mallerte imitas homojn, programante fidelon kaj servemon, sed eblas – kaj nun eĉ necesas – perfektigi tiun imiton plu; la feraj manekenoj iras en muzeojn de teĥniko, kaj ilin anstataŭas kvankam senpersona, tamen neegoisma, zorgema, karesa, rekte ama kaj senrezerva zorgo de la tuta medio, preta plenumi apenaŭ naskiĝintajn dezirojn kaj kapricojn. Sed se absoluta potenco absolute malĉastigas, do tiom perfekta favoro faras la homon absoluta nulo. Kaj ĉar reveno al la tempoj de ĉioma defcito, mizero kaj primitiveco por plej multaj homoj estas neebla – al kiu ili devas doni konton pri la feliĉo, kiu ilin premas? Certe, al la teĥnologio, kiu ĝin produktas!

Iu devas esti kulpa – Dio, la mondo, la najbaro, la antaŭuloj, fremduloj, iu devas respondi pro ĉio. Kaj kio? Oni devas savi kontraŭ la homoj tiun ilian malŝatatan feliĉon, kaj se ili ne povas ĝin neniigi, do ili ne havas, kun kiu kvitiĝi, krom aliaj homoj. Tial savi oni devas ĉiujn kontraŭ ĉiuj – jen kion vi atingis. Ĉu tio ne estas katastrofo – ĉies paradizo, en kiu ĉiu sidas kun sia propra infero interne kaj ne povas sentigi al aliuloj ĝian abomenan guston, kvankam ĝuste tion li dezirus plej multe? Ĉu vi bezonas pruvojn? Jen ili. Kvankam vi tute ne deziris tion, kvankam tio estis nur flankaj kaj eĉ nedezirataj konsekvencoj de la kredo de la malbonabsorbanta medio – vi kreis determinilojn de kredo kaj nekredo. De sinceraj kaj falsaj konvinkoj. La registaro deklaras, ke temas pri rekono de tre mizera kaj malnobla kredo, reduktiĝanta al unusola dogmo, al alinomado de malbono al bono, de murdo al sankta devo. Laŭ ili, por niaj ekstremistoj tiu kredo estas ne celo ([ja kredo devas esti celo](#)), sed rimedo trompi la etikosferon kaj akiri eblon murdi. Tial lertonetikistoj inventadas novajn programojn, por rebati tiun paŝon, kaj kritikantojn kiel min opinias siaj kontraŭuloj. Sed mi tute ne estas kontraŭulo. Mi diras nur: bonvolu diri, kion vi atingos, perfektiginte la etikosferon tiel, ke la malbono, kiu ankoraŭ tralikiĝas tra la lasta restinta fendeto – la religia sento, – estos ŝtopita plene? Ĉu vi enbetonigos en la animo de ĉiu lian internan inferon? Ĉu vi vere ne vidas absurdecon de tia «perfektigo»? Mi scias, vi deziris bonon. Vi ne deziris malbonon. Vi volis, ke ĉie estu bono, kaj nur bono. Sed la rezultoj evidentiĝis ne bonaj. Nun vi penas maski la malbonon, kaŝiĝintan en via nobliga agado. Kaj sekve, vi trompas vin mem. Vi strebas al tio, ke jam neniu povu pruvi kaj al vi, kaj al ĉiuj ceteraj, ke via bono faras ilin malfeliĉaj kaj malbonaj. Kredo naskiĝas el malfeliĉoj, nedisigeblaj de la ekzistado. El bezono de tia Patro, kiu neniam maljuniĝos kaj mortos, sed por ĉiam restos senrifuzaj, amanta prizorganto. El konvinko, ke, se la mondo nin ne amas, devas esti iu, kiu nin amas. Kredo aperas ne el materia bezono, sed el espero pri tio, ke tiu ĉi mondo tamen ne estas la tuta mondo, ke en ĝi aŭ super ĝi ekzistas Tio aŭ Tiu, kiun eblas voki, kiun eblas vidi rekte post la morto – se ne dum la vivo. Unuvorte, la kredo estas artifiko de malespero, tio estas de espero, naskita de malespero, ĉar en plena malespero kaj sen ero de espero vivi ne eblas – vivi se ne

pro si, do almenaŭ pro aliaj. Vi senigis nin de tiu eblo. Sed ja tiu nova, naskiĝanta kredo, tiu, kiu murdon faras bono, altega merito, tiu mizera stumpo de la degenerinta kredo, estas same frukto de malespero kaj de naskita de ĝi espero al tio, ke tiel, kiel estas, esti ne povas. Kaj nia, primara, kaj tiu ĉi, sekundara, kredo havas unu spiritan fonton. Strangeco de la nova kredo estas reflektado de strangeco de la ordo, kiun vi mem kreis. Miaj kolegoj kaj amikoj-lertonetikistoj pri tio ne pensas, okupitaj pri teĥnikaj problemoj de la sekva etapo de gedomatiko kaj inhibado; ili ne scias kaj ne deziras scii, ke gedomatikon ili iom post iom transformis al inferatikon, al torturoj pro homamo».

Specialistoj ignoris tiun pamfleton, anstataŭe ĝi iĝis Biblio de intelektuloj – finfine iliaj veoj kaj pretendoj al la etikigo trovis indan esprimon. Historio instruas, skribis ili, ke ne ekzistas tia bono, kiu por iu ne iĝus malbono. Bono en negrandaj dozoj estas utila, sed bono porviva kaj neapelaciebla estas veneno. Prave diris Ksaimarnoks: ju pli perfekta estas prizorgo de lertonoj, des pli multaj malfeliĉoj el tio sekvas. La registaro silentis, sed ankaŭ ĝi havis siajn adeptojn; ili deklaris Ksaimarnoks-on lamentanto kaj strangulo. Oni eĉ disvastigis klaĉon, kvazaŭ li ricevis gratifikon de la Prezidanto. Baldaŭ tiu historio forgesiĝis. La profetaĵo de la maljuna lertonetikisto ne plenumiĝis, murdo kiel protesto kontraŭ truddeviga bonkoreco ne iĝas konfeso, se ne kalkuli areton da ekstremistoj, sed tamen Ksaimarnoks-on oni apenaŭ povas nomi falsa profeto. Okazis io tre stranga – la etikosfero renaskis la antikvan Instruon pri Tri Mondo.

Kiel tio okazis? Kiam la registaro enkondukis la etikigon, Luzanion skuadis krizoj. La prospero ardigis la socion, kresko de loĝantaro pufigis urbojn, estis forviŝiĝantaj la limoj inter politiko kaj krimo. Ĉio ĉi kvietiĝis sub la vitra kloŝo de la etikosfero, tamen post kvardek jaroj montriĝis fenomenoj, antaŭe tute nekonataj – favoraj, tamen ankaŭ maltrankviligaj. Tio estis ŝanĝiĝoj al bono, kiujn neniu planis kaj ne antaŭvidis. La demografia kresko bremsiĝis, ĉesis naskiĝi kriplaj kaj mensdifektaj infanoj, plilongiĝis vivdaŭro. La subtenantoj de la etikigo klarigis tion per nobliga influo de la lertonsfero. Maltrankvilo komenciĝis, nur kiam kuracistoj deklaris, ke maljunulojn

nun ne persekutas ordinaraj en ilia aĝo ostarompoj, ĉar en la tibiojn enkreskas mikroskopaj metalaj fadenoj. Tiam jam ne eblis limiĝi per ĝeneralaj frazoj pri bona efiko de la etikosfero; la lertonoj evidente agis arbitre. En malapero de ostarompoj estis nenio malbona – malbona estis nur tio, ke la lertonoj okupiĝis pri tio, kion oni al ili tute ne komisiis. Intelektuloj, kun kiuj ĉiu registaro sub ĉiu stelo havas senĉesajn problemojn, denove komencis laŭte demandadi, kiu, propre, kiun posedas: ĉu la homoj la lertonojn aŭ la lertonoj la homojn? Ĉu vere, demandadis ili sarkasme, oni sukcesis krei paradizon pli bonan, ol tiu, pri kiu oni revis?

La lertonetikistoj restadis neŝanceleblaj, klarigante al ĉiuj kaj ĉiu, ke ĉio iras kiel eble plej bone. Etikon ne eblas rekte traduki en la lingvon de fiziko. Dirinte: «Ne faru al aliulo tion, kio al vi mem ne plaĉas», oni povas nenion aldoni: ĉiu intuicie scias, kio al li ne plaĉas. Sed, enkorpigante moralajn ordonojn en fizikon de la mondo, totale riparata, oni jam ne povas apelacii al intuicio. Programoj estas farataj por logikaj elementoj, kiuj gvidas sin per ili, nenion en ili komprenante. Lertonetikisto laboras ne kiel moralisto, sed kiel matematikisto, konstruanta deduktan sistemon. Tia sistemo sekvas el deiraj premisoj, nomataj aksiomoj. El aksiomoj ordinare sekvas pli multe, ol sciis la kreinto de la sistemo. Geometrio donas difinojn de punkto, rekto kaj ebena, kaj poste evidentiĝas, ke spite al la sobra prudento el tiuj difinoj sekvas ankaŭ tia ebena, kiu havas nur unu flankon. Programistoj komisiis al la lertonoj zorgon pri bono de la socio, kaj tiuj zorgas pli multe, ol oni povis atendi. Kio do en tio estas malbona? Ja tio estas bonega: oni ordonis al ili zorgi pri nia sano, do jen ili zorgas. Rompiĝemo de la ostoj kreskas grade, kaj ne eblas diveni, kiam okazos rompo. Por preventi tion, kion oni komisiis al ili preventi, lertonoj transiris al radikala – anticipa – kuracado. Medicino metas neniujn objetojn kontraŭ metalizado de skeleto, do ĉu indas sonigi alarmon? Lertonoj eĉ ne pensis rompi la ĉefan ordonon – pri bonfaro; sekve, ĉio estas en ordo.

Tiutempe ankaŭ en la vetero io komencis ŝanĝiĝi. Ĉesis abruptaj ŝanĝiĝoj de aerpremo, ciklonoj ĉirkaŭiradis la teritorion de Luzanio, kion ĉio ĉi povus signifi? Fulmotondraj frontoj, okluzioj, atmosfera

elektro – ĉio ĉi kaŭzas stresojn, do ankaŭ ĉi tie la lertonoj montris laŭdindan zorgemon, reguligante la klimaton. «Ĉu vere, – demandadis lertonetikistoj la opoziciulojn, kiuj denove levis bruon, – vi sopiras pri tajfunoj kaj tornadoj?» Nun, tamen, montriĝis skismo ankaŭ inter la specialistoj. Unuj plu certigadis, ke bonaj programoj ĉiam tenos en brido memkontenton de la lertonoj; aliaj deklaradis, ke la malbono jam fariĝis, ĉar tiu, kiu ricevas nepetitajn donacojn, perdas propran volon.

Baldaŭ evidentiĝis, ke pravis kaj la unuaj kaj la duaj. Komenciĝis mirindaj okazintaĵoj. Maljunuloj ĉiam pli ofte mortadis ne ĝis fino. Tiel oni tion nomis. Ili perdadis fortojn, kuŝiĝadis sur la mortan kuŝejon, blindiĝadis kaj surdiĝadis, perdinte konscion. Ĉesigita agonio daŭris longajn monatojn. Proksimuloj atendadis la lastan spiron, sed la morto ne venadis. Por ĉies teruro, rigidiĝinta korpo subite komencadis movetiĝi, la brakoj kaj la kruroj ĥaose tiriĝadis, kaj poste ree venadis nekomprenebla letargio. Kaj eĉ se la koro ĉesadis bati, tio ne estis signo de morto; ĉiuokaze, la pseŭdan kadavron ne tuŝadis putrado. Tjukstl diris, ke la luzanoj ne mem inventis ektoteĥnikon, sed eksciis pri ĝi de lertonoj. Nepensantaj, sed efikaj, ili laboris tiel, kiel oni ordonis al ili. Ili devis subteni vivon, kaj ili subtenadis ĝin spite al mortado. La organismo iĝadis kampo de nevidebla batalo por savo de apenaŭ flagretanta vivo. La cerbo mortadis definitive, tion ili ne povis preventi kaj tial savadis tion, kion eblis.

Kiam oni eksciis pri tio, ekbrulis seriozaj disputoj. Specialistoj entuziasmiĝis kaj tuj komencis pluan perfektigon de lertonoj, absorbite de la perspektivo de senmorteco trans la sojlo de la morto. Surdaj al ajnaj protestoj, al voĉoj de indigno kaj maltrankvilo, ili eksperimentis kun animaloj. La opozicio kriis, ke ne imageblas pli moka realigo de la revo pri eterna vivo, ol tia donaco, subĵetita silente, enigita en la homajn korpojn kaŝe, ŝtele. Esti laŭ fremda volo kondamnita al senmorteco – ĉu tio ne estas moko? Kaj la arda entuziasmo de lertonikistoj atestas nur ilian profesian frenezon.

Rakontante la eventojn de trijarcenta aĝo, Tjukstl ne kaŝis ilian monstrecon. Konsekvencoj de la hasto, kun kiu la lertonetikistoj transiris de ektokigo de animaloj al ektokigo de entianoj, estis teruraj. Ili pensis, ke sufiĉas, ke sur stratoj aperu unuaj senmortaj pasantoj, kaj la socio forturnos sin de la kritikantoj-opoziciuloj. Tamen ne pasis eĉ jaro, kaj la unuajn kandidatojn al eterna vivo jam necesis kaŝi en specialaj aziloj. Unuj iom post iom rigidiĝadis kaj perdadis konscion, kaj tio estis ne la plej terura: multaj simple freneziĝis. Ili simie grimpadis sur arbojn kaj murojn, atakadis siajn proksimulojn, elĵetadis sin el fenestroj, tamen, sen ajna malutilo por si, ja la lertonsfero zorgis pri ili. Kiom mi komprenis, ĝuste el tio devenas la onidiroj pri «dorsmordistoj», «kroĉistoj» kaj «lojanigo», reflektitaj en la kurba spegulo de raportoj de nia ministerio. Tio estis des pli terura, ke en la etikigita medio neniun eblas reteni per forto. Eĉ egaj dozoj de trankviligiloj ne helpadis, ja la kuracistoj kunpuŝiĝis ne kun frenezaj maljunuloj, sed kun tuta armeo da lertonoj, kiuj ne permesadis dormigi la objektojn de sia senmortiga agado. Tragedio, rimarkis Tjukstl, devas aspekti digne, dum la bonintencaj zorgoj pri eterna vivo kondukis al tio, ke stratoj kaj domoj iĝis areno de interbatadoj de frenezaj gemaljunuloj kun timigitaj preterpasantoj kaj familianoj. Anstataŭ altiri la socion al la flanko de la etikigo, la lertonetikistoj senrevene malgloris ĝin, kaj, kiam la afero pliklariĝis, neniuj jam deziris aŭdi pri senmorteco. La animaloj, kun kiuj oni faris eksperimentojn, havis multe pli simplajn cerbojn, tial kun ili nenio okazis. Pli postaj sukcesoj ne helpis al la lertonikistoj. Kiu nun povas scii, skribis disidentoj, ĉu finiĝas sur tio nia truddeviga feliĉigo? Kiu ĵuros, ke lertonoj ne penetras kun konsento de la registaro en tombojn, por ĝojigi nin per konataj skeletoj, kiuj per vivĝoja marŝo revenas el tombejoj? Jam ne naskiĝas kriplaj infanoj, kaj tio ŝajne estas nemalbona, – sed kiel ni sciu, kiaj ankoraŭ infanoj ĉesis naskiĝi? Se lertonoj preventas naskiĝon de kripluloj, do ili okupiĝas pri selektado de fekundigo, sed kiu ĵuros, ke ili ne neniigas en embrio aliajn infanojn – ekzemple, tiujn, kiuj povus iĝi obstaklo por la etikosfero? Se la lertonoj estus flanko en disputo, se eblus kun ili interparoli, pridemandi ilin, elbati el ilia kapo tiun montran homamon, se ili povus indiki direkton de sia agado kaj ties bazojn, tio estus tolerebla, sed tio ja estas ĥimero! En deziro konversacii kun

la etikosfero estas ne pli da senco, ol en deziro eldemandi de atmosferaj fluoj morgaŭan veteron. Super ni dominas senanima aktiveco, inokulita al la ĉirkaŭanta materia mondo, kaj neniuj pruvoj, ke tiu nova mondo estos favora al ni – ke ĝiaj zorgemaj brakumoj post kvin aŭ cent jaroj ne iĝos mortigaj...

Aŭskultante tion, mi ne povis ne pensi pri Aniks. Li decidiĝis al ektokigo, ĉirkaŭita de homoj, spirantaj malamon al la sciencistoj, lertonteĥnikistoj kaj, probable, al filozofoj kiel li, – ĉar la despera, vokanta al venĝo homamaso ne distingas, kiu kulpas. Se ne estus la etikosfero, ili ne evitus perforton kaj linĉadon; tiutempe la lertonetikistoj vidis en insultoj, kiujn oni ĵetadis al ili, kaj en abomeno, kiun ili kaŭzas, pruvojn de sia praveco: se la etikosfero estus sklavigo de la racio, diris ili, ĝi ne permesus ĉies indignon. Kompreneble, neniuj deziris aŭskulti ilin. La ektokoj trafis en la staton de lepruloj, kaj ĉio, kion oni penis fari kun ili, ne plaĉis al la socio. Aperis onidiroj, kvazaŭ ilin oni sekrete mortigas per iaj ŝtalaj premiloj aŭ marteloj, kaj eĉ ne tute senbazaj: kelkaj vere postulis, ke iliaj parencoj-ektokoj estu senigitaj de senmorteco, almenaŭ per murdo, se alie ne eblas.

Sukcesaj ektokigoj, faritaj en la sekva jardeko, estis konservataj en grandega sekreto, tamen oni ne sukcesis ilin kaŝi, kaj la socion kaptis malsaneca suspektemo; nun jam ne stultecon, sed saĝon oni opiniis pruvo de kadavra deveno. Ektokoj devis ŝanĝi siajn aspektojn kaj nomojn, forlasi la familiojn, kaj ili nenie povis loĝi longe: nur sola najbareco de ektoko furiozigadis ĉirkaŭantojn. Ektokoj iĝis vagantoj kaj ofte turnadis sin al kosmetikistoj kaj kuracistoj, por ŝajni pli aĝaj. Vidante, en kian sakstraton venis la afero – akuzo pri senmorteco jam iĝis insulto, kaj al la suspektato minacis ĉies bojkoto, – la potencoj retiriĝis. Por prui al la opozicio ([kaj al si mem](#)), ke la etikosfero ne eliris el sub regado, ili provizore ĉesigis enkondukon de ektoteĥniko. Ekde nun la eterna vivo povis esti sorto nur de speciale meritaj agantoj. Tio estis nemalbone elpensita: la ektokigo, kiun la socio opiniis malgloro, estis farita privilegio. La manovro sukcesis kaj trankviligis mensojn. Tamen la rilato de la luzanoj al la etikosfero rimarkeble ŝanĝiĝis. Tion atestas parolaj

esprimoj, fiksitaĵoj en materialoj de nia MEA. La socio rilatas al sia perfektigita mondo kiel al antagonisto, havanta personajn trajtojn, kaj kun tio nenio fareblas. Sub influo de subkonsciaj timoj la kolektiva fantazio turnas sin al mitaj imagoj kaj enkorpiĝas en konkreta bildo tion, kio laŭ sia naturo estas senpersona kaj senkorpa. Sed krom tiuj naivaj imagoj ekzistas la realo, ne malpli mistera, ol la antaŭa, natura mondo, kiun oni deziris transformi al beata Arkadio. Ne malpli mistera, ĉar oni povas opinii ĝin favora, indiferenta aŭ malfavora – se rigardi al la estado per la okuloj de filozofoj de antikveco. La rifuzita senmorteco ankoraŭ ne estas pruvo de tio, ke oni povas por ĉiam fidi la lertonsferon. La tro bondezira prizorganto estis unufoje haltigita, sed kio? En ajna minuto oni povas atendi novajn «Atencojn de Bono», kiel esprimas kelkaj. La klasika demando «Quis custodiet ipsos custodes?» ne estas forigita. Prenu almenaŭ la sferon de ĉiutaga ekzistado: ĉiu faras, kion li deziras, – sed kiel oni eksciu, ĉu li mem tion deziris aŭ kaŝitaĵoj en li svarmoj de lertonoj? Dum ne estas forigita tiu dubo, ekzistos kaj la disvojiĝo de la Tri Mondo, kaj oni ne rajtas doni la sorton de la socio al ies prizorgo poreterne. Laŭ sia destino la etikosfero, certe, estas bona, sed ĉu ne tro bona ĝi estas fojfoje? Ĝuste tio estas nesciata – ekde kiam ĝi alloge ridetis al la entianoj per kadavra rideto de senmorteco.

Kiel mi aŭdis de Tjukstl, esploraj grupoj ellaboras novajn sistemojn de kontrolo, sendependajn de la etikosfero. Li mem partoprenis projektadon de «informadika spegulo»: pendante super la lertonsfero, ĝi permesus mezuri gradon de ĝia enmiksiĝo kaj per tio difini, kie finiĝas persona libero kaj komenciĝas kaŝa sklavigo. Tamen informadikistoj pruvis, ke la nova nivelo de kontrolo ne iĝus la lasta: simple super la lertona kontrolo aperus kontrolisto pli altranga. Necesus kontroli ankaŭ ĝin... Unuvorte, konstrui senfinan piramidon de kontrolo. Mi demandis Tjukstl-on: ĉu tiuj timoj ne ŝajnas al li troigitaj? Finfine sub la nobliga premo ili jam dum tiom da jarcentoj vivas pli bone – aŭ almenaŭ ne malpli bone, ol en la antaŭaj tempoj, krimaj kaj sangaj; ĉu ne meritas tiu aferstato almenaŭ ioman fidon? Sed la afero estas ne en tio, respondis li, ke ni opinias ĝin malbona; la afero estas en tio, ke ni ne scias, ĉu restos ĝi sub nia rego! Ni povus paciĝi kun tia duopa potenco,

se ni estus certaj, ke ĝenerale – ekzemple, je du trionoj – la rego estas en niaj manoj, kaj la cetero estas en dispono de niaj lertonaj komisiitoj... Sed ni absolute ne scias, kia estas ilia vera rolo en decidoj, difinantaj nian sorton. Eble, ĉiu kosma socio konstruas sian etikosferon, kaj ĉiu evoluas dum mil jaroj, kaj poste – pro memkomplikiĝo aŭ aliaj, nekonataj por ni kaŭzoj – degeneras, tamen ne tuj, sed grade, ĝis kiam la etikosfero iĝos etikokancero... Ni iras en la estontecon, eĉ pli nekonatan, ol la natura, kaj ĝuste tio nin maltrankviligas, sed ne ĝeno de la nobligaj malpermesoj... Konsideru, mia tera amiko, ke la etikigon oni ne povas malakcepti parte, same, kiel industriigon! Same kiel via homaro velkus sen industrio, tiel ankaŭ ni iĝus senhelpaj, frakasinte la malbonabsorban vitran kloŝon, kaj la timo de atendo de katastrofo iĝus tuja katastrofo...

Aŭskultante lin, mi komencis kompreni ilian sopiron pri kurdlanda simpliĝo – nun ĝi ŝajnis al mi tute ne tiom stulta. Aldone, kvankam mi ordinare dormas kiel marmoto ([tio, tamen, estas profesia kutimo de astronauto](#)), nun mi vekiĝadis kelkfoje dum nokto, ne elturmentita per koŝmaroj, sed ege mirigita de enhavo de la sonĝoj: tiajn mi antaŭe ne vidis. Mi sonĝis, kvazaŭ mi estas pasto, kiun knedas kaj dividas sur tabloplato grandegaj manoj jen al pastobuloj, jen al benjetoj, kaj mi vekiĝadis, ĵetata en bolakvon. Ĉu kapablas mia kapo elpensi tielaĵon, pensadis mi, aŭ tion ensonĝigis en min milionoj da lertonaj, mastrumantaj en mia cerbo? Mi turnadis min sur alian flankon, ĉiuminute suspirante ĉe penso pri tiu minuto, kiam mi finfine eniros en la ŝipon, kaj eĉ svisa prizono komencis ŝajni al mi kvieta azilo.

## Per viscera ad astra [\[56\]](#)

Memorema Tjukstl proponis al mi komence de somero iri duope al Teltlineu por serĉi monaĥejon de monaĥoj-pentofaristoj.

Mi relegas tiun ĉi frazon kun malplezuro. Feliĉa estas tiu kronikisto, por kiu leganto estas proksimulo, komprenanta lin per duonvorto. Li diros «somero», kaj la leganto jam vidas tritikan kampon sub nube blua ĉielo, aŭdas varmege zumantajn abelejojn; li diros «monaĥejo», kaj aperas imago de potenca konstruaĵo, malnovaj muroj, aŭdiĝas knarado de malfermiĝanta pordego, sed mi per ĉiu vorto erarigas la leganton. Eble, iu povas decidi, ke la luzanoj pensas nur pri la etikosfero kaj pridiskutas ĝin de mateno ĝis vespero, aŭ, kurĉasante unu la alian, kiel strutoj, seninterrompe okupiĝas pri fekundigo sur stadionoj. Tamen tio speciale interesis nur min, fremdulon, ne lasante lokon por priskribo de aliaj, ne malpli gravaj aferoj. Do, mi devos alpendigi multegajn klarigojn al tiu ĉi simpla frazo, kiu devas iĝi la komenco de la fino.

Tjukstl jam nomiĝis Tjotjoltek, kiam li ekveturis kun mi al Teltlineu ([la luzanaj nomoj ŝanĝiĝas depende de okupiĝoj de ilia posedanto](#)). Teltlineu, kiel videblas el la nomo mem, en kiu forestas sonoj «r» kaj «ks», estas «sovaĝsankta ermitejo de spiritaj provoj kaj eraroj de ŝtataj oficistoj». Aspekto ĝi similas rezervejon: duone sekiĝintaj marĉoj, tundro kaj arboskeletoj; tio estas parto de nenies tero, zonanta duoncirkle Luzanion laŭ la limo kun Kurdlando kiel sanitara kordono, ĉar koncentriĝo de lertonoj ne povas salte fali ĝis nulo. Sovaĝeco signifas nelertonizitecon, kaj sankteco – eblon renkonti monaĥojn; «monaĥejo» estas nur esprimo, ĝi ekzistas nur kiel statuto, ĉar la pentofaristoj estas nomada ordeno kaj ĉiutage transiras al nova loko. Nun pri la «provoj kaj eraroj». Antaŭ ducent jaroj la opozicio devigis la registaron akcepti leĝon, laŭ kiu ĉiu ŝtatoficisto unufoje dum jaro devas iri al Teltlineu kaj pilgrimi tie dum certa kvanto da tagoj, konformanta al lia ofica rango. Supera referanto, ekzemple, devas pilgrimi dum du semajnoj, ĉar lia rango

estas dekkvara. Tjukstl, pretendanta al posteno de konsilisto pri scienco en MEA, jam liberiĝis de sia pilgrimado ([ĝuste tiel li esprimis](#)) – vintre, por eviti kulojn, kunflugantajn el kurdlandaj marĉoj en la ĉefa, somera sezono de pilgrimado; tiam li portis nomon Tjukstjulliks, kio proksimume tradukeblas kiel «Tjukstl ekster bono ĉe sia malbono»: kvazaŭe en la nelertonizita sovaĝejo, liberiĝante de la etikaj bridoj, ĉiu montras sian malbonan flankon. Rivelado de tiaj breĉoj estas speciale grava ĉe ŝtatoficistoj, ja al lertonoj ne estas permesite enmiksiĝi en ilian laboron, kaj malica oficisto povas ĉiel ĝeni civitanojn. Tamen, ankoraŭ neniu aŭdis pri oficisto, kiu post pilgrimado forlasus sian postenon, kvankam post reveno ĉiu devas doni al afektologia inspekcio sian ksandion. Ksandio similas rozarion, kaj oni portas ĝin sur la nuda korpo, por ke ĝi registru plej etajn oscilojn de emocioj. Al ordinaraĵoj turistoj limgardistoj pendigas sur la kolon ksindrojn aŭ ĥronojn – por defendo kontraŭ renkontita survoje pilgrimo, se tiu subite «rivelus sian malbonon». Oni ne permesas malmunti kaj ksandion, kaj ĥronon; scii, kiel ili funkcias, same estas malpermesite. Tiuj aparatoj mem observas plenumon de la malpermeso, kaj liberiĝi de ili ne eblas. Laŭ instigo de Tjukstl mi ĵetis mian ĥronon en arbustojn, kaj ĝi tuj ekkuris post min, mallaŭte tintante per siaj bidoj. Verdire, mi esprimis ne tute ĝuste, kiam mi diris pri ksindroj. Ĥrono antaŭ la uzo estas indro; agordita por konkreta persono, ĝi ricevas prefikson laŭ ties nomo, kaj ĉar Tichy ([kvieta](#)) en la luzana estas Ks, do nur mian aparaton mi povas nomi ksindro; en traduko el la luzana tio signifas proksimume «kviet-strebanta savilo».

Ne superflue, tamen, estos aldoni, ke la pilgrimado de oficistoj, kaj ankaŭ la ksandioj kaj ksindroj, esence, estas simple formalajo. Baldaŭ mi konvinkiĝis pri tio mem. Ni veturis sur ekstervoja paŝanta aŭto kun postveturilo, ŝarĝita per provizaĵoj kaj ekipaĵoj, tra malviva arbaro. Ĝi elkreskis ĉe bordoj de riveroj, iam fluantaj de glaciejoj; nun, kiam la riveroj malestas, la arbaro sekiĝas kaj pereas. Je tagmezo Tjukstl, kiu de tempo al tempo ĵetadis rigardojn al lertonmezurilo, deklaris, ke ni jam estas en «sovaĝejo». Ni ne starigis tendon, sed simple eksidis sur sfagno, kaj Tjukstl malfermis ladvazon da konservita brrbicio: mi deziris gustumi la nacian supon de ĉlako.

Ĝi estas sufiĉe densa, guste similas soljankon, kiu jam komencas putri. Tiam super arboj aperis entiano, alta preskaŭ ses metrojn; sed tiel li aspektis nur el malproksime, ĉar li iris sur stilzoj aŭ, pli ĝuste, memiriloj (eblas ankaŭ diri «altiriloj», tamen, nomu ĝin kiel vi deziras; oni min riproĉas pri elpensado de neekzistantaj vortoj, kvazaŭ mi fantazias ilin por plezuro, sed ne pro neceso). La fremdulo malleviĝis sur la teron, mallongiginte la stilzojn kiel teleskopajn antenojn, kaj demandis, ĉu li povas sidi kun ni. Li prezentis sin kiel Kŭakŭaks (aŭ eble Kvakvaks), sed mi nomos lin referanto. Li servis en loĝeja fako de negranda apudlima distrikto, kaj nun estis pilgrimanta. Ni akceptis lin en nian kompanion. Kvankam oni devas esti elprovataj unuope, tamen pri tio neniu observas, kaj kiam mi demandis la referanton, ĉu li ne timas la ksandion, li respondis, ke tute neniu en ĝin rigardas.

En la dorsosako de nia nova kamarado estis undorto – vojaĝa materiigilo de aĵoj. «Undort» signifas «io el nenio». Ĝin oni uzas nur en nelertonizita sovaĝejo. El ĉio, trovebla apude, eĉ el rubo, ĝi tuj produktas necesan aĵon. Tiu aparato estis speciale utila por ni en la ventro de kurdlo, sed mi ne anticipu la eventojn. La referanto elsorĉis el sekaj branĉetoj kaj folio rondan skatoleton kun ciferplato, similan al kompaso – vivmezurilon, kiu indikis proksimume du pilgrimojn por kvadrata mejlo kaj (kiel opiniis mi kun Tjukstl) dume tolereblan kvanton da kuloj. Kun kul-forpelilo ni povus ankoraŭ ne hasti. Mi interesiĝis, por kio necesas ĉiuj ĉi pilgrimadoj, se la inspekcio eĉ ne kontrolas la ksandion; miaj kunvojaĝantoj unuvoĉe ekridis, kaj Tjukstl respondis, ke promeni en freŝa aero estas pli agrable, ol sidfroti seĝojn en kontoro. Tiel ni sidis kaj konversaciis, ĉar ni ne bezonis hasti – la vivmezurilo ne indikis eĉ spuron de la pentofaristoj. Tjukstl, kiu rimarkeble vigliĝis, kiam la indikilo de la lertonmezurilo falis ĝis nulo, rakontis al mi pri antaŭjuĝoj, ligitaj kun la etikosfero. La luzanoj vivas en ĝi dum jam kvar jarcentoj, kaj eĉ la plej kadukaj maljunuloj ne memoras, kiel estis antaŭe. Ekde junaj jaroj al ĉiu kaj ĉiuj oni enkapigas, ke la etikosfero estas ne persono, kun kiu eblas komunikiĝi; sed ĉio ĉi estas vana. Spiritismaj seancoj kolektas tutajn homamasojn kaj vokas furoron eĉ en la scienca medio. Tio estas ne tute friponaĵo, ja la saĝigita medio plenumas

ĉiujn dezirojn, se ili al neniuj malutilas; tial ĝi vere kapablas elsorĉi fantomojn, se tion iu tre deziras. Tamen, la seanculoj mem trompas sin, opiniante plenumon de subkonsciaj mendoj supernaturaj fenomenoj. En la lastaj jaroj aperis novaj kredoj. Kreiĝis sekto, kontaktanta la animojn de mortintaj ektokoj, kiujn la potencoj kvazaŭe sekrete neniigis, kaŝante spurojn de sia ektokiga eraro. La sektanoj publikigas protokolojn de tiaj interparoloj, plenajn de petegoj pri liberigo el la malviva vivo kaj, memkompreneble, de malbenoj, adresitaj al la potencoj. Estas malfacile diri, kiom da vero estas en ĉio ĉi, tio estas – ĉu la lertonsfero trompas la sektanojn, plenumante *ex nihilo* <sup>[57]</sup> iliajn kaŝitajn dezirojn, aŭ en ĝi vere ekzistas iaj restaĵoj de la spirita vivo de la eks-senmortuloj.

Tio, laŭ opinio de iuj ekspertoj, ne estas ekskludebla: la lertonsfero memoras ĉiujn siajn agojn, kaj ĉiu ektoko, almenaŭ tial, ke li estis ektokigita, ĝis la fino mem restas ĝia parto. La stato, kiel ni vidas, estas ege stranga, se oni ne povas distingi ekziston de postmortaj vizioj kaj nepaciĝintaj animoj disde ilia neekzisto, – kvankam eĉ en tio opinioj de specialistoj disiras. Perfekta imito de la realo, rimarkis Tjukstl, ne diferencas de la realo mem, kaj tiel estas en ajna tereno. Mi demandis, ĉu vere neniuj eĉ foje postulis plenan likvidon de la etikosfero, por ĉiam aŭ almenaŭ provizore? Tielaĵoj okazadis, respondis ili al mi; oni proponadis ankaŭ projektojn ne tiom radikalajn.

La suno estis malleviĝanta, kaj ekzumis kuloj; ni eksidis en nian paŝaŭton kaj direktis nin al serĉo de pli komforta loko por noktado. Ni traŝiriĝadis tra arboskeletoj, sidiginte la referanton-pilgrimulon sur la malantaŭan seĝon, de kie li replikadis, kaj kiam sur malebenaĵoj la referanto faladis sur nin de malantaŭe, mia ĥrono aŭ la ĥrono de Tjukstl, pendinta sur ties kolo, eligadis mallongan avertan siblon.

La paŝaŭto balanciĝis, kiel boato sur ondoj, kaj Tjukstl plu klarigadis, en kio estas la delikata diferenco inter elvokado kaj produktado de spiritoj. Se spiritojn elvokas tiu, kiu je ili kredas, la lertonsfero opinios lian kredon mendo kaj plenumos tiun mendon. Sed se li je spiritoj ne kredas, do li plifirmiĝos en sia nekredo,

ja lertonoj, kompreneble, eltrovos lian skeptikecon. Tamen oni ne povas opinii la lertonsferon lu – ĝi agas kiel aŭtomato, liveranta laŭ unua postulo ajnan libron, kvankam ne kapabla ĝin kompreni. Se mi dirus, ekzemple: «Mi deziras vidi fantomon de mia avo» – la lertonsfero plenumos la postulon, se ĝi ion scias pri tiu avo. Sed se mi turnus min al ĝi rekte, dezirante, ekzemple, ekscii ĝiajn intencojn aŭ pensojn, ĝi ne respondos, ĉar ĝi ne estas lu, kiu povas paroli de si aŭ pri si. Oni proponadis, vere, personigi la lertonsferon, sed ekspertoj pruvis, ke da malutilo de tio estus pli ol da utilo. Ne eblas mallonge kaj facile klarigi, kial estas tiel, – ĉi tie ni renkontas malfacile solveblajn paradoksojn kaj logikajn kontraŭdirojn. La medio devas plenumi individuajn postulojn, dum ili estas kongrueblaj kun bono de aliaj personoj. Ne estante persono, ĝi estas surda al ĉiuj deziroj, elirantaj ekster tiujn limojn. Alie ni povus iom post iom akiradi potencon super la sortoj de la proksimuloj. Interese estas, tamen, ke la lertonsfero, ne estante persono, kapablas produkti personecajn objektojn, almenaŭ en formo de fantomoj kaj spiritoj. Obeado de la lertonoj finiĝas tie, kie komenciĝas minacaj paradoksoj, kiujn terano ne povas koni eĉ per nomo. Tamen, klarigis Tjukstl, ili neniam havis mankon de reformprojektoj. Per trafa bato li mortigis kulon sur sia frunto kaj daŭrigis:

– Unu el la unuaj estis la izokratia plano – de ekvilibro de bono kaj malbono. Ĝin proponis disĉiploj de Ksaimarnoks. Laŭ la principo «okulon pro okulo» la medio devas repagi al ĉiu per samo. Se vi amos proksimulon – do lertonoj vin karesos. Se vi batos – mem ricevu al la dentoj. Ĉio tute simetrie, ekvilibre kaj proporcie. Laŭ tiu simetrio vi povus eĉ murdi, sed nur unufoje, ĉar vi tuj mortus sur la sama loko. Estas facile kompreni, ke tio estus rekta vojo al akcelo de malbono. Ordinare ni ne tro streĉiĝas, penante fari bonon, ja truddevigo estas kontraŭ la naturo de la bono, sed fari ion spite al aliuloj la homoj pretas nereteneble. Rezulte ruzaj fiuloj devigus la etikosferon lukti kontraŭ si mem: unue ĝi devus provizi ilin per karapaco aŭ io tiaspeca, kaj poste frakasi ĝin, por puni la murdinton. Tamen, tuja ekzekuto estas malbona justeco, speciale okaze

de murdo en afekcio. Lertonsfero, plenumanta funkciojn de ekzekutisto, estas ne tre alloga...

– Kaj ĉu vi memoras, – enmiksiĝis la referanto el malantaŭ niaj dorsoj, – la projekton de tri fratoj teologoj? Kiuj diris, ke necesas iri ĝis la fino? Tio, mi diru al vi, estis impresa ideo...

– Ĉu diosfero? – respondis Tjukstl. – Vere, estis tia ideo, sinteologia: ĵeti en la Kosmon, por ties humiligo, sintezitan Ĉiopovon... Jes, certe, kreita Dio, Sinto, naskiĝinta sur unu planedo, por post miriadoj da jaroj disvastiĝi al la tuta Universo... Sed se pensi, ke sub premo de totala zorgo haltus la natura evoluo, rabobestoj formortus pro malsato, kaj poste ankaŭ iliaj viktimoj, multobliĝintaj ĝis mortiga malvasteco... Ne, tio estis ne tre bone pripensita.

La interparolo rompiĝis. Tra densejo mi ekvidis malhelan figuron, fleksiĝintan sub peza portaĵo. Nia paŝaŭto haltis, kaj la renkontito – maldika maljunulo en dreliko – deĵetis de sur siaj ŝultroj grandegan ŝtonon kaj, kovrinte la okulojn kontraŭ la suno, ne palpebrumante rigardis al ni.

– Pentofaristo... – mallaŭtvoĉe diris la referanto. – Ni povas demandi lin pri vojo al la monaĥejo, sed ĉu li respondos?... Ili votas pri silento...

Tjukstl ĝentile salutis la monaĥon, sed tiu longe ne respondis. Eble, pensis, ĉu li rajtas respondi – la statuto de la ordeno permesas tion nur en esceptaj okazoj. Verŝajne, decidinte, ke tio ĉi estas ĝuste tia okazo, li nomis sin. Tio estis monaĥo-pordisto; matene li preterdormis la foriron de la monaĥejo, kaj nun estis serĉanta la siajn, kiel pentopunon metinte sur sin la ŝtonon. Tjukstl proponis veturigi lin, sed li nur riverencis al ni, surmetis la ŝtonegon sur la ŝultrojn kaj kaŝiĝis en densaĵo de malvivaj arbustoj.

Jam estis subiranta la ruĝa suno – promesante venton kaj kulojn, kiel asertis miaj kamaradoj, – kiam ni finfine trovis en malviva arbaro kampeton, taŭgan por lignofajro. La referanto instalis sin sur sfagno,

sorĉis kun la undorto, kaj antaŭ ni, kiel porcelana veziko, momente elkreskis blanka dometo. Post minuto el liaj pufaj muroj eliĝis longaj defendaj dornoj – kaj rezultis vera porcelana erinaco kun duonronda enirejo. Entrenante internen pneŭmatan matracon, mi ŝiris ĝin, tuŝinte unun el tiuj dornoj, kaj insultis per diablo. Sed la malfeliĉo evidentiĝis negranda: la referanto tuj produktis el amaso da branĉetoj alian matracon, krome markitan per miaj inicialoj, kaj por fari al mi eĉ plian komplezon, faris tiel, ke la dometo entiris en sin ĉiujn dornojn. Iomete manĝinte, ni babilis, sidante ĉe la enirejo, en densiĝanta mallumo. Sur la lignofajro, kiun ni bruligis por plia ekzoteco, estis kuirata supo. Mi eksciis, ke la referanto ĝenerale estas poeto, kaj servas li nur por prestiĝo, ja versojn, eĉ plej belegajn, neniu legas. Same kiel prozon. En la Union de verkistoj li ne aniĝis, ĉar tie estas nuraj intrigoj, speciale okaze de sepultoj. Unuj opinias, ke super ĉiu mortinto devas paroli la prezidanto mem, aliaj – ke oratoro, range egala al la mortinto, tio estas: membro de la tribunalo de honoro – pri membro de la tribunalo de honoro, vicprezidanto – pri vicprezidanto kaj tiel plu. Nur pri tio ili disputas, kompatinduloj, per indiferenta, malgaja voĉo diris la poeto, fiksrigardante al la flamo de la lignofajro. Nenio alia por ili restis: la Unio atingis ĉion, kion ĝi postuladis dum tutaj sepcent jaroj, materiaj zorgoj malestas, ĉiu por si mem difinas eldonkvanton, sed tio estas sensenca, se jam eĉ poetoj poetojn ne legas.

Poste la konversacio malleviĝis sur la Teron. Mi miregis pri tio, ke Tjukstl, ŝajne, tiom esplorinta niajn morojn, ligas ruĝigon de la lipoj fare de virinoj kun vampireco. La lipoj de virinoj havas skarlatan koloron, por ke ne estu videblaj spuroj de sango, elsuĉita dum kisoj, – ordinara mimetismo de vampiroj. Miaj protestoj tute ne perpleksigis lin. Aĥ, la virinoj deziras plaĉi? Ĉu sangaj lipoj estas belaj? Kaj ĉu bluigitaj okuloj kun verdaj palpebroj – same? Ja tio estas koloroj de kadavra putrado – ja mi ne negos tion, ĉu? Terura aspekto konvenas al vampiro. Mi ripetadis miajn argumentojn, la poeto aŭskultadis, kaj Tjukstl ironie subridadis. Nu jes, ili deziras esti belaj... kaj la maljunulinoj? Ili ja same ŝminkas sin! «Virino ĉiam restas virino, – insistis mi. – Ruĝigiloj kaŝas maljunecon...» Sed Tjukstl ne cedis al miaj argumentoj. En ĉiuj teraj bildoj femaloj

montras la dentojn. Demonstras la kojnodentojn. Certe, ankaŭ erotiko tion koncernas, sed tio estas nokta erotiko, kaj oni scias, ke vampiroj suĉas sangon nokte. Mi plu argumentadis, kaj li ĉiam palpebrumadis al mi, kio min diable incitadis; finfine li uzis nerefuteblan argumenton: se temas nur pri emfazo de beleco, kial viroj ne ŝminkas sin? Verdire, mi ne sciis kaj, bolante pro kolero, decidis ĉesigi tiun senfruktan disputon. Estu do vampiroj, diablo vin prenu, pensis mi, ekkuŝante por dormi en la dometo, malhela, kiel tombo.

Neniu el ni rimarkis kurdlon, kiu venis al tiuj lokoj. Kvankam mi vekiĝis kaj aŭdis snufadon kaj ŝmacadon, sed ne komprenis, ke tio estas sono de la grandega langego, lekanta la tegmenton. Konvinkiĝinte, ke ĝi trovis dolĉan pecon, tiu estaĵo unuglute voris la dometon, la paŝaŭton kaj ceteran nian havaĵon, tiel ke poste, post sufiĉe mola alteriĝo, ni trovis en la stomako eĉ la branĉetojn, preparitajn por matena lignofajro, kaj la gamelon – nur la supo elverŝiĝis.

Juĝante laŭ la amplekso de la stomako, en kiu eblis droni (nia kurdlo suferis pro soifo), ni trafis al vera giganto, unuopa vaganto. La stomakon mi esploris tre skrupule, kune kun ĉirkaŭaĵoj, ĉar ni pasigis tie pli ol semajnon. Tio estis io simila al grandega, malbonodora kaverno kun falta volbo, aldonaj kavoj kaj spuroj de erozio de la epitelio. La kavernon estis pleniganta nekredebla kvanto da duonlikva miksaĵo el arbustaj branĉoj, herbo, iaj rompitaĵoj, ladaĵoj kaj rubo. Nia kurdlo, evidente, estis ne tro elektema, voris ĉion ajn. Esperante, ke li mem elvomos nin el la faŭko, mi penis persvadi la kamaradojn tikli ĝian palaton, sed tiuj nur ŝultrolevis – kaj kiel ja ni povis grimpi al la ezofago, kiu per longa funelo nigris en lumo de poŝlampoj ie super niaj kapoj? Almanĝinte nin, la kurdlo komencis singulti. Tio estis vera tertremo. Finfine ĝi trovis trinkejon kaj faligis en la malhelan faŭkon impetan torenton. La aŭto tuj dronis, sed nia blanka dometo sentime tenis sin sur la akvo, kiel savboato. Tjukstl kaj la poeto-referanto alvokis min konservi paciencon, kaj mi impetis agi, ne sciante, kiel. La singultado ĉesis, ni rigardis al la fenestro, sur la nigra supraĵo de la lago kuris ondaj faldetoj; elŝovinte

la kapon eksteren, mi eksentis venton, sed ankaŭ tio ne mirigis miajn kamaradojn. «Ĝi simple regurgitas, ĉu vi aŭdas?» – diris Tjukstl. Vere, aŭdiĝis zumado de malbonodora aero.

Proksimume post horo la lago malprofundiĝis kaj transformiĝis al viskoza likvaĵo. Tuj kiam mi surpaŝis la fundon, ni renkontis la saman monaĥon. Li estis tiom nelacigebla en pentado, ke ne forlasis la ŝtonon, kvankam li tute facile povis droni. Kaj lin, kaj miajn kunvojaĝantojn nia stato neniom maltrankviligis. La poeto, kiu havis en sia sperto proksimume sep glutojn – li iam iradis en eksterprogramajn ekskursojn, kaj li loĝis ĉe la limo mem, – deklaris, ke la gorĝon eblos atingi ne pli frue, ol la animalo ekkuŝos por ripozo, sed en tio estas malmulte da senco, ĉar la ezofago estas tre malvasta, kaj neniam tikiĝas tie helpas: maljunaj kurdloj havas ŝtonfirman dormon. Mi volis pridemandi la monaĥon pri Klivio, sed Tjukstl deadmonis min: laŭ liaj vortoj, de simpla pordisto mi ekscios ne multe. La ĉefa afero estas pacienco: la kurdlo, probable, ekiros laŭ spuro de la monaĥejo, kaj ĉar la monaĥoj ne rajtas kontraŭi al perforto, baldaŭ nia kompanio kompletiĝos per pluraj el ili. Eble, al ni fortunos, kaj glutita estos bibliotekisto. Mi ne diru, ke li min konvinkis. Mi eksuspektis, ke nia nuna stato al li plaĉas. Li jam estis prepariĝanta al esploro de la loko: li petis de la poeto la underton kaj el la stomaka kaĉo produktis ministan kaskon kun lampeto, ŝnuran ŝtupareton kaj akvorezistan supertuton. Mi petis lin fari saman ekipaĵon ankaŭ por mi.

Tiutempe el obskuro, plena de ĉia abomenaĵo kaj rubo, komencis aperi mizeraj, ĉifonaj figuroj kun iaj siteloj en la manoj kaj kun balailoj sur la ŝultroj. Mi baldaŭ rimarkis, ke ili venas post matenmanĝo kaj tagmanĝo (*ne de ni, sed de la kurdlo*), por iom purigi la stomakan spacon. Do ili estis kvazaŭ purigistoj, sed mi neniam en la vivo vidis tian fuŝan kaj stultan laboron. Ili klopodis sen ajna kompreno. Unu el ili, rare parolema (*la ceteraj ne respondadis demandon entute*), diris al mi, ke la balailojn ili, vere, havas pro la ofico, sed ili tiujn ne uzas: unue, la vergoj forfrotiĝos, kaj tiam ili adiaŭos premion; due, tio povus malutili al Li. Pleje min mirigis ilia kreteneco. Ili indiferece vagadis preter ni kaj niaj maŝinoj, evitante nur lumon de lampoj,

dispelantaj la obskuron, – kvazaŭ lunatikoj en tranco; sed ĉiufoje, kiam ni havis brrbicion por tagmanĝo, ne malpli ol kvin el ili staris sub la fenestro, avide enspirante odoron de la supo. Tamen ili neniel deziris eniri en la dometon, kaj nur tiu, la parolema, konfesis, ke al ili estas malpermesite komunikiĝi kun fremduloj, tial ili ŝajnigas, kvazaŭ ni ne ekzistas. Ŝajne, li mem ektimis sian malkaŝemon – post tiam mi lin ne vidis. Kutimoj de la kurdlo estis por mi novaj, sed baldaŭ mi komprenis, ke matene kaj tagmeze necesas serĉi pli altan lokon aŭ kaŝiĝi en la dometo: kvankam ĝi voradis poiomete, tamen trinki ĝi komencadis subite kaj kun neaŭdita avido, kaj poste faladis vera Niagaro – el tie, kie ordinare la suno staras zenite. Kun tio ĝi glutadis aeron tiel, ke la stomako pufiĝadis duoble pli granda ol ordinare, kaj poste faradis longan regurgiton – tio estis kiel hurlado de vento en mallarĝa montofendo. La referanto malestime ignoradis la ĉlakojn, sed Tjukstl foje alpremis du aborigenojn al la stomaka vando kaj ne liberigis, ĝis tiuj diris al li, ke ili estas altrangaj oficistoj – unu prezentis sin urinulo, la alia – hepatulo. Tjukstl forlasis ilin ambaŭ, deklarinte, ke ili senhonte mensogas, penante doni al si gravecon per rilato al vive gravaj organoj. Diri pri iu: «Li estas el la organoj» – tio en kurdlo ion signifas. Tamen, Tjukstl opiniis, ke nia kurdlo estas baldaŭ mortonta kaj trenas sin al tombejo, por meti en ĝi siajn kadukajn ostojn. Maljuna bruto, forigita el bilanco, antaŭlonge elkursigita; tamen, kiel tio ordinare okazas ĉe ĉlako, en ĝi oni plu loĝas pro loĝejaj malfacilaĵoj; laste eliras el tia kurdlo la laborantoj de la servo de purigo de la urbosaŭro, kaj ne purigas ili simple tial, ke ili ne deziras. Sitelojn kaj balailojn ili portas, por ke ŝajnu, kvazaŭ ili laboras. Ĉiuj ili senescepte estas pigruloj – la laboro konformas al la rekompenco.

En la unua tago mi ne tagmanĝis, kvankam la poeto-referanto tentadis min per listo de manĝaĵoj, kiujn povis kuiri la undorto; sed ĉe penso pri tio, el kio ĝi ilin kuiras, mi perdadis apetiton. Mi strebis eliri al freŝa aero, kaj min pleje mirigadis, kiel miaj kamaradoj povas paciĝi kun sia prizono, eĉ pli, mi komencis suspekti, ke ili trovas en tio ian plezuron. Kian? Ĉu ili ĝojis ([peneme kaŝante tion](#)) al tio, ke ĉi tie ne estas eĉ unu lertono? Ili ekridis, kiam mi rekte demandis pri tio, sed en ilia rido sentebliis konfuziĝo.

En la dua tago post matenmanĝo (mi jam komencis manĝi, ja kion mi povis fari) Tjukstl ŝaltis muzikludilon, kaj mi, ne havante emon aŭskulti muzikon kaj ne dezirante sidi sen laboro, unue provis grimpi laŭ kruta deklivo sub la kardio, sed tie estis tro glite, kaj pri enbatado de hokoj ne eblis eĉ revii, tial mi en subakva kostumo direktis min pluen – al la duodeno. La referanto akompanis min ĝis la piloro kaj montris, kiel necesas tikli la piloran sfinkteron, por ke tiu malstreĉiĝu kaj tralasu min, sed li mem pluen ne iris. Li kunprenis dikan kajeron kaj kraĵonon: eble, lin vizitis inspiro, kaj li deziris izoliĝi. Malantaŭ la pilorio estis sufiĉe vaste, mi iris per grandaj paŝoj kaj sur disvojiĝo de galduktoj ekvidis en la muro paron de botoj. Mi preteris ilin per nevidantaj okuloj kaj ekiris plu, enprofundiĝinta en meditojn. Kial do miaj luzanoj, kiuj ŝajne malestimis ĉlakojn, konsentas sidi kune kun ili en tiuj kloakaj kavernoj kaj tute ne hastas al libero? Ĉu ĉarmo de ekzoteco? Ĉu primitiviĝo? Se ĉi tie estus iu freŭdisto, li tuj dirus, ke por entianoj sidi en kurdlo signifas reveni en la patrinan uteron, kaj entute atakus min per siaj freŭdismaj simboloj, kaj mi lin insultus, ĉar ili havas nenian uteron. Tamen, ĉu indis implikiĝi en imagata disputo kun elpensita freŭdisto? Sed en tio, tamen, estas io enigma, pensis mi, kaj nur tiam mian konscion atingis la viditaj dumvoje botoj en la muro. Mi lumis tien per la poŝlampo kaj rimarkis, ke ili moviĝas. Tiun enigmon mi, ĉiuokaze, povis solvi tuj. Mi vidis nur la vibroplandumojn kaj elfrotitajn kalkanumojn; mi tiris unu el ili, poste la duan, kaj el la muro retroe, kankre elrampis alta maldika entiano, same en subakva kostumo. Neniom mirigita de mia ĉeesto, li prezentis sin. Tio estis profesoro Ksouder Ksaate, katedrestro de kurdla anatomio en Iksibriks, nuntempe okupita pri kampaj esploroj. Ne demandante, kun kiu li havas honoron paroli, li klarigis al mi topografion de tiu ĉi peco de la intestaro; speciale lin admiris la *diverticulum duoden-jejunale* Xaater<sup>[58]</sup>: jes, jes, tiu loko portis lian nomon, ja ĝuste li pruvis erarecon de asertoj de la skolo de Kseps, kvazaŭ tiu divertikulo neniam estis verukoza. La profesoro montradis sin al la okuloj de tiu ĉi kurdlo jam dum kelkaj tagoj, sed la stulta animalo neniel deziris lin gluti, kvankam li, salita, ŝovadis sin rekte en ĝian faŭkon. Ĉe tiuj vortoj en mi vekiĝis pezaj rememoroj pri la satelito-amuzparko, kiun mi opiniis planedo – kaj permesis min trompi per falsa ĉasado al kurdlo.

Forlasinte – sufiĉe sendezire – la galajn verukojn, la profesoro kune kun mi revenis en la stomakon. Kaŝe li ĵetadis rigardojn al miaj kruroj, sed tuj formovadis la rigardon. Poste evidentiĝis, ke li opiniis min denaska kriplulo, sed pro ĝentileco ne montris tion; estante anatomo, li faris al mi diagnozon *deformitatis congenitae articulacionum genu* <sup>[59]</sup> – okazo sufiĉe rara kaj malfacila, ĉar tio ege komplikas la vivon, speciale iradon, kaj normale, tio estas entiane, sidi tia invalido entute ne kapablas; kiom da rido estis, kiam li komprenis, ke li renkontis homon, – mi forgesis al li diri pri tio, sed li mem komprenis, kiam ni demetis la oksigenajn maskojn. Tio estis jam trans la piloro, kaj desupre sur nin ekflugis tutaj faskoj da arbustoj kaj amasoj da grundo. Nia kaduka kurdlo estis rare manĝema; la profesoro konsilis hasti; el ĉie fluis torentoj de stomaka suko, kaj estis klare, ke tio ne estas fino: tia manĝaĵo kaŭzas pirozon, kaj sekve soifon. Vere, komenciĝis pluvego, sed ni sukcesis ĝiskuri la savan azilon, kaj neniuj gutoj nin trafis.

Miaj kamaradoj afable salutis la profesoron kaj invitis lin al brrbicio, kiu jam estis kuirata en la gamelo. Interese, ke al ĉiuj delicaĵoj, kiujn povis kuiri la undorto, ili preferadis tiun aĉaĵon, plenigantan la ejon perodoro, kiu kun tuta deziro ne nomeblas agrabla. Ni sidis runde kaj, trinketante la supon el bovlitoj, vigle babilis. La profesoro rakontis amuzan historion pri tio, kiel en la pasinta jaro li malkovris en marĉo apud la Tumulo de la Prezidanto dronintan en ŝlimo skeleton de grandega kurdlo kun kvardek skeletoj de ĉlatoj interne. Danke al tio li venkis arkeologojn el skolo de alia anatomo, docento Ksipsikvaks (aŭ io tiaspeca), kiuj asertis, ke kurdlo ne povas vivi sub akvo. Vere, en la naturo ĝi ne povas, sed eblas dresi ĝin al submarino, kaj nia anatomo pruvis tion, prezentinte pruvobjekton – periskopon, trovitan kune kun la skeleto. La docento malfruis je du tagoj, kaj kiam li finfine venis al la loko kun subakva kostumo, la skeleto jam estis sekiĝanta sub la suno, observata de preparistoj, kaj al la periskopo la profesoro alfiksis ŝildon kun moka surskribo: CITO VENIENTIBUS OSSA! <sup>[60]</sup>

Kiajn ridindajn problemojn havas tiuj sciencistoj, pensis mi, trinkante brrbicion tiel, kiel en la infaneco mi glutadis fiŝoleon, tio

estas ŝtopante la spirgorĝon per la postpalato; sed tamen mi trinkis, por ne montri min malsama. La monaĥo sidis kune kun ni, tamen ne sur matraco, sed sur sia ŝtono – li finfine lasis sin persvadi kaj deĵetis ĝin de sur la ŝultroj. Sciante, ke mi estas homo, li opiniis ebla rompi la voton; tiel komenciĝis interparolo, en kiu li montris multe pli grandan inteligentecon, ol supozis en li Tjukstl. Lian nomon mi ne povus prononci: ĝi estis tute alia, ol havas aliaj luzanoj, raŭka, el nuraj senvoĉaj konsonantoj. Ĉiuj monaĥoj havas tiajn nomojn, ĉar monaĥeco komenciĝas per elekto de klivia nomo – el konserviĝintaj kronikoj. Ekde tiu minuto monaĥo iĝas ankaŭ tiu kliviano. Ĉe tiu informo mia fantazio senbridiĝis. Mi atendis nekredeblajn sensaciojn – ekzemple, ke ili kredas je metempsiĥozo kaj je tio, ke per iliaj buŝoj parolas mortintaj klivianoj, aŭ ke dum siaj sakramentoj ili legas laŭ restintaj dokumentoj terurajn sorĉformulojn de Ka-Undrio, kaj, kvankam ilia kredo per tio estas malfacile elprovata, ĝuste en tio ili vidas sian pentan mision; kaj se vizioj iĝos amasaj, la piaj monaĥoj povas iĝi organizaĵo de venĝantoj. La frato-pordisto malvarmigis mian ardiĝintan fantazon, deklarinte, ke li nenion scias pri la kliviano, kies nomon li prenis, kaj ankaŭ pri aliaj klivianoj; li scias nur, ke tiuj ne kredis je Dio; tial ili nun kredas anstataŭ ili.

– Kial do, – demandis mi, kruele trompita en miaj atendoj, – vi havas kliviajn kronikojn, kaj vi eĉ ne provas esplori ilin?

La monaĥo, verŝajne, varmiĝis pro la brrbicio; li demetis de la kapo la kapuĉon kaj, rigardante al mi per siaj radiece plumitaj okuloj, diris:

– Ne ja, mi ilin legis. Inter niaj novicoj ne malmultas klerikoj, kiuj aniĝas al la ordeno ne pro pentado kaj ne pro pieco, sed esperante trovi ĉe la klivianoj kristaliĝintan esencon de la plej nigra Malbono. Tiaj baldaŭ foriras. Ĉu vi miras, fremdulo? Ni legas la kronikojn, por lerni la klivian lingvon, tamen tie estas nenio...

– Kiel nenio? – malrapide redemandis mi. Mi estis preta suspekti lin pri deziro kaŝi la veron.

– Nenio, krom frazoj. Propaganda fanfaronado, nure. Banalaĵoj kaj blufo. Ĉu vi miras? Kaj ĉu vi iam aŭdis pri potenco, kiu ne disŝutas ĉiuflanken promesojn de feliĉo, sed proklamas malesperon, dentogrincadon, priskribas propran fiecon kaj abomenecon? Neniu potenco iam ajn tion promesis. Ĉu ĉe vi estas alie?

– Ni ne parolu pri tio, – rapide respondis mi. – Sed ilia Ka-Undrio? Kio estis ĝi? Ĉu vi scias? Ĉu vi rajtas diri?..

– Ĉiam la samo, – ŝultrolevis li. – Ka-Undrio en preciza traduko signifas bonsfero.

Mi senspiriĝis.

– Ne povas esti! Do... ili deziris fari la samon, kiel vi?

– Jes.

– Tiukaze... kiel aperis la milito?

– Tio estis ne milito, sed senhoma kunpuŝiĝo de du ideoj.

– Aniks diris al mi, ke la lertonoj aperis kiel armilo...

– Probable, vi malĝuste lin komprenis. Ili aperis ne kiel armilo. Sed ili iĝis armilo, renkontinte tion, kio celis al ili mem.

Mi vidis, ke li kun peno serĉas vortojn sub senmova rigardo de la ceteraj, – kaj subite mi ekvidis tiun scenon kvazaŭ el ekstere. Homo, sidanta kun maloportune subfleksitaj kruroj inter estaĵoj, larĝe sidantaj sur siaj grandegaj piedoj, kun elstarantaj malantaŭen genuoj, kiel pezaj grandkapaj birdoj.

– Kunpuŝiĝis du versioj de la Bono, – diris finfine la monaĥo. – Ili diferencis per tio, kion nobla Tjukstl nomus programo. Tamen ne tro forte. Esence, ili koliziis tial, ke ili estis du projektoj de perfekteco. Se unu kontraŭ la alia ekstaros du eklezioj de unueca Dio, se ĉiu el ili staras por Li, sed postulas por si ekskluzivecon, permesantan

neniajn cedeojn, la afero povas finiĝi per batalo, eĉ se ĝin neniu dezirus. Ĉu ne tiel okazadis en historio? Kaj se eĉ fideleco al la Supera Bono kapablas naski ekstermadon, kiom pli rekte al tio kondukas ĉi-monda kredo, kies adeptoj kreis hordojn da nepensantaj plenumantoj! La du projektoj de beata sendieco kuris renkonten unu al la alia kaj renkontiĝis ne ĝuste meze de la vojo, ĉar unu el ili estis pli efika kaj havis pli grandan detruan forton. Kaj se fortunus al la klivianoj, vi sidus ne ĉi tie, sed inter malhelvizaĝuloj, en la suda rando de ilia altebenaĵo, kaj aŭskultus rakonton pri pereco de Norda Taraktio, mistera monstro, entombigita sub glaciejoj de Luzanio. Nur kun tia diferenco, ke tie vi estus inter nekredantoj. Ja la klivianoj, kiel mi jam diris, malkonfesis Dion, kaj ĉe ili vi pli malfacile trovus pentofaristojn...

– Do, ĉu ili vere deziris bonon?..

Mi neniel povis akcepti tiun penson.

– Mi pensas, ne malpli kaj ne pli, ol la patroj-fondintoj de la etikosfero. Sed nun mi devas iri. Adiaŭ.

La monaĥo ekstaris, surmetis sur sin la ŝtonon kaj ekiris, fleksiĝante sub la pezo. Mi tuj komencis pridemandi Tjukstl-on, ĉu li sciis tion, kion la monaĥo diris pri Klivio?

Li ne negis, tamen pruvadis, ke ĉio estis alie: laŭ li, la klivianoj havis aŭtoritatismajn idealojn kaj sian bonsferon ili deziris krei ne el lertonoj, sed el molekulaj mikrorobotoj, nomataj pigmoj, – ne nur malpli perfektaj, sed eĉ pli kruelaj, ol la lertonoj. Li superŝutis min per specialaj terminoj, mi vidis, ke li defendas sian aferon tute sincere, sed mi ne plu aŭskultis lin. Tamen, jam estis malfrua tempo. La du ceteraj ekstaris, por prepari la dormolokojn. Tjukstl eksilentis kaj same sendezire leviĝis. Min ĉirkaŭis mallertaj figuroj, kovritaj per densa velura lanugo, kun okuloj, dismetitaj preskaŭ same larĝe, kiel la nazotruoj, en kiuj ĉe spirado tremis malgrandaj plumetoj. Preparante min al dormo, mi elprenis el la orelo la tradukilon; kompreneblaj voĉoj iĝis rapidaj stridaj triloj. La poeto proksimigis al mi la strigajn okulojn kaj ion diris; mi komprenis lin, ĉar li almontris

la liton. Malheliĝis; ĉiuj jam ekdormis, juĝante laŭ egalmezura spirado, sed mi tute ne deziris dormi. Estas bone almenaŭ, ke neniu ronkas, pensis mi, ja mi ne eltenas ronkadon. Tamen, mi estas inter entianoj, kaj ili, verŝajne, ne ronkas. Ĉu iu aŭdis pri ronkantaj paseroj aŭ pingvenoj? En mia kapo ĉio miksiĝis. Por kio mi metis sur min malfacilaĵojn de stela vojaĝo? Ĉu por trafi kun aro de eks-birdoj en la nigran ventregon de duonmortinta kurdlo? Kiu? Mi, diplomata duonkuriero, ljon Tichy, eks-simio. Mi persone neniam estis simio, sed ja ĉiu el ili same neniam estis birdo. El kie do estas tiu malsana intereso al zoologio en genealogiaj esploroj? Ĉu vere, diris mi al mi mem preskaŭ kun malespero, mi nur tiel, stulte, povas pensi pri tiaj seriozaj kaj gravaj aferoj? Ĉu eksciis mi la sekreton de Nigra Klivio? Ŝajne jes; sed evidentiĝis, ke la sekreto – morna kaj nekomprenebla por ni – tute ne ekzistis, kaj estis io, tro bone konata al ni. Iu komencis ronki, kaj poste eĉ stertori, mi huŝis kelkfoje per antaŭlonge elprovita maniero, sed senrezulte. Mi leviĝis sur la kubuto, en timo, ke min atendas sendorma nokto, kaj tiam la stertoro transiris al tondrosimila gluglado. Ĝi estis venanta el ĉie, kvazaŭ ĉe pluvego. Tio estas ne ili, tio estas nur digestado de la kurdlo; tio estas murmuro en ĝia ventro, trankviliĝis mi. Mi plu kuŝadis kaj kuŝadis, sed dormo ne venadis. Kiel bidojn de rozario kalkuladis mi en la memoro miajn antaŭajn vojaĝojn. Kiom da ili mi havis! Tamen, kelkaj evidentiĝis sonĝo. Mi rememoris mian vekiĝon post la kongreso de futurologoj kaj subite pensis, ke, eble, ankaŭ nun mi sonĝas. Nenie sendormeco turmentas kun tia persisto, kiel en sonĝo, ja estas tre malfacile ekdormi, se vi jam dormas. Tiam pli facilas vekiĝi, tion komprenas ĉiu. Se mi vekiĝus nun, de kiom da klopodoj mi liberiĝus! Tio estus vere agrabla surprizo. Kaj mi streĉiĝis, penante disŝiri spiritajn ligilojn, per kiuj nin katenas sonĝo, sed, kiel ajn mi penis deĵeti ĝin de mi, kvazaŭ malhelan kokonon, mi nenion sukcesis. Mi ne vekiĝis. Alia realo ne ekzistis.

**Fino**

*Marto 1981*

# Apendico

## Eksplika teran-terana vortareto de luzanaj kaj kurdlandaj esprimoj, ordinaraj kaj sinturaj (vd: [Sinturo](#))

### Enkondukaj notoj

Rapida evoluo de entologio kaŭzis bezonon krei vortojn, kiuj estus sufiĉe lakonaj ekvivalentoj de entiaj esprimoj, signifantaj nekonatajn sur la Tero abstraktajn nociojn, kaj krome konkretajn objektojn.

Rezulte aperis vortaro de neologismoj, kiel eble plej precize transdonantaj sencon de aliplaneda esprimo. Malsupre mi donas manplenon da vortoj el tiu vortaro – tiuj, kiuj povas faciligi legadon de tiu ĉi libro. Mi inkludis ankaŭ kelkajn esprimojn, kiuj ne renkonteblas en la teksto, tamen ludas gravan rolon en la spirita kaj materia vivo de Entio. Al personoj, kiuj kun pli aŭ malpli granda sarkasmo riproĉas min pri tio, ke mi malfaciligas komprenon de miaj memoraĵoj kaj taglibroj, elpensante neologismojn, mi insiste rekomendas fari simplan eksperimenton, kiu klarigos al ili neeviteblon de tio. Tia kritikanto provu priskribi unu tagon de sia vivo en granda tera metropolo, ne elirante limojn de vortaroj, eldonitaj antaŭ la XVIII-a jarcento. Tiujn, kiuj ne deziras fari tian eksperimenton, mi petus ne preni en la manojn miajn verkojn.

---

konata ankaŭ kiel *Megapterix Sapiens* – granda racihava nefluganta birdo, la praulo de la entianoj, konformanta proksimume al nia pitekanthropo.

amplifiloj de moralo, etikaj sekurigiloj de lertonoj de la 16-a kaj sekvaj generacioj; preventas penojn de fiigo ([kretenigo](#)) de lertonoj, kiujn faras krimaj kaj disidentaj elementoj.

unu el multaj kolerabsorbaj establaĵoj en Luzanio, nomataj ankaŭ diboĉejoj.  
same kiel sur la Tero akvodukto liveras akvon, bonodukto sur Entio liveras (laŭ mendo) bonon (vd. ankaŭ Homodukto).

***Cadaveria Rusticana*** –  
pukbataliono sur paŝtejo (vd.: Pukbataliono).

***Civitatoro*** –  
de latina «civitas» (ŝtato) – reganta komputilo (vd. ankaŭ: Landopremanto).

metodo de dolĉigo de la vivo; permesas travivi tion, kion principe ne eblas travivi samtempe. Sendependaj fluoj de la konscio estas konektataj al ambaŭ duonsferoj de la cerbo, izolitaj unu de la alia per disrealigilo.

ciberanĝelo, androido-tradukisto, uzata ankaŭ por aerumado de ejoj kaj ceteraj servoj.

Prevento de intencaj malbonaj agoj per indikiloj, enkudrataj en la subveston (malbonaj intencoj kaŭzas akran atakon de iskiatalgio). Tiu teĥnologio havas en Luzanio nur historian valoron.

Dankema Objekto por Turmentoj kaj Torturoj (vd. ankaŭ: kiberludilo – por ludoj, robotsidulo – anstataŭas la mastron en kunsidoj, sesioj k. t. p.; vd. ankaŭ: Manekenigo, Familimultobligado).

duplikatita parenco, amiko aŭ proksimulo, mildiganta sopiron pri la mortintoj, aŭ incitiĝon pro malsameco de karakteroj (vd. ankaŭ: Manekenigo, Familimultobligado, sed tamen, vd. kien vi deziras).

konata ankaŭ kiel proponatoro, plifaciligas elekton de ĝuoj, distriĝoj k. t. p. Aparato, necesa en kondiĉoj de superflueco de variantoj. Elektokibero, difektita, distretita aŭ frakasita de la posedanto, tuj rekonstruas sin. Liberiĝi de ĝi ne eblas; estante elĵetita, ĝi sekvas la mastron, eĉ se tiu kaŝas sin en blendita kazemato (penetrante tien al li per specialaj blendopistiloj).

Estingiĝinta flamurdlo (vd. ankaŭ: humurdlo).

**Familimultobligado –**

substituo de parencoj kun malfacila karaktero per imitaĵoj (vd. [Homodukto kaj Manekenigo](#)).

**Genializo progresanta** ([Genialysis](#) [Progressiva](#)) –

apopleksio pro troeco de saĝo ĉe komputiloj, kondukanta al kurtumo de enigo kun eligo; tiaj enprofundiĝintaj en si komputiloj nomiĝas medituloj.

Persono, glutita de kurldo kaj eligita eksteren viva.

Granda Ĉasado al Indiferentaj Kandidatoj en potencorganojn de Luzanio.

bonodukto, liveranta duplikatulojn (vd.: [Duplikatulo](#)) kaj ceterajn imitaĵojn kaj androidojn. Transportado estas farata en pulvora stato; tial nomata Pulvora Persono muntas sin mem ĉe la mendinto post konekto de kurentofonto.

religio, dominanta en Luzanio. Mi skribis sur slipo, de kie devenis tiu vorto, sed, bedaŭrinde, nenie povis ĝin trovi.

([Honta Monumento](#)), monumento de malgloro, konstruata por memoro de la plej grandaj naciaj malherooj el speciala materialo, kapabla deformiĝi sub batoj, kaj poste restarigi la antaŭan formon. Kun kraĉujoj anstataŭ eterna flamo.

malsekiĝinta flamurdlo (vd. ankaŭ: [esturdlo](#)).

scienca fako, studanta evoluon de scioj pri tio, kion oni ne scias ĉi-momente.

scienca fako, mala al ignorantiko (vd.: [Ignorantiko](#)). Okupiĝas pri problemoj de ignorado de tio, kion oni ne scias ĉi-momente.

eksperto sur stadio de profundiĝo ([memfosado](#)) de scienco (vd. [Profundiĝo de scienco](#)).

persono de entiaj fabeloj: hibrido de virkoko kun kukolo ([danke al gena inĝenierado](#)). La virkoko respndas demandojn pri tio, kiom freŝaj estas kukolaj ovo.

kurdlo – siama ĝemelo.

danco en la ventro de kurdlo ([ne miksu kun ventrodanco!](#)).

supera pastro en kurdlanda antikveco.

estro de kurdlo, urbestro, estro de urbosaŭro.

Kampa herbo, hazarde infektita per lertonaj. Insultas, se oni ĝin surpaŝas.

substituo de naturaj personoj per surogataj, kiuj estas mendataj, ekzemple, en familimultobligaj metiejoj.

luzana malbonigista sekto. Opiniante, ke la kaŭzo de ĉies deprimado estas ĉies bonfarto, la malutilistoj ([konataj ankaŭ sub nomo de okulelŝiristoj](#)) penas helpi al la proksimuloj per torturado de ili ĝis morto.

loĝata kurdlo. Ankaŭ: urbosaŭro, politmobilo.

sekto, kiu predikas, ke civilizo estas perversio, tial oni stimulu en ĝi perversiojn, ĉar perversio de perversio elkondukas sur la rektan vojon, do kondukas al reveno al la normo.

Observanto kaj Kuratoro de Kurdloj, ankaŭ: kurdlestro; supera oficisto de kurdlanda administracio, estranta tretpartamenton ([vd.: Tretpartamento](#)).

persono, plufoje glutita de kurdlo.

Malsukcesa difino de la maniero de fekundigo ĉe la entianoj. La ĝusta termino estas polisemio. La virina seksa ĉelo ne povas esti fekundigita per unu vira spermatozoo; por impregno necesas minimume du spermatozooj de du genetike ne identaj maskloj ([do ili ne povas esti unuovolaj ĝemeloj](#)). Nuntempe ekzistas 47 teorioj, klarigantaj, kial sur Entio aperis ĝuste tiu maniero de reproduktado, sed pro manko de loko mi ilin ellasas. politika testejo, io simila al trejnilo por ŝtataj agantoj; nemalofte estas minita.

ekzilo en la postajn regionojn de kurdlo.

privata Galaksio, arkaika nocio, aperinta en la epoko, kiam luzaniaj civitanoj povis pretendi al aĉeto de elipsaj kaj spiralaj galaksioj. Nuntempe estas permesata nur luo por 10 000 jaroj.

se sciencistoj scias, ke interesantaj ilin malkovroj jam estas faritaj, sed ne scias, kie ili serĉu informojn pri ili, komenciĝas ekspedicioj en la profundon de scienco, aŭ inspedicioj. Ilin gvidas ekspertoj-internistoj, aŭ inspertoj. Tiun agadon oni ankaŭ nomas insperimenta, difference de la antaŭa eksperimenta.

sintezitaj animaloj, produkto de embria konstruado.

puna kurdlo, ankaŭ: VOPRIZo ([vojaĝanta prizono](#)).

bataliono de punaj kurdloj.

### ***Salto Rationale –***

ankaŭ: Regulo de Inverso de Praktikataj Sencoj ([RIPS](#)). Laŭ tiu regulo, se ĉe realigo de iu Ideo oni transiras la sojlon de Titikaks, la Ideo komencas efiki inverse. Super la sojlo de T. progresemaj ideoj iĝas malprogresemaj, ideoj, promesantaj bonstaton, kondukas al mizero, ĝojigantaj – subpremas k. t. p. La sojlo de T. estas difinata per rilato de la diametro de kranio al produto de averaĝo de ĉies elreviĝo pri la vivo kaj de la konstanto NM ([Neeviteblaj Miskomprenoj](#)).

Sinteza preparado de karieroj laŭ individua bezono, konforme kun la temperamento.

Sintezita naturo, kreita en Luzanio.

sintura prizono ([konvencia](#)). La afero estas en tio, ke en la sinturo ajnaj katenoj limigas liberon nur tiam, kiam la malliberulo tion deziras; se li deziros liberiĝi, lertonoj kaŭzas disfalon de la materialo, el kiu konsistas katenoj, ĉenoj k. t. p.

aŭtomato por hazardludo je ŝtato.

sojlo de saĝigo de la medio, post kies supero ĝi iĝas pli saĝa, ol la loĝantaj en ĝi raci havaj estaĵoj.

organo de loka administracio en Kurdlando.

insektoj, plenumantaj sur Entio la funkciojn de teraj verdaj kreskaĵoj.

persono, glutita de kurldo kaj eligita eksteren viva ([vd. ankaŭ: Plurglutulo](#)).

zoologia nomo de superaj entiaj animaloj ([pro vizaĝa lokalizo de la eksteraj seksorganoj](#)).

sciencisto, okupiĝanta pri mezurado de longo de vojo, kiun devas trairi serĉaj impulsoj, por atingi serĉatajn datumojn, entenatajn en la planeda memoro.

# Notoj

[1] *entia non sunt multiplicanda praeter necessitatem* – entoj ne estas multobligendaj super neceso (lat.) – eldiro de Occam.

[2] *Kulturdezernat* – departemento de kulturo (germ.).

[3] *Homo sum et nihil humani a me alienum puto* – Mi estas homo kaj nenio homa al mi estas fremda (lat.).

[4] *faux-pas* – mispaŝoj (fr.).

[5] *ergo* – sekve (lat.).

[6] *Ijon Tichy* – prononcu «ijon tiĥi».

[7] *nec Hercules contra plures* – eĉ Heraklo senfortas kontraŭ pluraj [malamikoj] (lat.).

[8] *post homicidium* – post murdo (lat.).

[9] *praesentes apud actum urationis aŭ defecationes* – ĉeesti ĉe agoj de urinado aŭ fekado (lat.).

[10] *In dubio pro reo* – ĉiuj duboj solviĝas por la akuzato (lat.).

[11] *dolus* – dolo, krimintenco (lat.).

[12] *corpus delicti* – krimpruvo, krimkonsisto (lat.).

[13] *Gastarbeiter* – gastlaboristo (germ.).

[14] *Fac quod vis* – faru kion vi deziras (lat.).

[15] *cordon bleu* – kotleto, farĉita per legomoj (fr.).

- [16] *faux-pas* – mispaŝo (fr.).
- [17] *Nolo contendere* – ĉi tie: mi ne enketos (lat.).
- [18] *ante rem* – antaŭ ol (io okazis) (lat.).
- [19] *prima vista* – ĉi tie: sen esploro (lat.).
- [20] *doctor honoris causa* – honora doktoro (lat.).
- [21] *contra rem* – kontraŭ (lat.).
- [22] *in abstracto* – abstrakte (lat.).
- [23] *honoris caudae* – Estimante voston (lat.), analogie kun *honoris causa* – estimante meritojn.
- [24] *Sursum corda!* – Ni levu la korojn! (lat.).
- [25] «*Historia naturalis praedatorum Entianum*» – «Natura historio de entiaj rabobestoj» (lat.).
- [26] *orificia oviductales* – ovoduktaj truoj (lat.).
- [27] *sine ira et studio* – sen kolero kaj prefero (lat.).
- [28] «*Inter faeces et urinam nascimur*» – Inter fekaĵo kaj urino ni naskiĝas (lat.).
- [29] *delectatio morosa* – senbrida ĝuo (lat.).
- [30] *homo sapiens* – homo raciĥava, homo saĝa (lat.).
- [31] *homo entiaensis* – homo entia (lat.).
- [32] *Homo Novus Entianus* – nova entia homo (lat.).

- [33] *status delectationis* – stato de delico (lat.).
- [34] *Per aspera ad astra* – Tra dornoj al astroj [iras la vojo] (lat.).
- [35] LIVE – Viva (ang.).
- [36] POST MORTEM – Postmorte (lat.).
- [37] *professor of computer sciences* – Profesoro de komputilaj sciencoj (ang.).
- [38] «GO» – «EK» (ang.).
- [39] *minorum gentium* – malpli valora (lat.).
- [40] *ad personam* – Aplike al personoj (lat.).
- [41] *Corruptio optima pessima* – Falo de la bona estas la plej malbona falo (lat.).
- [42] *law and order* – Leĝo kaj ordo (ang.).
- [43] *Höllenfahrt* – Descendo en la inferon (germ.).
- [44] *Circulus Vindobonensis* – La Viena rondeto (lat.) – societo de filozofoj-novpozitivistoj (1920–1924).
- [45] *Muĝanta Salmo* – De germana röhren (muĝi) kaj franca saumon (salmo).
- [46] *quis custodiet ipsos custodes?* – Kiu gardos la gardantojn mem? (lat.).
- [47] *Deus ex Machina* – Dio el maŝino (lat.).
- [48] *Geburtstag* – Naskiĝtago (germ.).

[49] *primum edere, deinde philosophari* – Oni unue manĝu, kaj nur poste filozofiu (lat.).

[50] *Tertium datur* – La tria [eblo] estas donita (lat.).

[51] *right or wrong my country* – Ĉu prava aŭ malprava, [tio estas] mia lando (ang.).

[52] *ars pro arte* – Arto por arto (lat.).

[53] *Bacillus benzinogenes, Spirocheta oleopoetica* – benzingenera bacilo, olekreanta spiroketo (lat.).

[54] *Vibrio Pelerinae* – pelerinaj vibrioj (lat.).

[55] *Pecco, ergo sum, et nihil obscoenum a me alienum puto* – Mi pekas, sekve, mi ekzistas, kaj nenio maldeca al mi estas fremda (lat.).

[56] *Per viscera ad astra* – Tra visceroj al astroj (lat.).

[57] *ex nihilo* – el nenio (lat.).

[58] *diverticulum duoden-jejuna* Xaater – divertikulo de duodeno de Ksaater (lat.).

[59] *deformitatis congenitae articulationum genu* – denaska difekto de la genua artikolo (lat.).

[60] CITO VENIENTIBUS OSSA! – al frua veninto – la ostojn! (lat.).